LA VILA MANO



Ĉi tiu verko estas kontrolita de fraŭlino Maria Ŝidlóvskaja kaj rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj.

19154

951 F52

LA VILA MANO

IDOJ DE CERESO

ORIGINALA ROMANO

DE

H. J. BULTHUIS, L. K.

verkinto de „Idoj de Orfeo", de „Idoj de Merkuro" k.c.

Ilustrita de TJEERD BOTTEMA

N.V. JOH. YKEMA'S UITG.-Mij. — 1928. — 'S-GRAVENHAGE.

KONINKLIJKE BIBLIOTHEEK

ĈAPITRO UNUA.

„La Verda Ĉevalo" kaj kio okazis tie — Peĉjo Klakilo[3]*) lia servisto (-aerkasteloj) — liaj klientoj[4]. Kelkaj Idoj de Cereso.

En ĉerk' ripozis Ŝercemul',
Li kuŝis — sterniĝinta,
Kaj ĉiuj plendis: Ŝercemul'
Nun estas jam mortinta.
Ho ve! ho ve! ho ve!

Sed jen subite Ŝercemul'
En sia ĉerk' sidiĝis,
Kaj ĉiuj kriis: Ŝercemul'
El morto reviviĝis.
Hura! hura! hura!

El ĉerko saltis Ŝercemul'
Li dancis tra la domo,
Kaj ĉiuj kantis: Ŝercemul'
Vi estas stranga homo!
Brave! brave! brave!

Peĉjo Klakilo (en realo lia nomo estis Petro Blunt) kviete sidis sur la kanapo kaj deklamis la supre cititan kanton, akompanante ĝin per laŭtaj klakadoj de siaj manoj, brue kunfrapante ilin ĉe ĉiu akcentigata silabo, kiun li plilaŭtigis. Peĉjo Klakilo estis en bona humoro kaj tial li deklamis. Oni rakontis pri li en la vilaĝo, ke preskaŭ neniam li estis en malbona humoro kaj tial li ĉiam deklamis, sed nur la deklamaĵon pri la Ŝercemulo, kiun li estante ankoraŭ knabeto estis lerninta de sia patrino. Kiam li ne deklamis, li parolis al si mem, kaj kiam

*) La ciferoj ĉe la vortoj rilatas la klarigojn en aparta kajereto je la fino de la libro.

li havis vizitantojn, li senĉese vigle interparolis kun ili, lasante al aliaj nur maloftan okazon ankaŭ diri kelkajn parolojn. Pro tio Petron Blunt oni ordinare nomis Peĉjo Klakilo, kaj oni faris tion jam tiel longe, ke tiu nomo ŝajnis esti la sola, kiun li havis, ĉar nur tre malofte iu nomis lin per lia vera nomo. Peĉjo Klakilo estis sepdekjara viro kun razita vizaĝo, kalva[5] kapo, sed ĉirkaŭ liaj nuko kaj oreloj pendis unu flanke de alia aro da delikataj grizaj ringoformaj harbukloj, kaj ĉar li ĉiam surhavis silkan ĉapon, li aspektis kiel viro kun multaj haroj. Liaj grizaj okuloj akre, ruze kaj honeste rigardis ĉiujn rekte en la vizaĝon kaj inter la okuloj elstaris lia dika nazo kun larĝaj flugiloj, kiuj konstante moviĝadis kiam li parolis. La vizaĝo de Peĉjo estis iom sunbruniĝinta, ĉar li ofte estis eksterdome, irante de unu farmejo al alia por aĉeti kaj vendi bovinojn, ŝafojn kaj ĉevalojn, li estis ja ne nur drinkejestro de „La Verda Ĉevalo" sed ankaŭ brutkomercisto.

Lia drinkejo, speco de hotelo, kian oni ĉie trovas en la norda parto de la provinco Groningen, utilis ne nur kiel kunvenejo dum sabatvesperoj de la ĉirkaŭloĝantaj bienposedantoj, farmistoj kaj kelkaj burĝoj, sed ankaŭ kiel hotelo, kiam venadis vilaĝon maloftaj vojaĝantoj por tie pasigi la nokton. Dum la tagaj horoj nur kelkfoje venis vizitantoj, tial la drinkejestro uzis tiujn horojn por labori en sia ĝardeno; aŭ por brutkomerco, ĉu komisie por la farmistoj, kiuj mem ne kuraĝis aĉeti ĉevalojn, ĉu por sia propra risko. Okazis tial ke li de tempo al tempo iris al brutvendejoj en la urboj de la provinco aŭ aliloken por vendi ĉevalojn kaj bovinojn, kiujn li estis aĉetinta proprakomerce. Peĉjo estis moviĝema kaj honesta viro, ĉiu en la provinco konis lin pro liaj multaj vojaĝoj al la brutvendejoj tiom pli ke li alparolis ĉiun, kiun li renkontis.

Lia drinkeja ĉambro estis vastega ejo. Enirante ĝin, oni vidis kvar flave pentritajn murojn, plen-plen kovritajn je reklamanoncoj kaj pentraĝoj aŭ ĝuste dirite: oleografaĵoj[6], kelkaj kun kadroj. La meblaro konsistis el dudeko da seĝoj, kvino da tabletoj, longa kanapo staranta en la fundo, du malnovmodaj pendantaj petrololampoj kaj bufedo[7].

Peĉjo sidis kiel laŭkutime sur la mezo de la kanapo, dekla-

mante sian poemeton, akompanante ĝin per laŭtaj bruklakoj de siaj manplatoj:

El ĉerko saltis Ŝercemul',
Li dancis tra la domo,
Kaj ĉiuj kantis: Ŝercemul'
Vi estas stranga homo!
Brave! brave! brave!!

Li ekstaris, ekpromenis tra la drinkeja ĉambro, dezirante ke baldaŭ venu iuj klientoj, ĉar sen klientoj li ne sentis sin en sia elemento. Sed estis ankoraŭ tro frue en la vespero por la kutimaj sabatklientoj, do neniu venis. Peĉjo promenis kelkfoje tra la drinkeja ĉambro, fine li eliris tra unu el la tri pordoj por direkti sin al la traveturejo [8] aŭ atendejo, en kiu ofte staris la jungitaj ĉevaloj, dum iliaj mastroj-farmistoj, interrompintaj sian vojaĝon sidis en la drinkoĉambro, nepre babilante kun Peĉjo Klakilo.

La traveturejo estis longa sed mallarĝa konstruaĵo kun tera planko, ŝtonaj muroj kaj tre alta pinta tegmento el kanoj.

Peĉjo trapaŝis sur la tera planko kaj malfermante larĝan pordon eniris la ĉevalejon, kie du ĉevaloj kviete staris tirante tufetoj da fojno el la fojnokadro [9], pendanta oblikve [10] super iliaj kapoj. Peĉjo estis fiera pri siaj ĉevaloj; ili estis bonaj, taŭgaj bestoj, kiujn li aĉetis aŭtaŭ kelkaj monatoj en la urba ĉevalfoiro [11] atendante nur la okazon por vendi ilin je bona profito kaj gajno.

En la ĉevalejo, aukaŭ eĵo de buterigilo, tute kalkŝmirita, troviĝis en angulo pumpilo [12], ĉe kiu junulo ĉirkaŭe dekokjara diligente senplumigis dekon da grasaj anseroj kaj saman kvanton da anasoj. Tiu junulo estis stultulo [13], duone idiota sed kapabla plenumi sufiĉe bone la ĉiutagan laboron de ĉevalej-servisto en la „Verda Ĉevalo", ĉar lia tasko konsistis nur el la prizorgado de la ĉevaloj, purigado de la ĉevalejo kaj traveturejo, melkado de kvar bovinoj kaj samspeca laboro. Nun li sidis sur renversita sitelo meze de amaso da senplumigotoj birdoj, kiujn li senplumigis kun tia fervoro kaj diligenteco ke la plumetoj, flugpendantaj ĉie en la ĉevalejo, baldaŭ tute kovris lin de supre malsu pren. La senplumigado de anseroj kaj

anasoj estis por la stulta Dirk, tiel oni lin nomis, tute eksterordinara kaj grandega amuzaĵo.

Peĉjo haltis antaŭ la servisto kaj alrigardante lin diris kun rideto:

— Kviete, Dirk, kviete, ne tiel disĵetu la plumetojn, ili sufokos vin kaj la ĉevalojn.

Dirk, kiu estis junulo silentema, ne respondis sed pintigante la buŝon, kvazaŭ fajfonta, tusis kelkfoje por liberigi siajn pulmojn, nazotruojn, buŝon kaj gorĝon de plumetoj, iom post iom ĉien enpenetrintaj.

— Ĉu vi preskaŭ finis? — demandis Peĉjo, okule kalkulante la senplumigitajn birdojn, amase kuŝantajn unuj sur aliaj ĉirkaŭ la servisto.

— Ankoraŭ du! — respondis Dirk, aperigante du anasojn el sub nubego da plumoj ĉe la pumpilo. Poste li tuj residiĝis sur sian renversitan sitelon kaj rekomencis la senplumigadon, sed iom pli malrapide kaj singarde, ĉar li estis en ĉio obeema servisto.

— Bone! — diris Peĉjo. — Bone! Post la senplumigado metu la plumojn en sakon kaj portu ĝin supren al la subtegmentejo de la porkostalo; la birdojn pendigu en la drinkeja ĉambro sur la vestokroĉilojn, kaj la vestojn kaj la ĉapojn, sur ili pendantajn, metu en la dormejon; fine purigu la ĉevalejon kaj nepre purigu la ĉevalojn ĉar ili estas superŝutitaj per plumetoj... Ĉu vi komprenis?

— Jes —

Dirk daŭrigis sian laboron kaj lia mastro iris pluen tra la malalta pordo de la ĉevalejo en duan stalon, nome en la bovinejon kaj porkostalon. Tiu duobla stalo estis preskaŭ malplena: la bovinoj sin paŝtis sur la paŝtejo, kuŝanta ekster la vilaĝo, en la porkostalo kuŝis nun du grasaj porkoj.

Peĉjo Klakilo rapide (li ĉiam ĉion faris rapide) sin direktis al la porkoj, sin klinis super ili dirante:

— Belaj grasaj bestoj!... Ili prosperas... Se ili estas same nutrataj ankoraŭ unu monaton, mi povos ilin buĉigi kaj parte vendi kaj parte enbareligi... ĝi estos bona provizo por la proksimiĝanta vintro.

Dirinte tion li verŝis kelke da kuleregoj da nutraĵo — pano kun buterlakto kaj kuiritaj terpomoj — en la trogon[14] de la porkejo. Tuj la porkoj brue ekstaris, ŝutforpelis de si armeon da grasaj muŝoj, kuris al la ĵus verŝita nutraĵo kaj ektrinkis kaj ekmanĝis dum Peĉjo kontentmiene ilin rigardis.

— Bone! — li diris. — Ili havas bonan apetiton.

Ĉiam parolante pri la porkoj, pri la buĉisto, kiu post unu monato buĉos ilin, pri ĉiaj aliaj aferoj, Peĉjo staris kurbigita rigardante kontente al la porkoj ĝis ili ĉion formanĝis.

Intertempe la muŝoj refoje svarme[15] sidiĝis sur la bestojn kaj Peĉjo ilin forpelis per sia ĉapo. Sed la muŝoj ne estis tiel obeemaj kiel Dirk, la servisto, ĉar ili tuj revenis kaj denove sidiĝis sur la dorsojn, orelojn kaj flankojn de la gruntantaj[16] bestoj, kiuj senĉese movetadis la vostojn kaj orelojn por fortimigi la ilin pikvundantajn insektojn.

— Malbeninda fiaĵaro![17] — fine ekkriis Peĉjo, sed ankaŭ tiu insulto ne efikis: la muŝoj ne forflugis de la porkoj sed restis obstine sidantaj kaj pikantaj ĝis fine la gruntantoj kuŝiĝis agante kvazaŭ la insektoj jam ne ekzistas. Ankaŭ Peĉjo foriris, metante la ĉapon sur la kapon kaj la manojn sur la dorson, ĉar neniam li enpoŝigis ilin, opiniante ke ion tian faras nur maldiligentuloj kaj kelkaj farmistoj aŭ bienposedantoj, kiuj neniam faras ion alian ol promeni tien kaj reen sur la kamparo por kontroli la laboron de la geservistaro.

Peĉjo iris returnen laŭ la sama vojo; unue en la ĉevalejon, kiun la servisto estis puriganta per siteloj da akvo, poste en la traveturejon kaj fine en la drinkejan ĉambron, kie refoje li sidiĝis sur sia kanapo, parolante al si mem. Tie li restis duonan horon.

Dume Dirk enportis kaj pendigis la senplumigitajn birdojn sur la indikitan lokon.

Dirk, la stultulo estis dika knabego kun ronda malbela kapo, similanta tiun de mopso[18]; lia malsupra makzelo elstaris antaŭen, lia nazo estis tre larĝa kaj plata kaj ankaŭ liaj rondaj okuloj havis grandan similecon kun tiuj de mopso.

Irante, li konstante sin kurbis autaŭen eĉ se li nenion portis surdorse.

Dirk treniĝis nun el la ĉevalejo al la drinkeja ĉambro kun kvar birdoj en la manoj; pendiginte ilin, li tuj sin returnis por ree alporti kvar aliajn. Tiel li devis kvinfoje iri kaj returneniri ĝis fine la anasoj kaj la anseroj pace kaj senmove pendis en unu vico.

Poste Dirk iris al la ĉevalejo por ankaŭ forigi ĉiujn plumerojn el la fojnokrado kaj de sur la ĉevaloj, kiuj staris kvazaŭ neĝekovritaj.

Kiam Dirk laboris aŭ ripozis, li preskaŭ ĉiam dronis en meditadoj[19] ĉar kvankam li parolis nur tre malofte li daŭre pripensis kaj meditis pri strangaj aferoj, ĉiam konstruante al si aerkastelojn, kiuj tamen tre baldaŭ ruiniĝis.

Dirk ne estis egoisto, nek altruisto, sed nur simpla stultulo trovanta ĉion tre natura kaj neniam miranta pri kio ajn. Li trovus tre natura la fakto, ke subite la ĉevalo, kiun li nun estis senplumiganta, kurus el la stalo eksteren por forflugi kiel ordinara aeroplano: aeroplano povas flugi, kial do la ĉevalo ne posedus la kapablon flugi? Sed la ĉevalo ne kuris eksteren por flugi for, sed restis kviete staranta dum la servisto forigis ĉiujn plumetojn dise kuŝantajn sur ĝia korpo. Dum tiu laboro li pripensis la eblecon ke li mem estus ne nur la posedanto de tiu ĉevalo sed de arego da ĉevaloj: Mi starigus ilin (tiel li revis) en belaj ĉevalejoj, mi aĉetus aron da veturiloj, dungus aron da servistoj kaj havus multan laboron por ili; mi perlaborus multe da mono por pagi la salajron al miaj servistoj; mi ludonus ĉevalojn kaj veturilojn al vilaĝanoj irantaj dufoje en la semajno al la urbo; mi... mi...

Sed la ĉevaloj, veturiloj, ĉevalejoj kaj servistoj kun la luigantoj subite intermiksiĝis, tiel ke ankaŭ la pripensoj de Dirk intermiksiĝis kaj nebuliĝis, kaj fine la bela aerkastelo disvaporiĝis kaj malaperis el la kapo de la stultulo.

Unu-du minutojn li staris kun pintigita buŝo, sencele rigardante antaŭ si, poste li subite kaptis plumeton de sur unu el la oreloj de la ĉevalo kaj denove li diligente eklaboris dum alia aerkastelo estis konstruota.

La ĉevaloj fine estis sen plumoj kaj Dirk purigis la foĵnokradon. Plenuminte tiun lastan taskon li iris eksteren, malantaŭ

la domon kie pendis sur la muro granda kuniklejo dividita en tri egalajn apartamentojn. En unu sidis deko da tre junaj kuniklidoj, en la meza apartamento sidis la patrino kaj en la tria la patro de la kuniklidoj. Ĉiuj estis blankaj kiel neĝo, ĉar Dirk plej multe amis blankajn kuniklojn. Tiuj bestoj estis lia propraĵo, lia trezoro. Li ilin prizorgis kun sindoneco, eĉ kun amo, li regule purigadis la pendantan kuniklejon, regule enmetis freŝan pajlon kaj same regule nutris la bestojn; ankaŭ nun li plenigis la manĝejon: nome larĝan breton, kiu estis kunigita al la malsupra parto de la kuniklejo. Per la blankaj piedetoj la kunikloj tiris al si tiujn aĵojn kaj komencis rapide manĝeti, rapidege movante la naztruojn.

Dirk ekstaziĝis kaj kun ĝojo rigardis al sia trezoro el kiu li baldaŭ esperis vendi grandan kvanton. Li denove revis kaj denove konstruis al si aerkastelon. Li pensis: „Ho, se mi estus Alings, (Alings estis tre riĉa terposedanto loĝanta ekster la vilaĝo)... mi konstruus grandegan domon kun cent ĉambregoj... en ĉiu ĉambrego mi lokus cent kuniklejojn... en ĉiu kuniklejo mi volus havi cent kuniklojn... kaj mi volus dungi cent knabojn por serĉkolekti nutraĵon, sed mi mem nutrus miajn kuniklojn... ho! kiom da kunikloj mi posedus se mi estus Alings...!"

Sed li estis nur la malriĉa stulta Dirk, posedanta nur unu kuniklejon; fine pensante, ke li ne estas la enviinda terposedanto Alings, la nura ekpenso pri la ebleco esti tia riĉulo, jam feliĉigis lin kelkan tempon, sed ĉar la aerkastelo kun tiuj miloj kaj miloj da kunikloj disvaporiĝis kaj malaperis el lia kapo, li malrapide reiris en la domon kaj dum liaj lignaj ŝuoj laŭtakte klaksonis sur la malmola tera planko, li sin direktis al la traveturejo por ĝin balai.

— — — — — — — — — — — — —

Dum Dirk dronis en meditadoj farante novajn aerkastelojn, lia mastro kviete sidis en sia drinkeja ĉambro, mallaŭte parolante al si mem. Li etendis la kvin fingrojn de la dekstra mano kaj kurbigante per la montra fingro de la maldekstra mano unu fingron post la alia, li kalkulis la vizitontojn de la alproksimiĝanta vespero: Ritsma (li kurbigis la fingreton) Skrant (li kurbigis la duan fingron) Vestberg (li kurbigis la trian

fingron) Rinders (li kurbigis la kvaran) Klaj (la kvinan). Subite li etendis la maldekstran manon kaj kalkulante per la montra fingro de la dekstra, li daŭrigis: Polman, Erasmus, Vulkanus, Benders, Knel... Jen, jam tuta deko, kiu certe venos. Nu, ili venu!... la forlototaj birdoj pendas tie kaj atendas...

Ĝoja kaj bonhumora pro la amuza vespero, Peĉjo Klakilo brubatis la manplatojn deklamante:

En ĉerk' ripozis Ŝercemul!
Li kuŝis — sterniĝinta,
Kaj ĉiuj plendis: Ŝercemul'
Nun estas jam mortinta.
Ho ve! ho ve! ho ve!!

Li ekstaris kaj irante al la senplumigitaj birdoj, pendantaj sur la najlegoj, ordinare utilantaj por pendigi ĉapojn aŭ vestaĵojn, li palpis la unuan kaj tre grasan anseron dirante:

— Bela ansero; mi miras, kiu estos la gajnanto; sed la aliaj estas ankaŭ belaj, grasaj kaj gajnindaj.

Returnante sin li deklamis plue:

Sed jen subite Ŝercemul'
En sia ĉerk' sidiĝis,
Kaj ĉiuj kriis: Ŝercemul'
El morto reviviĝis.
Hura! hura! hura!!

El ĉerko saltis Ŝercemul'
Li dancis tra la domo...

Subite la strat-pordo malfermiĝis kaj kapo ŝoviĝante en la drinkejan ĉambron deklamis:

Kaj ĉiuj kantis: Peĉjo Blunt,
Vi estas stranga homo!
Brave! brave! brave!!

Blunt laŭte ekridegis kaj tion saman faris la nova veninto, la sepa el la atendataj gastoj laŭ la fingro-kalkulado de la drinkejmastro.

Erasmus tuj sin direktis al la vico da senplumigitaj birdoj kaj frapetante ĉiujn unu post alia sur la grasan ventron, li diris:

— Belaj birdoj, Peĉjo, kaj grasaj kiel butero. Ĉu vi atendas ankaŭ eksterordinarajn vizitantojn hodiaŭ vespere?

— Nur la ordinarajn mi atendas... eble la vilaĝestro kaj unu el la instruistoj venos, sed tio ne estas certa.

— Vi tamen presigis anoncon en la gazeto; mi ĝin legis.

— Jes, kaj jen mi aŭdas la anonciston.

Ambaŭ iris al la fenestro kaj rigardis sur la straton, kie en tiu momento aŭdiĝis laŭta sonorilo tuj sekvata de la laŭta voko de la publika vilaĝa anoncisto, plengorĝe kriante:

— Hodiaŭ vespere je la sepa horo komenciĝos la publika forlotado de belaj, grasaj anasoj kaj anseroj en la Verda Ĉevalo de Petro Blunt. Ĉiu, deziranta gajni grasajn anserojn kaj anasojn, rapidu al la drinkejo, kie estas atendataj tiom da vizitantoj, ke nur parto de la lotantoj povos sidi, ĉar la tro malfruiĝintoj devos resti starantaj la tutan vesperon!!!...

Peĉjo kaj Erasmus laŭte ridis pro la ŝercaĵo de la anoncisto, kiu iris plue por rekomenci sian vokadon sur ĉiuj stratanguloj de la vilaĝo dum Petro kun sia unua gasto sidiĝis sur la kanapon por babili ĝis venos aliaj klientoj...

Intertempe Dirk la servisto balais la traveturejon per longega balailo ĉiam konstruante al si novajn aerkastelojn. En klinita pozo li svingis la balailon de dekstre maldekstren, ĉiufoje ĵetante flanken nubeton da polvo. Ŝajnis ke tiuj polveroj ne malhelpis al li aerkonstrui, kvankam parto da ili penetris liajn nazon kaj gorĝon: tio estis nur bagatelo tute ne ĝenanta lin. Regule balaante kaj regule antaŭen trenŝovante unu el la lignaj ŝuoj post la alia, la stultulo purigis jam la duonon de la tera planko, konstruante ĉiajn eblajn aerkastelojn. Li jam ne pensis pri la miloj da kunikloj, deziritaj antaŭ kelka momento, sed nun deziris ion tute alian: Se mi estus Alings, mi konstruus novan, grandan drinkejon kun multego da drinkej-ĉambroj kaj grandegan traveturejon kun ligna planko, ĉar plankon el ligno oni povas pli oportune balai ol ŝtonan aŭ teran. Mi volus havi dekon da servistoj por purigi la grandan drinkejon kaj traveturejon kaj mi metus longan benkon ĉe unu el la muroj

de la traveturejo por ke la servistoj oportune povu sidi tie unu flanke de alia post kiam ili estus purigintaj...

Kiam li estis konstruinta tiun parton de la aertrinkejo, lin interrompis rulado de proksimiĝanta veturilo sur la strato. Dirk rapide formetis la balailon kaj trenŝoviĝis al unu el la du strataj pordoj de la traveturejo kaj ĵetmalfermis ĝin por ke la veturilo povu eniri. Ĝi enveturis kaj haltis en la mezo. Dirk fermis la pordon kaj irante al la ĉevalo, kaptis ĝin ĉe la brido. Samtempe el la veturilo saltis juna farmisto, kiu dirante nenion al la servisto, iris en la drinkejan ĉambron.

Dirk, kiu devis gardi la ĉevalon de la farmisto, ne rekomencis la balaadon sed stariĝis flanke de la ĉevalkapo kaj pacience tie restos por atendi la revenon de la farmisto. Li antaŭe sciis, ke tiu farmisto restos almenaŭ du aŭ tri horojn en la drinkeja ĉambro, ĉar tion Ratsma kutime faris. Dirk ĉiam ĝojis pri la veno de Ratsma, ĉar tiu farmisto estis unu el la plej malavaraj el ĉiuj farmistoj kaj terposedantoj de la vilaĝo. Ĉiam li rekompencis la serviston de Blunt per kvaronguldeno pro la fidela gardado, kaj ĉiuj tiuj moneroj estis por Dirk, kiu zorge kolektadis ilin en ligna ŝparkesteto. Ĉiun tiel recevitan moneron li glitigis en ĝin tra kvin centimetroj longa kaj duon-centi-metroj larĝa fendo, intence segita tie por traglitigi eĉ la plej grandan moneron el arĝento, nome Nederlandan taleron = du guldenojn kaj duonon. Nur unu fojon Dirk estis ricevinta tian moneron kaj kvankam li forgesis pri multaj aferoj, li neniam forgesis ke unu fojon li ĝin ricevis de farmisto, revenanta de enterigo de riĉega onklo, kies sola heredanto li estis. Dirk, kies salajro konsistis el la rekompencoj de la klientoj veturile alvenantaj, refoje nun pensis pri tiu sola okazo kaj image li denove glitigas la brilan moneregon tra la fendo de la ŝparkesteto. Ho, se la ŝparkesteto estus plena de tiaj moneregoj, tiam li aĉetus belan pordimanĉan kostumon kun ledaj ŝuoj, kaj li promenus tra la vilaĝo vidigante la kostumon kaj precipe la ŝuojn, ĉar ledaj ŝuoj estis por Dirk io tre eksterordinara, kion li ĝis nun neniam posedis. Ho, se la ŝparkesteto estus plena de tiaj moneregoj, li aĉetus ne nur belajn vestojn kaj ŝuojn el ledo, li ankaŭ...

Sed dua veturilo, proksimiĝanta kaj jam ekhaltanta antaŭ

la travetureja pordo, interrompis la revadon de Dirk kaj subite forblovas la apenaŭ komencatan aerkastelon. Refoje la stultulo malfermis la pordon por enirigi la veturilon. La dua veninto estis la farmisto Knol, kiu ofte donis nenion al Dirk, sed spite tio la servisto devis gardi lian ĉevalon kaj tion li ĉiam faris, ĉar li estis same akurata kaj zorgoplena por ĉiuj klientoj veturile venantaj en la „Verdan Ĉevalon".

Ankaŭ Knel malaperis en la drinkejĉambron kaj Dirk devis atenti du ĉevalojn. Li faris tion plezure, ĉar ju pli da veturiloj venos, des pli multe da moneroj li rivecos, tion li jam spertis, kaj la sperto estis ankaŭ ĉe Dirk la plej bona instruisto.

La tempo pasis kaj sinsekve [20] venis pli da veturiloj, dum kelkaj klientoj, burĝoj kaj farmistoj, piede eniris la „Verdan Ĉevalon", tiel ke je la sepa horo jam trideko da personoj sidis kune en la drinkeja ĉambro, laŭte babilante, forte fumante kaj atendante la komenciĝon de la loterio, kaj la horo en kiu komenciĝos la loterio, fine eksonis.

— „Mi bezonas skribiston por noti la nomojn kaj ĵetotajn poentojn [21] de la kunlotantoj —" diris Peĉjo, kaj baldaŭ tiu skribisto estis trovata, ĉar unuvoĉe oni proponis, ke Erasmus, skribisto de la vilaĝa notario plenumu tiun funkcion.

La vizitantoj sidis nun ĉe la tabletoj kaj antaŭ ĉiu viro staris glaseto da brando, ĉar oni kutime trinkis brandon dum la loteria vespero. Peĉjo rapide disportis la glasetojn kaj la vizitantoj elblovis dens-dikajn tabaknubojn kaj dum la laŭta eĉ brua interparolado, similanta zumadon de svarmo da abeloj, aŭdiĝis eĉ de sur la strato, la nove elektita skribisto sidiĝis ĉe la granda tablo. Ni nomis lin Erasmus, sed tio estis nur lia moknomo; li sin nomis Velt, sed ĉar la profilo de lia vizaĝo estis tre simila al tiu de la fama filozofo, kaj verkinto de la Laŭdo pri la Malsaĝeco [22], ĉiuj nomis lin Erasmus, kaj li estis flatata de tia honor-nomo. Velt estis tre malgrasa vireto kun flaviĝinta vizaĝo kaj glataj jam grizaj haroj. En la trinkejo kaj sur la strato li estis tre babilema kaj kuraĝa viro, sed hejme lia edzino estis la mastrino pri ĉio, koncernanta ne nur la mastrumadon, sed ankaŭ pri ĉio, rilatanta la agadojn de la vireto, kiu jam de la unua tago de sia edzeco estis sub la ŝuo

de la edzino. Velt estis tre ŝatata viro ekster sia domo; li ĉiam helpis la vilaĝanojn pri administraj aferoj kaj heredaj malfacilaĵoj; li redaktis petskribojn por ĉiu, bezonanta ilin kaj ĉion tion li faris senpage al malriĉaj homoj, la riĉuloj pagis, kion ili deziris. Velt ne nur estis lerta, klera skribisto sed ankaŭ poeto. Li verkis poemojn por ĉiuj okazoj. Se knabo aŭ knabino deziris sendi poemon al onklo kaj onklino okaze de ilia arĝenta geedziĝo, aŭ se proksimiĝis la naskiĝtaga datreveno de avo aŭ de avino, ili iris al la notaria skribisto por peti belan poemon kaj tuj la vireto faris ĝin tute senpage. En la vilaĝo estis nur unu, kiu tre malamis tiajn poemojn kaj kiu malbenadis la poetan talenton de Erasmus, kaj tiu estis Erasmus-edzino, la alia duono de Velt. Tial li kiel eble plej sekrete kontentigis siajn petantojn, akceptante ilin prefere en la oficejo de la notario, ĉar okazis jam pli ol unu fojon ke la edzino de la poeto fortimigis la petantojn, kiuj venis en ŝian domon por peti poemeton.

Petro Blunt konstante disportis novajn glasetojn da brando kaj cigarojn inter siaj vizitantoj, fine li ekkriis brubatante la manplatojn:

— Ni komencu, amikoj —! kaj irante al la unua, la plej grasa ansero, li ĝin kaptis de sur la vestokroĉilo kaj levante la birdon kiel eble plej alte per la dekstra mano, li rapidis kun ĝi al la granda tablo, kaj ĵetante la anseron sur ĝin, li ekkriis:

— Jen la unua!... Sekretario, notu la nomojn de la lotantoj... Kiu deziras gajni tiun grasan birdon?

Kvar partoprenantoj ekstaris kaj ĵetante kvaronguldenon sur la teleron, sciigis per tio ke ili deziras kunloti.

Erasmus notis en kajero, kuŝanta antaŭ li:

1. Bekman.
2. Skrant
3. Ritsma.
4. Klaj.

Li atendis, rigardis per siaj grizaj okuletoj al la vizitantoj dise sidantaj ĉirkaŭ li, kaj baldaŭ kvar nomoj staris sub tiu de Klaj: li notis:

5. Rinders
6. Vestra.

7. Blomsma.
8. Knel.

Ok kvaronguldenoj kuŝis sur la telero, sed deko da tiaj moneroj estis postulataj por komenci la lotadon.

Denove Erasmus rigardis ĉirkaŭe, fine li demandis:

— Ĉu mi notos vian nomon, Eras?

— Jes, notu min laste!

Erasmus notis la nomon de la deka lotanto kaj bezonis aukoraŭ unu, tial li rigardis denove ĉirkaŭe, kriante:

— Kiu estos la naŭa?

— Notu mian nomon — respondis dika buĉisto, staranta ĉe la tablo kaj li ĵetis sian kvaronguldenon sur la teleron.

Erasmus notis: 9 — Kesper; poste sin turnante al Bekman, la plej supra sur la folio de la kajero, li diris:

— Bekman ĵetos unua.

Bekman kaptis la tri ludkubetojn [23] en la rondiĝintajn manplatojn kaj bruskuante ilin kun supren tiritaj brovoj, ĵetis la kubetojn en la tubon de la funelo, staranta sur la tablo. La kubetoj kun bruo falis sur la tablon: apenaŭ ili kuŝis senmove, la skribisto kviete singarde levis la funelon por kalkuli la ĵetitajn poentojn.

— Sep! — li ekkriis, notante la rezulton de la ĵetado. Numero dua ĵetis „dek" kaj dum ĉies okuloj atente kaj streĉite sekvis la ĵetadojn, la skribisto notis sinsekve: „dek-du", „kvar", „dek-unu", „naŭ", „ses", „dek-tri", „dek-sep".

— Vi gajnos! — ekkriis Bekman, kiu mem estis ĵetinta nur „sep".

— Kiu scias? — diris Erasmus. — Du lotantoj devas ankoraŭ ĵetludi.

La naŭa, jam senkuraĝiĝinta pro la altaj poentoj de la oka ĵetinto, kaptis la kubetojn kaj longe skuinte ilin en la manplatoj, fine ĵetis ilin tra la supren staranta tubo, sur la tablon, Longe oni povis aŭdi la ruladon de la kubetoj sed fine ili kuŝis senmove kaj dum ĉiuj kun retenita spiro fikse rigardis la funelon, Erasmus tre singarde ĝin levis montrante „dek-ok" poentojn. Laŭtaj krioj leviĝis tra la drinkeja ĉambro: ĉiu estis konvinkita kaj

certa pri tio ke la dika buĉisto estos la gajnanto, ĉar li estis ĵetinta la plej altajn poentojn, kiujn oni povas atingi.

— Nu! — kriis Skrant, la dua ĵetinto. — Nu, Eras, faru vian eblon kaj ĵetu ankaŭ „dek-ok".

Eras kaptis la kubetojn kaj tre kviete ĉirkau-ŝovinte ilin inter la manplatoj, li kviete lasis ilin fali tra la tubo. Lia granda kvieteco imponis[24] kaj impresis la rigardantojn. Erasmus aŭskultis ĝis neniu brueto sub la funelo estis plu aŭdebla kaj subite alte levis ĝin, montrante al la surprizitaj okuloj „dek-ok" poentojn.

Tondraj hura-kaj brave-krioj leviĝis, ĉar neniu estis atendinta tian rezulton. La plej laŭtan bruon faris Peĉjo, bruklaketante la manplatojn li deklamis:

El ĉerko saltis Ŝercemul'
Li dancis tra la domo,
Kaj ĉiuj kantis: „Ŝercemul'
Vi estas stranga homo!
Brave! brave! brave!!

La dika buĉisto jam kredinta sin la gajninto de la ansero, ne partoprenis la ĝeneralan ĝojon; li sciis ke li denove devos ludi kontraŭ Eras. Refoje li kaptis la kubetojn kaj brue ĵetis ilin tra la funelo, sed Fortuno turnis al li la dorson: li ĵetis... tri poentojn.

Peĉjo laŭte frapis la manplatojn kriante:

Vi estas malgajninta
Ho ve! ho ve! ho ve!

Ĉiuj ekridis kaj Erasmus rimarkis:

— Jen la kontrastoj sin tuŝis!... kiu povus atendi ion tian! Poste donante la kubetojn al Eras, li diris plue:

— Jen Eras, ĵetu, vi sendube gajnos la anseron, ĝi ne volas esti gajnata de la buĉisto pri kies graseco ĝi estas ĵaluza.

Ĉiuj refoje ridis kaj Eras ĵetis... kvar poentojn per kiuj li gajnis la birdon, kiu kun longe etendita kolo kaj larĝe malfermita beko pro la ŝnuro tiel longe kunpreminta ĝian kolon, kuŝis ankoraŭ meze de la tablo. Eras kviete kaj malrapide (li

ĉion faris malrapide) kaptis la grasan birdon kaj pendiginte ĝin sur la dorson de sia seĝo, ridetante kaj malrapide sidiĝis, dirante al Erasmus:

— Notu mian nomon denove kiel lastan sur via listo pro la dua ansero.

— Mi protestas! — diris Kesper, la buĉisto. Tiun lokon vi rajtas havi nur unu fojon. Poste sin turnante al Erasmus, li diris pli mallaŭte:

— Notu tie mian nomon.

— Vi pravas — diris la skribisto: mi notos vian nomon sur la dekan lokon de la dua listo.

Neniu kontraŭstaris, ĉar ĉiu opiniis ke Kesper estas kompatinda pro la subita ŝanĝo de Fortuno, kiu per unu fojo sin turnis de li al Eras.

La drinkejestro intertempe estis metinta la duan anseron sur la tablon kaj Erasmus denove kolektis la nomojn de la ludontoj.

Unu el la vizitantoj ĝis tiu ĉi momento senparole sed plejatente ĉien rigardante, sidis en angulo de la ĉambro sub la longa pendanta horloĝo. Tiu vizitanto estis la duone surda horloĝisto Kamen, kaj kvankam li montris konstantan intereson pri la loterio, li ankoraŭ ne kunludis. Tion kaŭzis lia duonsurdeco. Nun li ekstaris de sia seĝo kaj irante al Erasmus, li flustris al li:

— Notu mian nomon por ĉiu lotado.

— Bonege! — diris Erasmus, notante la nomon de la horloĝisto.

— Haltu! — kriis unu el la vizitantoj — ne estas permesate flustri ĉi tie sekretaĵojn en la orelon de la sekretario; li diris tion laŭ mokŝerca maniero, ĉar lia diraĵo celis nur ŝercon.

— Ĝuste! — respondis al tio la horloĝisto kaj ĉiuj laŭte ekridis.

La horloĝisto, nur malofte komprenante la personojn, lin alparolantaj, kutimis respondi: ĝuste! al preskaŭ ĉio, kion ili al li diris. Plej ofte tiu respondo ŝajnis tie natura, sed kelkfoje ĝi naskis la plej grandan ridadon de la ĉeestantoj. Ne atentante la ridadon li nun kviete eksidis sub la horloĝo kaj kaptante

apud li starantan glaseton da brando li alproksimigis ĝin al sia buŝo por trinki iom da ĝi. Tamen lia najbaro, al kiu okaze apartenis tiu glaseto, estis retenonta lian brakon rimarkante:

— Haltu, amiko, tio estas mia glaseto!

— Ĝuste! — diris la horloĝisto, ŝajnigante ke li komprenas la rimarkon, kiun li tamen ne estis kompreninta kaj larĝe malfermante la buŝon, li per unu ekmovo enversis la enhavon de la glaseto.

— Sed... ĝi estis mia! — pli laŭte diris la aliulo.

— Ĝuste! — refoje respondis la horloĝisto, relokante la glaseton sur la tablon sub akompano de brua ridado de la ĉirkaŭsidantoj.

Nun la duon-surdulo komprenis, sed kion fari?

— Mi bedaŭras, — li flustris, sed estas jam tro malfrue, mi fintrinkis ĝin, sed jen — anstataŭe prenu la mian. — Kaj li ŝovis sian glaseton al la alia, kiu malakcepte ŝovis ĝin returnen. Denove ĉiuj eksplodis je ridado dum Peĉjo deklamis, brufrapante la manojn:

Vi estas stranga homo,
Brave! brave! brave!!

Fine la tumulto[25] kvietiĝis; la horloĝisto mendis novan glaseton da brando por la vizitanto kies glaseton li estis fintrinkinta kaj Erasmus notis plue la nomojn por la sekvanta lotado.

La duan anseron gajnis la farmisto Klaj, kiu same pendigis ĝin sur la dorson de sia seĝo. La tria kaj la kvara birdo laŭ la sama maniero estis forlotitaj kaj kiam la horloĝo en la angulo batis la okan horon jam ok anseroj estis forlotitaj dum la seĝoj, portantaj la birdojn, indikis la feliĉajn gajnintojn.

La duonsurdulo, kiu konstante kiel unua lotanto partoprenis, gajnis ankoraŭ nenian birdon kaj kiam la dika buĉisto, ankaŭ gajninte nenion, moke diris al li, ke li devos esti singarda pro la multoj anseroj pendantaj sur lia seĝodorso, li laŭkutime respondis:

— Ĝuste! — Ĉiuj laŭte ridegis.

Agrable pasis la tempo, feliĉe la gajnintoj pendigis la gajn-

itajn birdojn post si kaj bonhumore Peĉjo de tempo al tempo laŭte kunfrapis la manplatojn deklamante pecon de sia deklamaĵo. Dume Erasmus kviete kaj grave notadis la nomojn, substrekante ĉiufoje per dika streko la gajninton. La fumo en la trinkeja ĉambro tiel densiĝis, ke apenaŭ la fumantoj povis vidi unuj la aliajn, kaj fine Petro estis devigata dum momento larĝe malfermi la stratan pordon por ke freŝa aero povu austataŭi la sufokantajn fumnubojn ĉie pendantajn sur la ĉeestantoj de la lotado. Glaseto post glaseto estis malplenigata kaj denove plenigata kaj ĝoja konkordo[26] regis inter la vizitantoj de la „Verda Ĉevalo".

— — — — — — — — — — — —

En la traveturejo kviete, pacience staris nun kelkaj veturiloj kun ĉevaloj, gardataj de Dirk. Verdire estis superflue ke li staru tie, ĉar la ĉevaloj jam kutimiĝis al tia enua atendado kaj preskaŭ ĉiam staris senmove. Oni aŭdis nur ilian regulan spiradon, kelkfoje interrompatan de laŭta eksplodo de ridoj, venanta el la drinkeja ĉambro. Sur unu el la muroj pendis sur najlo petrola lampo, disvastiganta malklaran lumon, tiel ke oni nur pene diferencigis la ĉevalojn, dronantajn en la longaj nigraj ombroj, kiujn ili ĵetis unu sur alian.

Dirk, staranta inter la ĉevaloj kaj veturiloj aŭdis nenion pri la spirado de la bestoj, nek pri la bruo venanta el la drinkeja ĉambro, ĉar li revadis, meditadis, dronis en profundajn pensojn, konstruante refoje unu el siaj aerkasteloj...

Dirk, kvankam li mem ne konsciis tion, estis kompatinda junulo. Lia patrino loĝis ekster la vilaĝo kaj servis kiel kamparlaboristino kaj melkistino ĉe la farmisto Vestberg. Ŝi neniam havis edzon sed spite tion al ŝi naskiĝis la stulta Dirk, kies patron neniu konis. Klaĉfamo[27] tamen disiris ke Alings, alia kulturisto[28], konata, kiel riĉega sed eksterordinare avara kaj ĉe kiu ŝi autaŭe servis, estas la patro de la stultulo, ĉar tuj post ŝia gravediĝo li elpelis ŝin el sia biena domo en kiun ŝi poste neniam revenis, ĉar ĉiuj ŝiaj penoj reveni en ĝin, estis vanaj, Alings konstante ŝin forpelis, rifuzante ŝin akcepti.

Pri Alings diskuris strangaj famoj kaj rakontoj. Antaŭ dudek jaroj li aĉetis sian bienon kun cent hektaroj da bona tero. Li

antaŭe pagis ĉion tion kontante, do li estis tie riĉa viro. Li havis malmultajn rilatojn kun la aliaj terposedantoj kaj farmistoj, nek kun la vilaĝanoj kaj nur malofte oni vidis lin ekster lia posedaĵo. Konstante li sin dediĉis al sia laboro, estis laborema kaj postulis saman fervorecon de siaj subuloj, forpelante ilin, kiam ili ŝajnis al li tro malviglaj aŭ mallaboremaj, neniam redungante la eksigitojn. Neniam li estis edziĝinta. La hejma laboro estis prizorgata de maljuna mastrumistino, servanta lin jam dudek jarojn, kaj de juna servistino. Junajn servistinojn li havis jam tre multajn, sed ĉiu el ili foriris post unu-aŭ dumonata servado kaj oni rakontadis ke tio devenis de la konduto de Alings, kiu ŝajne ne estis tre honesta, nek tre ĉasta viro. La fakto ke Dirk estis konsiderata lia bastardo, kvazaŭ pravigis la verecon pri la malbonaj moroj de la bienposedanto.

Alings loĝis en tre granda domo, sed nur malmultaj estis vidintaj la internon de lia domo, ĉar preskaŭ neniun li akceptis ĉe si kaj kun escepto de unu ĉambro kaj la kuirejo, neniu iam vidis la aliajn apartamentojn de la konstruaĵo. Eĉ la du servistinoj nur malofte eniris tiujn aliajn ĉambrojn kaj oni miris pri tio, kio igis la posedanton tiel agi.

Alings estis altkreska viro; per sia aspekto li tre diferencis de la aliaj farmistoj de la vilaĝo, ne nur pri sia stranga konduto rilate al ĉiuj homoj, sed ankaŭ per sia korpa eksteraĵo. Li similis pli multe duone sovaĝan kulturiston el la „Wild West" ol riĉan terposedanton el Groningen. Liaj longaj haroj, longa barbo kaj lipharoj memorigis la sovaĝulon pri kiu rakontas al ni Perrault en siaj fabeloj; kaj infanoj, legintaj tiujn fabelojn komparis Alings kun la sovaĝa giganto [29], kiu volis formanĝi la fratojn de Fingreto [30]. Neniu ŝatis aŭ laŭdis Alings, neniu sin okupis pri li. Li estis la sovaĝa, riĉa kaj ŝajne avara bienestro de la „Granda Grengarbo", kiel estis nomata lia bieno.

Dirk nur apenaŭ konsciis, ke la riĉa sovaĝulo de la „Granda Grengarbo" estas lia patro, aŭ ke li estas konsiderata kiel tia. Dirk pri tio ne pensis; li nur sciis, ke li havas patrinon same kiel aliaj knaboj; li sciis, ke li ne havas patron kaj ke neniam li havis patron, sed pli malproksimen ne atingis liaj pensoj kaj neniu pri tio al li parolis. Kelkfoje, okaze troviĝante

apud la bieno de Alings, li estis vidinta la grandegulon, estis admirinta lian longan barbon kaj lipharojn kaj la longan dikan bastonon, kiun la posedanto de la „Granda Grengarbo" konstante portis en la mano, sed ĉio tio kaŭzis nur „kastelojn" en la kapo de la stultulo, ĉar tute ne interesis lin la fakto, kiu estas lia patro, nek ke li eĉ ne havas aŭ neniam havis patron. Dirk ne scipovis legi kaj skribi, neniam li estis vizitinta la lernejon de la vilaĝo, certe tia vizitado estus tute senfrukta pro la stulteco de la knabo. Sian junecon li estis pasiginta en la dometo de la patrino kaj kiam li atingis la dekan jaron, li ekservis kiel ŝafogardisto ĉe la farmistoj. Ŝafogardisto li restis ĝis sia deksesa jaro, poste li fariĝis servisto en la „Verda Ĉevalo", kie li laboris kun kontenteco, zorge farante ĉion, kion li devis fari kaj zorge kolektante kaj gardante la monerojn, kiujn donis al li la farmistoj kaj bienestroj, vizitantaj la drinkejon de Peĉjo Blunt kaj postlasantaj veturilon kun ĉevalo dum kelka tempo en la traveturejo sub la gardado de la stultulo.

Dirk ne ricevis salajron de Blunt, li devis kontentigi sin per la moneroj, donataj al li pro tiu gardado, sed la veturile venantaj vizitantoj donis sufiĉe por ke li povu sin vesti kaj restis al li ĉiujare beleta sumo, kiun li zorge gardadis en sia monkesteto. Tiun kesteton li konsideris sia plej granda trezoro, per kiu li konstruis la plej bele imagineblajn kastelojn, precipe vespere kuŝante sur sia lito antaŭ ol li ekdormis.

Dirk bone konis siajn klientojn kaj preskaŭ ĉiam de antaŭe sciis, kion li ricevos ĉe la foriro de la veturilhavaj vizitantoj.

Estis nun la deka horo kaj ĉar la pordo kondukanta de la drinkeja ĉambro al la traveturejo malfermiĝis, Dirk antaŭsentis ke unu aŭ du veturiloj estas forveturontaj. Li antaŭsentis bone, ĉar Vestberg kaj Bekman aperis kaj forveturis. Kiam ili estis for, Dirk ekzamenis, kion li estis ricevinta kaj la rezulto estis konforma al liaj atendoj. Ĉiu donis al li po kvaronguldeno. Denove la stultulo dronis en pensojn; starante refoje en kurba pozo ĉe la kapo de unu el la ankoraŭ atendantaj ĉevaloj li prezentis al si, ke ĉiuj ankoraŭ forveturontaj farmistoj ankaŭ donas al li kvaronguldenon kaj li kalkulis la grandan monsumon ricevitan, se liaj esperoj efektiviĝus, sed la aliaj ne estis tiel

malavaraj kiel Vestberg kaj Bekman, ĉar kvankam ili forveturis nur la dekan horon, ĉiu donis nur dekonguldenon. Tamen Dirk estis kontenta kaj ĉar la traveturejo estis nun senveturila kaj ne novaj vizitantoj atendotaj, li iris dormi. Ferminte la pordojn de la traveturejo, li sin direktis al la ĉevalejo, trairis ĝin, treniĝis pluen al la bovinejo, kaj palpserĉis laŭlonge de la muro ĝis li trafis malaltan benkon. Tie li haltis kaj eksidis. Iom post iom li povis distingi ĉion, troviĝanta en la bovinejo, kiu estis aukaŭ lia dormejo; ĉar malantaŭ la benko, sur kiu li nun sidis, estis lia lito, aŭ pli bone dirite, lia litŝranko, ĉar en ĉiuj malnovaj domoj en la vilaĝoj de la provinco Groningen, la loĝantoj dormas en litŝrankoj kun du pordoj, kiuj tage ĉiam estas fermitaj.

Dirk sidis sur la benko sed dum kelkaj momentoj ne povis distingi la ĉirkaŭaĵon pro la subita lum-ŝanĝiĝo: en la traveturejo brulis lampo sed ĉi tie regis preskaŭ dumnokta mallumo. Du fenestretoj en la porkejo kaj unu fenestreto en la stalo de la bovinoj, kiu nun estis malplena, enlasis nur tre malmultan lumon, ĉar mallarĝa lunpeco, kiel falĉilo staranta sur la ĉielo, enverŝis iom da pala lumo en la dormejon de Dirk.

La stultulo restis kelkajn sekundojn senmove, sidante sur la benko, sed iom post iom liaj akre vidantaj okuloj penetris la mallumon kaj povis diferencigi antaŭ si la porkejon tute apud la enirpordo, kaj flanke de la porkejo la du bovinstalojn. Ĉiu stalo povis enhavi du bovinojn, sed ili ne staris tie sed estis sur la herbejo ekster la vilaĝo. La porkejo kaj bovinstaloj troviĝis unu flanke de la aliaj kaj krom ili estis nur videbla kesto kaj granda staranta barelo sen kovrilo, enhavanta manĝaĵon por la porkoj. Dirk neniam havis lampon en sia dormejo pro ebla danĝero bruligi la domon, sed li jam de longe kutimiĝis al sia senluma dormoĉambro neniam pensante pri tio, ke aliaj knaboj havas pli oportunan lokon por pasigi la nokton. La dumnokta restadejo estis laŭ lia plaĉo, ĉar kviete li dormis tie senzorge jam multajn jarojn kaj neniam io interrompis aŭ malkvietigis lian ripozon pro la longdaŭra dumtaga laboro.

Ĉie regis profunda silento, nur de tempo al tempo estis aŭdata ronkado aŭ gruntado de la porkoj. En la nokto muŝoj

ne zumadis, sed sidis dormantaj sur la muroj aŭ sur la grasaj porkoj. En la litoŝrankon ili ne venis, ĉar ili ne amis la mallumecon tie seninterrompe regantan ankaŭ tage pro la fermitaj pordoj kaj pro la mallumeco en la noktoj. Nur malofte kelkaj kuloj venis por piki kaj maltrankviligi lin dum kelkaj minutoj, sed la stultulo elpensis rimedon por silentigi ilin. Li spertis jam de longe ke tiuj insektoj, fluginte kelkan tempon super lia kapo, fine eksidas sur liajn nazon, orelon, frunton aŭ vangon por elsuĉi lian sangon. Kviete li lasis ilin suĉi dum du oŭ tri sekundoj, sed poste subite li frakasis ilin per la larĝe etendita mano, preskaŭ neniam maltrafante sian celon.

Dirk sidis nun sufiĉe longe kaj povis distingi la ĉirkaŭaĵon, kaj li direktis la okulojn al la porkejo, kies loĝantoj de tempo al tempo gruntetis: Dirk imagas esti riĉa bienestro kun centoj da tiaj porkoj; li imagis la multajn porkejojn, barelojn kun manĝaĵo por tiuj porkoj, la multan monon, kiun li ricevos, vendante la porkojn kaj tiel plu, kaj kontenta rideto ludis ĉirkaŭ liaj dikaj duone malfermitaj lipoj. Sed post kiam li direktis la okulojn al la bovinejo, la bela aerkastelo kun la porkejoj subite malaperis por esti anstataŭata de alia „kastelo" plena je bovinstaloj en kiuj staras multego da blankaj bovinoj, melkotaj de centoj da servistoj. Baldaŭ ankaŭ tiu lasta kastelo forflugis, ĉar li sentis ke peziĝas liaj okuloj kaj ke li devas enlitiĝi, ĉar la sekvantan matenon jam la sesan horon li devos ellitiĝi por melki la bovinojn sur la herbejo, kuŝanta kvaronhoron ekster la vilaĝo. Dirk komencis senvestigi sin, tio postulis nur mallongan tempon, ĉar multajn vestojn li ne bezonis forigi de sia korpo. Li demetis de si la jakon, la pantalonon [31], la ĉapon kaj la lignajn ŝuojn kaj metinte la unuajn sur la benkon kaj la pezajn lignoŝuojn sub ĝin, li malfermis la du pordojn de la litoŝranko. Tiuj pordoj fermiĝis super la benko, ĉar ili ne atingis ĝis la ŝtona planko de la dormejo, tiel ke la benko ĉiam restis staranta sur sia loko. Malfreŝa aero pendis en la lito en kiun dumtage neniam penetris la lumo, sed Dirk havis fortajn, sanajn pulmojn kaj tiu malfreŝa aero ne ĝenis lin. Formetinte la lignajn ŝuojn, li rampis en la liton kaj eksidis sur ĝi. Subite lia dekstra mano ŝoviĝis inter la muro kaj la pajlo sub la matracon [32]

kaj aperigis kesteton en kiu tintetadis liaj moneroj. Dirk, kvankam li estis stultulo, jam spertis ke la mondo estas plena je ŝtelistoj kaj aliaj malbonaj homoj. Por malhelpi al ili la forŝteladon de lia trezoro, li kaŝis ĝin jam dum jaroj sub la pajlon de sia lito, kie laŭ lia opinio neniu ĝin trovos. Ĉirkaŭprenante la trezorujon ambaŭmane, li glitigis la monerojn de unu flanko al alia tiel ke ili tintante ŝoviĝis unuj trans la aliajn, kaj la tintado sonis kiel dolĉa muziko en liajn orelojn. Dirk tute ne estis avarulo, sed posedis nur siajn kuniklojn kaj ĉi tiujn monerojn: ili estas karaj al li; per la moneroj li povos aĉeti vestojn kaj novajn lignoŝuojn kaj kuniklojn, la karajn blankajn kuniklojn, ĉiam troviĝantajn en la pendanta kesto eksterdome sur la muro apud la sterkejo de la „Verda Ĉevalo". Dirk kelkajn fojojn glitigis la monon de dekstre maldekstren kaj returnen, poste palpinte la kesteton karese per ambaŭ mamoj, li subite ekpensis ke li ankoraŭ ne enmetis en ĝin la ĵus ricevitajn monerojn, troviĝantajn ankoraŭ en la poŝo de la pantalono. Li sin kurbigis ekster la lito, palpserĉis kaj kaptis la pantalonon kaj malpleniginte la poŝon, remetis tiun parton de sia kostumo sur la benkon, kaj kalkulante la monon, glitigis unu post alia la moneretojn tra la fendo en la kesteton. Tiun tagon kaj vesperon li estis ricevinta pli ol du guldenojn. Tio okazis nur malofte, ĉar nur tri aŭ kvarfoje en la jaro, birdoj estis forlotataj al la klientoj de Petro Blunt.

Dirk estis kontenta, kaj feliĉa li sin sentis, pli riĉa ol iam antaŭe, kaj reŝovinte la monkesteton en ĝian ordinaran lokon sub la pajlon de la lito, li kviete dors-kuŝiĝis, tiris la litotukon kaj la litkovrilon sur la bruston kaj... ne ekdormis tuj, ĉar antaŭ la ekdormo li kutime konstruis al si kelkajn kastelojn. Dirk konstruis kaj malkonstruis, rekonstruis novajn ĝis fine liaj okuloj fermiĝis pro laceco. Ĝis tiu tempo neniu kulo malhelpis lin en liaj meditadoj kaj revadoj, sed apenaŭ la dormo tuŝis liajn okulojn, grasa kulo (ĉio en la dormejo estis grasa pro la grasa ĉirkaŭaĵo) ĉirkaŭ-fluginte kelkan momenton kaj laŭte zumante, eksidis sur la platan nazon de la dormanto kaj eksuĉis lian sangon. Sed Dirk, laca pro la longa dumtaga laboro, restis kuŝanta sen movo, lia mano nun ne frakasis la

sucantan insekton, car li profunde dormis kaj nur forta skuo aŭ laŭta voko estus kapabla forpeli Morfeon, tiun dion de la sonĝoj, tiun filon de la nokto kaj de la dormo, kiu estis etendinta siajn manojn super la stultan serviston de la „Verda Ĉevalo".

ĈAPITRO DUA.

Daŭrigo de la unua ĉapitro — Vigla interparolado — La vila mano — Alings — Fremda Dorotea.

Ĉiuj veturiloj estis for kaj kun ili multaj el la vizitantoj de la lotado; kelkaj, piede venintaj, jam foriris, sed la kvieteco ankoraŭ ne revenis en la drinkejan ĉambron de la „Verda Ĉevalo". La horloĝo aŭdigis la dekan horon kaj la plej granda bruo regis ankoraŭ inter deko da kutimaj klientoj, laŭte babilantaj pri sensignifaj aferoj kaj reciproke serce atakantaj kaj refutantaj ĉiajn atakojn. Preskau ĉiuj trinkis tro multe da brando kaj du el ili estis ebriiĝontaj [33], sed la interdisputo ne sangiĝis en malpacon.

La vilaĝanoj estas pacemaj, flegmaj [34] kaj sercemaj homoj, ĉiam dirante siajn opiniojn al ĉiuj kun kiuj ili parolis, sed veraj ofendoj estis preskaŭ nekonataj aferoj inter ili.

Ĉe tri tabletoj sidis la restintaj vizitantoj kaj brue parolis, interrompante la disputojn kaj sercaĵojn per malgrandaj ektrinkoj el la glasetoj, starantaj antaŭ ili. Plej laŭte parolis Bursma. Li estis unu el la klientoj, venantaj regule unu fojon ĉiusemajne en la „Verdan Ĉevalon", por tie kun aliaj regulaj vizitantoj pasigi la vesperon en agrabla maniero. Ofte la societo, kiu nun estis kompleta, restis parolanta ĝis noktomezo kaj Petro tre ŝatis tiujn vesperojn enspezante per tiuj okazoj multan monon.

Bursma estis konata kiel viro ne tre honesta kaj fidinda. Li estis la sola muelisto de la vilaĝo kaj lia ventmuelilo movadis siajn longajn flugilojn [35] kiel eble plej ofte, nome konstante kiam la vento estis sufiĉe forta por ilin turni; eĉ nokte oni ofte aŭdis la zumadon de la longaj brakoj, kiuj kiel kvar sin persekutantaj ombroj, ĉirkaŭflugis ĉe la supro de la alta muelejo.

Sed kiam la vento ne blovis, la muelilo staris sen movo, kaj pentrinde aspektis ĝiaj belaj brakoj. Bursma estis gajninta eĉ ne unu birdon, sed tio ne malhelpis ke lia voĉo, konstante, laŭte kaj tirtone aŭdiĝis, superregante [36] ĉiujn aliajn.

Oni rakontis pri Bursma ke li kelkfoje ŝtelis de la muelota greno, prenante el ĉiu sako, al li konfidata, malgrandan kvanton, kiun li anstataŭis per sama kvanto da akvo, tiel ke la sakoj post la priŝtelado pezis kion ili devis pezi. Dank' al la de li uzata rimedo, neniu povis pruvi la malhonestaĵon, kaj la muelisto, kiu estis ruzulo, plenumis siajn ŝteladojn nokte, ĉar tiutempe neniu povis spionadi aŭ surprizi lin. Kelkfoje oni aludis eĉ al li mem pri tiaj malhonestaĵoj, sed li ĉiam refutis [37] ilin per ŝercaĵo aŭ per samspeca aludo. Bursma estis tridekjara, pala viro kun deko da infanoj.

— Diru Bursma, parolis al li Erasmus, ludante kun la kajero en kiu li estis notinta la lotadon, — kion diros via edzino, revidante vin kun ĉiuj viaj gajnitaj anseroj?

— Ŝi diros kion ankaŭ diros la via — moke respondis la muelisto, rigardante lin kun rido; — Ŝi diros: estu bonvena, kara edzo, mi atendis vin jam longe kun maltrankvilo, timante ke okazis al vi malfeliĉo.

Ĉiuj ridis, ĉar ĉiu sciis, ke Erasmus estas sub la ŝuo de sia edzino, kaj ĉiu jam antaŭe sciis, ke Erasmus ĉe sia rehejmiĝo estos ricevata per laŭtaj riproĉoj kaj atakparoloj; ĉiu konis la akran langon de lia edzino kaj ĉiu sciis ke la malgrasa timema vireto ne kuraĝos refuti la riproĉojn, kaj rezignacie [38] englutos ilin kiel neeviteblajn pilolojn [39] kontraŭ grava malsano.

— Kaj kion diros la infanoj, vidante ĉiujn birdojn? — plue demandis Erasmus, ŝajne ne atentante la respondon de la muelisto.

— Ili diros: portu ilin al la infanoj de Erasmus, — respondis la muelisto.

Refoje la aliaj ridis, ĉar Erasmus ne havis infanojn.

— Kiom da infanoj Bursma havas? — enmetis alia el la societo, tamen bone sciante tion.

— Dek li havas, — diris Erasmus, disetendante la dek fingrojn de siaj manoj. — Nur dek!

— Dek!? — ekkriis la buĉisto, ŝajnigante grandan surprizon, ĉar ankaŭ li bone tion sciis. — Dek!? Kia Rotŝildo!

— Mi tamen ne... envias lin! — interĵetis Polman, kiu estis ebria.

— Nu, kiom vi havas? — sin turnis al li la muelisto, fintrinkante sian glaseton kaj prezentante ĝin poste al Peĉjo por ke tiu povu denove plenigi ĝin.

— Polman estas seninfanulo, — diris Peĉjo, sin direktante al la bufedo, kaj volonte li akompanus tiun diraĵon per laŭta klakado de la manoj, sed portante la glaseton de Bursma, li ĉi tiun fojon preterlasis sian klaketadon.

— Polman konstante resendis la cikonion, kiam ĝi alflugis kun ideto, kaj la cikonio, ne sciante kiel agi, konstante portis la infanon al la muelisto, tial li havas nun dekon da ili kaj Polman eĉ ne unu.

— Ĉu okazis tiel, Bursma? Ĉu vi bezonis la peradon de aliulo por ricevi la dek infanojn? Bursma ne respondis tiun ŝercon, sed akceptante la denove plenigitan glaseton, li iom trinkis kaj metis ĝin antaŭ si sur la tablon, dirante al la duonsurda horloĝisto.

— Atentu! ĝi estas mia!

— Ĝuste! kapjesis Kamen, kiu komprenis la mangeston de Bursma.

— Nu? — insistis la buĉisto. — Ĉu vi bezonis la peradon de Polman?

Peĉjo laŭte kunfrapis la manojn deklamante:

Jen sidas nia muelist',
Li sidas en konfuzo,
Kaj ĉiuj krias: muelist'
Vi...

Sed li ekhaltis ne povante trovi la ĝustan rimvorton. Erasmus, la poeto deklamis plue:

Kaj ĉiuj krias: muelist'
Forlasis vin la ruzo.

Ĉiuj, kun escepto de Bursma, brubatis la manojn.

— Mi ne estas ruzulo, — diris Bursma, nek klerulo, sed spite tio mi povas klarigi kial kelkaj geedzoj neniam havis, nek havos infanojn.

— Klarigu! — diris Peĉjo.

La muelisto rigardis al Erasmus dirante:

— Unue ĉar la cikonio ne volas enflugi tien, kie la edzo sidas sub la ŝuo, due ĉar ĝi ne flugas tien, kie la edzo kondutas tirane[40] kontraŭ sia edzino.

Dirinte tion, li rigardis al Klaj, kiu tamen estis tiel ebria, ke li nur duone komprenis la aludon.

Peĉjo ridetis mistere kaj okulumis[41] al Bursma.

— Sekve, — diris la buĉisto, sin turnante al la skribisto: ni povas kompreni el tio, ke Bursma ne sidas sub la ŝuo kaj ke li ne agas tirane kontraŭ sia edzino.

— Tion ni sciis jam antaŭ nia geedziĝo! — certigis Bursma.

— Kiel nome? — demandis la buĉisto.

— Ho, tre simple! La okuloj de mia estonta edzino tuj diris al mi, ke mi neniam sidos sub ŝia ŝuo, kaj la miaj diris ke mi neniam estos tirano; kaj tion sendube ankaŭ rimarkis la longkrura birdo — sektone respondis la muelisto.

— Brave! — klaketis la manoj de Peĉjo, kaj Erasmus demandis, ŝajnigante kvazaŭ la aludo de Bursma ne tuŝas lin, nek la ŝuon sub kiu li sidas.

— Kaj kiam la cikonio alportos la dekunuan?

La muelisto ne atentis tiun demandon, sed kirlante[42] per la kulereto la brandon kaj la sukeron de sia glaseto, li sin turnis al la duonsurda Kamen, kiu estis aŭdinta preskaŭ nenion de la ĵusa interparolado kaj diris:

— Mi malĝojas ke mi posedas nur unu filinon kaj ke la naŭ aliaj infanoj estas ĉiuj knaboj, sed la buĉisto asertis ke vi estas kulpa pri tio.

— Ĝuste! — diris Kamen, ne komprenante, kion diris la ruza muelisto, sed respondante trafe maltrafe[43] per sia kutima diraĵo.

— Alian fojon estu pli atenta. — diris la buĉisto, frapetante la ŝultron de Kamen.

— Ĝuste! refoje diris la horloĝisto.

Ĉiuj ridis kaj dum ili sin amuzis tiamaniere, la tempo rapidis kaj neniu foriris, kvankam du el la societo volonte irus for, sed ili estis tro ebriaj por duope rehejmiĝi kaj atendis ke alia vizitanto, loĝanta apud iliaj farmodomoj, ekstaros por foriri por ke ili havu akompananton sur la vojo, kuŝanta inter longfosoj [44] en kiujn ili ne volonte enfalus. Sed, ĉar la kondukontoj restis sidantaj, ankaŭ la ebriaj devis resti kaj laŭte oni babilis plue pri ĉiuj aferoj, precipe pri la farmistoj kaj bienposedantoj nun malestantaj kaj kiuj estis kritikataj kiel nepraktikuloj kaj nespertaj terkulturistoj. Unuj uzis tro multe da artefarita sterko, aliaj tro malmulte, unuj havis tro multe da bovinoj por siaj herbejoj, aliaj tro malmulte, tiel ke laŭ la opinio de la kritikantaj ĉeestantaj farmistoj, estis nur seso da terkulturistoj en la vilaĝo, kiuj kulturis laŭ la veraj reguloj de la agronomio [45].

— La plej malbona, neklera kulturisto el ĉiuj estas Polman,— diris fine ŝerce la buĉisto Kesper, kaj sin turnante al la duonsurdulo, li demandis lin:

— Ĉu ne vere Kamen?

— Ĝuste! — diris ĉi tiu post kio ĉiuj laŭte ridis, esceptinte Polman mem, kiu estis tiel ebria, ke li ne povis defendi sin kontraŭ la buĉisto, kaj ne povis trovi vortojn por refuti la diraĵon tiel malkaŝe kaj publike elparolitan.

Kiam ĉiuj malestantoj estis kritikitaj de nia rondo, ĝi atakis la politikon, kiu laŭŝajne estis tie mallaŭdinda. Neniu ministro taŭgis por sia altofico, ĉiu zorgis nur por si mem aŭ por sia politika partio kaj ĉiuj malzorgis la terkulturistojn, kiuj laŭ la opinio de la babilema societeto reale estas la kerno, la modelo kaj la ĉefa parto de la tuta popolo. Fine oni ekparolis pri fantomoj kaj spiritoj. Erasmus sciante, ke la muelisto estas iom superstiĉa [46], enkondukis tiun temon por turment-inciteti lin.

— Spiritoj vere ekzistas, — li certigis, — sed fantomoj neniam ekzistis. Ili estas fantaziaĵo kaj sensencaĵo por timigi infanojn kaj malsaĝulojn.

— Pruvu tion! — diris la muelisto.

— Jes, pruvu! — samopiniis Peĉjo, kiu ĉiam sin miksis en la disputon kiam sin prezentis la okazo fari tion.

— Pruvi?! Kiu povus pruvi!

— Kio ekzistas, estas pruvebla — diris alia, sed ne estas pruvebla tio, kio ne ekzistas, ekzemple pruvu ke la naskiĝonta infaneto de Bursma estos filino. Tion neniu povus, ĉar naskiĝonto ne estas naskiĝinto, sekve ne ekzistas...

— Ni ne plu parolu pri miaj infanoj — naskiĝintaj aŭ naskiĝontaj — sed pri fantomoj kaj spiritoj, ĉar estas granda diferenco inter ili, ĉu ne vere, Kamen?

— Ĝuste! — diris la horloĝisto, kiu ĉi tiun fojon trafis.

— Sed kiu estas la diferenco inter spirito kaj fantomo? — subite demandis Polman, kiu estis iom superstiĉa kaj timema, kiam li nokte kaj ebria iris hejmen.

— Spiritoj ne faras malbonon kaj estas senfortaj, — klarigis Erasmus, kaj fikse rigardante al Polman, li diris plue: — Sed fantomoj povas kaŭzi al vi multan malbonon. Mi eĉ aŭdis ke fantomo atakis ebrian farmiston, kiu iris hejmen noktomeze, kaj ke ĝi ĵetis lin en longfoson, kie la sekvantan matenon trovis lin la laboristoj, irantaj en la kampojn.

Polman komprenis la aludon, sed ne kapablis trafe respondi, ĉar lia lango estiĝis tiel dika ke li apenaŭ povis diri:

— Mi ne estas ebria!

Ĉiuj ridis post tiu diraĵo.

— Fantomoj ne ekzistas kaj neniam ekzistis, — diris la muelisto, kiu kredis je spiritoj.

— Sed ekzistas la vila mano, — diris Peĉjo, levante la montofingron de sia dekstra mano.

— La vila mano!? — demandis kelkaj, inter kiuj Bursma kaj Polman.

— Ĉu vi neniam aŭdis pri la vila mano!? — mire demandis la drinkejestro. — Tamen ĝi ekzistas, ofte sin montras, ofte subite aperas kaj malaperas, kaj kelkfoje influas la homojn, kiuj intencas ion malbonan. Ĉu vi neniam aŭdis pri la vila mano!? Mirindaĵo! — kaj tri-kvarfoje li laŭte kunfrapis la manplatojn.

Ĉiuj estiĝis scivolaj kaj Kamen, vidante la surprizon sur ĉies vizaĝoj, demandis la buĉiston:

— Kio do fariĝis?

— Al la muelisto naskiĝis la dekunua infano, kaj feliĉe knabino! — li ekkriis tiel laŭtvoĉe, ke la duonsurdulo ĉion aŭdis kaj komprenis.

— Vere!? — diris Kamen, kaj saltleviĝante li etendis al la muelisto la manon kore gratulante lin. La muelisto akceptis la gratulon.

— Kiam tio okazis? — demandis Kamen.

— Hieraŭ nokte je la dekdua horo, — respondis la buĉisto, kaj iom pli mallaŭte li diris plue: — Fantomo ĝin alportis.

— Ĝuste! — diris Kamen, kaj ĉiuj laŭte ridis.

— Sed ni parolu pri la vila mano, — diris Erasmus, — mi legis kaj aŭdis pri multaj aferoj, sed ĝis nun neniam pri la vila mano. Kio ĝi estas?

— Tion mi klarigos al vi ĉiuj — respondis la drinkejestro, kaj refoje levante la montran fingron li komencis rakonti, dum ĉiuj plenatente aŭskultis, ĉar neniu el la societo iam ekaŭdis pri tia mano, kaj ĉiuj estis scivolaj pri io, kio povas influi la malbonajn homojn.

— Estis iam muelisto, ĉiutage muelanta la grenon, kiun liaj klientoj alportis al lia muelejo. Ĉiu fidis lin kaj neniu suspektis ke li povus esti kapabla plenumi eĉ la plej malgrandan trompaĵon. Sed la fakto estis, ke la muelisto estis malhonestulo, kiu priŝtelis la klientojn, konstante ĉerpante ian kvanton da greno el ĉiu sako kaj enverŝante saman kvanton da akvo por ke la sakoj perdu neniom de sia pezo.

La trompo de la muelisto ne malkvoriĝis, ĉar la sakoj elirantaj el la muelejo, ĉiam havis la saman pezon. Sed kio okazis? Ian malfruan vesperon la muelisto ŝteliris en sian muelejon por refoje ŝtelĉerpi, kiel kutime, el la sakoj. Li jam estis malferminta kaj refoje ferminta kvin sakojn, ĉerpinte el ĉiu kvanton da greno, anstataŭinte tiun kvanton per iom da akvo, enverŝita el kaldrono, kiun li portis en unu el siaj manoj.

Apenaŭ li sin klinis la sesan fojon, apenaŭ li estis ĉerpinta la ŝtelotan grenon el tiu sesa sako, apenaŭ li estis enverŝonta en tiun sakon la akvon el la kaldrono, jen subite vila, nigra brako elsoviĝis malrapide de malantaŭe trans lian dekstran ŝultron. La muelisto, ekvidante tiun neatenditan vilan brakon,

preskaŭ ŝtoniĝis pro teruro. Sed kredante ke tiu brako estas nur infano de lia imago, li baldaŭ rekvietiĝis, ne atentis ĝin plu kaj jam levis la kaldronon por elversi la akvon en la sakon. Subite la vila mano ŝoviĝis pluen, kaptis la kaldronon kaj tirante ĝin el la mano de la muelisto, ĵetis ĝin supren tiel alten ke ĝi trafis la plafonon [47] de l'teretaĝo [48] de la muelejo. Kiam ĝi estis refalinta teren, flanke de la muelisto, la vila mano refoje retiriĝis, reŝoviĝis returnen trans la ŝultron de la ŝtelisto kaj malaperis en la mallumon. La muelisto tremis per la tuta korpo, sed returnante sin por vidi, kiu tiel subite estis interrompinta lian agadon, li vidis nenion. La vila mano estis for kaj la kaldrono kuŝis dispecigita en mil pecetojn sur la planko. Granda teruro kaptis la mueliston, li forkuris el sia muelejo kaj sin turnante al sia Kreinto, li petis pardonon, promesante kaj ĵurante neniam plu ŝteli la grenon, kiun aliaj homoj plenfide metis sub lian zorgon. De post tiu tempo li estiĝis honesta, fidinda viro, kaj la fantomon, la vilan manon li vidis neniam plu.

Ĉiuj aŭskultis kun streĉita atento, sed plej atente la muelisto, kaj Peĉjo finis kviete:

— Jen la historio pri „la vila mano", pri kiu vi neniam aŭdis. Juĝu ĉu ekzistas fantomoj aŭ ne!

— Sed tio estas nur fabelo, — diris la buĉisto, ĉar unue, neniu muelisto ŝtelas, due...

— La vila mano, ekzistas — interrompis lin Peĉjo.

— Mi certigas al vi ke ĝi ekzistas, sed nur al malbonaj homoj ĝi sin montras kaj feliĉe al tiu, kiu neniam ĝin vidis aŭ vidos. Ne gravas, ĉu ĝi estas fantomo, spirito aŭ io alia; ĝi ekzistas kaj ekzistos tiel longe, kiel la homoj ekzistas.

Erasmus kapjesis, ĉar li komprenis la signifon de la rakonto, sed li silentis.

— Sed... ĉu tiu mano nur ŝoviĝas trans la ŝultrojn de muelistoj? — demandis unu el la societo.

— Peĉjo parolis speciale pri muelisto... Ĉu vi ne ofendiĝis, Bursma?

— Bursma ja estas honesta viro, — diris la buĉisto, moke rigardante la mueliston, kial do li sentus ofendon? La proverbo instruas nin: kiu sentas jukon, tiu sin gratu... Sed tian jukon

Bursma ja ne bezonas senti. Peĉjo parolis nur pri muelisto malhonesta kaj ne pri muelisto ĝenerale.

Bursma penis rideti sed interne li bolis pro retenata kolero. Volonte li ĵetus la drinkejestron de la seĝo, sed per tio li ja montrus ke li sentas jukon. Ankaŭ Peĉjo, kiu konis la homojn, bone rimarkis la internan boladon, sed ŝajnigis ke li tute ne rimarkis ĝin kaj kviete parolis plue, refoje levante la avertantan fingron.

— Sed la vila mano ne ĉiam tiel trafe efikas, ĉar ofte ĝi ŝoviĝas trans la ŝultron ne nur de muelisto sed ankaŭ de farmisto, buĉisto...

— Kaj de poeto! — interrompis lin Bursma.

— Eĉ de poeto! — daŭrigis Peĉjo, — sed nur malofte ĉe poeto, ĉar ordinare poetoj ne sentas jukon, sekve ili ne bezonas grati sin.

La vizitantoj pensis pri la stranga rakonto, pri la vila mano kaj dum la interparolado daŭris, preskaŭ ĉiu memoris pri kelka malhonestaĵo, sed neniu iam estis sentinta la vilan manon sur sia ŝultro.

Estis nun preskaŭ noktomezo kaj Polman kubute puŝis la flankon de sia najbaro, kiu estis nur duone ebria kaj balbute flustris [49].

— Ni iru for Klaj, estas jam preskaŭ noktomezo...

— Kial jam foriri? — demandis Klaj. — Antaŭe Peĉjo rakontu pli multe pri tiu mano, kiu scivoligis min.

— Mi jam diris, ke ĝi ne ĉiam tiel trafe efikas, — daŭrigis Peĉjo. — Okazas kelkfoje ke ĝi nur ŝoviĝas ĝis la orelo de la malbonfaranto kvazaŭ por averti lin. Okazas eĉ ke la malbonfaranto tute ne rimarkas la vilan manon.

— Stranga mano! — diris Erasmus, — mi dezirus konatiĝi kun ĝi.

— Ĉio tio estas nura sensencaĵo! — balbutis la ebria Polman, kiu spite tio ne deziris konatiĝi kun la mistera avertanto, kaj refoje kubute puŝante Klaj, li diris: — Ni iru for, ĉar...

Subita rulado de proksimiĝanta veturilo eksilentigis lin, ĉar dumnoktaj veturiloj estis maloftaj en la vilaĝo.

Ĉiuj streĉis la orelojn. La veturilo haltis antaŭ la traveturejo kaj Peĉjo salte leviĝis por enlasi ĝin.

— Kiu venas tiel neatendite? — demandis la aliaj, ĉar ili atendis neniun.

La konversacio[50] ĉesis. Post kvin minutoj la drinkejestro revenis kaj lin sekvis altkreska sinjoro. Ĉi tiu malfrua vizitanto ne estis bienposedanto, nek farmisto, sed laŭ sia eksteraĵo, urbano. Li estis nigre vestita, portis altan ĉapelon kaj ĉio montris, ke li apartenas al la aristokrataro. Li estis ĉirkaŭe kvindekjara viro kun belaj noblaj vizaĝtrajtoj kaj havis longan zorge kombitan barbon, kaj lipharojn torde turnitaj supren. Kviete li sekvis la drinkejestron kaj demandis:

— Ĉu mi povos paroli al vi sola dum deko da minutoj?

— Sola? Nu, bone sinjoro; bonvolu sekvi min en mian familian ĉambron...

Peĉjo malfermis pordon en la fundo[51] de la drinkejo, malproksime de la scivole rigardantaj vizitantoj, kaj enris la familian ĉambron. La sinjoro sekvis, kaj Peĉjo, ekbruliginte petrolan[52] lampon, starantan sur granda ronda tablo meze de la ĉambro, ŝovis du seĝojn antaŭen, sidiĝis sur unu, invitante la sinjoron, ankaŭ eksidi. La fremdulo, ekzamenante sian poŝhorloĝon, grumblis[53] kelkajn vortojn kaj sidiĝis flanke de la drinkejestro.

Peĉjo estis scivola, ĉar la dumnokta vizito de fremda sinjoro, volanta paroli al li sola, estis vere io, kio ankoraŭ neniam okazis, kvankam li loĝis jam pli ol tridek jarojn en la „Verda Ĉevalo".

La fremdulo rigardis dum momenteto ĉirkaŭe kaj ekparolis:

— Mi venas en nekutima tempo por ĝeni vin, sed mi ne estas kulpa. Mi estas medicina[54] profesoro el Groningen kaj mi ricevis leteron de iu Alings, bienposedanto kaj loĝanta, kiel li skribis, duonan horon ekster ĉi tiu vilaĝo. Li petis min veni al li kiel eble plej baldaŭ pro grava malsano, kiu ŝajne malkvietigis lin, ĉar li sciigis al mi ke la vilaĝa kuracisto ne povas helpi al li. Kiu estas tiu Alings? Vi sendube konas lin.

— Jes, profesoro; ĉiu lin konas.

— Ĉu li estas jam de longe malsana?

— Mi ne scias tion; neniu sin okupas pri li kaj li sin okupas pri neniu vilaĝano. Li estas vera strangulo.

— Strangulo?

— Jes, kaj krom tio ŝajnas esti—mi diras ŝajnas, ĉar mine konas

lin bone,—la plej egoista [55] kaj la plej avara el ĉiuj bienposedantoj.

— Sed, eble riĉa?

— Riĉa kiel Rotŝild', almenaŭ tion ĉiu diras.

— Ĉu li estas ankoraŭ juna?

— Li estas viro kvardekjara ĉirkaŭe, sed aspektas kiel kvindekjarulo.

— Ĉu li estas edziĝinta?

— Ne, profesoro; li estas fraŭlo kaj vivas en sia bieno kun maljuna servistino kaj juna knabino, kiuj kune prizorgas la mastrumadon.

— Honesta homo?

— Tio dependas de la vidpunkto laŭ kiu oni volas konsideri kaj juĝi tion. Laŭ mia opinio li estas viro kun malbona karektero, ĉar, kiel mi ĵus diris: li estas avara kaj senkompate forpelas ĉiujn el sia domo, kiuj lin ĝenas..., ekzemple: Dek minutojn malproksime de lia bienadomo loĝas „fremda Dorotea", kiun li forpelis post kiam si gravediĝis; kaj kvankam ĉiuj pretendas kaj asertas, ke Alings estas la patro de la poste naskiĝinta infano, li forpelis ŝin el la domo kaj, kiom mi scias, li ne atentas ŝin plu. Mi eĉ aŭdis ke „fremda Dorotea", tia oni ŝin nomas tie ĉi, estas tiel malsana, ke ŝi kuŝas jam kelkajn semajnojn en sia lito kaj se kompatema najbarino ne helpus ŝin, la kompatindulino jam de longe estus pereinta kun sia infano. Nun vi scias kiu estas via nova paciento [56]. — Estus pli bone se li venigus vin pro la fremda Dorotea ol pro si mem. Neniu kompatas lin. Sed se mi estus lia kuracisto...

Peĉjo eksilentis kaj kunpremante la lipojn kaj fikse rigardante la profesoron, li skue levis la montran fingron.

— Kion vi farus? — kviete demandis la resanigisto.

— Mi pagigos lin kiel ankoraŭ neniun antaŭe, sed estos malfacile pagigi lin.

La profesoro pripensis kelkan momenton kaj Peĉjo streĉe rigardis la noblan vizaĝon de sia dumnokta vizitanto, kiu subite diris:

— Ĉu la vilaĝa kuracisto ne vizitas tiun fremdan Doroteon?

— Eble li vizitis ŝin unu aŭ du fojojn, sed al kio utilas tiuj vizitoj? Ŝajnas, ke ŝin atakis grava malsano kaj krome...

malsanulo ne nur bezonas vizitojn kaj medikamentojn de resanigisto, sed precipe bonan zorgadon, flegadon kaj plifortigitan nutraĵon. Sed kiu pagos ilin?

— La komunumo[57].

— La komunumo!?... Vi ne konas nian komunumon. Ĝi estas regata de vilaĝestro, havanta neniun influon kaj de kelkaj riĉaj bienposedantoj; kaj ĉu tiu fremda Dorotea povas ilin interesi?

— Ĉu vi neniam parolis kun ŝi?

— Neniu, aŭ preskaŭ neniu parolas kun ŝi; ĉar ŝi parolas lingvon, kiun oni ne komprenas tie ĉi. Ŝi subite venis en la vilaĝon, okaze venis al Alings kaj restis ĉe li kelkajn semajnojn, poste li forpelis ŝin. La kompatinda knabino luis ĉambron de dometo, apartenanta al kulturlaboristo, kaj tie ŝi loĝas ankoraŭ nun kun sia knabeto kaj en mizeraj cirkonstancoj.

— Oni diras ke Alings estas la patro de tiu knabeto?

— Jes, neniu dubas pri tio, ĉar Dorotea ne estas la sola, kiun li metis en tian staton. Ankaŭ mia servisto, stulta knabo, sed ne idiota, kiel oni kelkfoje diras, estas lia bastardo[58], kies patrino tamen estas laboristino, poste dungita de Vestberg, unu el la bienposedantoj ekster nia vilaĝo. Via profesora moŝto nun scias el kia ligno estas skulptita la nova paciento, kaj se mi estus en via loko, mi...

— Jen, aŭskultu! — interrompis lin la profesoro. — Mi iros nun al Alings, sed antaŭe mi vizitos tiun fremdan Doroteon. Ĉu via servisto povus montri la vojon?

— Li estas al via servo, profesoro; bonvolu sekvi min, mi vokos lin, ĉar li dormas.

— Mi povas atendi ĝis li sin vestos.

— Tio daŭros nur unu minuton; li bezonas surmeti nur pantalonon, ĉapon kaj lignajn ŝuojn, kaj tion li faros en unu ektremo de la palpebro[59], ĉar Dirk estas iom stulta, sed rapidmova, kiam li ricevas ordonon.

Peĉjo ekstaris, la profesoro sekvis lian ekzemplon kaj ambaŭ sin direktis al la traveturejo, kie atendis ankoraŭ la veturilo kaj ĉevalo de la profesoro kun la veturigisto, ilin gardanta.

Peĉjo prenis la pendantan petrolan lampeton de sur la muro, kaj diris al la veturigisto:

— Vi devos gardi momenteton en la mallumo, mi tuj revenos kun la lampeto.

Minuton poste Peĉjo kaj la profesoro staris antaŭ la lito de Dirk. Li kuŝis kviete sur la dorso kaj ronketis tra la duone malfermitaj lipoj. Li sonĝis kaj imagis esti posedanto de granda cirko[60] kun multaj ĉevaloj, galopantaj unu post alia en la areno[61] dum li laŭte klakigis la vipon. Sed la skuanta mano de Peĉjo ruinigis la tutan cirkon kaj kiam Dirk malfermis mirigite la okulojn, li vidis antaŭ si ne la galopantajn ĉevalojn kaj la cirkovizitantojn, sed fremdan sinjoron kaj sian mastron. La lumo de la lampo kun la kupra reflektoro igis la knabon kelkfoje palpebrumi, li frotis la okulojn kaj poste kviete rigardis la ruinigintojn de la bela cirko.

— Ĉu vi vekiĝis, Dirk?

— Jes.

— Bone!... Tuj leviĝu, vestu vin kaj montru al ĉi tiu sinjoro kie loĝas Alings.

— Ho, Alings!

— Kaj la fremda Dorotea, — diris la profesoro.

— Ho, kaj la fremda Dorotea!

— Jes, — diris Peĉjo. Ĉi tiu sinjoro ĵus venis veturile. La veturilo estas en la traveturejo. Vi iros veturile kun ĉi tiu sinjoro, kaj montros la bienan domon de Alings kaj la dometon de la fremda Dorotea... Ĉu vi bone komprenis tion?

— Jes.

Dirk ŝovis flanken la litotukon kaj kovrilon, saltis el la litoŝranko kaj sin vestis.

— Kio estas tio? — subite demandis la fremdulo, aŭskultante.

Ankaŭ Peĉjo aŭskultis, sed li aŭdis nenion aŭskultindan.

— Kiu tiel spiregas?

— Ho, nur la porkoj — respondis Peĉjo, kiu opiniis tion io tre ordinara.

— Ĉu li — (la profesoro fingre montris Dirk-on) dormas en la porkejo?

— Ne, nur apud la porkejo — respondis Peĉjo. — Ĉi tiu loko estas porkejo, bovinejo kaj samtempe dormejo de mia

servisto. Miaj servistoj kutimas dormi ĉi tie, alian dormejon mi ne havas por ili; sed ili volonte dormas en tiu litŝranko, ĉar vintre ili havas varman liton pro la bovinoj, kiuj nun estas sur la paŝtejo.

— Sed ĉu la fetoro[62] de la porkoŝtalo ne ĝenas ilin?

— Ho ne! Oni kutimiĝas al ĉio, ankaŭ al la fetoro de porkoj, ni jam ne sentas ĝin — kviete respondis la drinkejestro.

Dirk estis vestita, surmetis la pezajn lignajn ŝuojn, kaj atendis kun klinita dorso, stulte rigardante la fremdulon.

— Ni iru! — diris Peĉjo, kaj la trio, Dirk malantaŭe, sin direktis al la traveturejo. La profesoro eniris la postan parton de la veturilo kaj la veturigisto kun Dirk prenis lokon en la antaŭa parto post la vosto de la ĉevalo. Peĉjo malfermis la pordon de la traveturejo kaj tuj poste laŭta rulbruo indikis[63], ke la veturilo rapidas laŭ la strato en la direkto al la bienodomo de Alings.

Peĉjo refermis la pordon, iris al la drinkeja ĉambro, kaj detale rakontis, kio okazis.

La vizitantoj estis surprizitaj.

— Kiu iam kredus, ke tia avarulo venigus medicinan profesoron el la urbo! — diris Erasmus.

— Eble lin tuŝis la vila mano — moke rimarkis la buĉisto. Ĉiuj estis scivolaj kiel ĉio tio finiĝos.

— Ni ankoraŭ ne iras hejmen, — diris Ritsma. — Ni atendos la revenon de la profesoro.

Unuvoĉe oni decidis atendi kaj mendante novajn glasetojn da brando, ili denovi komencis interbabili pri Alings, pri la fremda Dorotea kaj pri la vila mano, kaj laŭte brubatante la manplatojn Peĉjo deklamis:

En ĉerk' ripozis Ŝercemul'
Li kuŝis sterniĝinta,
Kaj ĉiuj plendis, Ŝercemul'
Nun estas jam mortinta!
Ho ve! ho ve! ho ve!!

ĈAPITRO TRIA.

Dumnokta vizito de urba profesoro — Du pacientoj — Paŭl.

La vilaĝo estis unu el la plej belaj kaj riĉaj de la provinco kaj kuŝis en ĝia norda parto je unuhora distanco de la mardigo [64] etendiĝanta laŭlonge de la Norda Maro. La vilaĝo, vidata de sur la turo, staranta en ĝia mezo, sterniĝis ĉirkaŭ tiu turo kiel damtabulo [65]. La vilaĝo konsistis el kvar longaj stratoj. Ĉe la norda flanko kuŝis en la dekstra angulo de tiu damtabulo, la drinkejo „La Verda Ĉevalo", tre malnova kalkŝmirita domo, eble la plej malnova de la tuta vilaĝo. Ĝi estis tiel malnova ke la alta frontono [66], finiĝanta laŭ pinto kun kamentubo, staris tiel kurblinie ke ĝi minacis la preterpasantojn per subita ruiniĝo.

La lundisko [67] staranta kiel arĝenta falĉilo sur la sennuba ĉielo, ridetante malsupren rigardis kaj kvazaŭ sekvis kun oblikve tenata kapo la veturilon de la profesoro, kiu rapidis norden laŭlonge de la strato, kiu post kelkaj minutoj ŝanĝiĝis en makadaman vojon [68]. Tiu vojo sin etendis kvaronhoron rekte al la nordo, poste subite turniĝis orienten al la mardigo. Dekstre kaj maldekstre de la vojo kuŝis longfosoj, ĉiam duone plenaj de senflua akvo en kiu abunde kreskis longaj kanoj, neniam fortranĉataj, unue ĉar ilia valoro estis preskaŭ nulo, due ĉar ili estas sola ornamaĵo de la kamparo, kies vojoj ofte estas iom unutonaj pro malesto de arboj. La vojo, sekvata de la veturilo tamen estis ĉe unu flanko provizita je arboj, kies longaj ombroj je egalaj distancoj falis trans la hele lumigitan vojon.

Post deko da minutoj la veturigisto turnis la kapon ĉar laŭta frapado sur la vitron per kiu la veturilo estis dividita en du partojn, diris al li ke la profesoro havas ion por ordoni.

— Unue al la fremda Dorotea! — ordonis la profesoro. La veturigisto sin turnis al Dirk, sidanta ĉe lia flanko kaj kiu rigardis penseme antaŭ si.

— Kie loĝas tiu Dorotea? — li demandis.

— Ho, mi scias... jen ŝi loĝas — respondis la stultulo, etendante la manon nordorienten.
— Laŭ tiu ĉi vojo?
— Jes.
— Ĉu malproksime?
— Ne.
— Montru la domon tuj kiam ni povos vidi ĝin.
— Jes.
La veturilo iris pluen kaj la veturigisto rigardis la knabegon, kiu kun pintigitaj lipoj sidis ĉe lia flanko. Li aspektis kiel iu, kiu fajfas, sed el la lipoj ne eliĝis eĉ unu sono.
— Kia stranga junulo, — pensis la veturigisto kaj demandis:
— Ĉu vi estas la filo de la drinkejestro?
Dirk retiris la lipojn, strabe rigardis la veturigiston kaj respondis lakone:
— Se mi estus, mi ne estus tie ĉi.
— Stranga respondo, — pensis la veturigisto kaj demandis:
— Kie do vi estus, se vi estus lia filo?
— En Drento[69].
— Ĉu la filo de la drinkejestro loĝas tie?
— Jes.
— Kion li tie faras?
— Eble li dormas.
La veturigisto ekridis kaj demandis plue:
— Ĉu vi ĵus dormis?
— Jes.
— Sed vi venis el la ĉevalejo, ĉu vi tie dormas?
— Mi dormas en la porkejo.
— En la porkejo?... Ĉe la porkoj!?
— En mia litoŝranko.
— Ĉu tiu litoŝranko staras en la porkejo!?
— Apud la porkejo.
— Ĉu estas agrable dormi tie?
— Jes, sed la kuloj kelkfoje iom pikas.
— Ĉu vi ĉiam devas tie dormi?
— Jes.
— Ĉu vi neniam deziris pli bonan dormejon, sen kuloj?

— Se mi estus riĉa, mi dungus knabon, kiu devus forpeli la kulojn.

La veturigisto denove ridis, pensante:

— Kia strangulo! — kaj ĉar lia scivolo pri la stultulo estis instigita li demandis:

— Ĉu vi havas ankoraŭ gepatrojn?

— Nur patrinon.

— Via patro mortis?

— Mi ja ne havas patron.

— Vi tamen havis.

— Se mi havus patron, mi dirus lin peti al mia mastro loki benketon en la traveturejo.

— Por kio benketon?

— Por tie sidi kiam vespere mi devas gardi la ĉevalojn de la farmistoj.

— Nu, petu mem pri tiu benketo.

Dirk ne tuj respondis, nur ridetis; poste li pintigis la lipojn kvazaŭ por fajfi, sed anstataŭ fajfi li pensis:

— Kia malsaĝulo vi do estas: mia mastro ja ne permesas al mi sidiĝi sur tiu benketo. Poste subite rigardante la veturigiston, li direktis al li sian unuan demandon:

— Ĉu vi havas kuniklojn?

— Mi ne havas kuniklojn. Ĉu vi havas?

— Jes.

— Multajn?

— Mi havus tre multajn se mi estus Alings. — Kaj pensante pri la aerkastelo kun la miloj da kunikloj li ripetis al la veturigisto, kion li estis revinta la pasintan vesperon:

— Se mi estus Alings, mi volus havi cent domojn; en ĉiu domo cent ĉambrojn, en ĉiu ĉambro cent kuniklejojn, en ĉiu kuniklejo cent blankajn kuniklojn, kaj cent knabojn por kolekti nutraĵon... Sed mi mem nutrus!

La veturigisto eksplodis en ridon, sed kiam li refoje ekrigardis la knabegon, kompato lin ekposedis, ĉar li subite komprenis ke lia gvidanto al la du novaj pacientoj estas speco de idioto aŭ stultulo.

— Nu! eble vi estiĝos tiel riĉa kiel Alings... Ĉu baldaŭ ni vidos la domon de tiu Doroteo?

— Ne.

La vojo sin direktis nun sudorienten kaj sin etendis kiel longa pala strio inter la longfosoj ĝis la mardigo. Ĉi tiu nova parto de la vojo ne posedis arbojn, sed ĉe ĝiaj ambaŭ flankoj kuŝis ĉie la du longfosoj kun la altaj kanoj nun starantaj rekte en la akvo kun kapoj kiel penikoj [70] kliniĝintaj malsupren, de tempo al tempo ili moviĝis tien kaj reen pro la malforta nokta vento.

Dirk, kiu jam ofte vidis tiun vojon, ne atentis ĝin, sed ĝi impresis la veturigiston, por kiu ĝi estis io bela kaj eksterordinara. Post kelke da minutoj li vidis kelkajn dise starantajn dometojn dormantajn en la lunlumo, flanke de la vojo, kaj li demandis, fingre montrante la unuan:

— Ĉi tiun?

— Ne, tiun! — respondis Dirk, montrante la duan.

— Sed kiel ni transveturos la longfoson?

— Ni ne povas transveturi.

— Kiel do ni alvenos al la dometo?

— Laŭ la longa tabulo.

La veturigisto komprenis kion la knabo intencis diri, kaj parolis plue:

— Sekve la veturilo devos atendi sur la vojo dum la profesoro transiros sur la tabulo por iri al la domo?

— Jes.

Intertempe la profesoro sidis sur la mola kuseno en la posta parto de la veturilo pripensante la celon de sia vojaĝo. Antaŭ du tagoj li estis ricevinta de Alings mallongan leteron enhavanta la jenan enhavon:

Altŝatata profesoro.

„Mi estas malsana jam tri semajnojn kaj turnas min al vi, „timante ke la kuracisto de mia vilaĝo ne povos resanigi min, „ĉar ĉiuj liaj medikamentoj efikas nenion bonan. Mi ne dormis „dum kelke da tagoj pro terura doloro en mia dekstra flanko „kaj mi timas ke nur operacio povos min resanigi. Sed ne „volante konfidi mian korpon al operacio de mia resanigisto, „mi petas vin veni ĉi tien por ekzameni min en mia domo, „ĉar pro specialaj motivoj mi ne deziras esti transportata en

„la hospitalon aŭ en malsanulejon de la urbo. Ĉi kune mi „sendas letereton de mia kuracisto, kiu donos kelkajn informojn „pri mia situacio.

„Estime kaj atendante

„L. Alings, bienposedanto."

La profesoro neniam aŭdis pri Alings, li sciis nur ke la bienposedantoj en la provinco estas riĉaj kaj ke financaj malhelpaĵoj neniam ekzistas por ke resanigisto de la urbo rifuzu sian helpon kiel ajn malprosime loĝas la bienposedanto. La profesoro nur malofte havis pacientojn ekster la urbo, unue ĉar liaj akademiaj prelegoj [71] kaj liaj multaj pacientoj en la urba malsanulejo tion preskaŭ malebligis, due ĉar li ne volonte sin enmiksis en la praktikon de la vilaĝaj doktoroj. Sed la aldonita letereto de la resanigisto de Alings sciigis al la profesoro, ke lia kunhelpo estas nepre necesa, ĉar la malsano de Alings ŝajnis esti ne nur danĝera sed tiaspeca, ke la vilaĝa resanigisto ne scipovis ĝin diagnozi [72]. Ĉio tio estis instiginta la profesoron plenumi la deziron de Alings. La interparolado kun Peĉjo tamen estis decidiginta lin unue viziti la fremdan Doroteon.

Lia veturilo nun haltis, la veturigisto malfermis la pordeton kaj sciigis al la profesoro ke li estas ĉe la celo de la vojaĝo. La profesoro elsaltis sur la makadaman vojon kaj rigardis ĉirkaŭen.

— Kie estas la domo de tiu virino? — li demandis.

Dirk jam staranta ĉe la transirtabulo, etendis la brakon al la dometo ekkriante:

— Jen tie! — Samtempe li ŝovtreniĝis antaŭen kaj baldaŭ staris ĉe la transa flanko de la longfoso atendante la profesoron por indiki al li en kia parto de la dometo loĝas lia nova paciento. La indikita dometo staris je trideko da paŝoj pli malproksime malantaŭ la kreskaĵa barilo [73], kiu ĝin tute ĉirkaŭis. La stultulo malfermis la pordeton de tiu barilo kaj atendis la alproksimiĝon de la profesoro, kiu rapide venis kaj vidis antaŭ si malgrandan laboristan loĝejon kun pinta tegmento el tegoloj. La antaŭa muro havis kvar fenestrojn apartigitajn de du pordoj en la mezo, unu flanke de la alia. Neniu fenestro estis de interne lumigita per lampo. Do la loĝantoj dormis.

Dirk iris al la dekstra flanko de la dometo kaj penis enrigardi internen sed vidante nenion, li premis la orelon al la fenestro por aŭskulti. Nenion aŭdante, li ŝoviĝis al la maldekstra flanko de la dometo kaj denove rigardinte tra la fenestroj kaj denove preminte la orelon sur la vitron, li lakone [74] diris al la profesoro, staranta ĉe la pordoj:

— Ĉiuj dormas.

— Kie loĝas tiu virino?

— Ĉi tie! — respondis Dirk, montrante la dekstran pordon.

— Bone — diris la profesoro. — Reiru al la veturilo kaj atendu tie ĝis mi vokos vin aŭ la veturigiston.

Dirk, volonte enirus kun la fremda sinjoro, sed vidante ke tio estos neebla, li malrapide trenŝoviĝis al la transirtabulo, malrapide ĝin transiris, kaj grimpis en la autaŭaĵon de la veturilo, kie li pacience sidiĝis, atendante la venontajn okazantaĵojn. Dume la veturigisto staris ĉe la ĉevalo.

La profesoro, restinta sola, serĉis sur la pordokadro sonorilon por veki la malsanulinon, sed ne trovinte ĝin, frapetadis sur la fenestron; atendinte kelkan tempon kaj aŭdante neniun bruon interne de la ĉambro, li ripetis la frapetadon sur la fenestron de la aliaj loĝantoj. Post kelkaj minutoj la maldekstra pordo duone malfermiĝis kaj virina kapo elsoviĝis eksteren, demandante:

— Kio estas?

— Mi estas resanigisto el la urbo, mi venis pro la malsanulino, loĝanta en la alia parto de ĉi tiu domo, sed ŝajne ŝi dormas, aŭ estas tro malsana por malfermi al mi, tial mi vekis vin.

— Ho! resanigisto el la urbo!... Jes, Dorotea eble dormas; mi malfermos por vi ŝian pordon kaj iros kun vi por helpi se bezone, al ŝi aŭ al vi.

Ŝia kapo malaperis, sed post mallonga tempo la virino revenis kun ŝlosilo.

— Pardonu, doktoro, re mi atendigis vin kelke da minutoj, sed mi devis iom vesti min.

Ŝi malfermis la alian pordon kaj la profesoro eniris. La virino sekvis lin kaj ferminte la pordon ekbruligis alumeton, ĉar ĉio ĉirkaŭe estis tiel malluma, ke oni vidis nenion. Ambaŭ

enirintoj staris en mallarĝa koridoro [75]. La virino iris pluen kaj malferminte duan pordon tra kiu si eniris, invitis la fremdulon sekvi ŝin. Per la alumeto, kiun ŝi tenis inter du fingroj, ŝi ekbruligis petrolan lampeton, starantan sur la tablo meze de la ĉambro, kaj diris:

— Dorotea kuŝas en la litoŝranko.

— Lumigu, mi petas, — diris la profesoro.

La virino prenis la lampon kaj alŝovis seĝon al la lito, kies pordetoj estis larĝe malfermitaj.

La profesoro ne tuj sidiĝis sed rigardis en la liton. Tie kuŝis kadavre [76] pala virino kun korve nigraj haroj.

— Ĉu tio estas la fremda Dorotea?

— Jes, doktoro.

— Kio estas tio? La profesoro fingre montris ion kuŝantan ĉe ŝia flanko kaj kion li ne povis distingi pro la litotuko ĝin kovranta.

— Tio estas Paŭl.

— Ŝia knabo?

— Jes, doktoro.

— Ĉu tiu infano kuŝas ĉe la malsanulino?

— Kie alie?

La profesoro iom pripensis, poste li diris:

— Ĉu li ne povas dormi en via domo?

— Mi ne havas sufiĉan lokon kaj nur du litojn, unu por mi kaj mia edzo kaj unu por niaj tri infanoj.

— Sed tiu infano devas esti forigata de sia patrino, li ankaŭ malsaniĝos. Tiu virino ne havas edzon, ĉu ne vere?

— Mi kredas ke ŝi ne havas, sinjoro.

— Ĉu ŝi neniam parolis pri li?

— Ŝi parolas nur malmulte, ĉar ni ne komprenas ŝian lingvon.

— De kie ŝi venis kaj kiam?

— Neniu scias de kie. Antaŭ tri jaroj ŝi venis kaj Alings akceptis ŝin kiel servistinon, sed post du aŭ tri monatoj li forpelis ŝin el sia domo. Mi luigis al ŝi tiun ĉi ĉambron sed jam dum tri monatoj ŝi ne povas pagi la luprezon [77]. Kiam ŝi enloĝiĝis, ŝi havis aukoraŭ monon por pagi kaj por aĉeti

nutraĵon kaj aliajn bezonaĵojn, sed ŝi elspezis ĉion, kaj ĉar ŝi estas malsana jam kelkajn monatojn kaj ne povas plu labori sur la kampo, kion ŝi faris post kiam Alings forpelis ŝin, ŝi estas por ni granda zorgo kaj ŝarĝo, ĉar ni devas doni manĝaĵon al ŝi kaj al la knabo... Neniu sin okupas pri ili kaj neniu ŝin helpas kaj la doktoro ne venas plu, dirante ke ŝi suferas pro ftizo kaj ke si ne resaniĝos.

— Ĉu la vilaĝa komunumo ne helpas?

— Ĝi helpas nur vilaĝanojn, sed ŝi estas fremdulino.

La profesoro prenis la malgrasan manon de la malsanulino kaj atente ŝin rigardis. Post momento li diris:

— Ŝi ne povas resti tie ĉi, ŝi nepre devas esti transportita al la urbo en la malsanulejon. Mi miras ke la riĉaj farmistoj kaj bienposedantoj faras nenion en ĉi tiu afero.

La virino levis la ŝultrojn kaj diris:

— Farmistoj kaj bienposedantoj helpas neniun. Kio al ili estas tia fremda virino? Ŝi ja ne estas bovino aŭ ĉevalo? Ŝe ŝi estus bovino, kostanta monon kaj kies morto kaŭzus malprofiton, ho, ili tuj venigus bestokuraciston.

— Kial do ŝin forpelis tiu Alings? — demandis la profesoro, volanta certigon pri tio, kion Peĉjo jam diris al li.

— Ĉar ŝi estis graveda kaj ĉiu diris ke li estas la patro de la naskiĝonta infano, kaj ĉar Alings pretendis ke li havas nenion komunan kun tiu bastardo, li forpelis la fremdulinon.

— Sed ĉu ŝi ne diris ke li estas la patro?

— Mi ja diris al vi, doktoro, ke ŝi parolas fremdan lingvon; neniu ŝin komprenas. Ŝi parolas nur malmultajn vortojn, kiujn ni en ĉi tiu loĝejo komprenas; sed ŝi povas klarigi al neniu pri tio, kiu estas la patro de Paŭl, cetere kion tio utilus? Alings certigis ke li estas senkulpa pri tio.

— Ĉu oni kredas lin?

— Certe ne, ĉar Dorotea ne estas la unua, kiun li igis malfeliĉa. En la vilaĝo estas alia knabo, kompatinda stultulo, duone idiota, kiu ankaŭ estas lia filo, sed kion povas la knabinoj, kiujn li delogis kaj poste forpelis el sia domo? Ili estas tute senhelpaj kaj neniu sin okupas pri ili.

La profesoro komparis la diraĵojn de ĉi tiu virino kun tiuj

de la drinkejestro, kaj kelkan tempon li restis staranta, atente kalkulante la pulsobatojn [78] de la suferantino, kiu kiel mortintino kuŝis sur la lito kaj ĝis nun estis doninta neniun signon de vivo, ĉar ŝia spirado estis tiel malforta ke oni konsideros ŝin senviva. Fine li ellasis ŝian brakon kaj tuŝis ŝian frunton.

— Ĉu ŝi mortos, doktoro? — per tremeta voĉo demandis la virino, daŭre lumiganta la vizaĝon de la malsanulino per la lampo, kiun ŝi havis en la mano, kaj ŝi daŭrigis:

— Tion mi tre bedaŭrus, ĉar ŝi estas, kiom mi povas juĝi, bona virino, kaj ni ŝin tre kompatas, kvankam ŝi estas por ni granda ŝarĝo, ĉar ni estas nur malriĉaj homoj.

— Mi transportigos ŝin al la urbo — diris la profesoro.

— Kaj la infanon?

— Kian aĝon li havas?

— Tri jarojn.

— Lin mi ne povos transportigi tien; ĉu vi povos zorgi pri li, se vi ricevos por tio monon?

— Volonte ni farus tion, sed ni havas nur du litojn... estos al ni tre maloportune preni lin en nian ĉambron, precipe ĉar ni preskaŭ la tutan tagon estas eksterdome... Eble la almozulejo [79] lin akceptos post kelke de semajnoj, sed ne tuj, ĉar la komunumestroj antaŭe devos pridiskuti [80] tion.

— Ellitigu la knabeton kaj vestu lin; mi revenos post unu horo kaj tiam mi diros, kion mi intencas fari kun li, antaŭe mi devos iom ekzameni la patrinon.

La virino, metinte la lampon sur la tablon, ellitigis la knabeton kaj sidiĝis kun li sur seĝon por ke la profesoro ekzamenu la malsanulinon, sed la knabeto vekiĝis kaj ekvidante fremdulon [81], laŭte ekploris.

La malsana virino malfermis subite la grandajn nigrajn okulojn, kaj surprizite rigardis la profesoron.

— Ne maltrankviliĝu Dorotea — diris la alia virino, vidinte la vekiĝon de la suferantino, — tio estas doktoro... alia doktoro... el la urbo.

La malsanulino volis eksidi, sed la profesoro geste ordonis al ŝi resti kuŝanta kaj ekzamenis ŝian bruston. Li sin kurbis super ŝi kaj atente aŭskultinte ŝian spiradon, li diris:

— En kaj elspiru kelke da fojoj.

Ŝi ne komprenis la ordonon de la profesoro sed la alia virino alproksimiĝis kaj dum ŝi forte en kaj elspiris, ŝi diris:

— Faru tion!

La suferantiono komprenis kaj obeis.

— Mi jam aŭdis, — diris la profesoro kaj sidiĝinte li faris en diversaj lingvoj kelkajn demandojn sed ĉio estis vana, la malsanulino ne komprenis lin.

— Stranga afero, — li murmuris, ankoraŭ kelkan tempon atente rigardante ŝin. Fine li ekstaris kaj diris al la alia virino:

— Ĉu vi povas resti tie ĉi ĝis mia reveno? Mi devas nun viziti Alings kaj estos ree en ĉi tiu domo... eble post unu horo.

— Alings ne helpos ŝin, doktoro.

— Mi ne iras al li por peti pri lia helpo; li estas malsana kaj atendas min.

— He! Ĉu li estas malsana?

— Ĉu vi ne sciis tion?

— Ni ne vidis lin dum kelkaj tagoj, okazas ofte ke ni ne vidas lin eĉ dum tuta monato; sed pri lia malsano ni aŭdis nenion. Mi atendos tie ĉi ĝis via reveno, doktoro.

La profesoro iris for kaj fermis post si la pordon de la dometo. La veturigisto, vidante lin larĝe malfermis la veturil-pordeton. La profesoro ensaltis kaj diris:

— Nun al Alings.

La veturigisto sidiĝis flanke de Dirk kaj demandis:

— Nu, kie loĝas Alings?

— Tie! — diris Dirk, montrante per la fingro antaŭ si en la perspektivo [82] longan malluman strion, super kiu elstaris aro da altaj arboj, akre konturiĝantaj kontraŭ la lune lumigita ĉielo. Tiu strio estis la mardigo kaj meze de tiuj arboj kuŝis la biendomo de Alings. Ĝi estis la plej bela en la tuta ĉirkaŭaĵo, eble la plej bela en la tuta provinco kaj konsistis el tri longaj, larĝaj, unu flanke de la alia konstruaĵoj por la brutaro kaj la fruktoj, kaj etendiĝis de la sudo al la nordo. Ĉe la suda flanko ili angule kontaktis [83] kun la vasta loĝejo. La tuto, formanta unu komplekson [84], estis ĉirkaŭita per profunda, larĝa fosego, kiel antikvaj nobelaj kasteloj, kaj ĉiuflanke protektata de belaj

altaj arboj, sur kiuj loĝis nekalkulebla aro da ardeoj. Inter la ĵus priskribita komplekso kaj la arboj sin etendis belaj ĝardenoj kun promenejoj, kiuj tamen estis nur malofte vizitataj, ĉar neniu trairis ilin krom la malmultaj loĝantoj de la biendomo. La makadama vojo kondukis ĝis la vasta autaŭkorto, kuŝanta ĉe la suda parto, kaj estis apartigita de ĝi pere de duobla, alta kradpordo el forĝita fero. Tiu duobla pordo, pendanta je gigantaj ĉarniroj sur du ŝtone masonitaj kolonoj [85], estis ĉiam vespere kaj nokte ŝlosita por malebligi ĉiun neinvititan venanton, suriri la korton; kiom tio du korthundoj ĉiam ŝteliris sur ĝi kaj ilia bojado fortimigis ĉiun, kiu nevokite volis riski sin sur tiun lokon.

La veturilo fine haltis antaŭ la kradopordo, la veturigisto refoje elsaltis sur la vojon. Dirk lin sekvis kaj ĉar la veturigisto vane turnis la ringon [86], pendantan sur la mezo de la kradopordo por malfermi, Dirk tiris malsupren feran ĉenon, kiu pendis ĉe unu el la ŝtonaj kolonoj. En la malproksimo aŭdiĝis sono de sonorilo, tuj poste laŭta bojado de du hundoj, kiuj rapidis al la vizitantoj por ataki ilin.

— Kuŝu! eksilentu! — kriis la stultulo, sed la furiozaj bestoj saltis kontraŭ la pordojn.

— Kuŝu! — refoje kriis Dirk, sed la hundoj, saltante tien kaj reen bojis ankoraŭ pli laŭte kaj pli furioze.

— Sonorigu ankoraŭ unu fojon — diris la veturigisto. Dirk obeis kaj dua sono de sonorilo aŭdiĝis.

— Kuŝu! — ekkriis la stultulo je la tria fojo.

En tiu momento lumstrio subite montriĝis el la meza porto de la brutarejo, ĝi fariĝis pli kaj pli larĝa kaj el la malfermiĝanta pordo aperis virino kun lanterno en la mano. Ŝi uzis la alian manon kiel reflektoron kaj la lumo sin direktis al la bojantaj hundoj. Ŝajnis ke ŝi vidis la veturilon kun la du viroj ĉe la alia flanko de la kradpordo, ĉar ŝi laŭte diris: — Ĉi tien Karo kaj Fidelo! Ĉi tien! — La hundoj lastfoje saltis kontraŭ la kradpordon, sin turnis kaj rapidis al la virino malantaŭ kiu ili malaperis en la brutarejon. Ŝi fermis la pordon kaj la dancanta lumo de la lanterno sciigis al la vizitantoj, ke ŝi proksimiĝas. Jam aŭtaŭ ol ŝi atingis la kradopordon ŝi demandis laŭtvoĉe:

— Kiu tie!?
— Doktoro! — respondis Dirk.
— Doktoro?
— Jes.
— Kiu doktoro?
— El la urbo — respondis la veturigisto.
— Ho, bone... feliĉe!

Dum la virino malŝlosis la kradpordon, la veturigisto elveturiligis la profesoron, kiu suriris la korton kaj sekvis la virinon.

— Ĉi tien, mi petas, doktoro — ŝi diris al li, direktante siajn paŝojn al la sama pordo tra kiu estis malaperintaj la korthundoj.

— Alings vin atendas kun malpacienco — ŝi diris, enirante la bovinejon, tiel longan ke la lumo de la lanterno lumigis ĝin nur duone. Ĝi estis kalkŝmirita konstruaĵo ĉe kies dekstra flanko troviĝis unu flanke de alia dudek bovinstaloj, kiuj povis enhavi po du bovinoj. Sed, ĉar oni estis en la komenco de la aŭtuno, la bestoj paŝtis sin ankoraŭ sur la herbejo. Irante laŭlonge de la vico da staloj, la profesoro rigardis ĉien kaj admiris la grandecon kaj longecon de la bela bovinejo, kies posedanto nepre devas esti riĉega viro. Malrapide la virino iris antaŭen dum ŝiaj duonpantofloj [87] ĉe ĉiu paŝo klaksonis sur la ŝtona planko. Fine ili estis trairintaj la stalaron, la virino puŝmalfermis pordon kaj invitis la profesoron eniri la manĝejon de la geservistaro. Ĝi estis vasta ĉambro; trairinte ĝin oni venis en marmoran koridoron ĉe kies fino estis la ĉiutaga ĉambro aŭ salono de la bienposedanto. Ambaŭ eniris.

— La doktoro el la urbo — diris la virino, fermante post si la pordon.

Anstataŭ respondo, venis profunda dolorĝemo el granda lito, staranta en unu el la salonanguloj. La virino metis la lanternon sur la tablon, starantan meze de la salono kaj iris al la lito antaŭ kiu staris tableto kun seĝo; invitinte la profesoron sidiĝi, ŝi reiris al la tablo, kie si restis staranta.

La profesoro rigardis en la liton. Tie surventre kuŝis Alings. Lia vizaĝo, sovaĝe aspektanta kaj esprimanta profundan doloron, sin direktis time al la nova veninto. La profesoro ofte estis

vidinta farmistojn kaj bienposedantojn el la nordo de la provinco, ĉar kiam ili estis grave malsanaj, ili ofte petis lian helpon, kaj multajn el ili li jam kuracis. Sed neeble li rekonus en la viro, kuŝanta antaŭ li, tian bienposedanton, ĉar la nezorgita longa ruĝa barbo de la malsanulo, liaj senordaj ĉien pendantaj lipharoj, liaj senordaj kapoharoj, kiuj kiel ruĝaj serpentoj ĉien ŝoviĝis, donis al li la aspekton de sovaĝulo, kian oni pentras por ilustri infanajn fabelrakontojn. Ĉiu, leginta tiajn librojn, kaj vidinta tiajn ilustraĵojn, tuj komparus Alings kun la sovaĝulo, pri kiu rakontas Perraŭlt en sia „Malgranda Fingreto" kun la sep fratoj.

Alings, kvankam giganto laŭ eksteraĵo, estis pigmeo[88] pri kuraĝo. Li montris nur kuraĝon al senfortuloj, sed neniam al aliaj. Alings estis giganta timemulo kaj neniu pli ol li timis la morton, kiun li la lastajn tagojn konstante vidis antaŭ la okuloj. Neniam antaŭe li estis malsana, sed la plej malgranda malsano estus kaŭzinta al li timegon, do, ne estas mirige, ke la doloroj, kiuj dum la lastaj horoj turmentadis lin korpe kaj anime, lin tremigis, ĉar laŭ lia opinio nur la morto, la terura morto, povus fari finon al liaj doloroj. En la komenco de sia malsano li estis vokinta la vilaĝan resanigiston, sed ties medikamentoj efikis nenion, fine li sentis sin devigata skribi leteron al la profesoro. Eble ties helpo kostus al li multan monon, ĉar ne nur la vojaĝo de tiu resanigisto, sed ankaŭ lia vizito kaj eventuala operacio, kiu jam antaŭe tremigis lin, postulos altan monsumon, spite tio la letero estis forsendita kaj jen la profesoro, fame konata pro la lertaj operacioj, kiuj savis la vivon al multaj danĝere malsanaj pacientoj, staris antaŭ li kaj time, sed plenespere li lin rigardis. La profesoro ŝajne legis sur la trajtoj de Alings, kion tiu viro pensas. Li sidiĝis ĉe la lito sur kiu sin tordis la suferanta bienposedanto kaj demandis:

— Ĉu vi estas la skribinto de la letero, kiun mi ricevis el ĉi tiu bienodomo?

— Jes, profesoro, mi estas Alings... Ho, helpu min, tiuj teruraj doloroj min mortigos.

— Ĉu vi ne povas eksidi?

— Mi ne povas, tio tro doloras min.

— En via flanko?

— Jes... Ĉu vi povus ĉesigi tiujn dolorojn?

— Eble mi povos... Kion diris pri via malsano la vilaĝa doktoro?

— Jen tion, jen alion.

— Kie estas la medikamentoj, kiujn li preparis por vi? La malsanulo fingre montris breton super la piedoparto de la lito, kie staris arego da boteletoj kaj skatoletoj. La profesoro ekstaris, prenis kelkajn boteletojn kaj okule kaj flare ekzamenis ilin. Poste li malfermis kelkajn skatotelojn. Kaj enrigardinte remetis ilin sur la breton.

— Ĉu ili ne taŭgas por mi? — demandis Alings.

— Vi povas forĵeti ĉion tion — kviete respondis la profesoro kaj residiĝinte li diris plue: — Provizore [89] vi ne bezonos medikamentojn.

— Kion do mi bezonos?

— Eble operacion — same kviete respondis la profesoro, sed mi ankoraŭ ne estas certa pri tio; mi unue devos diagnozi vian malsanon.

Alings fariĝis pli kaj pli malkvieta. La ŝvito de angoro [90] gutetis de lia frunto, ĉar ne nur la vorto operacio sed precipe tiu alia, kiun li neniam ekaŭdis, nome „diagnozi" lin tremigis.

— Kio tio estas, profesoro?

— Kio?

— Diagnozi.

— Ho, tio estas nur ekzameni por ekkoni vian malsanon laŭ la simptomoj.

— Ĉu tio estas doloriga?

— Ne timu. Viro kiel vi ja ne timos kelkan doloron? — Alings refoje kun timo rigardis la profesoron timante ke li tuj komencos lin diagnozi kaj li volonte demandus ĉu tiu diagnozo tuj okazos, sed la profesoro kviete forŝovis la litkovrilon kaj ordonis:

— Sidiĝu.

Alings obeis, sed tio kaŭzis al li teruran doloron kaj tion vidis la resanigisto, kiu komencis ekzameni sian pacienton. Post kelkaj minutoj dum kiuj li faris diversajn demandojn al

la malsanulo, li estis fininta sian ekzamenon kaj sciis kia malsano estis atakinta la suferanton, kaj diris:

— Vi bezonos operacion.

— Kiam, profesoro?

— Kiel eble plej baldaŭ.

— Ĉu ĝi estas danĝera?

— Ĉiu operacio estas pli aŭ malpli danĝera, sed mi kredas ke vi povos elteni ĝin pro via forta korpo kaj ĉar vi estas ankoraŭ juna viro.

— Ĉu vi povos fari tion tie ĉi?

— Tie ĉi?... Eble mi povos sed pli volonte mi faras miajn operaciojn en la malsanulejo en la urbo.

— Mi tre dezirus ke tio okazu en mia domo.

— Sed kial? La kostoj estos la samaj.

Alings, kiu plej multe amis sian korpon, sed kiu tamen tre ŝatis sian monon, forgesis por momento la danĝeron, lin minacantan; pensante pri sia mono, li diris:

— La samaj?... Ĉu vi povus diri al mi profesoro, kiom vi postulus por la operacio?

— Tio kompreneble dependas ne nur de la speco de la operacio, sed ankaŭ de la financa [91] kapablo de la pacientoj, ĉar ĉiu devas pagi laŭpove; kelkaj pacientoj pagas tute nenion, sed ĉar la malsanulejo ĉiujare kostas grandajn monsumojn, vi devas kompreni ke kelkaj pacientoj, precipe la riĉaj, devas pagi por tiuj, kiuj pagas nenion. — La profesoro fikse rigardis Alings, daŭrigante:

— Ekzemple: senmona knabino aŭ virino troviĝanta en mizeraj cirkonstancoj, estas akceptata senpage. —

Momenton li silentis, sed la mieno de Alings ne perfidis internan emocion [92], nek ion alian per kio la profesoro povus vidi ke lia paciento komprenas la aludon, tial li daŭrigis post kelka tempo:

— Ĉu vi ne konas kompatindulon en la vilaĝo, kiu bezonas kuracistan helpon por esti savita de certa morto?

— Mi konas nur malmultajn homojn en la vilaĝo, ĉar mi preskaŭ ne havas interrilatojn kun ili... Eble tia malsanulo estas en la vilaĝo sed...

Li eksilentis kaj konvulsie[93] kuntiris la muskolojn de sia vizaĝo dum li ĝemdiris:

— Ho, tiu doloro!... Ĉu vi ne povos ĉesigi ĝin profesoro?

— La operacio faros tion... Kaj sin turnante al la virino, staranta ankoraŭ ĉe la tablo meze de la salono, li daŭrigis:

— Ĉu vi ne konas tian malsanulon aŭ malsanulinon? La virino konsternite rigardis unue al Alings, ĉar ŝajne ŝi komprenis, kion aludis la profesoro, sed ĉar la bienposedanto premis sian ruĝan kapon en la kusenon, ŝi ne povis vidi kion la okuloj de ŝia mastro ordonas al ŝi, tial ŝi diris nenion, sed rigardante malsupren, ŝi komencis tordi sian antaŭtukon per unu mano dum ŝi apogis sin per la alia kontraŭ la tablo.

— Nu? — diris la profesoro. — Mi vidas ke vi jam pripensas; eble vi memorigis al vi tian personon. La virinon frapis la subita ekpenso, ke la profesoro eble jam aŭdis pri la fremda Dorotea, ĉar la stulta Dirk staris ĉe la veturilo, kiam la profesoro suriris la antaŭkorton, kaj ŝi tuj konjektis ke Peĉjo Klakilo, la mastro de la stultulo, estis parolinta kun la urba resanigisto. Tial ŝi diris post kelka hezito[94]:

— Eble la fremda Doroteo.

— Eksilentu! — ekkriis Alings, levinte la kapon el la kuseno, minace rigardante la mastrumistinon. — Eksilentu! mi havas neniun interrilaton kun ŝi.

— Kiu do diris, ke vi havas? — demandis la profesoro.

— Krome, ŝi ne estas danĝere malsana — diris Alings.

— Eble ŝi estas, ĉar via mastrumistino...

— Se ŝi estus, — diris Alings — kion tio min koncernus? Mi ne venigis urban profesoron por ke li...

— Mi ĉiam uzas la okazon, interrompis lin la profesoro, — kaj vizitante vin, mi samtempe povas viziti ŝin; eble ŝi bezonas mian helpon.

— Se ŝi estas malsana, mi ne estas kulpa kaj...

— Kiu kulpigas vin...?

— Klaĉantoj en la vilaĝo.

— Kion do klaĉas la vilaĝanoj?... Ĉu pri ŝi kaj pri vi?

— Jes, ili diras, ke mi estas la patro de ŝia knabo, sed mi ĵuras ke ili mensogas...

— Ĉu tiu malsanulino havas knabon?

— Jes, ŝi havas, sed kiam ŝi venis en mian domon, ŝi estis jam graveda, tion pruvis la naskiĝo de la infano, kiu venis en la mondon ok monatojn post kiam la patrino venis en nian vilaĝon. Kiam ŝi estis ĉe mi du monatojn, mi maldungis ŝin pro ŝia gravedeco timante ke la vilaĝanoj kulpigus min.

— Ĉio tio estas eble vera, — diris la profesoro, kaj mi ne venis por esplori tion. Mi tamen povas jam tuj diri ke tiu naskiĝo pruvas nenion. Multaj infanoj naskiĝas eĉ du monatojn antaŭtempe. La akuŝisto [95] povas konstati [96] ĉu naskiĝo estas antaŭtempa aŭ ne.

— Mi ĵuras, ke tiu infano ne estas mia — refoje diris Alings, kaŝante la vizaĝon en la kusenon.

— Mi ne venis por diskuti pri io tia; mi estas resanigisto, ne juĝisto, kaj havante nur malmultan tempon, mi devas foriri, sed antaŭe decidu tion, kio estas farota. Ĉu vi konsentas pri la operacio?

— Ĉu vi povos operacii min en mia domo?

— Kial?

Alings, antaŭvidante ke la fremda Dorotea iros al la urbo por esti flegata en la tiea malsanulejo, tuj decidis ke li mem ne volas iri tien, sed ne kuraĝante eldiri tiun motivon [97], li respondis:

— Ĉar mi ne povos elporti la transportadon tien... pro la doloroj... pro la skuadoj de la veturilo sur la vojo...

— Nu, mi faros la operacion ĉi tie, sed nur post du tagoj kaj en ĉeesto de la vilaĝa resanigisto.

— Ĉu vi povus diri kion tio al mi kostos?

La profesoro pensis pri la flegota Dorotea kaj farinte sian kalkulon li diris:

— Du mil guldenojn.

Alings konsternite rigardis la profesoron.

— Du mil guldenojn! Sed tio estas terura...

— Tio tute ne estas terura, sed nur malalta prezo por persono kiel vi. Sed vi povas malakcepti kaj nur pagi ĉi tiun mian unuan viziton.

— Kiom vi postulas por ĉi tiu vizito?

— Mil guldenojn.

Alings ne kredis al siaj oreloj kaj dum ŝviteroj ruliĝis de lia kapo, ĉu pro doloro ĉu pro aliaj kaŭzoj, li ekkriis:

— Mil guldenojn!?

— Jes.

— Nu, mi atendos vin post du tagoj.

— Bone, sed mi devas ankoraŭ atentigi vin pri tio, ke ĉiu operacio estas danĝera, mi sekve konsilas al vi reguli antaŭe viajn financajn kaj aliajn aferojn.

— Kiajn aliajn aferojn nome?

— Estas eble ke vi mortos kaj ĉiu mortonta aŭ eble mortonta viro havas siajn regulotajn aferojn rilate al sia testamento aŭ aliaj disponaĵoj.

— Testamento? Mi neniam pensis pri mia testamento.

— Vi ne havas edzinon, vi sekve devas testamente disponi pri via havaĵo, se ekzistas personoj, kiujn vi pro specialaj kaŭzoj kaj motivoj deziras favori. Eble tiaj personoj ekzistas, sed mi ne volas esti via konsilanto aŭ admonanto en tio, mi diris ĉion tion ĉar mia devo instigis min al tio. Agu laŭ via propra konscienco antaŭ ol estas tro malfrue.

— Ĉu la operacio estas tiel danĝera?

— Mi jam diris, ke ĉiu operacio povas esti tia.

La profesoro ekstaris, dirante plue:

— Post du tagoj mi revenos kun via vilaĝa doktoro, adiaŭ.

La virino prenis la lanternon, malfermis la pordon de la salono kaj eliris kun la profesoro. Neniu parolis unu vorton. Refoje trairinte la koridoron, la manĝejon de la gelaboristoj kaj la longan bovinejon, ili sin direktis al la antaŭkorto. La virino kelkfoje rigardis post si kaj komandis al la hundoj, kiuj grumblante sekvis, ke ili kuŝiĝu. Poste ŝi kondukis la profesoron trans la korton ĝis la kradopordo kaj malŝlosinte ĝin, diris, fingre montrante la stultulon:

— Tiu knabego povos diri al vi kie loĝas la fremda Dorotea, sinjoro.

La profesoro salutis, ensaltis la veturilon kaj ordonis:

— Denove al la alia paciento!

La veturilo ruliĝis returnen laŭ la makadama vojo.

ĈAPITRO KVARA.

Refoje en „la Verda Cevalo" — La stultulo enkondukas neatenditan gaston. Stranga lotado.

Ni reiros al la „Verda Ĉevalo", kie regis ankoraŭ granda bruo, ĉar la interparolado de la gastoj fariĝis iom post iom pli laŭta. Post kiam Peĉjo estis deklaminta la kvar liniojn per kiuj finiĝis la dua ĉapitro de ĉi tiu rakonto, ĉiuj hore kriis:

Ho ve! ho ve! ho ve!!...

— Sed, — diris la buĉisto, Alings, kvankam kuŝanta sterniĝinta, tute ne similas ŝercemulon, ĉar li ankoraŭ neniam ŝercis.

— Jes, li tamen ŝercis, — malsamopiniis Erasmus.

— Neeble!

— Kiam nome? — demandis alia.

— Du fojojn, la unuan kun la patrino de Dirk, la duan fojon kun la fremda Dorotea, — respondis Erasmus.

— Sed el tiuj ŝercoj fariĝis gravaĵoj, — diris Peĉjo, eble la urba profesoro pagigos al li tion.

— Kiel do?

— Atentu. Mi konas la homojn kaj mi tuj rimarkis ke tiu profesoro havas intenceojn kaj ke li pagigos la friponaĵojn de Alings.

— Peĉjo, mi esperas ke via diraĵo veriĝos kaj laŭ la proverbo ĝi devas veriĝi, ĉar post ĉiu ago venas tempo de pago kaj precipe post friponaj agoj, ĉu ne vere Bursma? — sin turnis la buĉisto al la muelisto.

— Jes, kompreneble! — diris Bursma kaj vole nevole li pensis pri la sakoj, kiujn oni konstante al li konfidis kaj image li vidis la vilan manon.

— Sed kiu plendos pri tiu ŝercemulo kiam li estas mortinta? — demandis Kesper.

— Nia horloĝisto estos lia plendanto, ĉu ne vere? — diris Erasmus, subite sin turnante al li.

— Ĝuste! — respondis la duonsordulo.

Ĉiuj ridis kaj sin amuzis, ankaŭ la horloĝisto, kvankam li ne komprenis kial.

— Kion vi diras pri tio, Klaj? — demandis Peĉjo. — Vi sidas kvazaŭ vi ne apartenas al la societo, kaj kvazaŭ vi dormas.

— Mi diras ke ĉio estas nura sensencaĵo... nura sensencaĵo! — balbutis Klaj, pensante al la vila mano.

— Sensencaĵo!? — ekkriis Kesper.

— Jes! nura sensencaĵo! mi... diras... ke tiu mano ne ekzistas...

— Ha! vi parolas pri la vila mano? — diris Erasmus.

La buĉisto mendis novan glaseton da brando, liane kzemplon sekvis kelkaj aliaj klientoj.

— Nu! — diris Bursma al Klaj — ĉu vi ne devas mendi glaseton?

— Mi volas glason da... mineral... akvo...

Ĉiuj ridis dum la buĉisto diris:

— Donu prefere lakton, Peĉjo.

— Lakton!? — indigne kriis Klaj, serĉante per la vitrecaj okuloj la lasten parolinton, sed ne trovante lin, ĉar ĉiuj vizitantoj ŝajnis turniĝi ĉirkaŭ li, la ebria farmisto balbutis:

— La diablo vin prenu!... trinku mem lak... ton!... mi volas mineralan akvon... sed tiu vila mano ne ekzistas...

Peĉjo rapidis al la bufedo por plenumi la mendojn de siaj klientoj kaj servante ilin ĉiujn, li diris:

— Ŝajnas al mi ke Klaj iom timas tiun manon.

— Eble ĝi tuŝis lin, vespere, kiam li rehejmiĝis kaj kiam li trinkis tro multe da... minerala akvo! — ŝercis Rinders.

— Nu, do!... diris Klaj, kial ĝi tuŝus min?... tial ĉar mi kelkfoje estis iom malĝentila kontraŭ... mia edzino, kiam ŝi estis malbonhumora... pro mia malfrua reveno?

— Ĉu vere ŝi estis malbonhumora pro tio! — kvazaŭ surprizite demandis Bursma, kiu bone sciis ke Klaj estas tirano en sia domo, kaj ke li kelkfoje eĉ batis sian edzinon kiam li estis ebria.

— Kelkfoje ŝi montris malbonan humoron... diris Klaj, sed min ne tuŝas ŝia humoro... kredu al mi! — kaj li pugnobatis la tablon.

— Kvietiĝu! — kriis la buĉisto, ne frapu tiun senkulpan tablon... tablo ne estas edzino.

— La diablo... vin prenu!... balbutis Klaj. Sed, mi diras al vi... ke vilaj manoj ne ekzistas... kaj neniam ekzistis... ĉar neniam mi vidis ilin.

— Jam atentu! — admonis Peĉjo, skuante antaŭ li la levitan fingron. — Jam atentu: kio ĝis nun ne okazis, povas okazi.

— Klaj neniam plu igos sian edzinon malbonhumora, — diris Polman. — Li de nun traktos ŝin kiel pupeton el porcelano, kaj por pruvi tion li de ĉi tiu vespero trinkos nur mineralan akvon anstataŭ brando aŭ...

— Aŭ lakton! — konkludis la muelisto.

Polman, kiu ankaŭ estis ebria, parolis nur malmulte; volonte li forirus kun Klaj kaj Rinders, sed Rinders, kiu neniam trinkis tro multe, sed ofte longe restis en la trinkejo por babili, sentis neniun deziron kontentigi la ebriajn farmistojn, ĉar li estis tre scivola pri tio, kio okazos ĉe Alings, kaj li nepre volis atendi la revenon de la urba profesoro. Ĉiuj do restis babilante, ŝercante kaj trinkante; la tempo pasis rapide; fine oni aŭdis en la malproksimeco la ruliĝantan veturilon, kiu revenis. Ĉiuj aŭskultis kaj Peĉjo, kiu havis akrajn orelojn ekkriis:

— Ĝi estas lia veturilo!...

Li pravis, ĉar ĝi ekhaltis, ne antaŭ la pordo de la traveturejo sed antaŭ la drinkeja ĉambro. Peĉjo tuj malfermis la pordon kaj iris sur la straton al la veturilo de la profesoro. La veturigisto malfermis la pordeton de la veturilo, la resanigisto elsaltis kaj eniris en la „Verdan Ĉevalon". La veturigisto restis ĉe la ĉevalo.

— Kie estas Dirk? — demandis Peĉjo al la veturigisto..

— Li ja baldaŭ eliros el la veturilo, — respondis ĉi tiu

— Li sidas en la posta parto... La veturilo skuiĝis kaj el ĝi elvenis Dirk portanta sur la brakoj ion, kio ŝajne estis peza, ĉar la stultulo sin klinis ankoraŭ pli multe teren ol ordinare.

— Kion do vi portas? — demandis Peĉjo.

— Ĝi estas Paŭl.

— De la fremda Dorotea? — Peĉjo kunfrapis la manplatojn kriante:

— Ho, mi komprenas, tio estas la komenco. Alings ekpagas siajn ŝuldojn. — Dirinte tion li sekvis la stultulon, kiu staris en la drinkeja ĉambro, rigardante la profesoron, pintigante la lipojn kvazaŭ por fajfi, sed anstataŭ fajfi li demandis:

— Kien mi starigos lin?

— Bonvolu transdoni lin al mi, — respondis la profesoro, kiu prenis la knabon sur la brakon, poste starigante lin sur la plankon li donis grandan moneron al Dirk kaj diris:

— Iru refoje dormi, mi ne bezonas plu vin.

Dirk staris ankoraŭ momenteton, rigardis la grandan arĝentan Nederlandan taleron*), refoje pintigis la lipojn, tuŝis per la dekstra mano sian ĉapon por montri sian dankon, kaj trenŝoviĝis for al la traveturejo, al la ĉevalejo kaj fine al la bovinejo, kie lin atendis lia litŝranko. Li glitigis la moneron tra la fendo de la ŝparkesteto, kie ĝi tintante falis sur la malgrandajn moneretojn.

Poste li restis sidanta kelkajn minutojn pensante, konstruante. Fine li kuŝiĝis surdorse, tiris la litaĵon sur la bruston kaj pensis, rigardante antaŭ si al la malluma muro de la litŝranko:

— Estas multaj farmistoj, bienposedantoj kaj riĉaj urbaj sinjoroj. Ofte ili venas veturile en nian traveturejon kaj ofte ili donas al mi moneron. Ĉi tiu riĉa urba sinjoro, kun kiu mi veturis al Alings kaj al la fremda Dorotea, donis al mi Nederlandan taleron kaj li konsentis ke mi sidas apud li en tiu bela veturilo. Ĝis nun mi neniam veturis en tia veturilo, sed nur en ligna grenveturilo, kiu tremigas koron kaj intestojn. Sed ĉi tiu veturilo estis tiel bela kaj oni veturas en ĝi tiel dolĉe kvazaŭ, oni sidus en sia lito. Kiel agrabla estas tia veturilo... Se ĉiu kliento de Peĉjo donus al mi Nederlandan taleron... mi volus havi grandan veturilejon kun belaj veturilo...j mi volus havi multajn ĉevalojn... maltajn veturigistojn kaj mi veturus la tutan tagon. Mi..." Jen subite li ekpensis pri tiuj aliaj konstruaĵoj kun la cent ĉambroj kaj pri la miloj da kunikloj, kaj liaj pensoj intermiksiĝis, fine ĉiuj imagaj veturiloj iris el la veturilejoj eksteren

*) Granda monen valoranta du guldenojn kaj duonan.

kaj sekvis unu la alian laŭlonge de la makadama vojo, kaj la blankaj kunikloj tiris ilin antaŭen, dum la ĉevaloj malaperis li ne sciis kien. Kaj li rigardis tiujn ravajn... belajn veturilojn... la kurantajn kuniklojn... ĝis ili kunfandiĝis en unu tuton en kies mezo li sidis kun pezaj okuloj sur kiujn la kompatema Morfeo subite ĵetis nigran vualon. La buŝo de la stultulo, kiu ĝis tiu tempo pintiĝis, kvazaŭ por fajfi, ŝanĝiĝis, ĝi ridetis kaj feliĉa-kontenta la stultulo profunde ekdormis.

En la drinkeja ĉambro sidis ankoraŭ naŭ klientoj, inter ili kvin burĝoj kaj ĉiuj malpacience atendis, ke Peĉjo revenos el sia familia ĉambro, kien li estis retirinta sin kun la profesoro por priparoli ion, kio tre interesis ilin ĉiujn.

Post deko da minutoj la pordo refoje malfermiĝis kaj la profesoro iris eksteren. Tuj poste oni aŭdis ke lia veturilo forruliĝas. Peĉjo revenis portante sur la brako la knabon de la fremda Dorotea; malrapide li proksimiĝis instigante la scivolon de siaj klientoj, kiuj rigardis lin per surprizitaj okuloj kaj ne sciante kion pensi.

Peĉjo nun ne brubatis la manplatojn, ĉar la knabo tion malebligis, sed mistere ridetante kaj skuante siajn arĝentajn harbuklojn li sidiĝis meze de la vizitantoj kaj fine diris:

— Jen la fileto de la fremda Dorotea.

Li rigardis al la ĉirkaŭe sidantaj personoj atendante ke iu el ili demandos, kion li faros kun la knabo, sed ĉiuj silentis, rigardis jen la ĝojan drinkejestron, jen la knabon, kiu per larĝe malfermitaj brunaj okuloj rigardis ilin reciproke.

— Jen li estas! — diris Peĉjo; poste li sidigis lin sur sian genuon, rajdigis la knabeton kaj fine demandis:

— Kiu el vi volas lin akcepti?

Neniu respondis, ĉar neniu sentis la deziron akcepti fremdan infanon. Plej scivola estis la duonsurda Kamen; li ne sciis, kion pensi pri la afero, sed opiniante ke la aliaj scias tion, li sin turnis al Kesper, demanante:

— Ĉu li restos tie ĉi?

La buĉisto respondis:

— Dorotea portigis lin ĉi tien ĉar vi estas tie ĉi? Ŝi diris ke vi estas la patro kaj ke vi lin akceptos. —

Kamen ne bone komprenis, kion diris la buĉisto, sed ĉar li ne volis ke la buĉisto ripetu sian respondon, li ŝajnigis sin kvazaŭ li bone komprenis kaj diris laŭkutime:

— Ĝuste! — post kio ĉiuj laŭte ridegis.

— Jen via infano! diris Peĉjo, metante la knabon sur lian genuon.

Kamen fariĝis ankoraŭ pli scivola kaj ne komprenante kial oni metis la knabon sur lian genuon, li ekkriis:

— Kion mi devos fari kun li?

— Li estas via! — laŭte respondis la buĉisto.

— Mia!?

— Jes, tion vi mem diris.

— Ho, nu, mi eble ni bone komprenis, — diris Kamen kaj sidigis la knabeton sur la genuon de la dika buĉisto, sed ĉi tiu metis lin sur la genuon de la ebria Klaj, kiu ankaŭ ne deziris akcepti lin kaj transdonis la knabon al Polman. Tiam Polman sidigis lin sur la genuon de Bursma.

— Mi akceptas nur knabinon, — diris Bursma kaj tuj poste Paŭl sidis sur la genuo de Erasmus. Sed la poeto, kiu amis infanojn, sed sidis sub la ŝuo de sia edzino, kaj sciis ke tiu edzino tute ne amas infanojn, sidigis la knabeton sur la plankon, dirante:

— Jen sidu kaj vin akceptu, kiu deziras...

La knabeto direktis siajn grandajn okulojn al Peĉjo, sed nenion diris. Tiam la drinkejestro residigis lin sur sian genuon kaj komencis ludi kun liaj longaj brunaj haroj.

— Kion do tio signifas? — fine balbutis Klaj.

Peĉjo respondis:

— Tion mi klarigos, aŭskultu: La patrino de... kiel vi nomiĝas? li diris al la knabeto.

— Paŭl! — li respondis, kaj rigardante la pordon li daŭrigis: Mi volus esti ĉe panjo.

— Panjo estas malsana kaj veturos al la urbo, — diris Peĉjo.

— Al la urbo? — scivole demandis Erasmus.

— Jes, al la malsanulejo.

— Kiu tion pagos? — demandis Blomsma.

— Aŭskultu! — respondis Peĉjo. — La profesoro, kiu ĵus foriris veturile, diris al mi, ke li estas vizitinta Alings kaj poste la fremdan Dorotean. Alings post du tagoj devas esti submetata al operacio en sia propra domo, kaj la profesoro, kiu faros tiun operacion, kunprenos kun si la fremdan Dorotean, kiu devos esti flegata en la urba malsanulejo, sed ĉar oni ne akceptas tie sanulojn, oni kompreneble ankaŭ ne akceptos la infanon, kaj ĉar Paŭl ne povos resti ĉe la najbaro de Dorotea, la profesoro konfidis lin al mi.

— Li sekve restos ĉe vi? — ekkriis Erasmus.

— Eble, sed prefere mi ne akceptos lin, ĉar mia filino ne amas infanojn kaj ĉar mia edzino jam ne vivas, me tre dezirus ke iu alia akceptus la knabon.

— Neniu lin akceptos, — diris Ritsma.

— Eble iu tamen akceptos lin, — certigis Peĉjo, — ĉar la akceptonto ricevos rekompencon.

La afero fariĝis pli kaj pli interesa kaj ĉar Peĉjo atendis momenton, rajdigante la knabon sur sia genuo, Erasmus diris:

— Rekompencon?

— Jes; ĉiu, kiu akceptos Paŭlon en sian domon, ricevos monate sufiĉe grandan monsumon por prizorgi lin.

— Kiom? — diris alia.

— Dudek guldenojn.

— Kiu tion pagos?

— Mi!

— Vi?

— Jes, mi pagos, sed mi estas nur la kasisto, la peranto[98], ĉar aliulo pagos.

— Alings? — surprizite ekkriis Ritsma, kiu ne povis kredi tion.

— Tion mi ne povas diri, sed la mono estos pagata, pri tio mi garantias[99]... Nu!? Kiu akceptos la knabon?

Ĉiuj silentis rigardante unuj la aliajn. Fine Peĉjo sin turnis de unu al alia:

— Ĉu vi, Ritsma?

— Mi ne akceptas lin.

— Ĉu vi, Rinders?

— Demandu al Klaj, eble li konsentos.

— Ĉu vi, Klaj?

— Mia edzino fariĝus tro malbonhumora.

— Ĉu vi, Polman?

— Mi eĉ ne pensas pri tio akcepti lin.

— Ĉu vi, Erasmus?

— Imagu ke mi revenus hejmen kun fremda infano, mia edzino forpelus nin ambaŭ.

— Sekve vi ne kuraĝas! — diris Bursma.

— Ĉu vi kuraĝas? — demandis la poeto.

— Mi volus kaj kuraĝus se Paŭl estus Paŭlino. Mi havas jam tiom da knaboj ke Paŭl estus malbonveninto.

— Ĉu vi, Blomsma?

— Mi ne havas infanojn..., ne kutimiĝis al ili, nek mia edzino.

— Vi akceptos lin, ĉu ne vere? — sin turnis la drinkejestro al Kamen, kiu ĉi tiun fojon komprenis la demandon.

— Diru „ĝuste!" ekkriis Erasmus. — Sed Kamen ne diris „ĝuste", sed:

— Portu lin al lia patro, al Alings.

— Mi jam komprenas ke neniu propravole akceptos lin, diris Peĉjo, sed mi promesis al la profesoro ke iu el ni lin akceptos... Kion fari?

Neniu respondis. Peĉjo rajdigante la knabon sur sia genuo, fine diris: — Ni lotu!

Refoje la vizitantoj rigardis sin reciproke kaj post kelka tempo Ritsma diris:

— Ni akceptos kun unu kondiĉo, nome ke la feliĉa gajninto rajtas transdoni la knabon al iu alia en la vilaĝo, kiu kompreneble ankaŭ ricevos la ĉiumonatan monsumon, ĉar tiu sumo sufiĉas, kaj multaj vilaĝanoj volonte akceptos la knabon sub tia bona pago.

Neniu kontraŭstaris, pensante ke la adoptado[100] estos nur provizora.

— Tia fremda anaso ankoraŭ neniam antaŭe estis forlotita, — diris Peĉjo, daŭre rajdigante sur sia genuo la forlototan knabon. Ĉi tiu ŝajnis esti kontenta pri la sorto, kiun la ĵetkubetoj destinos[101]

al li, ĉar li sidis kviete rigardante ĉirkaŭe al tiuj fremdaj homoj kaj ĉirkaŭaĵo, kiuj ŝajnis veki liajn intereson kaj scivolon. Li ne diris plu: Mi volas esti reportata al Panjo; kviete li atendis la okazontajn aferojn admire ludante per la poŝ-horloĝa ĉeno de Peĉjo.

Malferminte sian kajeron kaj prenante la krajonon Erasmus ekkriis:

— Atentu! mi notos la nomojn.

— Notu min lasta, diris la buĉisto.

— La lastan mi jam notis.

— Kiun do?

— Min mem. Tion mi postulas kiel rekompencon por mia sensalajra sekretarieco.

Neniu konstraŭstaris kaj dum Peĉjo laŭte deklamis:

El ĉerko saltis Ŝercemul'
Li dancis tra la domo,
Kaj ĉiuj kantis: Ŝercemul'
Vi estas stranga homo!
Brave! brave! brave!!

la skribisto notis unu sub alia:

1. Klaj.
2. Polman
3. Ritsma.
4. Bursma.
5. Vulkanus.
6. Kesper.
7. Kamen.
8. Blunt.
9. Rinders.
10. Erasmus.

Fine li estis notinda ĉiujn nomojn kaj dum ĉiuj eksilentis kaj plenatente rigardis la kajeron, la krajonon de Erasmus la ĵetkubetojn kaj la renversitan funelon, la poeto ekkriis:

— Klaj!

Klaj pene ekstaris, ŝanceliĝante aliris al la tablo, kaptis la kubetojn kaj sin turnante al Petro Klakilo, diris:

— Se mi gajnos, vi sendube transprenos de mi la knabon, ĉu ne vere, ĉar mi ne scias kiel kunporti lin hejmen.

— Mi promesas nenion, — diris Petro... nu! ĵetu!

Klaj ĵetis la tubetojn tra la funelkolon kaj kiam la kubetoj kuŝis senbrue, Erasmus kviete kaj singarde levis la funelon. Ĉiuj scivole rigardis la ĵetitajn poentojn.

— Naŭ! — kriis Erasmus, notante.

Polman ĵetis dua, sed nur kvar poentojn. Ritsma ĵetis naŭ.

— Bursma! — kriis Erasmus.

La muelisto kelkfoje frotis la kubetojn kaj ĵetis dek-kvin. Klaj ĝojis kaj Bursma kun batanta koro residiĝis. Vulkanus ĵetis nur kvin. Kesper, la dika buĉisto, kiu sekvis, ĵetis naŭ kaj kontente residiĝis dum la malkvieteco de la muelisto pligrandiĝis. Ankoraŭ kvar devis partopreni en la stranga ludado, li sekve havis la ŝancon [102] ke unu el ili lin superos, tamen ĉar dek-kvin poentoj estis multe, li timis ke la ŝarĝo falos sur dorson kaj refoje li pensis al ĉiuj siaj knaboj.

— Kamen! — kriis Erasmus.

La horloĝisto ĵetis nur tri.

— Tio pruvas, ke vere vi ne estas lia patro! — diris la forĝisto, kiu montris sian kontentecon kaj bonan humoron ĉar li mem ĵetis nur kvin poentojn.

— Blunt! — kriis Erasmus, kiu fariĝis tre nerva [103], ĉar image li vidis antaŭ si la furiozan vizaĝon de sia edzino, se li prezentos al ŝi la knabeton, kiun li eble gajnos mem.

Peĉjo Blunt stariĝis, metis Paŭlon sur la plankon kaj lotis.

— Dek ses! — kriis Erasmus.

— Hura! — kriis la muelisto, sentante ke subite muelilŝtono deruliĝis de lia brusto, kaj brubatante la manplatojn li imitis la drinkejestron, deklamante.

Vi estas stranga homo!
Hura! hura! hura!!...

Ĉiuj ekridis, ĉar nur miraklo povos liberigi la drinkejestron de la knabo.

Sed Peĉjo kviete residiĝis, reprenis Paŭlon sur la genuon kaj diris, rajdigante la knabon:

— Nu, Erasmus, ĵetu lasta!

Erasmus ridetante kaj plenkonfide kaptis la kubetojn pensante: Estus miraklo se mi ĵetus dek-sep aŭ dek-ok. Li ĵetis, atendis momenton dum ĉiuj kun streĉita atento fiksis la okulojn sur la funelon. Malrapide Erasmus levis la funelon kaj...

— Dek ok! — kriis unuvoĉe ĉiuj kunludantoj, brue batante la manojn escepte Erasmus, kiu paliĝis kaj refalis sur la seĝon.

Peĉjo kalkulis al li dudek guldenojn, dirante:

— Jen akceptu! Ĝi estas la pago pro la unua monato.

— Vi mem estas kulpa! — ridis la buĉisto.

— Kial? — demandis la poeto.

— Ĉar vi skribis vian nomon tutsube sur la liston. —

Erasmus ĝemis kaj rigardis la knabeton kaj la drinkejestron. Apenaŭ la laŭtaj krioj silentiĝis, li pete rigardis Peĉjon, dirante:

— Ĉu ne vere Peĉjo, vi transprenos lin de mi.

— La sorto decidis, respondis Peĉjo. — Fortuno ĵetis en viajn brakojn la filon de Dorotea, akceptu lin. — Dirinte tion, li ŝovis la knabeton al la kompatinda skribisto, kaj aldonis ridetante:

— Jen via patro, Paŭl, iru ĉirkaŭbraki lin.

— Mi gratulas! — diris la buĉisto.

— Mi ankaŭ! — diris Bursma.

— Akceptu ankaŭ mian gratulon, — diris la forĝisto.

— Kompreneble ni ĉiuj kore gratulas, — kriis Ritsma kaj nun la feliĉa gajninto nin regalos.

— Sed, mi do ne povas kunporti tiun infanon?... Kion diros mia edzino?

— Kuŝigu lin ŝtele kaj sekrete ĉe ŝia flanko, — konsilis Kesper, mistere levante la fingron, — kaj kredigu al ŝi, ke la cikonio surprizis ŝin per subita donaco.

— Kuŝigu la diablon ĉe la flanko de via edzino! — Kolere ekkriis Erasmus, kiu fariĝis malespera.

— Volonte mi farus tion, kondiĉe ke li forflugus kun ŝi, — moke respondis Kesper kaj per unu foje li malplenigis sian glaseton, kiun li tuj poste prezentis al Peĉjo, dirante:

— Plenigu ĝin Peĉjo, Erasmus regalas.

Ĉiuj prezentis siajn glasetojn eĉ Klaj kaj Polman, sed Erasmus diris konsternite:

— Mi regalas se Peĉjo transprenos la knabon.

Sed la drinkejestro rifuzis, dirante ke li ne volas, eĉ ne kuraĝas kontraŭstari la decidon de la sorto, kiu tiel neatendite faris el Erasmus patron kaj el lia edzino patrinon.

Vidante ke la poeto ne volas regali kaj ke Peĉjo ne transprenos la forlotitan knabeton, ĉiu pensis ke la plezuro finiĝis. Ritsma kaj Rinders ekstaris por foriri. Klaj kun Polman imitis ilian ekzemplon; tion ili faris pro serioza kaŭzo, ĉar ili ne povis bone paŝi kaj atendis ke la du aliaj farmistoj prenos ilin en sian mezon por tiel kvarope laŭiri la makadaman vojon ĝis la sablaj flankvojetoj, kondukantaj al iliaj farmodomoj.

— Salutu en mia nomo vian edzinon! — diris Ritsma al Erasmus, kaj gratulu ŝin okaze de ŝia subita patrineco. Kvarope la klientoj foriris; baldaŭ poste Vulkanus. Kesper kaj Kamen ekstaris por ankaŭ rehejmiĝi. Ili faris tion ridetante kaj ĵetante lastan mokan rigardon al la skribisto, kiu restas tutsola kiel kliento.

— Transprenu la knabon, Peĉjo; — li petegis, puŝante lin al la drinkejestro, — pensu pri mia edzino... Sed Peĉjo ridis, puŝis la knabon returnen al tiu, kiu honeste estis gajninta lin, dum li diris:

— Vi gajne lotis lin laŭ honesta maniero, vi akceptu lin tiel longe kiel vi deziras; mi ne volas miksi min en tiun aferon, ĉar ĉiuj min mokus.

Erasmus malespere rigardis antaŭ si dum kelka tempo, subite li salte leviĝis kaj rapidis al la strata pordo, malfermis ĝin kaj malaperis. Sed Peĉjo, kiu konis siajn klientojn, jam antaŭvidis tian rimedon eble uzotan de la skribisto por senigi sin de la knabo. Samrapide li kaptis Paŭl, portis lin eksteren kaj metante lin sur la stratŝtonojn li kriis al la forkuranta Erasmus:

— Jen staras la knabeto, vi jam enpoŝigis la unuan pagon; vi estas responda pri li; kaj sin turnante, li reiris en la „Verdan Ĉevalon" fermante kaj ŝlosante post si la pordon. Poste li

silente aŭskultis kaj aŭdante ke la skribisto revenis por forkunduki kun si la knabeton, la drinkejestro ridetante kaj ĝoje frotante siajn manojn blovestingis la lampojn kaj iris dormi.

ĈAPITRO KVINA.

Kvar Idoj de Cereso iras hejmen meznokte. Ilia interparolado — Stranga aventuro de Klaj.

La kvar farmistoj, tute ne supozante ke Erasmus klopodos senigi sin de la knabo, kiun li estis gajninta laŭ la plej honestaj reguloj de la loterio, kviete daŭrigis sian dumnoktan promenadon laŭ la strato de la vilaĝo kaj baldaŭ atingis la ponton, kiu kuŝis trans la larĝa kanalo. Ili transiris tiun ponton kaj sin trovis sur la makadama vojo, kiun ili laŭiris dum kvaronhoro. La luno per sia falĉilforma disko lumigis la vojon kaj malsuprenrigardis ridetante sur la kvar promenantojn, kiuj iris unu flanke de la alia. En la mezo estis Klaj kaj Polman, ĉar ili bezonis kelkfoje subtenadon de la aliaj, kiuj ne estis ebriaj, kaj do sendanĝere povis iri sur la lumigita vojo, kiun ambaŭflanke limigis longfosoj, aspektantaj kiel du nigraj striegoj pro la ombro, kiun ĵetis iliaj krudaj deklivoj kaj pro la kanoj plenigantaj ilin preskaŭ ĝis la nivelo [104] de la vojo. Nur tie kaj tie ĉi kelkaj longaj senfruktaj kanspikoj balanciĝis sur siaj longaj trunkoj kaj ŝajnis klinsaluti la preterirantojn, sed ĉi tiuj ilin tute ne atentis. Ili ne rimarkis la belegecon de la nokto, nek la kvietecon kiu ĉie regis, sed babilante kaj kun peno portante la pezajn birdojn, pendantajn sur iliaj ŝultroj, ili iris kaj faletis pluen.

— Terure peza estas mia ansero, — ĝemis Klaj, — ĝi min faligas preskaŭ. Polman, metu vian brakon ĉirkaŭ la mian... por ke ni povu pli bone subteni unu la alian.

— Atentu momenton, — diris Polman, — antaŭe mi metos mian anseron sur la alian ŝultron, ĉar la besto seninterrompe puŝas min dekstren.

— Jes, metu ĝin sur la alian ŝultron, — konsilis al li Klaj.

Polman tion faris, poste hokis la brakon ĉirkaŭ tiu de Klaj kaj denove la kvaro iris antaŭen.

— Vi gajnis unu el la plej pezaj anseroj, — diris Ritsma al Klaj.

— Sed la plej pezan gajnis Erasmus, — diris Ritsma. Ĉiuj laŭte ridis. La vojo nun kurbiĝis maldekstren kaj la kvaro, sekvante la kurbiĝon, marŝis pluen kun la luno post si. Kvar longaj ombroj, kunfandiĝantaj kaj disiĝantaj kaj denove kunfandiĝantaj ŝoviĝis antaŭen sur la vojo antaŭ la piedoj de la kvar farmistoj.

Klaj rigardis ilin kaj ĉar la ansero sur lia ŝultro ĵetis strangan ombron flanke de la kapo de lia propra ombro, li subite memoris la misteran vilan manon, kiu, laŭ la rakonto de Peĉjo, ankaŭ tiel mistere moviĝas trans homajn ŝultrojn, kaj li balbutis:

— Ĉio... estis sensencaĵo!

— Kio? — demandis Rinders.

— Ĉio, pri tiu vila mano...

— He, tiu mano vin timigas?

— Min?... Kion vi pensas... Se ĝi aperus trans mian ŝultron... mi simple... simple...

— Vi simple teruriĝus, — diris Ritsma.

Klaj subite haltis, balbutante:

— Ĉu mi teruriĝus?... Ĝi venu... tiu vila mano, mi... simple ĝin forpuŝus!

Ritsma ridis kaj diris:

— Nu!... ne haltu, ni devas iom rapide, estas jam tiel malfrue.

— Kiu horo estas?

— Preskaŭ la meznokta, kaj en tiu horo plej ofte venas tiu vila mano.

— Kial meznokte?

— Ĉar ĉiuj misteraĵoj montriĝas meznokte. Ni do rapidu!

Refoje unu hokis la brakon al tiu de sia vojkamarado, kaj refoje la kvaro promenis kaj faletis pluen dum la ombroj antaŭ iliaj piedoj ŝanceliĝis tien kaj reen kiel ondoj sur furiozanta maro.

— Mi gratulas la skribiston, — diris Rinders.

— Kaj mi lian edzinon, — diris Klaj. — Kiel ŝi ĝojos... pro tiu subita... patrineco.

Ĉiuj ridis.

— Mi fordonus mian anseron, se mi povus vidi lin rehejmiĝanta kun... kun tiu grasa ansero, — balbutis Klaj. Tiel mokante kaj babilante ili post kvaronhoro atingis la unuan flankvojeton, kondukantan al la farmodomo de Ritsma. Li adiaŭis la tri kunulojn kaj sola sin direktis hejmen. Klaj, Polman kaj Rinders triope daŭrigis sian iradon ĝis la dua flankvojo, kondukanta al la loĝejo de Klaj.

— Ni kondukos vin hejmen, — diris Rinders, timanta ke Klaj ne kapablos trovi la vojon tutsola.

— Ne!... Ne!! — protestis[105] Klaj. — Mi povas iri sola,... mi ne estas infano... kiu bezonas akompananton... sur tiu mallonga vojo... Iru do... mi ja atingos mian domon sen via helpo... Mi ne estas ebria... Iru do!

— Estas pli bone se ni iros kun vi ĝis la korto de via domo, — opiniis Rinders, jam paŝante sur la flankvojeton, sed Klaj fariĝis pli kaj pli obstina, dirante ke li nepre volas iri tutsola ĝis la korto kaj plue en sian domon.

Rinders reiris sur la makadaman vojon dirante dum li skuis la ŝultrojn:

— Nu, bone; iru sola, adiaŭ.

— Adiaŭ! — diris Klaj, irante pluen.

Rinders kaj Polman, hokitaj unu al alia, iris pluen sur sia vojo dum Klaj sekvis la sian. Liaj pezaj ŝuoj profundiĝis ĉe ĉiu paŝo en la molan, sekan sablon kaj supren ĵetis nubetojn da sableroj, kiuj brilis en la lunlumo.

— Mi volas iru tutsola! — diris Klaj, parolante al sia ombro, kiu nun moviĝis ĉe lia dekstra flanko kaj kiu sin klinis saltetante ĝis la longfoso en kiun malaperis la ombrokapo kun la ombro de la birdo kuŝanta sur lia ŝultro. Kelkajn fojojn la ebriulo preskaŭ falis, sed svingante la maldekstran brakon, kiu estis libera, ĉar la alia subtenis la anseron, li sin tenis sur la piedoj. Ŝanceliĝante kaj faletante li iris pluen jen ĉe la dekstra jen ĉe la maldekstra vojflanko kaj ĉiumomente unu el la longfosoj minacis engluti lin kun la birdo.

— Mi ne estas ebria! — li balbutis, sed... mi bedaŭras ke mi trinkis... tiun lastan glaseton... da brando, ĉar... tiu lasta glaseto supreniris... en mian kapon... Mi jam neniam... trinkos la lastan glaseton.

Li pripensis tiun decidon, sed ju pli li ĝin pripensis des pli liaj ideoj konfuziĝis kaj intermiksiĝis. Fine li demandis al si, svingante la liberan brakon por ne perdi la ekvilibron [106].

— Kio fakte estas la lasta glaseto?... Mi trinkis... mi pripensu momenton..., mi trinkis, mi kredas... dekon da glasetoj... Fiksu la nombron kaj diru... ke mi trinkis dekon..., tiam la lasta estas la deka... Mi do jam ne plu trinkos... dekon..., sed nur naŭ... jes, nur naŭ mi trinkos... nur naŭ glasetojn!

Subite li haltis meze de la vojo, refoje momenton pripensis kaj klakigante la fingrojn de la libera mano, li ekkriis, faletante pluen:

— Diablo! Min ekfrapas la penso... ke el la naŭ glasetoj, la naŭa estas la lasta! Nu!... se la naŭa glaseto estas la lasta el naŭ, mi trinkos... nur ok!... nur ok!

Refoje li haltis; balbutante:

— Sed el la ok, la oka estas la lasta..., mi do ne... trinkos... tiun okan, sed... nur sep!... Sed, pro la...! Jen mi estis falonta en la longfoson!... Kiel Rinders ridus, se mi vere falus en ĝin... Li dirus: Jen vi kuŝas... ĉar vi volis iri tutsola... Sed li ne ridos... mi ne enfalos!... Kiom da glasetoj mi do trinkos por ne trinki la lastan?... Eble sep!?... Sed la sepa estas la lasta el sep!... kaj la sesa estas la lasta el ses!... Diablo! la problemo [107] estas... malfacile solvebla!... Nu, mi ne volas plu rompi mian kapon... mi ne volas plu cerbumi... pri tiu lasta glaseto, sed... mi ĵuras, ke mi neniam plu ĝin trinkos!... Ho! jen mi denove preskaŭ... falis en la longfoson!... Kiel Rinders ridus!... Ridu nur... Ridu nur! Sed tutsola mi volas iri sur mian korton... kaj en mian... dormoĉambron!... Ĉu ŝi refoje nomos min... mizerulo [108]?... Se ŝi kuraĝas nomi min tia, mi refoje donos al ŝi tian piedbaton... kian mi donis... la lastan fojon... spite al ĉiuj... vilaj manoj!... ĉar vilaj manoj ne ekzistas!... Peĉjo Klakilo... estas malsaĝulo... kiu volis timigi min, kiam il diris ke... vila mano povas ĵeti iun en... la long-

foson... Ĉu Peĉjo tion diris?... aŭ iu alia?... Mi ne plu memovas... Mi pripensu fojon!...

Klaj denove haltis por pripensi tiun gravan aferon. Li sin turnis duone kaj rigardis aŭtaŭ si trans la kamparon, hele lumigitan de la luno. Antaŭ kaj malantaŭ li kuŝis longfoso ĉe kies deklivoj kreskis malmultaj dise starantaj arbetoj. Ĝuste ĉe lia dorso staris tia arbeto, sed li ĝin ne atentis, li eĉ ne atentis la antaŭ li sterniĝantan kamparon, sed dronis en pensojn por memorigi al si, kiu certigis ke vila mano povas ĵeti iun en longfoson, ĉar tio ŝajnis tre interesi lin en tiu momento. Li sin klinis por depreni la anseron de la ŝultro, ĉar la birdo iom ĝenis lin kaj li volis ĵeti ĝin sur la alian ŝultron. Sed kiam li tiel sin klinis, subite ŝajnis al li, ke io nigra glitas trans lian ŝultron.

Klaj, kiu estis timemulo, ektremis.

— Kio estas tio? — li diris kaj rektiĝis. Samtempe la nigra strio malaperis. Klaj eligis profundan elspiron kvazaŭ io peza falis de lia koro. Li rekuraĝiĝis, pensante ke tiu nigra strio estis nur imago. Por certigi sin pri tio, li denove sin klinis kaj la nigra strio reaperis.

— Diablo!... Kio do tio estas? — li balbutis, fikse rigardante la nigraĵon, kiu restis sur la sama loko.

Kelkajn fojojn li sin klinis kaj rektiĝis sed ĉiufoje tiu nigra ombro aperis kaj malaperis. Granda timo kaptis lin, li preskaŭ ne kuraĝis plu rigardi tiun teruran strion, kiu similis la vilan manon kaj li balbutis:

— Ĉu tio estas la vila...?

Por konvinkiĝi pri tio, li palpis la ŝultron, sur kiun ĉiufoje glitiĝis tiu ombro tute mallumiganta parton de la blanka ansero. Kiel li teruriĝis: la nigraĵo ŝoviĝis trans lian palpantan manon, kiun li tuj retiris.

— Ĉu tiu vila... mano aperas tie... ĉar mi volas piedfrapi mian edzinon? — li pensis kaj faligis la anseron, kiu kun obtuza[109] bruo falis malantaŭ lin en la molan sablon, ĵetante supren milojn da brilantaj sableroj. Samtempe la strio denove sin montris sur lia ŝultro kaj senmove li ĝin rigardis dum lia koro bategis de teruro.

Subite de malprokime aŭdiĝis laŭtaj batoj de la vilaĝa turo. Klaj kalkulis: unu — du — tri — kvar — kvin — ses — sep — ok — naŭ — dek — dek unu — dek du!... La sonorilo haltis kaj la lastaj posttriletoj malrapide formortis en la noktan senbruecon.

— Dio! — kriis la konsternita Klaj — meznokta horo batis... kaj en tiu tempo aperas... misteraĵoj...

Refoje li rigardis la teruran ombron sur lia ŝultro; fine li iom rekuraĝiĝis kaj levante la alian brakon, li estis kaptonta la teruran vilan manon, sed samtempe la mola sablo forglitis el sub liaj piedoj kaj malrapide li glitis en la longfoson sur kies deklivo li staris.

— Helpu! kriis Klaj. Helpu! helpu!... mi jam ne piedbatos mian...

Li ne findiris sian promeson; laŭta plaŭdado sub liaj piedoj kaj amaso da akveroj saltantaj supren ĝis lia nazo, sciigis lin, ke li staras en la akvo.

Sendube Rinders estus laŭte ridinta se li povus vidi la ebrian farmiston, sed Rinders estis jam malproksime kaj ne povis helpi lin kaj tiri el la longfoso en kies ŝlimo iom post iom dronis la ŝuoj de Klaj, staranta ĝis la brusto en la akvo laŭte kriante helpon. Sed neniu aŭdis lin. Li restis kelkan tempon staranta, sed sentante ke liaj piedoj dronas pli kaj pli profunden, li unue rigardis sian ŝultron kie ne montriĝis plu la vila mano. Poste penante tiri supren la piedojn, li baldaŭ sentis ke li glitas pli kaj pli profunden. Kaptita de angoro, li denove kriis el tute sia gorĝo: helpon!... helpon!! — kaptante ambaŭmane la kreskaĵon de la deklivo por ne gliti pli profunden. Tiel li restis staranta kaj per la dorso apogante sin sur la longfosa deklivo, li kriis helpon ĝis lia voĉo raŭkiĝis. Ŝvito perlis sur lia frunto kaj vole nevole li pensis pri la multaj piedbatoj, kiujn li estis doninta al sia edzino. Duone malebriiĝante pro angoro kaj pro la malvarma akvo penetranta liajn vestojn kaj tremiganta lian tutan korpon, li fine ekkriis:

— Kompaton! kompaton!!... Mi jam neniam piedfrapos...!

Sed li eksilentis. Obtuzaj bruoj de paŝoj, venantaj el la direkto de lia farmodomo, kuŝanta proksime, anoncis al li, ke helpo venas.

— Helpu!... helpu!! — li denove kriis por ke la venanto povu aŭdi kie li staras.

La paŝoj fariĝis pli kaj pli laŭtaj, rapide proksimiĝis; fine ili haltis malantaŭ lia kapo kaj du fortaj manoj, kaptante liajn ŝultrojn, tiris lin supren.

— Ĉu vi falis en la longfoson? demandis kvieta voĉo de lia servisto.

— Oni ĵetis min en ĝin.

— Kiu do!? — demandis la servisto, rigardante ĉien, sed vidante neniun li denove demandis:

— Kiu do?

— La vila mano!

— Kiu?

— La vila...! — Ne demandu plu! Vi min eltiris, kaj mi rehejmiĝos... por surmeti sekan ĉemizon kaj por dormi.

Klaj, kiu preskaŭ tute malebriiĝis pro la sentitaj emocioj, lasis fortflui la akvon el la pantalono kaj iris al sia domo, sekvata de la servisto, kiu tute ne komprenis, kiel lia mastro estis falinta aŭ kiel li estis ĵetita en tiun longfoson, ĉar la luno lumis klare, hele, kaj neniu estis videbla sur la vojo, nek sur la kampoj, kiu povus plenumi tian perfortaĵon[110]. Rilate al la vila mano, pri kiu estis parolinta la farmisto, la servisto komprenis absolute nenion, tial malrapide sed kviete irante malantaŭ la farmisto, li demandis:

— Kion do pri tiu vila mano!?

— Ŝt! — diris Klaj. — Neniam parolu pri ĝi, sed mi povas certigi al ĉiu, ke ĝi ekzistas, ĉar mi ne nur ĝin vidis sed eĉ sentis ĝin.

Kiel ni diris: la loĝejo kuŝis tre proksime kaj Klaj kun sia servisto baldaŭ atingis la korton. La servisto malfermis la pordon de la bovinejo, li kaj lia mastro ĝin trairis kaj veninte en la koridoron, kondukantan al la dormejo de Klaj, ili haltis.

— Mi ne bezonas vin plu, — diris Klaj.

— Mi do iros dormi, — kviete diris la servisto, kaj malrapide foriris, pensante pri la stranga aventuro, kiun li ĵus travivis kaj pri tiu mistera vila mano. Sed ĉar li estis scivolemulo, kiu volis ekscii ĉion eksterordinaran, li decidis ke li faros sian eblon

malkovri, kiu estas tiu vila mano, kiu tiel subite povas ĵeti en la longfoson unu el la plej pezaj viroj de la tuta ĉirkaŭaĵo.

Klaj staris antaŭ la pordo de la dormejo. Li aŭskultis, sed aŭdante nenion li formetis de siaj piedoj la ŝuojn en kiuj ankoraŭ staris akvo, kaj singarde levis la pordoriglilon por enŝteliĝi kiel eble plej senbrue. Li eniris, refermis malantaŭ si la pordon kaj tuj vidis sian edzinon. Ŝi kuŝis tute vestita sur la sofo[111] en la fundo de la ĉambro. Ŝi ne dormis, sed tuj eksidis kaj timeme rigardis sian edzon. Kiel ŝi miris vidante lin tiel malseka kaj tiel kvieta.

— Bonan vesperon! — diris Klaj.

— Bonan nokton, — ŝi diris, tuŝita de la voĉo de ŝia edzo, kiu kutimis krii plengorĝe, kiam li nokte rehejmiĝis.

— Kio estas al vi? — ŝi demandis.

— Mi estas malseka.

— Malseka?... Kiel tio fariĝis?

— Oni ĵetis min... mi glitis en la longfoson, sed feliĉe Klaŭs eltiris min.

— Vi malvarmumos[112], — mallaŭte, dolĉe diris, la virino, — tuj formetu tiujn malsekajn vestojn; mi prenos sekan tolaĵon. Kaj ŝi iris al la ŝranko.

— Mi ne malvarmumos, la vetero estas bona kaj mi enfalis antaŭ nur mallonga tempo.

— Vi tamen povus malvarmumi; tuj... surmetu sekan tolaĵon.

— Ĉu tio estus tiel grava, se mi malvarmumus?

— El tio kelkfoje naskiĝas pulminflamo[113], — ŝi diris.

Klaj rigardis sian edzinon. Ŝi estis malforta, bona virino, kiun li ofte piedbatis, sed kiu kviete suferis ĉiun ofendon, kvankam Klaj disrakontis ke Ksantipo ne superas ŝin en malico kaj kolero. Li rimarkis brilajn larmojn sur ŝiaj vangoj kaj li sentis fortan penton pro ĉio, kion li faris al ŝi.

Honte li restis staranta, atendante la sekajn subvestojn, kiujn ŝi portis al li.

— Tuj vestoŝanĝu, — ŝi diris, preskaŭ flustre, dum ŝi retenis strangajn sonojn, kiuj obtuze supreniris el ŝia brusto.

— Kial vi ploras? — li demandis, kaptante ŝian manon. — Mi ja ne faris al vi malbonon?

— Ne!... vi ne faris al mi malbonon... ĉi tiun fojon... tial mi ploras...

Subite ŝi eksplodis je laŭta plorado kaj falsidiĝante sur seĝon, ŝi apogis la kapon sur la brakojn; tute ŝia korpo skuiĝis.

Klaj staris konsternita. Li pensis pri la antaŭaj piedbatoj, pri Peĉjo Klakilo kaj pri tio, kion tiu viro estis rakontinta rilate al la vila mano; fine li komprenis, kio estas tiu mano.

— Maria, li diris, sidiĝante ĉe ŝia flanko kaj karesante ŝiajn harojn, — ĉu vi povas min pardoni?

Sed ŝi restis sidanta, skuiĝante kaj ne levis la kapon.

— Maria, — li flustris, — mi ofte piedbatis kaj insultis vin, sed... mi ĵuras ke neniam plu mi refaros tion.

Ŝi levis la vizaĝon, kiu dronis en larmoj kaj diris tremvoĉe.

— Ne ĵuru.

— Jes, Maria! — li diris decidatone, premante ŝiajn manojn, — mi ĵuras ke neniam plu mi ebriiĝos... La brando en ĉio estas kulpa.

Ŝi rigardis lin kelkan tempon kaj legante en liaj okuloj ke il estas sincera kaj ke li pentas kaj hontas pri ĉio, kion li malbone faris kontraŭ ŝi, ŝi flustris:

— Unu sola amika kaj ĝentila vorto efikas pli multe ol cent batoj per la piedo.

— Vi pravas, Maria, sed la brando estis kulpa en ĉio... mi neniam plu trinkos ĝin.

Ŝi ridetis kaj li parolis plue:

— Ĉu vi povas pardoni min, Maria?

— Jes, mi povas; kaj ĉirkaŭbrakante lin ŝi denove ekploris.

Ili enlitiĝis kaj Klaj refoje ĵurante al si mem, ke li neniam plu trinkos brandon, ekdormis tute ne pensante pri la grasa ansero, kiun li faligis ĉe la longfoso, kaj kiu kuŝis ankoraŭ tie sur la sabla vojeto, lumigita de la luno.

Kaj la luno miris ĉar la gajninto de tia grasa birdo lasis ĝin tie anstataŭ kunporti ĝin hejmen.

ĈAPITRO SESA.

Bursma la muelisto iras hejmen meznokte — Lia aventuro en la muelejo — Kial li volas pendigi Fulgon.

Ni scias ke la muelisto Bursma forlasis la „Verdan Ĉevalon" samtempe kun la kvar farmistoj. Sed Bursma sin turnis al la kontraŭa direkto, ĉar lia muelejo staris ĉe la norda flanko, kelkajn minutojn ekster la vilaĝo. Li sola iris tien, kaj irante malrapide, kaj pensante pri tio, kion Peĉjo Klakilo estis rakontinta, li fariĝis malbonhumora. En realo li jam kelkan tempon estis en tia animstato, sed li ne montris tion al la vizitantoj de la drinkejo. Bursma estis ruza viro, ne fidinda kaj hipokrita. Li pretendis esti religia[114], regule ĉiudimanĉe vizitis la preĝejon, multe parolis pri bonfarado kaj kristanaj devoj, sed li ne praktikis ilin. Li ŝajnigis sin bonkora kaj kompatema viro, sed Peĉjo, kiu konis la karakterojn de siaj klientoj, rigardis ĝis la fundo de iliaj koroj kaj legis sur ĉies vizaĝo, kion la homoj pensas kaj intencas. Ne ĉiuj havas tiun kapablon, sed Peĉjo estis eksterordinara viro, kiu mem havis bonan kompateman koron kaj larĝan scion pri ĉio, kio ĉirkaŭ li okazis, kvankam li tute ne estis klerulo. Peĉjo bone sciis, ke Bursma ne estas fidinda kaj intuicie[115] la muelisto komprenis, ke la drinkejestro lin ne ŝatas kaj ke Peĉjo kvazaŭ sentas ĉiujn liajn intencojn; tio kolerigis la mueliston, kies vizaĝtrajtoj klare tion montris, kiam li ne plu sidis inter la klientoj de la „Verda Ĉevalo", sed iris hejmen, dum neniu povis lin atenti.

Profundaj sulkoj aperis sur lia frunto, la brovoj super liaj okuloj minace proksimiĝis unu la alian kaj pugnigante ambaŭ manojn, li murmuris mallaŭtan blasfemon[116] spite sia religia eksteraĵo, en la sama tempo singarde rigardante ĉirkaŭe, ĉu neniu estas en lia proksimeco, li murmuris:

— Malbeninda Klakilo, la diablo lin prenu! — kaj refoje li pripensis la rakonton pri la vila mano, kiun li konsideris kiel aludon al liaj propraj agadoj kaj friponaĵoj.

— Kial li speciale [117] kaj tiel fikse rigardis min, dum li rakontis tiun sensencaĵon?... Ĉu oni babiladis pri mi malantaŭ mia dorso, kiam ili sidis kune en la „Verda Ĉevalo" klaĉante pri ĉiu, kiu okaze ne sidis tie?... Li (Bursman celis la drinkejestron) ridus, se mi estus lotinta tiun bastardon, sed feliĉe la skribisto lotis lin... Kiel lia kara edzino ĝojos, vidante tian neatenditan surprizon... Estas bedaŭrinde, ke li povos transdoni la knabon al alia vilaĝano, ĉar tion li sendube faros: la dudek guldenoj allogos pli ol unu. Kaj Erasmus, kiu estas skribisto de la notario, konas ĉiujn homojn en la vilaĝo, li konas iliajn financajn situaciojn kaj baldaŭ trovos kandidaton, kiu akceptos la knabon. Sed kiu do tion pagos? Tion mi volus scii... Alings ne estas la paganto, ĉar pagante li konfesus, ke li estas la patro de la bubo. Eble li estas la patro, sed kiu certe tion scias? La fremda Doroteo neniam parolis pri tio, ĉar ŝi estas kvazaŭ mutulino, ŝi ne havas interrilatojn kun la vilaĝanoj; nun ŝi estas eble morte malsana, eble mortos. Kien do poste iros la knabo? Mi estas scivola pri tio...

Tiel parolante al si mem, li iris pluen kaj jam estis ekster la vilaĝo. La vojo, ne plu el strataj ŝtonoj, sed el makadamo, turniĝis maldekstren kaj rekte antaŭ li en la malproksimeco konturiĝis la muelejo, la giganto kun la kvar longaj brakoj, nuntempe ripozantaj. Klare oni povis vidi ĝin, akre kontrastantan [118] kontraŭ la hela lun lumigita ĉielo en kies se nnubabeleco ĝi staris kiel giganta misteraĵo, ĉirkaŭita de kelkaj arboj kaj dometoj. En unu el tiuj dometoj plej proksime al la giganto, loĝis la muelisto kun edzino kaj multaj infanoj el kiuj nur unu estis knabino. Bursma rigardis la muelejon, kiu tiom pli altiĝis, kaj pli-dikiĝis kiom pli li proksimiĝis, vidis ankaŭ la konturojn [119] de sia dometo kun la tri fenestroj rigardantaj la muelejon, kaj ke el unu el tiuj fenestroj penetras eksteren malforta lumo de la lampo.

— Ŝi ankoraŭ ne enlitiĝis — pensis Bursma, kaj jam bedaŭris ke li devas reveni hejmen kun malplenaj manoj, ĉar li vere amis la edzinon kaj proprajn infanojn; sed li ne gajnis eĉ unu birdon, kvankam li ne preterlasis unu okazon, ĉar li estis paginta por ĉiu lotado, esperante gajni almenaŭ unu anason aŭ anseron.

Sed la sorto ne estis ridinta al li, kaj Fortuno dum la tuta vespero estis turninta al li la dorson.

— Klaj, kiu kunlotis nur kelkajn fojojn, foriris kun grasa birdo, — li pensis plue. — Kial do mi ne gajnis ĝin? Klaj estas sufiĉe riĉa por aĉeti anserojn. Klaj ne havas infanojn... mi havas multajn infanojn kaj malmultajn enspezojn.[120] Se la muelejo nur estus mia proprajo... sed mi estas nur la luanto, mi devas labori de la mateno ĝis la vespero, eĉ kelkfoje nokte kaj la posedanto, kiu tute ne laboras, vivas kiel granda sinjoro, dum mi estas kvazaŭ lia sklavo... Sed kion fari kontraŭ tio? Se mi de tempo al tempo ne kompensus min mem per iomete da greno...

Subite li denove pensis pri Peĉjo Klakilo kaj la vila mano.

Ba!... li grumblis. — Kion do signifas kaj valoras kelkaj greneroj el ĉiu sako por la posedantoj... por la klientoj? Por ili tio signifas kaj valoras tute nenion, kaj por mi tio estas de granda valoro... En la biblio staras skribite ke laboristo indas sian salajron... Sed kio estas tio, se la mastro ne rekompencas inde la serviston? Ĉu tio ne estas ŝtelado? Tio estas pli grava ol ŝtelado, ĉar tian mastron protektas la leĝo, dum tiu sama leĝo punas la serviston se li per iom da greno el ĉiu sako sin savas de mizero kaj sufero...

Refoje li pensis pri la vila mano, kaj sulkigante la frunton kaj kuntirante la brovojn, li kraĉis sur la vojon, dirante:

— La diablo sufoku tiun Klakilon kaj lian vilan manon!... Kie do li prenis tiun fabelon?... Neniam antaŭe mi aŭdis pri tia mano... Bursma atingis nun sian dometon, starantan kontraŭ la ventmuelejo. La ekstera galerio[121] de la muelejo elstaranta ĉirkaŭ ĝia mezo je alteco de tri metroj, ĵetis sur la teron larĝan ombron, kaj ĉar la muelejo kaj la dometo staris tre proksime unu de la alia, Bursma en ĉi tiu momento dronis en la mallumo. La lumigita fenestro de la loĝejo ŝajnis fajra kvadrato[122] meze de la muro. Li iris al tiu fenestro kaj aŭskultis, sin klinante kaj rigardante internen. Li nur momenteton atente aŭskultis kaj rigardis, poste li iris sub la muelejgalerion kaj malŝlosis la pordon tra kiu li enŝteliris en la teretaĝon de la muelejo. Tie regis nokta mallumo ĉar la luno ne povas enverŝi tien siajn

radiojn. Bursma elpoŝigis alumetujon, ekbruligis kandelon, starigis ĝin sur breteton, elstarantan el la muro kaj sidiĝis sur sakon. La kandelo malantaŭ li heligis lian kurbigitan dorson, ĵetis longan ombron antaŭ liaj piedoj kaj etendiĝis trans kelkajn sakojn kaj laŭlonge de dika ligna kolono tra kiu povas malsuprenflui la muelita greno en la sub ĝi starantajn sakojn. Neniu bruo aŭdiĝis kaj Bursma restis kelkan momenton, sidanta droninta en pensojn, apogante la kapon sur unu el siaj manplatoj. Per la alia li ludis kun la alumetujo. Fine li enpoŝigis ĝin kaj ekstaris; li kaptis kruĉon, kiun li metis teren ĉe unu el la kvin sakoj starantaj unu flanke de alia. Farinte tion li prenis saketon kaj kuleregojn kaj malferminte la sakojn, ĉerpis kelkajn kuleregojn da greno el ĉiu sako, poste li metis flanken la elĉerpitan grenon kaj refoje prenante la kruĉon, li sin klinis ĉe la unua sako kaj komencis enversi en ĝin iom da akvo, sed apenaŭ la unuaj akvogutoj falis sur la grenon, subite io tuŝegis la ŝultron de la ŝtelanto. Terurite li haltis, retiris la kruĉon kaj liaj okuloj kun timo sin direktis flanken al la ŝultro sur kiun sin lokis io, restanta tie senmova. La koro de la muelisto laŭte ekbatis kaj pli atente li ŝtelrigardis la interrompanton de lia dumnokta ŝtelado. Apenaŭ li kredis al siaj okuloj ĉar sur la ŝultro malrapide, senbrue ŝoviĝis antaŭen io vila kaj nigra, kion li ankoraŭ ne bone povis distingi. Li tuj pensis pri la vila mano, ĉar klare li vidis ion vilan. Spiregante pro teruro kaj mirego, li sentis ke liaj genuoj fleksiĝas kaj li sidiĝis surgenue, apogante sin sur la sakon dum li tenis ankoraŭ la kruĉon el kiu ne plu fluis la akveroj. Li pensis kion ĉiu pensus en lia cirkonstanco: „Kio estas tio?" — Sed la vila mano, ĉar sendube tio estis la vila mano, iom post iom kaj senbrue ŝoviĝis pluen, fariĝanta pli kaj pli vila kaj dika.

— Dio! helpu! — ĝemis la konsternita muelisto, sed li ne kuraĝis sin movi, kaj la mano soviĝis pli kaj pli malproksimen, fine tuŝis lian vangon, kia ektuŝo tiel tremigis lin, ke li bezonis ambaŭ manojn por apogi sin sur la sakon. La kruĉo falis teren. Angoro kaptis la muelisto, kiu ne sciis, kion fari. Li ne plu dubis. Tio estis la vila mano, kiun li estis ridinta.

Ĝi ekzistis kaj surprizis lin dum li priŝtelis siajn klientojn, ĝi kaptis lin en la freŝa faro. Subite ŝajnis al li, ke la mano etendiĝas ĉirkaŭ lia nuko kaj plilongiĝas, ĉar li sentis ke ankaŭ lia alia vango estas tuŝata de la sama vilaĵo.

— Eble ĝi ĉirkaŭprenos mian tutan kolon! — li pensis, liaj haroj ekstaris sur lia kapo kaj liaj dentoj interklaketadis.

Iafoje angoro naskas malesperon kaj subite Bursma sentis tiun malesperon. Li devis toleri ke la vila brako lin sufokos aŭ li devos sin defendi. Li decidis fari la lastan kaj per la maldekstra mano li kaptis la manon, kiu nun tuŝis liajn dekstrajn orelon kaj vangon. Li ĝin kaptis kaj forte pinĉis. Samtempe laŭta siblado aŭdiĝis ĉe lia maldekstra orelo, kaj longaj pintaj ungoj penetris lian vangon. Bursma ellasis la vilan manon laŭte blasfemante kaj por defendi sin kontraŭ la mano, kies ungoj pli kaj pli profunden penetris lian vangon, li per subita frapego klopodis fortimigi ĝin. Denove ĝi siblis, pli laŭte kaj du fajre lumigitaj okuloj minace rigardis lin.

— Malbenita kato!! — hurlis[123] la muelisto, kaptante la beston ĉe la dorso por forigi ĝin de la ŝultro, sed ju pli forte li tiris la dorson de la besto, des pli profunden ĝiaj ungoj englitis en lian vangon. Fine li sukcesis ĝin fortiri, samtempe la ungoj faris kvar longajn profundajn striojn en lian vangon, al kiu ili estis sin kroĉintaj.

— Malbenita kato!! — refoje ekkriis la furioza muelisto, svingante la beston super la kapo kaj ĵetante ĝin al la ligna kolono, sur kiu ĝi restis pendanta per la kvar piedoj.

— Atentu!!... Mi instruos vin tiel... tiel timigi min! — kriis Bursma, okule serĉante ion por ĵeti al la besto, kaj li kaptis la kruĉon kaj celante la katon ĵetis ĝin supren, sed la besto saltis malsupren sur la sakojn, de tie sur la ŝtuparon, kondukantan al la dua etaĵo de la muelejo kaj malaperis laŭte siblante. Dume la kruĉo, trafinte la lignan kolonon, brue refalis al la piedoj de la ĵetinto kaj dispeciĝis en mil pecetojn. Bursma saltis flanken, rigardis la pecetojn kaj per la mano viŝis la vunditan vangon, el kiu sangogutoj fluis. Li eltiris la poŝtukon por forigi la sangon kaj sidiĝante sur sakon, frotviŝis la vangon, kiu estis terure vundita, ĉar la poŝtuko estis tute ruĝe makulita.

— Malbenita kato!! — li refoje grumblis, dispuŝante per la piedo la pecetojn de la kruĉo kaj frotviŝante la vangon. — Sed mi instruos ĝin tiel grati min... morgaŭ mi pendigos ĝin por ke ĝi ne plu tiel...! Li eksilentis kaj komparis ĉi tiun strangan okazintaĵon kun tiu, rakontita de la drinkejestro. Longe li restis sidanta, tiel longe, ke la kandelo estis tute forbrulonta kaj ĝia flamo flagretis,[124] anoncante per tio tujan estingiĝon.

Bursma kolektis la kruĉpecojn, blovestingis la kandelon kaj iris eksteren, ŝlosante post si la pordon de la muelejo.

Lia edzino ankoraŭ ne enlitiĝis, ĉar meze de la domomuro li tuj vidis ŝian lumigitan fenestron.

Li eniris sian domon poste la ĉambron. Lia edzino sidis ĉe la tablo kaj kudris.

— Vi ankoraŭ ne enlitiĝis? — li demandis, pendigante la ŝlosilon de la muelejo sur najlon, apud la spegulo.

— Mi ja neniam enlitiĝas antaŭ via reveno. Ĉu vi gajnis nenion?

— Nenion!

Ŝi rigardis supren al li, ĉar ŝajnis al ŝi ke lia voĉo sonas alie ol kutime. Ŝi vidis kiel pala li estas kaj ke kvar longaj ruĝaj strioj makulas lian vangon.

— Ĉielo, kio estas al vi?... Ĉu vi batalis?

— Jes, mi batalis.

— Kontraŭ kiu!? Kiel pala vi aspektas... Via vango estas tute kovrita de sango.

— Tion faris Fulgo.

— Fulgo!?

Fulgo estis la nomo de la kato, kiu estis nigra kiel fulgo.

— Tiel ĝi gratis min.

— Tio estas stranga... Neniam ĝi gratas... Kie tio okazis?

— En la muelejo... kie mi okaze estis...

— Sed tio estas vere strangega; la besto neniam gratas.

— Nu, rigardu mian vangon! tiel ĝi gratis!... Morgaŭ mi pendigos ĝin!...

La virino mire rigardis sian edzon; poste ŝi diris:

— Fulgo ja estas bona besto, tiel amika ke ĝi eĉ sidiĝas sur niajn ŝultrojn.

— Ĝuste tial mi pendigos ĝin!

— Vi ne pendigos Fulgon!

— Mi ne povas plu ĝin toleri en mia proksimeco. Ĝi memorigas min al io terura, al io kion mi ne povas klarigi al vi.

— Kio do okazis?

— Ankaŭ tion mi ne povas diri, sed ĉiuokaze la kato devas malaperi.

— Nu, donacu ĝin al iu en la vilaĝo.

— Mi pendigos la katon, kiel mi ja diris!

— Vi ne faros tion! Estas eble, ke vi ne plu povas toleri ĝin en via proksimeco, kvankam tio ŝajnas al mi tre stranga, sed vi ne bezonas pendigi Fulgon; morgaŭ mi fordonos ĝin en la vilaĝon.

— Faru tion, sed mi ankaŭ ne alian katon toleros.

— Kaj la musoj? Kiu forpelados la musojn?...

— Mi volas havi hundon! — respondis Bursma kaj veninte en la kuirejon li lavis sian vangon. Poste li enlitiĝis.

Mirante, lia edzino sidis ankoraŭ ĉe la tablo kaj pripensis kun duone malfermita buŝo, ĉiam rigardante la pordon tra kiu ĵus eliris la muelisto. Tia li ankoraŭ neniam rehejmiĝis. Ofte li iris vilaĝon vespere por iom babili en la „Verda Ĉevalo", sed ĉiam li revenis en bona humoro; kial li nun tiel strange agis? Eble ĉar li gajnis nenion? Sed okazis jam antaŭe, ke li revenis kun malplenaj manoj, sed neniam li kondutis tiel strange. En la komenco ŝi estis malkvieta, nun ŝi fariĝis scivola. Kial la kato lin gratis? Fulgo estis ĉiam amika al ĉiu, ĉiam ĝi venis renkonte al siaj kunhejmanoj, ĉiam ŝoviĝis laŭ ĉies kruroj, alte levante la dorson kaj la voston, kvazaŭ petante pri kareso. Fulgo eĉ kutimis salti sur ĉies ŝultron kaj ofte sidis sur tiu de sia edzo, kiam li vespere legis gazeton apud la forno. Neniam la besto gratis... kial ĝi gratis nun?

Ankoraŭ kelkan tempon ŝi dronis en pensoj, meditante tiun strangan aferon. Kial li devis esti en la muelejo, meznokte dum la aero estis tiel senmova, ke ĝi ne povis turni la brakojn de la muelilo... Ĉu okazis io stranga?...

Fine ŝi ekstaris, prenis la ŝlosilon de sur la najlo apud la spegulo kaj ekbruligis lanterneton. Singarde ŝi eniris la kuirejon, sed Bursma tie ne estis.

— Li enlitiĝis, — ŝi pensis, kaj instigata de ĉiam pligrandiĝanta scivolo, ŝi iris eksteren al la pordo de la muelejo. Atente ŝi rigardis ĉirkaŭen. Ĉie regis nokta senbruo. La lanterno ĵetis malpalan lumon sur la teron. Antaŭ la pordo kuŝis kelkaj kruĉpecoj. Tiun kruĉon ŝi bone konis; ofte vespere ŝia edzo plenigis ĝin per akvo kaj iris kun ĝi en la muelejon, sed neniam ŝi sentis ian suspekton. Ŝi prenis kelkajn pecojn kaj rigardis ilin atente. Ili estis malsekaj, sekve la kruĉo estis estinta plena je akvo. Ŝi eniris la muelejon kaj rigardis internen. La lanterno ĵetis grandajn nigrajn kvadratojn sur la murojn, sed ŝi vidis nenion eksterordinaran. Ŝi mallevis la okulojn kaj ekvidis la saketon, kiun ŝia edzo estis faliginta. Ŝi ĝin prenis kaj pripensis. Ŝi vidis kelkajn kruĉpecetojn sed suspektis nenion malbonan, refoje ŝi rigardis ĉirkaŭen. Post momento ŝi vokis mallaŭte:

— Fulgo!... Fulgo!! —

Ŝi atendis kelkajn sekundojn supre sur la ŝtuparo, kondukanta al la dua muelejetaĝo, aŭdiĝis plend-miaŭado.

— Fulĉjo!... Fulĉjo! — ŝi vokis pli laŭte. — Venu do! —

Malrapide la kato saltis de unu ŝtupo al alia, fine sur la ŝultron de sia mastrino, kiu karese premis ĝin sur la bruston.

— Vi estas kara besto!... Sed kial do vi tiel gratis la mastron? Li volas pendigi vin, sed tion mi malhelpos!

— Miaŭ!! — diris la kato kaj ekzumetis.

— Vi ne estas kulpa! li ne pendigos vin, nek faros al vi alian malbonon. Morgaŭ mi portos vin al Peĉjo Klakilo, li akceptos vin kaj vi estos ekster danĝero.

Ŝi reiris al sia domo, metis la katon en ĝian korbeton sub la tablo kaj poste iris al sia dormejo.

ĈAPITRO SEPA.

Erasmus, la vilaĝa poeto iras hejmen meznokte kun stranga ansero — Pri du monstroj. — Erasmus kaj lia edzino — Kiel ili vekiĝas, matenmanĝas kaj interparolas.

Ni returnen iru al Erasmus, kiun ni forlasis, kiam li staris ĉe la knabo antaŭ la drinkejo de Peĉjo Klakilo.

Malespere li ĵetis rigardon al la pordo post kiu estis malaperinta la drinkejestro, kaj ne sciis, kion fari.

Ĉu li frapu la pordon por revoki Peĉjon? Li jam ekpaŝis antaŭen, sed ne frapis; ĉar li de antaŭe sciis, ke la pordo ne malfermiĝos. Tial li reiris al la knabo, staranta meze sur la strato kaj diris al li, kaptante lian manon:

— Ĉu vi volas iri kun mi, Paŭl?

— Al panjo?

— Ne al panjo, ĉar ŝi estas malsana, sed al mia domo. Paŭl ne respondis, nek protestis.[125] Li estis knabo, kiu neniam protestis: li spertis ke liaj protestoj ne havas bonan rezulton. Li estis do ĉiam obeа, trovis ĉion bona, neniam estis malkontenta,[126] ĉar li ne estis trodorlotita infano. Lukson[127] li ne konis, li konis nur mizeron kaj estis jam kontenta ricevanta ion por manĝi. Ludilojn li neniam havis, kvankam li kelkfoje povis ludi kun malbela pupo de Johana, la pli aĝa knabino de sia najbaro. Tia pupo estus por li riĉaĵo kaj trezoro pri kiu li ofte sonĝis kaj kiun li aspiris kaj deziris sed ankoraŭ neniam akiris, ĉar lia patrino estis malriĉa kaj ne fordonis sian monon aĉetante ludilojn por sia infano. Tial li ankaŭ nun ne montris malkontentecon sed tuj sin submetis al sia sorto, kvankam pli volonte li reirus al sia patrino.

— Estu saĝa knabo! — diris Erasmus, kaj morgaŭ mi donacos al vi belan pupon.

— Pupon!?

— Jes, belan, novan pupon...

— Kaj buterpanon?

— Kaj tri buterpanojn, sed: estu saĝa, ne ploru kaj ne

parolu kiam vi estos en mia domo, ĉar en la kelo sub la planko, estas terura monstro, kiu formanĝas kriantajn, plorantajn kaj netaŭgajn infanojn... [128]

Tion dirinte, li malrapide iris al sia domo, staranta sur alia strato apud la preĝejo de la vilaĝo.

La rimedo, kiun Erasmus elektis por silentigi la knabeton, ne estis tre pedagogia [129] kaj certe li ne ĉerpis ĝin el „Emile" de Rousseau, sed li ne konis alian rimedon, kaj ĉar li ne estis patro, li ne komprenis, kian angoron povus kaŭzi al infano la minaco esti formanĝata de terura monstro, tial la konduto de Erasmus kontraŭ la knabo estis pardonebla, tiom pli, ĉar ankaŭ lin mem minacis alia, vere ekzistanta monstrino, kiu ne nur minacis sed agis, kiam la edzo ne kondutis laŭ ŝia deziro.

Paŭl kuretadis ĉe lia flanko pensante pri la terura monstro kiu eble nun sidas kaŭranta en la domokelo, por engluti lin tuj post kiam li eligos unu sonon. Li decidis do esti silenta, kio ne estis por li malfacila, ĉar hejme li kutimis esti silenta pro la malsana panjo, kuŝanta sur la lito kaj kiu ofte parolis nekompreneblajn frazojn [130] kaj ekkriojn al personoj, eĉ ne estantaj en ŝia ĉambro. Paŭl kredis ke la nova konato certe lin protektos kontraŭ la monstro kaj plena je konfido li marŝetis ĉe lia flanko, irante renkonte al tute nova sorto, kiu tamen ne povos esti pli malbona ol tiu, el kiu la profesoro estis liberiginta lin. Post deko da minutoj lia protektanto haltis antaŭ sia domo, metis la fingron sur la buŝon por rememorigi ke Paŭl estu silenta, kaj singarde, malbrue malŝlosis la pordon. Ambaŭ eniris kaj kiam la pordo malfermiĝis, regis ĉie terura mallumo. Ambaŭ aŭskultis: Paŭl por aŭdi ĉu la monstro ne supreniras el la kelo kaj Erasmus por aŭdi ĉu lia edzino (la dua monstro) dormas. Eble ili ambaŭ profunde dormis, ripozante en la brakoj de Morfeo, ĉar oni aŭdis nur tik-takon de horloĝo, ie pendanta, kies regulaj sonoj venis el malproksima loko. Erasmus sin klinis al la orelo de la knabeto kaj flustris:

— Nun estu dolĉa kaj ne parolu, nek kriu aŭ ploru; mi iros kun vi al dormejeto, kuŝigos vin sur liteton, kaj morgaŭ matene mi alportos al vi buterpanojn kaj belan pupon, eble ankaŭ bildolibron... [131]

Paŭl diris nenion; li sentis ke li estas portata supren laŭ ŝtupareto, trans koridoreton en ĉambreton.

— Ĉi tie vi dormos — flustris la skribisto.

La luno malforte heligis la dormejeton, en kiun la loĝantoj de la domo ne ĉiutage venis.

Paŭl vidis nur la parte lumigitan plankon kaj ĉe unu el la muroj liteton por unu persono: en la domo de Erasmus ne estis litŝrankoj. La skribisto senvestigis la knabeton kaj kuŝigis lin flustrante:

— Nun kuŝu kviete kaj dormu, sed precipe ne kriu.

— Ĉu la monstro estas sube... en la kelo?

— Jes, tutsube; ĝi ne scias ke vi estas tie ĉi kaj ne venos se vi nur ne faros bruon.

Paŭl kuŝis surdorse kaj rigardis antaŭ si tra la lumigita parto de la fenestro dum Erasmus foriris sur la piedfingroj; la knabeto aŭskultis momenton por aŭdi ĉu la monstro ne venas, sed ĉar li aŭdis nenion kaj kredante al Erasmus, lia timo fariĝis pli malgranda tiom pli, ke la monstro troviĝis tre malproksime en la kelo, kaj ĉar la pordo de la dormejeto estis bone fermita. Kvankam la knabo ne sentis grandan timon, li tamen pensis pri la terura monstro, kiu povus manĝi lin, kaj li komparis ĝin image kun la duone sovaĝaj korthundoj, kiujn li estis vidinta sur la korto de Alings. Li imagis ke la nun dormanta besto en la domokelo estas almenaŭ trifoje pli dika ol tiuj hundoj, multe pli nigra kaj ke ĝi havas grandegan tute ruĝan faŭkon el kiu elstaras longaj pintaj dentoj, ke el ĝi konstante pendas longa tremetanta lango, kiu tiel amas sangon de infanoj; nevole la knabeto glitis pli profunden sub la litkovrilon.

Teruraĵoj, fantomoj, koboldoj kaj aliaj misteraĵoj, kiujn la infanoj neniam vidas, sed pri kiuj ili tiel volonte aŭdas paroli, forte ilin impresas; ankaŭ Paŭl sentis tian impreson pro la mistera monstro en la kelo. Imagoj de infanoj tamen ŝanĝiĝas pro multaj kaŭzoj: unu imago forpuŝas konstante alian kaj ĉar Paŭl subite aŭdis sonoran baton post la lumigita fenestro de la dormejo li pensis pri la turo, kiun li ĵus preteriris kun sia protektanto. Tiun turon li nun ne povis vidi pro la kurteno,

kaj volonte li suprentirus ĝin, tamen refoje pensante pri la kelo, li restis kuŝanta kaj glitis ankoraŭ pli profunden sub la litokovrilon, tiel profunden ke nur la supra parto de lia vizaĝo, tio estas: de la naztruoj ĝis la haroj estus videbla al la luno, se ĝi povus enrigardi en la liton.

Paŭl pensis pri sia patrino, pri siaj najbaroj, pri sia malgranda mondo en kiu li ĝis nun vivis, fine pri la ricevotaj pupo, bildolibro kaj buterpanoj, kaj havanta nenion alian por pripensi, lia imago saltis de unu el tiuj objektoj al la alia kaj returnen ĝis subite li refoje aŭdis fortajn senorajn batojn de la tura sonorilo. Tiuj batoj, kiujn li antaŭe en sia domo neniam aŭdis tiel klare, tremetante formortis kaj denove lin ĉirkaŭis malbruo.

— Kiel laŭte la turo batas! — li pensis. Fine liaj okuloj fariĝis pezaj kaj li estis ekdormanta, sed nun lia atento estis vekita de alia bruo: ie en la domo ekklaketis tuj poste birdo ekkriis kelkajn fojojn: ku-kuk! — ku-kuk! — ku-kuk!! Ĉu tio estis la sama birdo kiun li ofte aŭdis apud sio domo sur alta arbo? Ĉu ĝi estis enfluginta ĉi tien por voki lin? — Paŭl pensis pri tio, sed refoje peziĝis liaj okuloj kaj li aŭdis plu nenion, li dormis.

— — — — — — — — — — — — —

Estis ankoraŭ frue en la sekvinta mateno, kiam Erasmus vekiĝis el tre malkvieta dormo. Li malfermis okulojn kaj ŝtelrigardis sian edzinon, kies blanka pura noktokufo kun kelkaj grizaj haroj elstarantaj el ĝia suba rando, unue trafis liajn okulojn. Ŝi kuŝis kun la nazo turnita al la muro kaj tio ĝojigis la skribiston. Li ne amis kiam ŝia maldika nazo, pinta mentono kaj flaviĝinta sendenta buŝo estis turnitaj al li, precipe en ĉi tiu frua matenhoro, ĉar li havis gravan motivon ellitiĝi nerimarkite. Por ne veki ŝin, li tre malrapide eksidis, levante sian preskaŭ kalvan verton ĉirkaŭ kiu disen kuris malsupren kelkaj blankaj haroj, el la ronda kavaĵo de la blanka kapkuseno. Singarde apogante sin sur la kubutoj, li kaŭris [132] sur la lito kaj atendis momenton... Ŝi ne movis sin. Kviete kaj singarde li forŝovis la litkovrilon kaj pendigis ambaŭ krurojn el la lito. Li faris tion ekstreme malrapide dum la pinto de lia lango elsoviĝis eksteren tra la lipoj... Refoje li aŭskultis, rigardis malsupren al ŝi, kaj retirinte

la langopinton, li metis la piedofingrojn sur la plankon... poste la kalkanojn kaj retirante la lipojn kvazaŭ por engluti ilin, li ekstaris flanke de la lito... Denove li aŭskultis, kaj aŭdante nenion krom la kvieta regula spirado de la dormantino, li paŝis al la seĝo, sur kies dorso pendis lia pantalono... Li surmetis la pantalonon farante nenium bruon. Feliĉe ŝi aŭdis nenion sed subite la kukola[133] horloĝo aŭdigis klaketon, malgranda blanka kukolo brue aperis el la ĵetmalfermita pordeto super la ciferplato, kaj profunde riverencante,[134] la birdetoper larĝe malfermita beko kriis sesfoje sian kutiman saluton: ku-kuk! — ku-kuk! — ku-kuk!... Poste ĝi rektiĝis, fermis la bekon kaj per forta ektiro malaperis en sian loĝejon, fermante post si la pordeton kun nova laŭta klako. Erasmus rigardis kun teruro la malaperantan birdon pensante:

— Malbeninda birdo!... preskaŭ ĝi vekis ŝin.

Li estis surmetonta la veŝton[135] kiam subite li aŭdis novan bruon el kio li komprenis ke unu birdo estis vekinta alian birdon, ĉar la kanario sidanta ĝis nun senmove kun la kapeto inter la flugiloj, mallaŭte pepis en sia ringo, unu... du fojojn, poste ĝi etendis la flugilojn, movadis ilin kvazaŭ por forflugi de la ringo, sed restante sidanta, eksvingiĝis, pepante iom pli laŭte, por saluti la belan ĵus komenciĝantan matenon.

— Malbeninda birdo! — pensis Erasmus, kaj etendante al la kaĝo ambaŭ pugnigitajn manojn, li minacis la birdon, kiu mirigite pro tia neatendita interrompo de sia saluto, subite eksilentis, rigardante kun oblikve tenata kapeto la viron sub sia kaĝo.

— Feliĉe! — pensis Erasmus.

Sed apenaŭ li estis surmetinta la veŝton kaj butonuminta tiun parton de sia vestaro, la birdo ŝajne forgesis la minacantajn pugnojn, ĉar denove ĝi ekpepis, sed pli laŭte ol la unuan fojon.

— Malbenindulo! — pensis Erasmus, kaj denove liaj pugnoj sin levis, sed vane, la kanario, pensante eble, ke ĝia mastro nur ŝerce minacis, pepis plue kaj jam malfermis la bekon por eligi longan triladon,[136] sed la poeto kaptis seĝon, metis ĝin sub la kaĝon, kaj eltirinte poŝtukon el la pantalonpoŝo, ĵetis ĝin

sur la kaĝon. La birdo, kiun subite ĉirkaŭis mallumo, eksilentis.

Erasmus remetis la seĝon sur ĝian antaŭan lokon, kaptis la frakon, surmetis ĝin kaj senbrue malfermante la pordon eliris el la dormejo, post kiam li konvinkiĝis per rapide ekrigardo, ke lia edzino dormas ankoraŭ. Li estis nun en mallarĝa koridoro kaj malfermis la pordon de la familia ĉambro, kiam el sub la tablo saltis al li la hundo por lin saluti.

— Malbeninda hundo! — li grumblis, piedpuŝante ĝin returnen.

— En la korbon!... Kuŝu!... Silentu!!

La hundo, malgranda, longhara besteto, resaltis en sian korbon kaj mire rigardis sian mastron, kiu tiel malĝentile repagis ĝian matenan saluton.

Erasmus tiel silentiginte du vivantajn estaĵojn, kiuj povus veki lian edzinon, supreniris la ŝtuparon por ekzameni ĉu Paŭl jam vekiĝis. Li malfermis la pordon, kiu knarbruis.[137]

— Malbeninda pordo! — flustris Erasmus, sed li tuj eksilentis, vidante ke la knabeto kviete dormas. Lia nazo preskaŭ malaperis sub la litaĵo, sed li kuŝis tiel kviete, kvazaŭ la monstro en la kelo neniam estus malkvietiginta lin kaj kvazaŭ li kuŝus sur rozoj, dismetitaj sub li de Fortuno proprapersone.

— Li dormas — flustris Erasmus, kaj sidiĝis por rigardi la knabeton. Erasmus amis infanojn, sed lia edzino tute ne amis ilin. Ŝi pli amis la hundeton, kiu estis ŝia sola amiko.

Erasmus pensis: — Kion ŝi diros, ekaŭdante ke li estas tie ĉi?... Ĉu ŝi faros al mi scenon?...[138] Sendube ŝi faros scenon, sed eble la dudek guldenoj fermos ŝian buŝon, ĉar la guldenojn ŝi tre amas... Ĉu mi vekos la knabeton por eviti ke li krios?...

Ne, mi ne vekos lin, sed atendos lian vekiĝon por rememorigi al li ke li estu silenta ankoraŭ kelkan tempon, ĝis mi iom post iom antaŭ-anoncos al ŝi ke io ne atendita estas okazinta, kio eble ne ĝojigos ŝin, sed kio alportos al ŝi monan profiton... monatan aŭ pli longdaŭran, tio dependos de ŝia volo, ĉar Erasmus, sidanta sub la ŝuo de sia Ksantipo, spertis ke en lia domo nur ŝia volo regis. Li projektis ĉiajn planojn, ĉiajn mensogetojn por eviti eksplodon de insultoj, minacoj kaj aliaj malagrablaĵoj, li fariĝis nerva. Li estis poeto, povis verki poemojn,

povis inventi fantaziaĵojn, sed la fantaziaĵo, kiu en ĉi tiu cirkonstanco helpos lin el embaraso, ne naskiĝis en lia cerbo.

La granda malbruo, ordinare reganta en la vilaĝoj, nun estis interrompita de peza grenveturilo, venanta el unu el la farmobienoj. Ĝi proksimiĝis kun tondra bruo, kvazaŭ aro da tamburistoj returnen vokus tutan taĉmenton da infanterio, fine ĝi preteriris la domon, kiu tremetis, kaj Paŭl malfermis la okulojn.

Infanoj ordinare vekiĝas subite. Same Paŭl, kiu eksidis kaj rigardis sian protektanton.

— Ŝŝ!! — flustris Erasmus.

— Ĉu la monstro grumblegis?... Mi sonĝis ke ĝi venas...

— Tio estis nur veturilo, la monstro dormas, ĝi vekiĝas nur pro kriadoj de infanoj.

— Por tuj manĝi ilin?...

— Jes, sed ne timu. La monstro ne faros al vi malbonon. Restu ankoraŭ momenton en la lito kaj atendu ĝis mi revenos por porti vin malsupren. Vi estas bona infano kaj ricevos la pupon, la libron kaj la buterpanojn kun varma lakto.

Erasmus frapetadis la vangon de la knabeto kaj denove lin kuŝigis. Poste li reiris al sia edzino. Ŝi dormis ankoraŭ kaj ne plu timante ke la kanario ŝin vekos, li forigis de la kaĝo la poŝtukon kaj iris al la kuirejo por pretigi la kafon, ĉar tion li faris ĉiumatene. — Unu horon poste la geedzoj sidis en la familia ĉambro kaj matenmanĝis. Neniu parolis ĉar se Erasmus ne parolis, ankaŭ lia edzino ne malfermis la buŝon, sed ĉar li ne bone sciis, kiel komenci la interparoladon, li pripensis kiel li plej bone povos antaŭ-anonci ke supre en la dormejo kuŝas Paŭl. Fine li ekparolis:

— Mi lot-gajnis nenion hieraŭ vespere...

— Hieraŭ nokte!!

— Nu, bone; hieraŭ nokte.

— Neniam vi gajnas!

— Vi eraras; la lastan lotadon... tio estas: la antaŭlastan lotadon, mi gajnis grasan anseron.

— Kiu estis tiel maljuna, ke mi ne povis manĝi ĝin kaj kiu kostis al vi tiom, ke vi povus aĉeti du bonajn anserojn per la

forlotita mono. Tio ne estas gajno; tio estas malgajno!! —

Ili manĝis kaj trinkis; post momento Erasmus rekomencis:

— Mi aŭdis ke la bienposedanto Alings estas tiel malsana, ke profesoro el la urbo devos operacii...

— Nu, li operaciu!!

— Ankoraŭ mi aŭdis, ke fremda Dorotea estas tre malsana, tiel malsana, ke ŝi devos esti transportita al la malsanulejo de la urbo.

— Ne kredu ke ŝi veturos tien!

— Kial ne kredi?

— Kiu pagos?

— Oni diras ke Alings.

— Alings!? — Ŝi levis la ŝultrojn.

— Ĉu vi ne kredas tion?

— Nur azeno tion kredos, ĉar pagante tion, li konfesos ke la knabo de la fremda Dorotea estas lia.

— Hm!... Eble aliulo pagas, sed ŝi iros en la malsanulejon. Hieraŭ vespere la profesoro el la urbo vizitis ŝin kaj la bienposedanton Alings, kaj li diris al Peĉjo, ke ŝi estos transportita jam postmorgaŭ.

— Eble!

— Ŝi certe iros tien.

— Nu bone, sed kiu pagos, se Alings ne estos la paganto.

— Eble la komunumo.

— La komunumo!?... Bah! — Ŝi estas ja fremdulino.

— Ĉu vi scias, kion oni intencas fari kun la knabo?

— Mi ne scias, eble li restos ĉe... kiel nomiĝas la najbaro de Dorotea?

— Li ne restos ĉe tiu najbaro, sed ie alie.

— Kie nome?

— Pri tio mi volus paroli.

— Nu! fakte tio ja tute ne interesas min —

— Sed, kiu ricevos la knabon, tiu ankaŭ ricevos monaton pagon da dudek guldenoj.

— Ne kredu tion. Kiu volus pagi tian sumon...

— Ĉu vi opinias ke tiu sumo estas alta?

— Kompreneble!

— Nu, eble la muelisto Bursma ricevos tiun sumon.
— Bursma!?
— Jes.
— Jen refoje montriĝas, ke vi estas azeno.
— Kial do?
— Ĉu vi ne povis akcepti lin?
— Ho, mi povus, sed mi ne diziris.
— Kompreneble vi ne deziris. Vi deziras fari nur... poemojn... tute senpage... Vi neniam entreprenas ion, kio estas profitodona.

Ŝi kolere postenŝovis sian seĝon, sed tuj denove reŝovis ĝin sur ĝian antaŭan lokon.

La vizaĝo de Erasmus ekbrilis pro ĝojo; li triomfis;[139] li konis sian edzinon kaj estis elpensinta la ĝustan rimedon ne nur por eviti scenon, sed eĉ por veki ŝian deziron akcepti la knabon.

— Jen! li diris, salte leviĝante, — mi ĉi tiun fojon pruvos al vi ke mi ne estas azeno, sed ke mi agis laŭ via deziro.

Li elsaltis el la ĉambro, rapidis supren en la dormejeton de Paŭl.

Sed Paŭl estis kaŝinta sin sub la litaĵon. Erasmus diris:

— Paŭlĉjo, jam ellitiĝu por malsupreniri al la familia ĉambro, ĉar vi tuj havos la buterpanojn.

La kapo de la infano reaperis:

— Mi kredis ke venas la monstro — li diris.

— La monstro?

— Jes, ĉar mi subite aŭdis tiun bruon sur la ŝtuparo.

Erasmus ridetis dirante:

— La monstro foriris; mi fortimigis ĝin el la domo.

Paŭl ellitiĝis. Erasmus rapide lin vestis kaj prenante lin sur la brakojn, reiris al sia edzino, dirante:

— Jen la ansero, kiun mi gajnis! Oni ridis pri mi, sed: plej bone ridas, kiu lasta ridas, kaj ĵetante sur la tablon dudek tintantajn guldenojn, li daŭrigis:

— Kaj jen la dudek guldenojn por la unua monato. Enpoŝigu ilin, ĉar ili estas viaj!

Ŝi enpoŝigis la monon, sed respondis nenion, ĉar ŝi sentis

ke la ruza Erasmus estis superruzinta sin; sed ŝi pensis, pretigante la buterpanojn por Paŭl:

— Atendu, ankoraŭ mi al vi repagos!!

ĈAPITRO OKA.

Iom pri politiko — Alino kaj Dirk iras melki — Pri kio aspiras Alino — Pri perdita kaj retrovita ansero — Peĉjo, la edzino de la muelisto kaj Fulgo. Letero kiu kaŭzas disputon.

Mono kaj teraj posedaĵoj estis rigardataj kiel la ĉefaj aferoj en la homa ekzistado ĉe preskaŭ ĉiuj loĝantoj de la norda parto de la provinco Groningen. La plej multaj bienposedantoj kaj farmistoj estis riĉaj kaj ili regis en ĉio. Ili preskaŭ tirane staris super ĉiuj vilaĝanoj kaj kvankam ili ne montris tion en la publikaj drinkejoj, kie regis speco de egaleco inter la klientoj, ili montris tion des pli multe en kelkaj aferoj kaj unu el tiaj ni citos.

En la vilaĝo kie staris la „Verda Ĉevalo", estis antaŭe tri forĝistoj; ili estis inklinaj al la socialista partio, kaj havis la kuraĝon tion montri publike.

Ĉe unu el la voĉdonadoj [140] okaze de elektado de nova vilaĝa sub-urbestro, Vulkanus, la forĝisto, kiu plej fervore diskonigis siajn socialistajn ideojn, faris paroladon en la „Verda Ĉevalo". Per tiu parolado li penis pruvi, ku nur unueco inter la burĝoj povas certigi progresadon de la socialista partio, kiu iom post iom jam ekkreskis kaj ekfloris en la ĉirkaŭaĵo. La rezulto de tiu parolado estis grava, ĉar ĉe la sekvanta voĉ donado por elekti novan sub-urbestron, [141] estis elekata socialista bakisto, kiu de post tiu tempo movadis sian langon en la komunumaj kunvenoj laŭ maniero, kiu tre kolerigis la terposedantojn. Kaj per kin parto de ilia potenco transiris al la alia politika partio. Ilia indigno estis tiel ekscitita, ke ili serĉis ĉiujn rimedojn por kontraŭŝtari pluan progresadon de la socialista partio en la vilaĝo. Ne povante kontraŭstari perforte; ili trovis alian rimedon, kiu ne trafis nur la forĝistojn, sed

estis konsiderata kiel grava averto por ĉiuj vilaĝanoj, ĉiam dependaj de la terposedantoj kaj aliaj riĉuloj de la komunumo.

La riĉuloj nome aranĝis sekretan kunvenon en kiu ili post varmega diskutado decidis venigi el la urbo forĝiston, ne apartenantan al la socialista partio. Tiu forĝisto enloĝiĝis en grandan domon ekster la vilaĝo. Ĉiuj burĝoj scivole atendis kio fariĝos, kaj baldaŭ evidentiĝis la rezultoj de la sekreta kunveno. La domo estis ŝanĝita kaj el porsinjora kunstruaĵo naskiĝis nova forĝejo. Kelkaj endomaj muroj estis forigitaj, la plej granda ĉambro ŝanĝiĝis en forĝejon; antaŭ la rekonstruita domo estis starigita hufnajlejo [142] por timemaj ĉevaloj, kiuj ne toleris ke la forĝisto subforĝus la hufoferon prenante la hufojn sur sian kurbigitan genuon. Flanke de tiu hufnajlejo baldaŭ estis metataj novaj brilantaj plugiloj kaj aliaj terkultur-bezonaĵoj, kaj ĉio tio servis kaj utilis kiel grava averto al ĉiu, kiu kuraĝus propagandi socialistajn, tio estis: kontraŭterposedantajn ideojn, ĉar ĉiuj klientoj de la forĝistoj transiris al la nove veninta forĝisto, dum la tri jam de longe en la vilaĝo loĝintaj, devis kontentiĝi je burĝoj; tiuj klientoj kompreneble estis tiel malmultaj, ke baldaŭ unu el la forĝistoj bankrotis kaj foriris el la vilaĝo dum dua estis devigita turni la dorson al siaj partianoj kaj aliĝi al la aristokratia partio. Nur Vulkanus, estante viro iom monhava, ne lasis sin forpeli, sed restis fidela al sia partio kaj daŭrigis laboradi, sed nur por la vilaĝanoj. Vulkano en realo sin nomis Lans, sed ĉar li nomis sian nun malaperintan unuiĝon „Vulkanus" *), la vilaĝanoj ofte nomis lin mem Vulkanus, kaj pro ĝi li estis fiera.

La ekzemplo, uzita de la terposedantoj, por sentigi ĉiujn kontraŭpartianojn, ke estas danĝere deklari al ili la politikan militon, efikis tiel, ke post la konstruado de la nova forĝejo, la socialista movado donis nur malfortajn signojn de vivo.

Neniu povis diri al kiu partio Peĉjo Klakilo apartenis. Li sin movis inter la du partioj, neniam tirante supren sian politikan standardon kaj kiam li parolis pri la politiko, li ĉiam diris: — En ĉiu partio sin kaŝas io bona kaj io malbona;

---

*) Dio de la fajro kaj de la forĝistoj, filo de Jupiter kaj Juno.

forigu el la partioj la malbonajn partojn kaj kunigu la bonajn en unu tuton kaj la mondo estos perfekta. — Sed ŝajnis ke tiu konsilo estis malfacile plenumebla, ĉar la programoj de ambaŭ partioj restis kiel ili estis, la malbonaĵoj ne malaperis kaj la politika interrilato ne ŝanĝiĝis; la politika milito ne ĉesis, sed la batalantoj dum kelka tempo forigis por tiel diri, la batalilojn kaj kondutis unu al alia kiel du armeoj dum militpaŭzo.[143] Ĉiuj pensis pri la vundoj ricevitaj, kaj aspiris[144] venĝon. Ĉiuj terposedantoj kaj farmistoj pensis pri eventualaj,[145] estontaj unuiĝoj de la metiistoj, kiuj povus minaci ilin; la metiistoj ne forgesis la du foririntajn forĝistojn. Ambaŭ partioj atente spionadis sin reciproke, sub ŝajno de indiferenteco; ambaŭ partioj atendis favoran okazon por plimalfortigi sian kontraŭulon. Kaj inter ili sin movis kaj manovris Peĉjo kun siaj ŝercoj kaj delamoj. Li ofte rakontis pri sia patro, kiu vivis en la tempo kiam la „Princanoj" kaj la „Patriotoj" ekinterbatalis. Tio estis en la tempo, kiam la armeoj de la francoj superverŝis la landon predikante pri Libereco-Egaleco-Frateco. En tiu tempo lia patro estis posedanto de la „Verda Ĉevalo", kaj liaj klientoj estis dividitaj en Princanojn kaj Patriotojn. Por kontentigi ambaŭ, li metis super sia bufedo du grandajn kruĉojn bele pentritajn. Sur unu staris per belaj oranĝkoloraj literoj: „Vivu la princo de Oranĝujo!" (tio estis la princo, kiu estis forkurinta Anglujon ĉe la veno de la francaj soldatoj Holandon). Sur la alia kruĉo staris la Arbo de la Libereco ĉirkaŭ kiu oni dancis la „Carmagnole" kaj la ruĝaj vortoj „Egaleco-Libereco-Frateco!"

Kiam la princanoj aludis lian patriotajn principojn, li ekstaris kaj fingre montris la kruĉon kun la devizo de la princanoj kaj kiam la patriotoj nomis lin sia kontraŭulo li ankaŭ ekstaris kaj montris la kruĉon kun la Arbo de la Libereco, dirante:

— Mi zigzagiradis[146] inter viaj partioj, ĉiu partio havas siajn bonajn principojn, sed samtempe siajn malbonajn. Forigu la malbonajn kaj mi ĵetos ambaŭ kruĉojn en mil pecetojn.

La patro de Peĉjo estis politikisto laŭ sia maniero kaj Peĉjo imitis lian ekzemplon.

Ni jam diris ke Petro Blunt, la politika nepolitikisto, havis

du infanojn: filon, kiu estis instruisto en urbeto de la provinco Drente, kaj filinon, kiu loĝis ĉe li por prizorgi la mastrumadon. La filo estis kiel la patro, bonhumora viro sed pri kiu oni diris ke li estas strangulo, ĉar li tro multe sin dediĉis al artoj kaj sciencoj tute ne ŝatante monon. La filino de Blunt estis la malo de sia frato. Ŝi estis dika malgranda personino, tre egoista kaj ĉiam malbonhumora; ŝi ŝatis nur monon, kredante ke ekzistas nur tri aferoj en la mondo, kiuj povas feliĉigi kaj kontentigi la homojn: unue mono, due mono, trie mono. Pri mono ŝi pensis, pri mono ŝi aspiris opiniante ke ĝi estas la enkorpiganto[147] de ĉio bona, bela kaj dezirinda. Ŝia malgrasa, palvizaĝa frato amis artojn, sciencojn, poezion. Ŝi opiniis kontraŭe ke artoj, sciencoj kaj poezio estus bonaj se ili estus profitodonaj, sed ŝi sciis ke artistoj estas malriĉaj, ke scienculoj ne posedas monon kaj ke poetoj mortas pro malsato. Tial ŝi ne ŝatis tiujn aferojn kaj tute kontentiĝis kun bona drinkejo sen artoj, kelkaj bovinoj sen sciencoj, kaj ĉevaloj kun veturilo sen poezio. Se vi rakontus al ŝi, ke Pegaso estis flugilhava ĉevalo, naskita el la sango de Meduso; ke Pegaso servis al poetoj kaj ke poetoj ŝuldas multon al tiu ĉevalo, ŝi turnus al vi la dorson, suprentirus la nazon kaj forirus de vi, dirante ke estas neeble ke ĉevalo povas havi interrilatojn kun poetoj aŭ poezio. Alino, tiel sin nomis la filino de Blunt, ne ŝatis Pegason sed nur senflugil-havajn ĉevalojn kiuj povas tiri la plugilonkaj la veturilon. Ŝi ŝatis nur prozajn aferojn, nur bonan drinkejon, bonajn bovinojn kaj tiujn bovinojn ŝi vizitadis nur por melki ilin.

Estis la tago post la loterio kaj Alino, ĵus ellitiĝis, sin vestis, sin lavis kaj pretiginte kafon en la kuirejo, sin direktis al la dormejo de Dirk por veki lin el profunda dormo. Tion ŝi devis fari ĉiumatene, ĉar la servisto Dirk neniam vekiĝis per si mem. Li kutime laboradis la tutan tagon kaj pro la multaj konstruataj aerkasteloj, kiuj ĉiuvespere plen-plenigis lian liton, li kelkfoje malfrue endormiĝis, tiel ke li eble dormus ĝis la deka horo de la sekvanta mateno, se la krianta voĉo de Alino ne fortimigus la bonkoran dion Morfeon, kiu tamen tuj prenis la piedojn en la manojn, kiam lin timigis la voĉo de Alino.

Tri, kvar akraj, laŭtaj ekkrioj penetris ĝis la cerboj de la stultulo kaj li malfermis la okulojn.

— Jes! — li respondis tirtone, ĉar li sciis ke nur tia respondo povas silentigi la kriojn de Alino.

Dirk aŭdis la malproksimiĝantajn paŝojn de la fraŭlino kaj ellitiĝis, iom ordofaris la liton, glitigis la brakon sub la matracon por palpsenti ĉu la trezoro ne estis forŝtelita de ratoj, kiuj ofte lin vizitas. Sentinte la kesteton li kontente fermis la litŝrankon kaj rapide sin vestis. Laste li ŝovis la piedojn en la lignajn ŝuojn kaj kun laŭtaj klaksonoj iris al la ĉevalejo, kie lin atendis du siteloj, kies kupraj ĉirkaŭligoj brilis pro la hieraŭa frotado. Flanke de la siteloj staris la vekton,[148] kontraŭ la muro. Li ĵetis ĝin sur la ŝultrojn, pendigis la sitelojn ĉe la fino de la blankaj kupraj ĉenoj, kaj tiel ŝarĝita, ŝovklakis al la kuirejo por rapide engluti tason da varmega kafo kun dika peco da buterpano. Tion li faris starante.

Alino jam staris ĉe la tablo kaj estis preta iri kun la servisto eksterdomen, ĉar kune ili devos iri al la herbejo por melki la bovinojn. Tiu herbejo kuŝis kvaronhoron ekster la vilaĝo, apud la muelejo de Bursma.

Dumvoje tien, neniu el ambaŭ parolas, ĉar Dirk neniam parolas propramove sed nur donas respondon se oni faris al li demandon kaj Alino ne parolus al la servisto pro la stultaj respondaj, kiuj kutime sekvas post ĉiu al li adresita demando. Tial ankaŭ ĉi tiun matenon ili silente iris unu flanke de la alia. Dirk, iom kliniĝinta antaŭen metis unu piedon antaŭ la alian dum ĉiu paŝo estis akompanata de klaksono sur la stratŝtonoj, ĉar lignaj ŝuoj estas pezaj kaj ĉirkaŭprenas la piedojn nur malbone. Do Dirk silente treniĝis antaŭen kun pintigita buŝo kvazaŭ por fajfi, ĉiam rigardante la stratŝtonojn tiel, ke li trovus ĉiun moneron, kiun okaze vilaĝano estus perdinta tie. Sed Dirk ankoraŭ neniam trovis moneron, ĉar la vilaĝanoj kutime ne perdas sian monon. Dum la stultulo kun siaj vekto kaj siteloj tiel iris antaŭen, marŝetis ĉe lia flanko Alino. Ŝi neniam rigardis la stratŝtonojn, ŝi rigardis nenion, sed kiel kutime ŝiaj rigardoj sencele estis direktatoj ien rekte malproksime aŭtaŭ ŝi, sur loko, kiun neniu povus indiki.

Alino estis fraŭlino kun ruĝaj rondaj vangoj kvazaŭ de porcelana pupo, kun helaj bluaj okuloj, ankaŭ kvazaŭ de porcelana pupo kaj en kiuj brilis nek amikeco, nek bonkoreco, nek intereso por la ĉirkaŭantaj aferoj. Alino havis kvazaŭ frostitan, vizaĝon. Ŝi neniam ridis, konstante estis en acida humoro kaj tiu humoro estis plej acida matene, kiam ŝi devis iri melki kun la stultulo. Alino havis nur unu deziron, nome iom post iom ekposedi la havaĵon de sia patro kaj ofte ŝi pensis ke iam venos la tempo, ke la frato venos por dividi kun ŝi la „Verdan Ĉevalon" kaj ĉion, kio apartenas al la „Verda Ĉevalo". Ŝi pensis kiel absurda [149] estas tiu dividado, ĉar la frato kostis tiel multe pro sia studado, ke laŭ ŝia opinio li devus postuli tute nenion, sed li havis edzinon kaj lia edzino ne kontentus, ke Alino ricevus la tuton heredaĵon. Tial ŝi malamas sian bofratinon kaj dezirus ke la frato estu ankoraŭ fraŭlo, sed la sorto decidis ke Niko renkontu dum kermeso ĉarman knabinon kaj ke tiu knabino poste fariĝu lia edzino. Se Niko ne estus renkontinta ŝin li eble neniam edziĝus kaj, ĉar li estis viro, kiu neniam sin okupis pri financaj aferoj, li ne postulus la duonon de la „Verda Ĉevalo", sed lia edzino kaj la leĝo malebligos ke Alino estus la sola posedantino de la drinkejo, de la ĉevaloj kaj bovinoj, kiujn ŝi nun estis melkonta.

La bovinoj jam sperte sciis ke la melkontoj alproksimiĝas kaj tuj kiam ĉi tiuj suriris la herbejon, la brutoj ekstaris ĉe la ligna krado apartiganta la herbejon de la makadama vojo. Ĉe la ligno krado kuŝis du tripiedoj. Alino kaptis unu, Dirk kaptis la alian kaj ĉiu sidiĝinte sur sian tripiedon flanke de bovino, ekmelkis. Plaŭdetante la kvar laktostrioj iom post iom plenigis la sitelojn kaj post kelkaj minutoj la melkado finiĝis. Dirk refoje surŝultrigis la vekton, pendigis ĉe ĝiaj ekstremaĵoj la pezajn, nun plenajn sitelojn kaj silentante la du melkintoj returnen paŝis al la „Verda Ĉevalo". Tian promenadon al la bovinoj kaj returnen al la drinkejo ili estis farantaj en la daŭro de kelke da jaroj, matene kaj vespere.

Rehejmiĝinte, Dirk iris nutri siajn kuniklojn, ilin kelkan tempon rigardis, poste li iris al la ĉevalejo por fari buteron. Li plenigis per lakto altan starantan barilon kaj enmetinte

longan bastonon fermis la barilon per du duonaj kovriloj kun truo en la mezo.

Dirk komencis labori, tio estas: ili movadis supren-malsupren-supren-malsupren la bastonon tra la ronda truo tiel ke ĉe ĉiu ekmovo aŭdiĝis laŭta plaŭdsono interne de la barilo. Tiu laboro estas laciga, sed Dirk tiel kutimiĝis al ĉiu laciga laboro, ke seninterrompe li daŭrigis movadi la bastonon supren-malsupren, konstruante aerkastelojn kun vastaj paŝtejoj, multego da bovinoj, grandaj buterigiloj kaj bareloj da vendota butero. Li kiel kutime dronis en meditadojn, imagante ke li estas la riĉa Alings, la posedanto de ĉiuj tiaj paŝtejoj, bovinoj kaj buterbariloj, kaj li estas kontenta, feliĉa...

Dume Alino sidis en la kuirejo por prepari la matenmanĝon. Farinte kelke da dikaj buterpanoj, ŝi plenigis tasegon per kafo kaj alportis la matenmanĝon por la servisto al la ĉevalejo, starigis ĝin sur renversitan sitelon kaj reiris al la kuirejo, kie ŝi sidiĝis ĉe la tablo atendante la aperon de sia patro, kiu jam kelkfoje laŭte brufrapadis la manplatojn kaj per tio jam antaŭanoncis sian baldaŭan aperon.

Ŝi verŝis kafon en lian tason kaj atendis. Fine Peĉjo proksimiĝis, liaj duonpantofloj klaketadis sur la planko de la koridoro kaj bonhumora li deklamis:

En ĉerk' ripozis Ŝercemul'
Li kuŝis sterniĝinta,
Kaj ĉiuj plendis: Ŝercemul'
Nun estas jam mortinta,
Ho ve! ho ve! ho ve!!

La ĝoja humoro de Peĉjo neniam efikis la acidan humoron de Alino. Ŝi eĉ ne aŭdis lian laŭtan deklamadon kaj se ŝi aŭdus ĝin, ŝi tute ĝin ne atentus, ĉar laŭ ŝia opinio tia sensencaĵo ne indas atenton. Ŝi ne amis tiun strangan kutimon de la patro nek ŝatis lian seninterrompan babiladon, kiu donis al li la alnomon „Klakilo".

Peĉjo sidiĝis, vigle frotis siajn manojn por iom plivarmigi ilin kaj ripetis: Ho ve! ho ve! ho ve!! — poste li trinketis sian kafon kaj ekmatenmanĝis.

La leterportisto ankoraŭ ne venis, sekve Peĉjo ne povis legi la matene alportotan gazeton kaj atendis pacience la venon de la leterportisto, kiu kutime venis je la oka horo.

— Ĝoja estis hieraŭ la lotado, Alino.

— Eble ĝi estis ĝoja.

— Jes, tre ĝoja, ĉio marŝis kvazaŭ sur radetoj; en malmulta tempo ĉiuj birdoj estis forlotitaj.

— Mi dezirus, ke la vizitantoj ne faru tiom da bruo, tiel en la mezo de la nokto.

— Tio ne malhelpas kaj ne ĝenas.

— Jes, tio tre ĝenas; mi ne povis dormi.

— Ne estas eble fermi al ili la buŝon, kaj posedanto de drinkejo ne atentu tion...

Peĉjo babilis kaj babilis pri la loterio, pri la urba profesoro, pri Paŭl de la fremda Dorotea, pri Alings, kaj fine rakontis ke la knabo estas ĉe Erasmus ,kaj brubatante la manplatojn li finis per:

Hura! hura! hura!!

— Nu, diris Alino, — lia edzino ne ĝojos pro tia surprizo, mi ne tolerus tian bubon en nia domo.

— Sed ŝ i toleros lin... pro la mono; mi konas la edzinon de Erasmus.

— Sed m i ne toleros lin.

— Vi ne bezonos toleri la knabon, mia infano, supozu ke li ne povus resti ĉe la skribisto, mi konas alian, kiu volonte akceptus lin.

— Kiu nome?

Peĉjo estis respondonta sed la kuireja pordo malfermiĝis kaj eniris la leterportisto. Li havis la leterujon ĉe sia flanko kaj ĵus elprenis el ĝi la gazeton kaj leteron, kiujn li ĵetis sur la tablon.

Peĉjo kaptis la gazeton kaj Alino kaptis la leteron.

Peĉjo tamen ne tuj eklegis, ĉar li vidis ke la leterportisto portas en la alia mano grasan anseron, kiun liaj kvin fingroj tenis ĝuste sub la kapo de la birdo, tiel ke ĝia beko staris larĝe malfermita.

— Por kiu estas tiu ansero? — demandis Peĉjo, kies okuloj sin direktis al la birdo sur kiu ne pendis adreso.

— Mi ĝin trovis — mallonge respondis la leterportisto.

— Ĉu vi ĝin trovis!?... Kie do?

— Sur la sabla vojeto apud la farmodomo de Klaj.

Peĉjo laŭte ekridis kaj kunfrapante la manojn li kriis: Ho ve! ho ve! ho ve!!

— Kial: ho ve!? — demandis la leterportisto. — Ĉu ne estas feliĉe ke mi ĝin trovis?

— Trovitaĵo ne estas propraĵo — respondis Peĉjo.

Alino mirigite remetis la leteron sur la tablon kaj estis subite plena je atento, ĉar trovado de tia ansero estis io eksterordinara.

— Apud la farmodomo de Klaj? — ekkriis Peĉjo. — Ho, mi komprenas tion.

— Kion do?

— La ansero estas lia; li ĝin lotgajnis hieraŭ vespere, kaj sendube ĝin perdis.

— Sed kiel do...! Ĉu Klaj estis ĉe vi hieraŭ vespere? —

Ideo venis en la kapon de la leterportisto nun li ankaŭ komprenis jam, same kiel Peĉjo, ke Klaj en ebria stato estas la perdinto de la birdo.

— Nu! — li diris plue. Mi deponos ĝin ĉe la policano.

— Kial ne reporti ĝin al Klaj?

— Kiu pruvas, ke li perdis ĝin?... Trovitaĵoj devas esti deponataj ĉe la policano. Poste oni decidu kaj pruvu al kiu la perditaĵo apartenas.

— Estu prudenta! — diris Peĉjo. — Mi konas Klaj, li kompreneble hontos pro la perdo, kaj li rekompencos vin; la policano ne povas rekompenci.

— Vi pravas! — diris la leterportisto, kaj foriris kun la ansero.

Peĉjo refoje eksplodis je ridego sed baldaŭ li eksilentis ĉar refoje la pordo de la kuirejo malfermiĝis kaj eniris la edzino de la muelisto. Ŝi portis korbeton sub la brako kaj el la korbeto eksonis plendaj krietoj.

— He!... bonan matenon! — diris Peĉjo, rigardante la virinon kaj la korbeton.

— Bonan matenon! — resalutis la edzino de Bursma, kaj sidiĝante, ŝi parolis plue:

— Mi venas por demandi ĉu vi, Peĉjo, ne volus havi Fulgon?

— Fulgon!?... Kion do mi faros kun fulgo?

— Mia kato nomiĝas Fulgo.

— Ho — he!

— Jes, kaj mi devos fordoni ĝin.

— Mi ne amas katojn — acidtone diris Alino, kiu denove kaptis la leteron kaj ekzamenis la adreson.

— Sed Fulgo estas tre aminda kato.

— Kial do vi mem ne konservos ĝin? — demandis Alino.

— Ĝi gratis mian edzon tial li nepre volas ĝin forigi.

— Ĝi do n e estas tre aminda — sektone diris Alino.

— Jes, ĝi tamen estas tie aminda, ankoraŭ neniam antaŭe ĝi gratis, eĉ ne gratetis; sed sendube mia edzo pro al mi nekomprenebla kaŭzo faris al ĝi malbonon en la pasinta nokto, ĉar li rehejmiĝis kun vundita vango kaj ĵuris ke li volas pendigi Fulĉjon.

— Vundita vango!? — diris Peĉjo... Vi sekve ne vidis ke ĝi gratis lin?

— Ne, ĉar tio okazis en la muelejo.

— La pasintan nokton?... Ĉu Bursma laboris ankoraŭ post kiam li forlasis la drinkejon?

— Ne, ĉar la vento estis tro malforta.

— Li tamen estis en la muelejo?

— Jes.

Peĉjo fariĝis scivola kaj diris:

— Rakontu do, kiel ĉio tio okazis.

La edzino de Bursma detale rakontis finante:

— Kaj nun li tiel koleras kontraŭ la besto ke apenaŭ li volas rigardi ĝin, do por malhelpi ke li pendigu Fulgon, mi proponas al vi ke...

— Mi ne amas katojn! — acidtone interrompis Alino.

Sed Peĉjo ne atentante la dirajon de sia filino, pensis momenton: rompiĝinta kaldrono... pecetojn en la muelejo kaj ekster

la muelejo... la kato kutimas salti sur ies sultron... eble ĝi saltis sur lian ŝultron... tio ektimigis lin... kial?... Ho! mi komprenas...: la vila mano! Refoje li laŭte ekridis kaj deklamis:

Kaj ĉiuj kantis: Ŝercemul'
Vi estas stranga homo!
Brave! brave! brave!

Poste li diris:

— Nu, donu al mi la katon: ĝi povos formanĝi la musojn.

— Mi ne amas katojn! — triafoje diris Alino, kiu ekvidis ke la ĵus alportita letero venas de ŝia frato.

Peĉjo, kiu amis bestojn, prenis la katon el la korbeto kaj momenton ĝin karesis. Ĝi staris sur lia genuo¦ alte levis la voston rekte en la aeron, karbigis la dorson kaj kontente miaŭis, poste ekzumetis kaj grimpis sur la ŝultron de la drinkejestro. Tie ĝi sin turnadis, kviete sidiĝis kaj rigardis alterne al sia estinta mastrino kaj al Alino. Sed Alino estis malferminta la leteron, legis kaj kondutis kvazaŭ Fulgo tute ne ekzistus.

Peĉjo diris: — Mi metos ĝin sur la subtegmentejon, kie musoj svarmas. Ĝi povas ekstermi ilin kaj poste ĝi ja kutimiĝos en ĉi tiu domo.

Li iris kun la kato al la koridoro, supreniris la ŝtuparon, kiu kondukis al la subtegmentejo, ĵetfermis la falpordeton de la subtegmentejo por ke la kato ne povu salti malsupren kaj diris:

— Jen ĝi sidas!

— Sed ĝi bezonas ankaŭ lakton — diris la zorgema muelist-edzino, kiu estis sekvinta la drinkejestron.

— Kompreneble; mi havas bovinojn, sekve ankaŭ lakton, ne maltrankviliĝu, mi bone prizorgos la katon. — Subite li demandis:

— Ĉu vi iam aŭdis pri la vila mano?

— La vila... mano!? — Ŝiaj okuloj klare diris, ke neniam ŝi sciis, nek aŭdis pri tia mano.

— Mi jam vidas ke vi neniam pri ĝi aŭdis — kviete kaj ridetante diris la drinkejestro, kaj li daŭrigis iom mistertone:

— Oni rakontas ke tiu mano vere ekzistas kaj ke ĝi kelkfoje surprizatakas malbonfarantojn.

— Ĉu vere?... Nu, min ĝi neniam surprizis.

— Eble ĝi surprizis iun alian en la pasinta nokto.

— Kiun?

— Mi ne scias.

— Vi ŝercas kiel kutime — ridetante ŝi diris.

— Ĉi tiun fojon mi ne ŝercas — kaj levante la fingron li diris plue, sed ankoraŭ pli mistertone:

— Feliĉe estas tiu, kiun neniam vizitas la vila mano, kaj mi esperas, ke ĝi neniam vin tuŝos.

Ŝi ne sciis kion pensi, sed iris for al sia domo daŭre pensante pri la vila mano; ŝi decidis demandi sian edzon ĉu li iam aŭdis pri tiu mano kaj ĉu ĝi jam lin tuŝis.

Dume Peĉjo kun rideto sur la lipoj postrigardis ŝin, reiris al la kuirejo kunfrapante la manojn kaj deklamis:

Sed jen subite Ŝercemul'
En sia ĉerk' sidiĝis,
Kaj ĉiuj kriis...

Li eksilentis ĉar Alino ĵus ĵetis sur la tablon la legitan leteron ekkriante:

— Jen vi havas!... Jen kvarope ili falos sur nian dorson kaj forpelos min el ĉi tiu domo!

— Kio estas?

— Legu! — ŝi diris, montrante la leteron.

Li legis kaj ŝi kunpremis la lipojn, fikse rigardante sian patron por vidi sur lia vizaĝo, kian impreson faros sur lin la letero: samtempe ŝi pensis pri sia aerkastelo, kiu subite ruiniĝis, kaj larmoj de kolero aperis en ŝiaj okuloj.

Kia diferenco estis inter tiu knabino kaj Dirk. La aerkasteloj de Dirk sinsekve ruiniĝis, sed li konstruadis ĉiam aliajn dum la renversiĝintaj neniam pelis larmojn en liajn okulojn. Li eĉ ne ĝemis pro la malaperinta imaga feliĉo; seninterrompe li laboradis en la ĉevalejo, farante buteron kaj la bruo de la bastono moviĝanta tra la truo de la barelkovrilo penetris en la kuirejon, kie nun Alino sidis kun kolero en la koro kaj kie

Peĉjo kviete legis la leteron, adresitan al li, sed kiun lia filino estis elŝirinta el la koverto por legi unua.

Atente Peĉjo legis kaj iom post iom la ridantaj trajtoj malaperis de sur lia vizaĝo kaj estis anstataŭataj de signoj de naskiĝanta ĉagreno. Li sin klinis super la letero, kiun li tenis en ambaŭ manoj, kaj samtempe kliniĝis lia kapo tiel ke la supro de lia silka ĉapo plene sin montris al la rigardanta knabino, kiu samtempe vidis la blankajn buklojn ĉirkaŭantajn la kapon de la patro kiel brilanta arĝenta aŭreolo.[150]

Fine li residiĝis rekte, kunfaldis la leteron kaj diris frapetante per una mano la tablon:

— Kompatinda knabo.

— Kial?

— Li ja malsaniĝis.

— Jes, li malsaniĝis, sed tio jam tiel ofte okazis, ke tio ne bezonas malkvietigi nin. Li kompreneble resaniĝos kiel li ĉiufoje resaniĝis.

— Jes, eble li refoje resaniĝos.

Peĉjo enpoŝigis la leteron.

— Nu! Ĉu vi ne legis ke ili intencas veni ĉi tien kvarope?

— Jes, mi legis tion.

— Nu?

— Nu, ili venu.

— Jen kion mi atendis!

— Kion mi do faros alie krom akcepti ilin?

— Li ja resaniĝos... Estas ridinde veni ĉi tien... kvarope!

— Li ne povas veni tutsola.

— Kial ne? La aliaj povos resti tie.

— Niko devas eble esti flegata kaj tion plej bone povas lia edzino.

— Ĉu mi ne povos tion?

— Ne, Alino; vi ne povos. Vi ne estos taŭga flegistino.

— Bela afero!... tiel preni sur vian dorson ĉiujn kvar!

— Li resaniĝos, kiel vi mem diris.

— Sed li skribas plue, ke li intencas restadi ĉi tie, kaj eksiĝi kiel instruisto, ĉar tiu ofico, kiel li skribas, ĉiam denove malsanigas lin.

Peĉjo pripensis momenton kaj ŝi daŭrigis:

— Kial do li fariĝis instruisto?

— Li amas artojn, sciencojn...

— Kial li ne edziĝis kun alia knabino?

— Sed Alino! Li ja ŝin amis.

— Sensencaĵo!... Ŝi estis nur malriĉa rato.

— Jes, ŝi estis malriĉa, sed ŝi feliĉigis Nikon.

— Ĉu ŝi feliĉigis lin? Kial do la filino de Hamstra same bone ne povus fari lin feliĉa?... Ŝi montris sufiĉe klare kiel volonte ŝi fariĝus lia edzino.

— Sed Alino!... Ŝi estas ja malfeliĉulino.

— Kial?

— Ŝi ja estas... ŝi ja tute ne estas aminda personino kun sia ĝibo.

— Ĝibo? Nur ĝibeton ŝi havas; sed ŝi estas riĉa.

— Ĉu vi volus fariĝi edzino de ĝibulo?

— Tio dependas. Se lia ĝibo estus nur ĝibeto kaj se li estus tiel riĉa kiel Hamstra...

— Fi do! hontu! — kriis Peĉjo, skuante siajn arĝentajn harbuklojn.

— Mi ne hontas. La homoj bezonas monon por progresi en la mondo. Kun mono oni estas sendependa. Homo, kiu havas monon, ne bezonas fali sur la dorson de sia patro por ke tiu patro zorgu ne nur pri li, sed ankaŭ pri liaj edzino kaj infanoj... Imagu ke ili kvarope venas ĉi tien... Kien mi iros?

— Vi ankaŭ restu; vi, por labori kiel vi faris ĝis nun, kaj ŝi povos flegi Nikon.

— Kaj tiuj infanoj!?

— Ili havas du knabojn, du karajn obeemajn infanojn.

— Ili mem prizorgu ilin! Li estas instruisto kaj jen subite li volas eksiĝi por enloĝiĝi ĉi tien... kvarope!

— Li ja povos labori ĉi tie.

— Labori!?... tio estas: sin okupi pri sciencoj, artoj, poezio, pri tiuj aferoj, kiuj malriĉigas la homojn. Sed mi certigas al vi, ke mi tuj iros for, kiam ili kvarope metos la piedojn trans la sojlon de ĉi tiu domo!

Ŝi tremis pro kolero, ŝiaj pupaj okuloj brilis, ŝiaj rondaj vangoj ardis[151] kaj pro eksciteco ŝi eligis laŭtajn spirojn.

Peĉjo kviete refoje sin klinis, refoje lia arĝenta aŭreolo, ĉirkaŭanta lian kapon kiel tiu de sanktulo, trafis ŝiajn okulojn, sed tion ŝi ne rimarkis. Ŝi subite salte leviĝis kaj rapidis el la kuirejo, kriante:

— Mi tuj respondas ke ili ne venu!

Peĉjo postrigardis sian filinon kaj sentis dolorpremon en la koro.

— Kia karaktero! — li fine flustris. Poste li dum kelka tempo fikse rigardis antaŭ si kaj kviete ekstarante li diris al si mem:

— Mi estas la mastro en ĉi tiu domo; mi skribos al li, kaj mi skribos ke mi atendos ilin kvarope se tion postulas lia sanstato.

ĈAPITRO NAŬA.

La vila mano fariĝas ĉiekonata — Erasmus verkas poemon pri Patrina Amo kaj kiel li estas interrompata. Vigla interparolado inter Erasmus kaj Ksantipo. Paŭl.

Tri tagoj pasis post la lotado en la „Verda Ĉevalo", kaj ĉie en la vilaĝo oni babilis, parolis, klaĉis kaj ridis pri la vila mano. La drinkejestro ne tuŝis plu tiun aferon, sed aliaj klaĉantaj langoj disrakontadis ĉion pri tiu mistera vila mano.

Kiam la edzino de Bursma rehejmiĝis post sia vizito al Peĉjo, ŝi dum la tuta reiro al sia domo pripensis kion Peĉjo estis dirinta pri tiu mano. Image ŝi vidis ankoraŭ lian levitan fingron kaj aŭdis lin diri: „Feliĉa estas tiu, kiun ankoraŭ neniam tuŝis la vila mano, kaj mi esperas, ke ĝi neniam tuŝos vin.

Reveninte hejmen ŝi parolis pri tiu misteraĵo al sia edzo, sed paliĝante li foriris el la ĉambro al la muelejo grumblante:

— La diablo prenu tiun Klakilon kaj lian vilan manon! — Kial ŝia edzo ekkoleris? Kion do koncernis lin tiu mano? Ŝi sciis ke malpravas, tiu, kiu koleras, sekve ŝi devis konjekti ke

Bursma ankaŭ malpravas; pensante plue, ŝi kredis ke lia kolero havas rilaton kun tiu mano. Pri la kato ŝi ne plu pensis, sed ŝi intencis ekzameni la aferon, ĉar kiel multaj aliaj virinoj, ŝi estis scivolema kaj ne ripozos antaŭ ol tiu scivolemo estos kontentigita. Ŝi do parolis al sia najbarino pri la vila mano, demandante ĉu ŝi jam aŭdis pri ĝi. La najbarino parolis al alia najbarino kaj tiel plu ĝis la tuta ĉirkaŭaĵo precize sciis pri ĉio, kio estis okazinta. Kelkaj virinoj estis vidintaj la ruĝajn striojn sur la vango de la muelisto kaj tuj ili ekpensis pri la longaj ungoj, kiujn kompreneble la vila mano posedas. Sinjorino Bursma poste rakontis ke ŝia kato tiel terure gratis la vangon de la muelisto, sed la najbarinoj levis la ŝultrojn, pripensadis kaj image vidis kiel la pintaj ungoj de la mistera mano salutas la vangon de la muelisto pro kaŭzo, kiun neniu kuraĝis eldiri, sed kiu ŝajnis esti tre klara, ĉar laŭ la rakonto de Peĉjo, la vila mano jam antaŭe ŝoviĝis trans la ŝultron de alia muelisto; do baldaŭ ĉiuj samopiniis ke la vundita vango de Bursma estas la rezulto de samspeca misterplena surpriz-saluto.

Ne nur la edzino de Bursma, sed ankaŭ la servisto de Klaj kaj la leterportisto estis klaĉintaj kaj la famo diskuris en la vilaĝo ke la vila mano ankaŭ vizitis la farmiston Klaj kaj ke Klaj estis ĵetita en la longfoson, estis perdinta ĉe tiu okazo sian gajnitan anseron, ke fine li eĉ ne volis reakcepti tiun anseron kaj donacis ĝin al la honesta trovinto.

El unu rakonto ofte sekvas alia samspeca, el unu klaĉo naskiĝas aliaj klaĉadoj kaj en malmultaj horoj ĉiuj langoj de la vilaĝo estis en rapida movado pri la sama temo.

Kompreneble ankaŭ la edzino de Erasmus ekaŭdis pri ĝi kiam ŝi estis en la butiko de la vilaĝa spicisto, kaj si ekkoleris; ne pro la vila mano, kiu tiel regalis du respektindajn virojn de la vilaĝo, sed ĉar ŝia edzo ne estis rakontinta al ŝi kion ĉiu en la vilaĝo rakontas kaj ĉiujn altgrade interesas.

Aliaj rakontoj diskuris pri Alings. Unuj diris ke ankaŭ lin vizitis la vila mano kaj ke ĝi decidigis lin konfesi ke Paŭl estas lia infano, ke lin tiel teruris la mano, ke grava malsano estas la rezulto de tio, tiel ke li nun kuŝas en sia lito kaj ke meznokte urba profesoro venis veturile por lin viziti, kaj ke tiu profesoro

baldaŭ revenos por farî danĝeron operacîon por savî Alings de certa morto.

Aliaj disrakontis ke la fremda Doroteo estis transportota en la urban malsanulejon je kostoj de Alings. Fine la edzino de la vilaĝa barbiro [152] estis aŭdinta, (ŝi ne plu sciis dek iu) ke la vila mano ankaŭ vizitis la fremdan Dorotean, sed la barbiredzino ĉiujn petis ne ripeti al aliulo tiun okazintaĵon, ĉar eble ĝi ne estas vera kaj nur la rezulto de malica klaĉado de tiu, kiu unua pri ĝi parolis.

La plej stranga afero tamen estis, ke nek Klaj nek Bursma sciis pri tio, kion ĉiuj vilaĝanoj klaĉis pri ili, ĉar neniu vilaĝano parolis al ili pri la okazintaĵo. Ankaŭ al Alings, kiun vidis nur la maljuna mastrumastino, la afero restis tute kaŝita, ĉar la mastrumistino, kvankam aŭdinte pri ĉio pere de la juna servistino, ne kuraĝis tuŝi tiun temon, timante la koleron de la malsana bienposedanto.

Tiel pasis kelkaj tagoj.

Paŭl dum tiu tempo estis ĉe siaj novaj provizoraj geadoptintoj [153] kaj estis kontenta. Erasmus aĉetis por li pupon kaj bildolibron kaj la knabeto, kiu ĝis tiu tempo nenion posedis krom siaj vestoj, kredis sin riĉulo. Kontenta li sidis en angulo de la ĉambro ludante kun la pupo kaj rigardante kaj admirante la bildojn de la libro.

Paŭl havis strangajn opiniojn pri la mondo, tute aliajn ol ordinaraj infanoj. Ĝis nun li konis nur sian patrinon, siajn najbarojn kaj malofte li estis vidinta aliajn personojn, kiuj preteriris ilian domon, sed ili estis nur malmultaj kaj Paŭl ne multe pensis pri ili; li nur sciis, ke lia patrino estas lia superulino, al kiu li ĉiam devas obei, poste la najbaroj fariĝis liaj superuloj. Venante en la domon de Erasmus, li konsideris tiun viron kiel la plej eminentan kaj la plej potencan en la tuta mondo, ĉar li per unu piedfrapo povis forpeli la teruran monstron, kiu kaŭranta en la kelo, atendis la favoran momenton por engluti la knabon kun haŭto, haroj kaj vestoj. Sed Paŭl baldaŭ eksciis ke Erasmus estas nenio kompare kun sia edzino, kiu sendube estas la plej potenca el ĉiuj homoj iam ekzistintaj, ĉar ŝi ordonis al Erasmus kaj li obeis al ŝi.

La knabeto sidis en sia angulo kaj ludis. La skribisto sidis en ĉambreto flanke de la familia ĉambro kaj laboris super poemo dum lia edzino estis eksterdome por aĉeti kelkajn mastrumajn bezonaĵojn. Erasmus do povis kelkan tempon dediĉi sin al la poezio kaj diligente skribis, ĉar sian poemon li volis pretigi por poste prelegi ĝin okaze de retorika [154] konkurso [155]en la „Verda Ĉevalo". Li verkis tiun poemon tre sekrete ĉar li sciis, ke lia edzino ne amas la poezion kaj konsideras perdita ĉiun minuton, kiun li uzas super siaj retorikaj amuzaĵoj. Sed li estis ruzulo kaj laŭ ruza maniero li ŝteluzis ĉiun minuton por fini sian jam de longe komencitan poemon. Ofte li kuŝis meznokte sendorme en sia lito kaj pripensis la verkatan poemon, penante teni en la memoro la versojn, [156] kiujn li laŭ tiu maniero faris. Lia poemo estis titolita: [157]

„P a t r i n a A m o",

kaj li estis preskaŭ certa, ke ĝi akiros la premion [158] dum la festa vespero en kiu li ĝin deklamos. Ĝis tiu ĉi tago li verkis jam 77 liniojn, kiuj rimis laŭ ĉiuj reguloj de la poezio. Li havis nun la feliĉan okazon verki la sekvantajn ses liniojn, pri kiuj li jam cerbumis [159] la pasintan nokton, do rapide li skribis:

Mi volas eksidis, sed ve! mi ne povas,
Kaj dum la ventego ekstere tremblovas
Mi vidis nur al la fein',
Ŝi ridas pro ĝojo, kantetas pro danko
— — — — — — — — — —

Erasmus haltis kaj serĉis du rimvortojn, nome unu finiĝanta per... „anko", kaj unu finiĝanta per... „in'". Vortojn rimantajn kun „anko", li konis multajn, nome: banko, blanko, flanko, manko, branko, franko, ŝranko, sed ĉiuj ne taŭgis por la poemo. Li do meditis, fine trovis: „planko", kaj frapetante per la maldekstra mano sur la tablon por ricevi la ĝustan ritmon, [160] li flustris:

„Subite... jen pomo rulfalas sur planko"

Refoje li haltis por serĉi rimvorton kun „fein'" —

Li pripensis: kombin, turbin, medicin, fasĉin, rafin, parafin, morfin... kvin... Jen li trovis, kaj refoje frapetante la tablon li flustris:

Ĝin sekvas alia... ĝis kvin.

Li rapide skribis la frazon kaj meditis plue, frapetante la tablon kaj flustrante.

Paŭl scivole aŭskultis. Li ne sciis kion signifas tiu flustrado, tiu frapetado kaj metante flanken la bildolibron, li ekstaris, iris al la pordeto grandparte konsistanta el vitro kaj enrigardis.

Erasmus sidis en klinita pozo super la papero; skribante li ekhaltis frapetante la tablon, flustrante:

„bruligas... kuiras... ŝin...
tiklado... sonĝado... patrin'"

Poste li refoje ekskribis. Gratante la plumo flugis sur la papero. Refoje li formetis la plumon dum li flustris:

„leviĝu... sidiĝu... bru'!
„koleros... maltoleros... du."

kaj frapetante la tablon por ricevi la ĝuston ritmon li denove skribis, nenion aŭdante, eĉ ne rimarkante ke lia edzino malfermis la stratan pordon kaj eniris la koridoron. La pordo de la familia ĉambro tuj poste malfermiĝis kaj ŝi staris sur la sojlo rigardante Paŭl'on. Ŝi tuj suspektis ke Erasmus faras ion neordinaran, ĉar Paŭl scivole rigardas en lian ĉambreton. Ŝi suprentiris la brovojn, levis la montran fingron kaj fikse rigardante la knabeton, faris movon per la buŝo, kiu ordonis al li: Silentu!... Ŝŝt!!...

Paŭl komprenis, kaj reiris al sia angulo kie li sidiĝis. Dume sinjorino Erasmus singarde formetis la ledajn pantoflojn,[161] senbrue fermis post si la pordon kaj sur la piedfingroj ŝteliris al la ĉambreto en kiu sidis Erasmus, kaj enrigardis.

Li flustris: „Seĝo... reĝo... ter'
Ronkadis... festenadis... mizer'

poste frapetante la tablon per unu mano, li skribis per la alia.

Gratante la plumo flugis de unu linio al alia. Fine la lasta staris preta kaj Erasmus legis la tutan poemon por se bezone fari kelkajn korektaĵojn:

Patrina Amo.

Ŝi estis malbona, senhonta knabin',
Sed amo blindigas; li amis nur ŝin.
„Ĉu", diris ŝi moke, „nur min amas vi?
Alportu do koron patrinan al mi!"
Li koron el brust' de l'patrino elŝiris,
Kaj tuj al la senhontulin' rapidiris,
Sed... falis, kaj koron patrinan frakasis.
La kor', kvankam tiam
Rompita por ĉiam
Demandis, eĉ antaŭ li vojon daŭrigis:
„Ĉu do, mia knab' vi ne vin dolorigis?" *)

Tiele kantadis antikva poeto.
Sed mi al vi kantos nun en rakonteto
Pri kio okazis en ver'.
Mi al vi rakontos pri mia patrino,
Ŝi estis al mi, kvazaŭ bona feino
Veninte por mi nur sur ter'.

Ŝi estis malriĉa kaj ĉiam laboris,
Ŝi ĉiun amadis, sed min ŝi adoris
Per amo de vera patrin'.
Ŝin batas la edzo, malbona drinkulo,
Senhonta viraĉo, maldiligentulo,
Nur kiu vivadis por vin'.

Kaj kiam l'adzino de l'frua mateno
Klopodis akiri manĝaĵon kun peno

*) La linioj 1—11 estas tradukitaj el la holanda lingvo (aŭtoro: V. A. de la Montagne).

Por l'edzo kaj por la knabet',
Li viro la monon en bruo forĵetis,
Kaj en la drinkejo sen hont' firidetis
Pri sia sklavin-edzinet.

Ŝi multe suferis kaj multe ŝi larmis,
Mi multe malsatis kaj ofte malvarmis
Kaj ridis en sonĝo nur mi,
Kredante ke iel la bona patrino
Aperis al mi kvazaŭ dia feino,
Portanta manĝaĵon kun si.

— — — — — — — — — —

La vintro regadis, ventego kolera
Dissemis neĝflokojn per mano severa;
En lito mi kuŝis kaj jen:
Dum patro ebria en sonĝo blasfemas,
Kaj pro la malsat' kaj malvarmo mi tremas,
Maldormis patrin' pro ĉagren'.

Murmuris ŝi kun malesper' en la koro:
„Ho Dio, kompatu je mia trezoro,
Mi panon ne havas por li;
Nun, kvankam ventegas, mi iros eksteren,
Por vidi ĉu ion faligis Vi teren,
Por nutri la knabon per ĝi."

Malfermas ŝi pordon kaj en la malvarmo
Ŝi nun malaperas, dum fluo da larmo
Ekfalas el ŝia okul'.
Irante tra stratoj, nenion ŝi trovas,
Kaj dum la venteg' pli terure ekblovas,
Ŝin vidas nenia vivul'.

Kaj ĉiam pli akra fariĝas l'aero,
Nur pene ŝi kuras sur blanka la tero,
Ĝis fine, ho bona Vi Di'!
Jen kuŝas sen dub' ruliĝinta el ĉaro,

De l'urbo venanta, belega pomaro,
Loganta ŝin... sur la glaci'.

Ŝi tremas pro ĝojo, sed ve! la riveron
Trančantan serpente malvarman la teron
Nur kovras maldika glaci'.
Sed Dion ŝi fidas, ĉar Li ne forlasas
Malriĉan patrinon, kaj jen ŝi alpaŝas
Riveron... Protektu ŝin Di'!

Jam ŝi kolektadas kun dank' en la koro
La pomojn kaj kvazaŭ monerojn el oro,
Avide jam prenis dekkvin.
Subite... diskrevas maldika glacio,
Kaj mia patrin' kun terura ekkrio
Al bordo glitigas nun sin.

Kaj ĵus ŝi eksaltis sur bordon en neĝon,
Dum kio kun trem' ŝi balbutas ekpreĝon,
Kun krako rompiĝas glaci'.
Sed ŝi ne atentas pasintan danĝeron,
Apenaŭ piede tuŝante la teron
Al domo rapidas nun ŝi.

— — — — — — — — — —

Mi dume sonĝadis: ...Refoje feino
(Ŝi multe similis al mia patrino),
Subite revenas al ni.
Kaj en l'antaŭtuko ŝi portas ludaĵon,
Aŭ ion alian... ho eble manĝaĵon!!
Sed vidi ne povas ĝin mi.

Mi volas eksidi, sed ve! mi ne povas,
Kaj dum la ventego ekstere tremblovas,
Rigardas mi al la fein'.
Ŝi ridas pro ĝojo, kantetas pro danko,
Subite... jen pomo rulfalas al planko,
Ĝin sekvas alia... ĝis kvin.

Fein' en kameno bruliges lignaĵon
Kaj dum ŝi mistere kuiras frandaĵon
Rigardas atente mi ŝin.
Kaj en mia nazo fariĝas tiklado
L'odoro min vekas el stranga sonĝado:
„Ĉu ĝi estas vi, ho patrin'?"

„Jes knabo, rigardu, kaj baldaŭ leviĝu,
Kuiris mi pomojn, ĉe l'fajro sidiĝu,
Kaj manĝu, sed manĝu sen bru'.
Ne veku la patron, li eble koleros,
Kaj kiel kutime al ni maltoleros
Ke manĝos en paco ni du."

Vestiĝis mi tuj kaj sidiĝis sur seĝo,
Mi sentis min kvazaŭ la plej riĉa reĝo
Reganta sur tuta la ter'.
Kaj dum mia patr' en la lito ronkadis,
Ni ambaŭ silente kun ĝoj' festenadis,
Pensante jam ne pri mizer'.

Subite, manĝante, „patrino!" mi diris,
„Hodiaŭ vespere el domo vi iris;
Kun pomoj revenis ĵus vi.
Sed, kiu do donis al vi tiujn pomojn?
Ĉar morgaŭ mi iros por danki la homojn
Pro tiu donaco al ni."

Sed panjo, falante sur plank' surgenue
Min ĉirkaŭbrakante, plorante senbrue:
„Infan', ne demandu al mi",
Kaj min premegante sur nobla la koro:
„Por tiu pomaro, ho kara trezoro,
Mi riskis la vivon por ĝi!"

Dum nia poeto legis sian poemon, lia edzino sen bruo malfermis la pordon kaj ŝtelirinte en la ĉambreton, rigardis

trans la ŝultron de la leganto. Ŝiaj vizaĝtrajtoj akceptis la esprimon de iu; kiu kolere kaj indigne prijuĝas friponaĵon kaj levante la dekstran manon, ŝi ŝovis ĝin trans la ŝultron de la poeto kaj subite kaptante la plumon el lia mano, ŝi kriis:

— Kio estas tio!?

La vila mano ektimigis la mueliston kaj la farmiston Klaj, sed ĉi tiu mano de sinjorino Erasmus, tiel mistere ŝoviĝanta trans la ŝultron de la malfeliĉa poeto, tiel lin surprizis kaj ekteruris ke li kvazaŭ ŝtoniĝinta rektiĝis sur sia seĝo, ŝovante antaŭ sin sur la tablo la poemon, kiu forglitinta, falis sur la plankon ĉe la alia flanko de la tablo.

— Mia Dio!!—ekkriis la konsternita [162] viro:—Kio estastio!?

— Nur mia mano! — moke respondis lia edzino, kaj minace rigardante la skribiston ŝi diris plue:

— Ĉu vi pensis ke la vila mano vin tuŝis?

— La vila mano? — li demandis ŝajnigante kvazaŭ li ŝin ne komprenus.

— Jes, la vila mano! Ĉu vi vere ne scias, kio estas la vila mano? — Nu, mi scias tion... la tuta vilaĝo parolas pri tiu vila mano, kiu tuŝis la mueliston, kiu tuŝis la farmiston Klaj kaj... pri kiu vi silentis kaj ne rakontis al mi.

Erasmus sidis kiel granda pekulo kaj ne sciis kion respondi, fine li diris:

— Oni ja ne povas rakonti ĉion?

— Oni ne povas rakonti ĉion!... sed vi silentis pro kaŭzo.

— Pro kaŭzo?

— Jes, pro kaŭzo, alie vi ja estus parolinta al mi pri tiu vila mano!... Ĉiu parolas pri ĝi, kelkaj homoj diris ke ĝi estas nur sensencaĵo kaj fantaziaĵo de Peĉjo Klakilo, sed mi diras kaj certigas al vi ke tiu mano ekzistas, vere ekzistas, se ĝi ne ekzistus, mia mano, kiu eĉ ne estas vila, ne estus timiginta vin en tia maniero!

Ŝi paŝis post la tablon, kaptis la poemon kaj disŝirante ĝin en pecetojn ĵetis ĝin for.

— Mi ne komprenas, kial tiu poemo tiel povas kolerigi vin.

— Ĉu vi ne komprenas tion!? Nu, mi tion komprenas, kaj mi komprenas ankoraŭ ion tute alian.

— Kion do?

— Ĉu vi scias kion diris al mi la edzino de la spicisto?

— Kiel mi povus scii!?

— Nu! mi ne havas sekretojn por vi; mi diras ĉion rekte en vian vizaĝon, kaj ankaŭ nun mi ĵetos rekte al via Erasmusa nazo, kion diris al mi la spicist-edzino!... Ŝi diris ke ŝi estas tre mirigita, ne nur ŝi, sed ĉiuj en la vilaĝo, ke vi kunprenis kun vi tiun bastardon de la fremda Dorotea.

— Mi lin lotgajnis.

— La diablo lotgajnu vin!

— Mi do ne povis lasi la knabon sub la libera ĉielo, tiel mezo de la nokto!

— Sed Peĉjo Klakilo!? Li metis lin tien... kaj lasis lin sub la libera ĉielo, meznokte!

— Li ja ne lotgajnis la knabon!

— Eĉ se li estus lotgajninta lin, li estus lasinta lin tie sur la strato, por ke la v e r a p a t r o, kiel oni diras, kunportu lin kun si!

— La vera patro!!? — La kompatinda poeto sentis, ke liaj malmultaj haroj stariĝis sur lia kapo kaj li diris plue, dum lia edzino rigardis lin fikse per siaj meduzaj [163] kuloj, kiuj lin rigidigis.

— Kiu elklaĉis tiun kalumniaĵon?

— He!... Ĉu tio estas kalumniaĵo!?... Nu, mi scias, kion mi scias kaj denove mi demandas: Kial vi ne lasis la bastardon tie, kie li estis?

— Sed, mi ja diris...

— Kial vi antaŭe ne diris tion? Vi diris nenion pri ĉio tio, nek pri la vila mano kaj venis hejmen kiel...

— Nu, kiel?

— Kiel ŝtelisto!... kiel iu kun malbona konscienco!...

Kial vi la saman nokton ne diris al mi, ke tiu bastardo estas en la domo?... Kaŝe vi portis lin supren en la liton kaj ruzmaniere vi decidigis min tenadi lin ĉi tie...

— Sed aŭskultu do...

— Nun mi ne volas aŭskulti; tiun nokton volonte mi

aŭskultus; nun estas tro malfrue; nun mi scias, kion mi scias kaj ofte mi jam suspektis...

— Kion vi suspektis?

— He!... Ĉu vi demandas? Vi, kiu faras ĉion kaŝe kaj sekrete?... Vi, kiu faras kaŝe poemaĉojn... Vi, kiu kaŝe portas hejmen bastardon pri kiu oni nun disrakontas ke li estas via...

Erasmus volis interrompi ŝin, sed tio ne estis ebla. Ŝi siblis, hurlis kaj fine batis la tablon: kriante: — Li tuj malaperu el mia domo...

— Kien?

— Ĉu vi refoje demandas?... Mi ne scias kien, kaj mi ne volas tion scii; mi de nun spionados ĉiujn viajn farojn kaj starojn, ĉiujn viajn movojn kaj provojn!... Jam ne klopodu fari pluajn friponaĵojn nek... nek poemojn. Ĉi tiun lastan mi ŝiris en pecetojn kaj disĵetis sur la plankon kaj mi ĵuras al vi ke... Ŝi ne kapablis daŭrigi. Senspire ŝi falis sur seĝon kaj dum momento sidis kiel ŝtona statuo.

Erasmus pensis: Ŝi per si mem rekonsciiĝos. Ne estas la unua fojo, ke tia furiozo ŝin atakas. Ŝi rekonsciiĝos... Mian poemon ŝi neniigis, sed tio ne estas grava, ĉar mi konas ĝin parkere kaj rilate al Paŭl, nu, li restos ĉi tiun monaton kaj la sekvantan mi transdonos lin al iu alia.

Li surmetis la ĉapelon kaj rapidis el la domo.

Paŭl, la atestanto de tiu sceno, estis rampinta kiel eble plej malproksimen en sian angulon kaj kun angoro rigardis tiun virinon, kiu laŭ lia opinio, superis ankoraŭ sian edzon do nepre devas esti la plej potenca homo en la mondo, tiel potenca ke unu sola ekrigardo de ŝiaj akraj okuloj sufiĉus por fortimigi ĉiujn monstrojn, kiuj povus eniri la domon por engluti sentaŭgajn infanojn. Paŭl komprenis nur malmulton pri la sceno, nek pri la dialogo [164] de la du aktoroj, [165] sed li komprenis, ke li mem estas la bastardo pri kiu ŝi estis parolinta, kaj gravurante [166] tiun nomon en sian memoron li fariĝis tre scivola pri ĝia signifo.

Erasmus estis for; lia edzino post kelkaj sekundoj rekonsciiĝis kaj komencis purigi la ĉambron, tute ne atentante pri la knabo, kiu evitis ĉiujn angulojn, en kiuj ŝiaj viglaj manoj sin movis.

Li tamen zorgis pri tio, ke li konstante sin trovus malantaŭ ŝia dorso, ĉar li timis la akrajn okulojn de tiu megero, [167] kiesrigardoj tremigis lian tutan korpon.

Fine la ĉambro estis purigita kaj Paŭl refoje sidis en sia anguleto, ludante kun sia pupo dum lin karesis la dolĉa espero, ke lia patrino baldaŭ resaniĝos por ke li kviete kaj sentime povu reiri en sian dometon por rekomenci sian antaŭan unutonan sed trankvilan vivon.

ĈAPITRO DEKA.

Ĉe Blink, la vilaĝa barbiro — Liaj klientoj kaj lia nova samhejmano. Paŭl ekaŭdas ke monstroj ne ekzistas. Paŭl kaj la infanoj de Blink.

La edzino de Velt sciis ke ŝia aludo pri lia kvazaŭa patreco je Paŭl estas tute senbaza, sed ŝi estis serĉinta la okazon pagi al li la ruzon, per kiu li akceptigis la knabon en sian domon kaj lia edzino havis plenan sukceson. Estis al ŝi indiferente ĉu la knabo estas en la domo aŭ aliloke, unue Paŭl estis obeema infano kaŭzanta nenian apartan laboron, nek specialan zorgadon aŭ grandajn elspezojn, due la dudek guldenoj, pagataj al ĉiu prizorganto de la knabo, estis al ŝi tre bonvenaj, ĉar ŝi amis monon kvankam ŝi ne estis avara; sed ŝi konsideris financan gajnon kiel ion tre grava. Laŭ ŝia opinio homo neniam laboru senpage, ĉiu laboranto aŭ laboristo valoras kaj indas sian rekompencon aŭ salajron, kaj neniu laboru ne profitigante sian laboron kaj tempon. La literaturaj fruktoj de ŝia edzo (se liaj versoj valorus ion) ŝi rigardis kiel ion tre absurdan kaj malsaĝan, ĉar ne nur tiuj fruktoj estis netaŭgaj por ŝanĝi en manĝeblajn aferojn, sed eĉ kostis al li tempon kaj monon, kaj Velt povus pligrandigi siajn enspezojn kopiante adresojn por iu riĉa firmo, kiu kutimis dissendi siajn presitajn reklamaĵojn; li povus hektografie kopii cirkulerojn por malpli riĉaj firmoj kaj alimaniere perlabori monon en sia libera tempo, sed anstataŭ tio li faras poemojn kaj partoprenas konkursojn; neniam gajnante unu centimon. Ĉio tio tre kolerigis ŝin, tial ŝi konstante

kontraŭis sian edzon en ĉiuj tiaj sensencaĵoj, sed tiuj kontraŭstaroj efikis nur malmulte la skribiston. Li ne kopiis cirkulerojn, ne skribis adresojn por firmoj, sed verkis poemojn por sin amuzi.

Paŭl estis nun preskaŭ monaton en la domo de la skribisto. Volonte li reirus al sia patrino, sed ŝi estis en la urbo, kie „fratinoj" el la malsanulejo ŝin flegis. Ŝia stato ne estis tre bona, sed post akurata ekzameno la profesoro konstatis ke ŝin ne estis atakinta la ftizo, kaj ke verŝajne ŝi resaniĝos post kelkaj monatoj dum kiuj Paŭl devis loĝi en la vilaĝo ĉe burĝo, kiu ricevos ĉiumonate la fiksitan pagon. Peĉjo estis la paganto kaj neniu sciis kies perulo li estas, ĉar kiom ajn oni klopodis por ekscii tion, la drinkejestro pri tiu temo silentadis.

Post unu monato Paŭl transloĝiĝis en alian domon, nome en tiun de la razisto Blink. En la komenco Erasmus decidis lasi la knabon ĉe si, sed li volis repagi al sia edzino la insulton, kiun ŝi estis ŝovinta sub lian nazon, kaj subite en la lasta vespero de la unua monato li prenis Paŭlon je la mano kaj kondukis lin al la domo de Blink, antaŭ ol sinjorino Erasmus sentis ion suspektindan. Ŝi mordis al si la maldikajn lipojn, ŝiaj okuloj elĵetis fajrerojn de kolero, sed ŝi diris nenion sed pensis: — Mi mem ordonis ke li ne restu ĉi tie, sed mi repagos al vi ankaŭ tion kaj ŝi atendis la okazon por sin venĝi.

Alings eltenis sian operacion kaj post unu monato resaniĝis, paginte du mil guldenojn al la profesoro, kiu deponis la plej grandan parton de tiu sumo en la kason de la urba malsanulejo por la flegado de la fremda Dorotea, la restaĵon li uzis por ĉiumonate pagi la prizorganton de Paŭl.

Ordinare la razistoj, precipe tiuj de vilaĝoj, estas babilemaj viroj, kiuj povas rakonti ĉion, kio okazas en lia ĉirkaŭaĵo, sed Blink, kvankam sciante preskaŭ ĉion, parolis pri tio nur malmulte. Plej volonte li aŭskultis kion diris liaj klientoj, kutime li ne enmiksis sin en ilian interparoladon, sed, ĉar kelkfoje li estis devigata ion diri aŭ respondi, li preskaŭ ĉiam diris la samon, nome: „Ĉu vere?" — „Pri tio mi miras." — „Pri tio mi ne miras", aŭ ion samspecan. Li havis du infanojn kaj volonte akceptis por kelka tempo la malgrandan Paŭlon, pro

la mono, kiu kun la knabo eniros lian domon, ĉar Erasmus estis certiginta ke la knabeto estas obeema kaj neniel kaŭzos ian zorgon kaj ĝenon.

Li do venis la lastan vesperon de la monato laŭ la interkonsento,[168] ĉar ambaŭ viroj sciis ke estos plej bone ne paroli pri tio al aliaj por eviti ke la edzino de Erasmus malhelpu.

La fiksita vespero estis je sabato kaj ĉar en tiaj vesperoj la metiejo de la razisto ĉiam estis plena je klientoj, ankaŭ ĉe tiu okazo tie sidis deko da viroj por esti razataj.

Ĉiu estis mirigitaj kiam Erasmus eniris kun Paŭl kaj diris al la razisto, ŝovante al li la knabeton:

— Jen via nova samhejmano!

— Ĉu li ne plu loĝos ĉe vi? — demandis la forĝisto, ankaŭ ĉeestanta.

— Mia edzino ne povas kutimiĝi al infanoj.

— Kial vi ne kondukis lin al Bursma? — demandis alia.

— Bursma havas tro multe da knaboj, li akceptos de nun nur knabinojn.

— Nu — rimarkis alia kliento, mi havas ses knabinojn, se li deziras li povas adopti ĉiujn.

Ĉiuj ridis pri la ŝerco.

— Kial vi ne kondukis lin al lia patro? — demandis la forĝisto:

— Al lia patro?

— Al Alings nome.

— Vi pravas, sed mi timas ke liaj korthundoj disŝiros lin.

— Kiel fartas nun Alings? — demandis alia kliento.

— Ho li tute resaniĝis.

— Mi vidis lin plugi hodiaŭ — sin miksis alia en la interparoladon.

— Ĉu vere? — diris la barbiro.

— Jes, sed mi konsilas al Blink viziti lin morgaŭ.

Blink, (kiu estis kaptonta la nazon de la dika buĉisto, sidanta kun sapumita lipo sur la razoseĝo, ĉar kelkaj haroj, dikaj kiel kudrofadenoj devis esti fortranĉataj) sin turnis al la parolinto, demandante:

— Kial?

— Ĉar liaj haroj fariĝas tiel longaj ke li fortimigos la birdojn, kiuj alie sekvus lian plugilon por kapti kaj formanĝi la vermetojn.

— Ĉu vere? diris Blink.

Ĉiuj ridis kaj Blink rekaptis la nazon de la buĉisto, ŝovis ĝin supren kaj forskrapis la dikajn harojn de la supra lipo.

— Mi konas alian personon, kiu bezonas vian tondilon Blink — sin turnis al li la forĝisto.

— Ĉu vere?

— Jes, la orgenisto.

Refoje oni ridis, ĉar la kapo de la orgenisto estis tute senhara kaj similis ovon, kaj sur ĝi dum kelkaj jaroj ne kreskis eĉ unu hareto.

La buĉisto ekstaris de la seĝo, viŝis sian lipon per blanka tuko kaj sidiĝanta inter la aliaj klientoj subite diris:

— Blink, vi postulis de mi tro multe da mono.

Blink sin preparis por sapumi novan klienton, kiu ĵus sidiĝis sur la razirseĝon, kiun la buĉisto estis al li cedinta, sed kies kusenon antaŭe estis renversita, ĉar ĉiuj klientoj estis razetaj sur la sama seĝo, kaj sur la sama kuseno, sed ĉe ĉiu nova kliento la razisto rapide renversis la kusenon. Renversinte ĝin li diris kviete:

— Ĉu vere?

— Jes, de mi vi postulis dek cendojn por nur kelkaj forrazitaj haroj kaj de Vulkanus, kiu havas tiom da haroj kiom havis la dio Vulkanus, vi ankaŭ postulis dek cendojn.

— En realo vi pravas, — diris Blink.

— Mi proponas ke estonte ni pagu laŭ la pezo de niaj kapoj — intermetis alia kliento, kiu estis tre malgrasa kaj kies kapo pezis ne pli ol la duonon de tiu de la dika buĉisto.

— Nu! — diris Vulkanus al la buĉisto. — Ĉu vi pagis tro multe?

Blink kviete razis sian sesan klienton, kaj ridetis anstataŭ ion diri.

— Ĉu vi devas ankaŭ esti razata Paŭl? — demandis la buĉisto la knabeton starantan ankoraŭ post la razista seĝo.

— He! li staras ankoraŭ tie! — diris Blink kaj kviete formetante la sapumilon,[169] li prenis la knabeton ĉe la mano kaj

kondukis lin en la kuirejon, kie kune sidis lia edzino kaj la du infanoj. Poste li reiris al sia kliento kaj razis lin.

— Ĉu vi aŭdis plu nenion pri la filo de Peĉjo? — demandis alia.

— Vi celas la instruiston? — demandis la razisto. — Jes, mi aŭdis ke li enloĝiĝos ĉe sia patro.

— Li havis la intencon eksiĝi kiel instruisto pro malsaneco, sed li resaniĝis — diris la buĉisto.

— Kiel ĝojos Alino! — kriis alia.

— Ĉu ne vere? — diris Blink.

— Ĉu Klaj ne venis? — demandis Vulkanus.

— Ne — diris la razisto.

— Kial ne?

— Li jam ne venas, li ne estas plu mia kliento.

— Kies do? — demandis Vulkanus.

— Nenies — respondis la buĉisto, — li lasas kreski ĉiujn siajn harojn. Li preskaŭ neniam plu venas en la vilaĝon, precipe li ne venas vespere.

— Ho, mi scias kial, klarigis alia: li timas ke la vila mano refoje ĵetos lin en la longfoson...

— Kaj ke ĝi ĵetos la anseron en la sablon — diris plue la forĝisto, kaj sin turnante al Erasmus, li findiris:

— Tiu vila mano estas vera io stranga; ĉu ĝi neniam vin tuŝis Erasmus?

La poeto ridetis, ne respondis sed pensis pri tute alia mano, kiu ne estis vila, sed kiu estis disŝirinta lian belan poemon, kvankam neniu povis elŝiri tiun poemon el lia kapo, ĉar tie ĝi estis engravurita kvazaŭ per fera skribilo sur marmoro.

Erasmus sidiĝis sur la razoseĝon, mem ĵetturninte la kusenon, Blink okaze forgesis pri tio, ĉar li devis iom akrigi sian razilon, kion li faris ĉiam plenatente. Farinte tion li sapumis la mentonon kaj la supran lipon de la skribisto, kiu subite pensis pri Bursma, kiun li ne estis rimarkinta inter la klientoj. Tuj kiam Blink formetis la sapumilon por preni la razilon, Erasmus, rapide uzante la okazon, diris:

— Ĉu la muelisto ne venis ankoraŭ? Ĉu vi ankaŭ perdis lin kiel klienton same kiel la farmiston Klaj? Blink ridetis,

ne respondis sed komencis razi la skribiston, kies okuloj ĉien direktiĝis por vidi, kiu respondos lian demandon.

— Vere! — diris la buĉisto — li jam kelkajn fojojn ne venis. Lin tamen la vila mano ne ĵetis en la akvon, nek forprenis de li anseron.

— Li ne gajnis anseron — rapide interĵetis Erasmus, refoje uzante la okazon, kiam la razisto forviŝis la malpuran ŝaŭmon de sia razilo.

— Li ne gajnis anseron, li sekve ne devus timi, ke la vila mano ĵetos ĝin de lia ŝultro, tamen la vila mano, kiel oni diris, karesis lin tiamaniere, ke la postsignoj sidas ankoraŭ sur lia vango.

— Eble tial li ne venis ankoraŭ ĉi tien — diris Erasmus, refoje uzante la okazon.

— Sed li revenos, kiam la strioj estos malaperintaj — opiniis alia kliento. Kion pensas pri tio Blink? — li demandis, sin turnante al la razisto.

— Mi esperas tion — respondis Blink, kiu per la dorso de sia mano tuŝis la vangon de Erasmus por senti, ĉu ĝi estas sufiĉe glata kaj ĉu ĉiuj haretoj estis forrazitaj.

— Ĉu vi iam razis Alings? — sin turnis nun alia kliento al Blink.

— Neniam, respondis la razisto.

— Li ja ne bezonas raziston, — diris Vulkanus, — li lasas kreski ĉiujn siajn harojn, sed se li venus, li estus bonvena, ĉu ne vere Blink?

— Kompreneble, — diris la razisto.

— Nu, kiu scias, — diris Erasmus, purigante sian ĵus razitan vizaĝon, — eble li venos.

— Mi esperas! — diris Blink.

— Sed tio estus miraklo — opiniis Vulkanus.

— Mirakloj kelkfoje okazas — certigis alia kliento.

— Nu, diris al tio la buĉisto, kiu opiniis ke tia miraklo neniam efektiviĝos. — Nu! se li fariĝos via kliento, mi regalos vin ĉiujn.

— Per kio vi regalos? — demandis Erasmus.

— Per kesto da havanaj cigaroj.

— Erasmus! — kriis la forĝisto, notu niajn nomojn!

Erasmus ridetis, sed li ne eknotis, pensante ke la ŝerco estas sensencaĵo kaj malsincera.

— Notu, notu, sekretario! — diris la buĉisto, — mi estas sincera, kaj li pensis: Tia miraklo ja ne povas okazi kaj neniel pagigos al mi la cigarojn.

Erasmus prenis papereton per kiu Blink kutime purigis la razilon, ridetante notis la nomojn de la ĉeestantoj, kiuj ankaŭ ridetis. Notinte ilin, li transdonis la papereton al Blink, dirante:

— Jen la papereto kun la nomoj, ne purigu la razilon sur ĝi, sed gardu ĝin zorge.

— Kompreneble, diris Blink, enpoŝigis ĝin kaj daŭrigis sian razadon sub ĝoja babilado de la klientoj, kiuj unu post alia foriris kun glata vizaĝo.

Tiel regule pasis tiuj vesperoj, tiel regule sin amuzadis ŝercante la vilaĝanoj kaj la farmistoj dufoje en la semajno, kiam ili kunvenadis en la razejo de Blink por esti razataj.

Kiam ĉiuj estis foririntaj, Blink malfermis la kuirejan pordon, prenis Paŭl'on je la brako, sidigis lin sur la razoseĝon kaj diris al li:

— Kiu tiel bele fortranĉis viajn harojn? Ŝajnas kvazaŭ musoj tion faris, kiuj volis fari el via kapo ŝtuparon por supreniri sur vian verton.

— Tiu sinjorino...

— La edzino de Erasmus?

Paŭl ne bone komprenis la demandon, ĉar li ne sciis, kiu estas Erasmus, kaj li ne respondis plue sed direktis siajn grandajn brunajn okulojn demandoplene al Blink, kiu kun kombilo en unu mano kaj longa tondilo en la alia, estis glatigonta liajn harojn.

— Sidu senmove Paŭĉjo, alie mi eble fortondos peceton de via orelo.

Paŭl sidis senmove. Li sentis kiel la tondilo dancas sur lia kapo forigante la harŝtupojn, sentis kiel la haretoj falis laŭ liaj oreloj kaj kiel kelkaj penetris en liajn okulojn.

— Premfermu [170] la okulojn Paŭĉjo, alie la haretoj ilin pikos.

Paŭl refoje obeis; li ĉiam obeis kiam oni ordonis al li ion, ĉar li estis spertinta ke kontraŭstaro estas vana.

— Kiom da jaroj vi havas Paŭĉjo?

— Preskaŭ kvar.

— Preskaŭ kvar!?... Ĉu vi ne eraras? Vi estas jam tiel altkreska kaj tiel dika knabo, preskaŭ unu kapon pli altkreska ol nia Berta, kaj ŝi estas kvinjara.

Paŭl ne respondis al tio sed pensis, ke eble la razisto pravas, ĉar li estis spertinta ke aliaj homoj ĉiam pravas dum li mem ĉiam malpravas.

— Kion vi havas sub la kitelo, Paŭĉjo?[171]

— Pupon, kiun tiu sinjoro donis al mi.

— Bone, gardu ĝin zorge, Paŭĉjo!

Paŭl sentis ke la razisto estas bona kaj ĝentila, eĉ amika viro kaj kuraĝiĝinte, li demandis.

— Ĉu vi havas kelon?

— Jes Paŭĉjo, ni havas kelon.

— Ĉu la monstro sidas tie? — Paŭl volis levi la okulojn por vidi kion diros la barbiro, sed sentante ke ĉiam ankoraŭ haretoj falas sur lian nazon, li tuj refermis la okulojn.

— Monstro!? — demandis Blink kun miro. — Kia monstro?

— Tiu, kiun la alia sinjoro fortimigis el sia kelo.

— Ĉu sidis en lia kelo tia monstro?

— Jes, tion li diris.

— Kial li diris tion?

— Por ke mi ne kriu.

— Monstroj ne ekzistas, Paŭĉjo.

— Kiu do formanĝas kriantajn infanojn?

— Neniu formanĝas infanojn. Ne timu, estu nur obeema knabo kaj al vi fariĝos nenia malbono.

Paŭl eligis longan elspiron pro senŝarĝiĝo;[172] li sentis pli kaj pli ke la razisto estas bona, amika viro, pli amika ol multaj aliaj, ĉar li parolis al li tiel amike kaj certigis ke monstroj ne ekzistas. Li spiris pli libere kaj fine levis la okulojn, ĉar la tondilo estis metata sur la tablon kaj Blink ridetante diris, levante lin de la seĝo kaj antaŭ la granda spegulo:

— Rigardu Paŭĉjo, nun via kapo similas belan kokosnukson,[173]

sen ŝtupareto por la musoj. Palpu kiel glata nun estas viaj haroj!

Paŭl palpis per la mano kaj ridetis dum en la granda spegulo ridetis al li alia knabeto, kiu same kiel li, palpis sian tonditan kapon. La razisto diris plue:

— Nun reiru en la kuirejon, mi devas balai la plankon. Metinte la seĝon en angulon li balakolektis la harojn dise kuŝantajn en la razoĉambro.

Paŭl reiris en la kuirejon. Tie sidis ĉe tableto la edzino de Blink, tre maldika virino kun grizetaj okuloj (el kiuj unu estis straba)[174] pala, malgrasa vizaĝo kaj flavaj haroj. Ŝi senŝeligis terpomojn. Ĉe la forno staris du lignaj fajrokestetoj[175] (piedvarmigiloj) sen fajrovazetoj,[176] ĉar ili ne servis plu kiel varmigiloj, sed kiel benketoj por la du infanoj de la razisto, kiuj nun ludis kun dika kato. Paŭl, kiu ne ricevis seĝon, nek benketon por sidi, staris ĉe la forno kaj aperigis el sub sia kitelo la pupon. Neniu parolis al li, ĉar li ne estis konsiderata kaj traktata kiel paganta gasto, sed kiel io tute stranga kaj superflua, kion la edzino de la razisto toleris en sia domo pro la dudek guldenoj, kiujn ŝi ricevos ĉiumonate.

Paŭl palpis sian pupon kaj rigardis ĉirkaŭen. Li silentis, ĉar nur tre malofte li kutimis paroli se oni ne sin turnis al li kun demando.

Post kelka tempo la razisto eniris la kuirejon kaj la familio ekvespermanĝis. Paŭl ricevis nun seĝon kaj kunmanĝis. Nur Blink kelkfoje diris al li kelkajn amikajn parolojn, sed lia edzino preskaŭ ne atentis lin kaj la du knabinoj rigardis la fremdan knabon kiel anasoj rigardas fremdan birdon, kiu subite inter ili aperis. La knabinoj pensis: Kia dikulo, kia altkreskulo, kia dikvangulo vi estas! Kaj Paŭl pensis: Kiel malgrasaj, kiel maldikaj, kiel malbelaj estas ĉi tie la homoj, esceptinte la sinjoron, kiu ĵus fortondis miajn harojn.

Post la vespermanĝo la knabinoj malaperis en ĉambreton flanke de la kuirejo kaj Paŭl estis portita de la razisto al subtegmenteja ĉambreto. Preninte lin sur la brakon, li amike al li diris:

— Nu, venu kun mi supren, Paŭĉjo; mi enlitigos vin.

Kviete Paŭl sidis sur lia brako, li fidis la raziston, ĉar li

estis dirinta ke monstroj ne ekzistas, ke li estu nur obeema knabo kaj ke neniu faros al li ion malbonan.

Paŭl kuŝis en bona lito, sed li ne tuj fermis la okulojn, ĉar li kuŝis en nova lito kaj ĉio nova interesas infanojn; ankaŭ lin interesis ĉi tiu nova ĉirkaŭaĵo. Li vidis nur malmulton, ĉar la razisto estis forportinta kun si malsupren la lampeton, kies malforta lumo estis dum unu minuto montrinta al Paŭl la internon de lia nova dormejo. La lampeto estis for kaj nun en la ĉambreto regis nur malforta lumo, kiun la luno enverŝis tra la diafana[177] kurteno de la fenestro. Paŭl ne timis plu la monstron, ĉar monstroj ne ekzistas laŭ la diro de la razisto, sed li pripensis, kiel infanoj povas pripensi, nome: pri sia patrino, pri siaj antaŭaj najbaroj, pri Erasmus kies pinta nazo ŝajnis al li io eksterordinara kaj pri la edzino de Erasmus, kiu ĉiam kondutis al li kun malvarma indiferenteco, fine li pensis pri la edzino de la razisto, kiu ankaŭ kondutis al li laŭ la sama maniero; li kredis ke same faras ĉiuj virinoj, ĉar eĉ lia propra patrino estis al li kvazaŭ iu, indiferenta pri lia sorto. Finfine li ekdormis kaj kiam li la sekvantan matenon vekiĝis, staris antaŭ lia lito la razisto, kiu amike ridetis al li kaj helpis lin ellitiĝi, sin lavi kaj sin vesti. Poste Paŭl matenmanĝis, sed la manĝado pasis kiel la vespermanĝo de la antaŭa tago. La knabinoj diris al li nenion kaj ilia patrino agis kvazaŭ li ne ekzistus.

Estis nun dimanĉo. La knabinetoj estis vestitaj per dimanĉaj vestoj, sed Paŭl posedis nur unu kostumon konsistantan el ĉapo, kitelo, mallonga pantaloneto, kiu kiel li kredis, fariĝis pli kaj pli mallonga, paro da dikaj lanaj ŝtrumpoj, kiuj iam kovris liajn genuojn, sed kiuj ankaŭ fariĝis pli kaj pli mallongaj, tiel ke ili nun apenaŭ kovris liajn tibikarnojn;[178] paro da lignaj ŝuoj kompletigis la kostumon.

Je la naŭa horo la granda sonorilo en la preĝeja turo laŭte kaj tremetante bumbamis kelkan tempon kaj la barbiro iris preĝejon. La aliaj restis hejme. La knabinoj iris sur korton malantaŭ la domon kaj ankaŭ Paŭl iris tien, portanta kun si la pupon kaj la bildolibron, sian tutan havaĵon. Sur tiu korto staris ronda, profunda tirputo[179] el ŝtono en kiun sitelo, pendanta

je longa ĉeno povis malsupreniri por ĉerpi akvon. Tiu puto estis ĉiam kovrita de ligna kovrilo, sur tiun kovrilon la knabinoj sidiĝis. Paŭl staris apude ludanta per la pupo. Kelkan tempon ĉio marŝis bone, fine unu el la knabinoj kaptis la pupon el la manoj de Paŭl. La knabo mirigite rigardis unue la knabinon poste sian pupon kaj rekaptis ĝin, sed ŝajne tio tre malkontentigis la knabinon, ĉar refoje ŝi eltiris la ludilon, kriante:

— Mi volas ludi kun ĝi!

Paŭl, sentante ke li agas rajte kaj prave, ĉar la pupo estas lia, refoje volis kapti sian proprajon, sed la knabino ĝin ne ellasis. Paŭl levis la manon, minacante ŝin. Eble li rigardis ŝin per minacantaj okuloj, ĉar li estis multe pli forta ol la knabino, ŝi ellasis la pupon kaj laŭte ekkriante rapidis hejmen.

— Li min batis! — ŝi kriis.

Baldaŭ ŝi revenis kun sia patrino, kiu per rapidaj paŝoj, flamantaj okuloj iris al Paŭl, staranta ankoraŭ ĉe la tirputo. Ŝi tiris la pupon el la manoj de la knabo, ĝin donis al la knabino, dirante:

— Ne plu batu Berta'n!... Ĉu vi komprenas!?

— Ŝi kaptis de mi mian pupon.

— Vian pupon!?... Vi ne havas pupon, vi havas tute nenion, kaj mi avertas vin ne plu tuŝi Berta'n; poste doninte la pupon al sia filino, ŝi diris:

— Nun ludu kun la pupo kaj lasu lin sola.

Paŭlo estis konsternita. Infanoj estas sentemaj pri justeco kaj ankaŭ Paŭl sentis ke oni faras al li maljustecon, sed li silentis, rigardante sian proprajon, kiu tiel maljuste transiris en fremdajn manojn. Kiam la patrino estis for, Berta iris al li, moke montris al li la langon kaj levante antaŭ lia nazo la pupon, diris:

— Ĝi estas mia pupo! Panjo diris ke vi havas tute nenion, ŝi eĉ diris hieraŭ ke vi neniam havis patron.

Paŭl, forgesinte pri la minaco de la virino, per unu ektiro ŝiris sian proprajon el ŝia mano, sed la knabino, sentante sin forta pro la patrino protektado, donis al Paŭl tian baton sur la nazon ke li lasis fali la pupon kaj laŭte ekploris.

En la sama momento la barbiro aperis sur la korton. Ne

dirante vorton, li kuŝigis la knabinon sur sian genuon kaj punis ŝin per kelkaj fortaj frapoj; poste li redonis al Paŭl la pupon dirante al li:

— Jen Paŭl, ĝi estas via pupo! — kaj al Berta:

— Se vi refoje lin ĝenos, mi vin regalos ankoraŭ pli severe!

Li reiris en la domon kaj neniu ĝenis plu la knabon, kiu kviete sidiĝis sur la tirputo pensante:

— Ĉi tie l i estas la plej forta, sed en la alia domo ŝ i estis la plej forta, kaj li sentis ke lia protektanto estas honesta, bonkora viro. Ĝis tiu ĉi tago la knabo nenie spertis amon nek amikecon kaj la konduto de la barbiro tiel impresis lian animon, ke en ĝi naskiĝis sento de dankemo, ĝis nun tute de li nekonata.

ĈAPITRO XI.

Alings la luphomo. — [180] Alings sur la digo kaj sur la kampoj. — Li aŭskultas strangan interparoladon pri si mem. — Stranga plugado. — Novaj intencoj de Alings.

Nenio estis pli stranga ol la vivo de Alings, la riĉa bienposedanto de la „Granda Grengarbo". Kiel dua Robinsono li vivis sur sia bieno kaj sur sia vasta kamparo, konsistanta el multaj hektaroj da paŝtejo por ŝafoj kaj bovinoj kaj el aliaj multaj hektaroj da ĉiuspecaj grenkampoj. Kiel ni jam diris, li sin okupis je preskaŭ neniu kaj vidis nur sian geservistaron, dum li aranĝis siajn komercaferoj ne persone sed skribe, tiel ke li malofte venis en la urbon, kie peranta komisiisto vendis liajn fruktojn en la granda grenborso. Ĉiu tamen devis konfesi ke la aferoj de Alings marŝis bonege, ĉar lia kamparo kaj la paŝtejoj ĉiam estis en bona stato; li ricevadis multego da bonaj fruktoj kaj ne pagante tro multon da salajro al la servistaro, kies nombron li kiel eble plej estis limiginta, li fariĝis pli kaj pli riĉa, tiom pli ĉar lia mastrumado kostis al li tre malmulton kompare kun tiu de aliaj terkulturistoj, kiuj posedis kelkajn luksoĉevalojn, luksoveturilojn kaj aliajn luksaĵojn, apartenantajn al ilia rango. Alings posedis nur malmultajn superfluaĵojn kaj

neniu komprenis, kial tiu viro vivis tiel strange kaj kvazaŭ ermito; neniu sciis por kiu li amasigis siajn riĉaĵojn, ĉar nur parencoj, se ili vivus, povus poste ĝui la fruktojn de lia laboro. Alings, kiu estis diligenta viro, multe laboris. Ofte li mem iris post la plugilo, ofte li mem sidis sur la semveturilo, mem prizorgis grandan parton de la falĉado kaj aliajn kulturlaborojn kaj nur malofte li ripozis por interrompi la ĉiutagan laboron per amuzaĵo. Oni disrakontis ke li neniam sin amuzis, esceptinte ke li de tempo al tempo en la ĉastempo iris ĉasi sur siaj kampoj. Tiam lin akompanis unu el la junaj kamplaboristoj por porti la longan saltbastonegon [181]*). Jam frumatene Alings sin levadis por persone kontroli la iradon de sia vasta bieno, kaj ne pli frue ol la vespero, ofte ne antaŭ noktomezo li enlitiĝis. Li neniam legis librojn, sed nur gazetojn, kiujn regule ĉiumatene alportis al li la sola leterportisto de la vilaĝo.

Unu semajno nun pasis post kiam Erasmus estis notinta la nomojn de la klientoj troviĝantaj en la razejo de Blink kaj neniu pensis plu pri la ŝercaĵo. Tiaj ŝercaĵoj estis tre ordinaraj inter la vilaĝanoj, ĉar ili rigardis ilin kiel amuzaĵojn en sia unutona vivo.

Alings jam frumatene estis sur la piedoj kaj trairis unu post alia siajn bovinejon, ĉevalejon kaj grenejojn. La servistoj donis nutraĵon al la porkoj, al la ĉevaloj kaj sin okupis pri aliaj taskoj preskaŭ ne atentante sian mastron, kiu kutime ne multe parolis kun ili. Alings iris eksteren sur la antaŭkorton. La du hundoj, ĉiam ĉirkaŭirantaj tie kiam ili ne kuŝis en la hundejoj — specoj de lignaj dometoj kun pintaj tegmentoj — venis renkonte al li svingante la longajn vostojn, sed Alings forpelis ilin, malfermis la feran kradpordon, kiu apartigis la korton de la makadama vojo, kaj sin direktis norden, kie la longa alta digo kiel verda serpentiĝanta ŝirmilo kontraŭ la norda maro, etendiĝis antaŭ li. Tiu digo, konstruita en la epoko, kiam la franca imperiestro Napoleono estis alpropriginta [182] nian landon kiel francan provincon, servis ne nur por malebligi la maron superverŝi kaj engluti la tutan nordan parton de la provinco Groningen, sed ankaŭ

*) Uzata por salti trans larĝajn longfosojn.

kiel paŝtejo por ŝafoj kaj ĉevaloj. La tuta digodorso estis dispartigita en multe da pecoj-paŝtejoj, apartenantaj al bienposedantoj; la lignaj kradoj inter la paŝtejoj estis tiel altaj, ke ŝafoj ne povus salti transen. Dekon da tiaj digopartoj posedis Alings, kiu utiligis ilin por sia ŝafaro kaj iafoje por la ĉevaloj. Aroj da ŝafoj ĉiam kviete paŝtiĝas tie kaj kvankam ili povas libere sin direkti kelkajn centojn da paŝoj sur la digo kaj en la direkto al la maro, ilin nur minacas malofte la danĝero esti dronigataj kaj fortirataj de la ondoj, ĉar la marakvo atingas la digon nur ĉe okazoj de furiozaj ventegoj, kaj ĉe tiaj okazoj la bestoj instinkte forkuras sur la digon, aŭ ĝin malsupreniras ĉe ĝia alia flanko. Starante sur la digo la rigardanto povas ĝui belegan vidaĵon. Alings, grimpinte sur la digon, rigardis antaŭ si en la direkto kie sin etendis la maro. La vetero estis bela, kvieta kaj antaŭ la piedo de la digo sterniĝis la verdaj paŝtejoj, forrabitaj de la maro kaj elkulturitaj [183] jam antaŭ multaj jaroj de la diligentaj manoj de la farmistoj kaj terposedantoj, kaj kien la maro preskaŭ neniam plu penetras. Iom post iom tiuj belaj ĉiam freŝaj paŝtejoj transiras en ŝlimon, kie ĝis nun neniam kreskis la herbo; tie nur dise kuŝas ĉiuspecaj konkoj, malgrandaj pecoj de rompiĝintaj ŝipoj, ŝnuroj, korkoj kaj aliaj objektoj, senvaloraj, do de neniu forportataj. La ŝafoj neniam iras ĝis tiu ŝlimaĵo, sed restas sur verdaj paŝtejoj ĉe la piedo de la digo, aŭ sur la digosupro. Alings transrigardis ĉiujn tiujn antaŭ li kuŝantajn aluviaĵojn [184] kiuj plejparte al li apartenis. Pli malproksime sin etendis duoncirkle la griza maro, de supre limigita de la blua ĉielo. Tiu maro nun kuŝanta sen movo, similis grandan spegulon super kiu ŝvebflugis la marbirdoj kaj sur kiu navigis kelkaj ŝipoj. Ŝajnis ke tiuj ŝipoj kuŝas senmove, sed ĉar preskaŭ ĉiuj havis velojn, ili sin movis antaŭen sed pro la granda distanco la okuloj de Alings ne povis vidi eĉ la plej malgrandan movadon. Kiu je la unua fojo ĝuas tiun belan vidaĵon, tiu estas ravita de ĝia beleco, sed je Alings, kiu jam tiel ofte staris sur la digo, ĝi tute ne efikis. Li trovis, ke la maro, la digo, la paŝtejoj kuŝantaj antaŭ liaj piedoj, estas io tre ordinara kaj kutima. Li deturnis la rigardon de la maro kaj laŭiris la digon, kelkcentojn da paŝoj kviete

irante sur ĝia dorso. Ĉe lia dekstra flanko kuŝis liaj kampoj. Ili aspektis kiel gigantaj kvadratoj, kelkaj verdaj, aliaj grizaj, flavaj aŭ brunaj laŭ tio ke sur ili kreskis terpomoj, aveno, oleoplantaĵoj [185] (brassica napus), kaj aliaj kreskaĵoj alterne kulturitaj sur la kampoj, kaj apartigitaj unu de alia pere de longfosoj. Al unu el tiuj kampoj Alings sin turnis, malsuprenirante la digon. Certiĝinte ke la ŝafoj kviete paŝtiĝas, ke nenio eksterordinara okazis, li estis inspektonta siajn kampojn. Sur kelkaj kampoj laboristoj sarkis, sur aliaj ili elfosis terpomojn, sur ankorau alia falĉisto kolektis trifolion, [186] per kiu li ŝarĝis veturilon, do ĉiu laboristo sin dediĉis al tiu parto de la kulturlaboro, kiun li devis plenumi. Alings ĵetis rapidan rigardon tra ĉiujn tiujn kampojn kaj irante laŭlonge de longfoso trairis vastan linkampon, sur kiu je kelka distanco sidis — duone kuŝis deko da virinoj unu flanke de alia por senloligi [187] la teron. Malrapide ili rampis antaŭen eltirante la lolon kaj ĵetante ĝin for. Ili laboris ne rigardante post si, tre malrapide sed seninterrompe rampante.

Alings ekstaris post unu el la salikoj, kreskantaj ĉe la flanko de la longfoso kaj rigardis la virinojn, kies dorsojn li povis vidi kaj kies voĉojn li povis aŭdi. Li aŭskultis, ĉar li aŭdis, ke unu el la laboristinoj eldiris lian nomon, kaj ĉiu en tia cirkonstanco vole nevole estus aŭskultinta, por ekscii kion la parolantino diros pri li.

— La stultulo, ho jes, sendube! — diris tiu sama voĉo.

Alings kuntiris la dikajn brovojn kaj sin klinis iom antaŭen por pli bone aŭdi.

La aliaj virinoj ridis, post momento unu el ili diris:

— Kaj Paŭl?

— Kiu scias — diris ŝia najbarino, eltirante grasan lolon kaj forĵetante ĝin: Kelkaj diras ke jes, aliaj diras ke ne.

— Neniu scias; ĉar la knabo tute ne similas lin.

— Li havas brunajn harojn kaj brunajn okulojn.

— Kaj Alings ruĝajn harojn kaj bluajn okulojn.

— Estas tamen diferenco inter ruĝo kaj bruno! — opiniis alia virino.

— Kaj la stulta servisto de Peĉjo Klakilo?

— Ho! li havas blondajn harojn kaj bluajn okulojn.

— Li havas flavajn harojn!

— Nu, flavajn, sed lia patrino havas blondajn.

— La haroj pruvas nenion — opiniis alia voĉo... Mi havas nigrajn harojn kaj nigrajn okulojn kaj rigardu mian filinon. Ŝi havas blondajn harojn kaj bluajn...

— Same kiel via edzo — ŝin interrompis la antaŭlasta parolantino.

Alings aŭskultis pli atente. — Ili parolas pri Paŭl kaj pri Dirk — li pensis, kaj kolero lin ekposedis. Por aŭskulti plue li kaŭris sur la tero, ĉar en tiu pozo[188] li povus vidi kaj aŭdi pli bone, kaj se okaze unu el la virinoj turnus la kapon, ŝi lin ne vidus.

— Mi diras ke estas honto, ke li tute sin ne okupas pri Paŭl kaj pri lia patrino.

— Kiu diras ke li sin ne okupas pri ili? Ŝi estas nun en la malsanulejo de la urbo kaj Paŭl estas ĉe Blink... Kiu do alie pagus tion?

— Jes, oni diras ke Alings pagas tion.

— Ne kredu tion. Alings ne estas viro kiu pagos tion, tiom pli, ĉar neniu povas pruvi, ke li estas la patro de la knabo.

— Oni ne povas pruvi tion, sed ŝi loĝis ĉe li.

— Nur kelkajn semajnojn.

— Ho, tio sufiĉas... Unu semajno sufiĉas.

— Unu nokto sufiĉas! — moke diris alia virino.

Ĉiuj ridis kaj Alings fariĝis pli kaj pli furioza.

— Ĉu ŝi ne loĝis ĉe iu alia? — demandis voĉo, kiu ĝis nun estis dirinta nenion.

— Mi ne scias.

— Neniu scias ion pluan.

— Fremda Dorotea mem neniam pri tio parolis.

— Kompreneble, ŝi ja ne povis pri tio paroli, ĉar neniu komprenas ŝin.

En la lasta tempo ŝi povus paroli, ĉar iom post iom ŝi komprenas nian dialekton kaj povas jam komprenigi sin.

— Eble ŝi parolos kiam ŝi revenos el la malsanulejo.

— Povas esti, ke ŝi tamen ne faros tion eĉ se ŝi povus.

— Kial do?

— Nu, mono estas potenca, eble la mono ĝis nun silentigis ŝin, eble ŝi ankaŭ estonte silentos.

— Ĉu ŝi ricevas monon?

— Oni diras ke jes, ĉar la malmulto, kiun ŝi perlaboris ne sufiĉis por pagi ĉion, kion ŝi bezonas.

— Ŝi ŝuldas al sia najbaro, ĉar en la lastaj semajnoj ŝi ne pagis la luprezon de sia ĉambro.

— Strange kaj hontinde ke io tia povas okazi.

— Kial ŝi ne estis pli prudenta? Ni ja scias kiaj estas la viroj: ili promesas orajn kornojn [189] kaj donas eĉ ne dornojn.

— Jes, dornojn ili donas; demandu al fremdo Dorotea, ĉu la knabo ne estas dorno, kiu pikas ŝian koron?

— La knabo ne estas kulpa, se li pikas.

— Sed la patro estas kulpa; li povus elŝiri la dornon el ŝia koro...

— Kaj el la koro de Truda, — daŭrigis alia virino.

La interparolado haltis momenteton kaj Alings pensis pri Dorotea kaj Truda. Kaŭrante dum liaj pezaj botoj dronis en la molan teron, li meditis pri tiuj du virinoj kaj duobla sento lin ekposedas; malamo kontraŭ Dorotea kaj honto pro la patrino de Dirk. Pugnigante ambaŭ manojn kaj ĵetante sovaĝajn rigardojn al la rampantaj laboristinoj, li deziris ke ĉiuj diabloj kaptu tiujn tie antaŭ li loloelŝirantajn klaĉistinojn kaj tiujn du aliajn virinojn, pri kiuj la klaĉistinoj nun babilas.

— Kial ili sin miksas en miajn aferojn? — li pensis, sed li sentis ke neeble li povos por ĉiam silentigi tiujn klaĉantajn langojn; li sentis ankaŭ, ke la tuta vilaĝo klaĉadas pri li kaj ke ĉiu sin miksas en liajn aferojn; li estis forironta, sed ĉar la rampantaj virinoj rekomencis paroli, li restis sidanta, kvankam liaj kruroj laciĝis pro la nekutima pozo. Li restis sidanta sur la kalkanoj, kiuj ĉiam pli profunden dronis en la teron kaj aŭskultis plue.

— Ĉu vi aŭdis pri la vila mano, kiu ĵetis Klajon en la longfoson kaj kiu tiel terure gratis la vangon de Bursma? — subite demandis unu.

— Jes, mi aŭdis pri tio!

— He! — diris alia — mi nenion aŭdis.

— Kiu kredus ke vi ne aŭdis pri tio! La tuta vilaĝo parolas pri la vila mano.

— Rakontu do!... Mi fariĝas scivola!

Ankaŭ la bienposedanto fariĝis scivola ĉar pri tiu mano li ankoraŭ neniam aŭdis. La virino detale rakontis pri ĉio, kio okazis al la muelisto, al Klaj kaj pri ĉio, kion ni jam scias pri la vila mano.

Ĉu ĝi efikis la koron de Alings? Eĉ la plej akraj okuloj ne povus tion rimarki laŭ la vizaĝtrajtoj de la terposedanto, ĉar kun escepto de liaj okuloj, nenie estis legeble sur lia vizaĝo pro lia barbo kaj liaj lipharoj, kiuj kune ĝin tute kovris, kiun impreson sur lin faris la rakonto.

Liaj piedoj nun tiel laciĝis pro la nekutima kaŭrado ke li ne povis plu elteni, li sidiĝis, etendis antaŭ si la rigidiĝintajn krurojn kaj aŭskultis plue, sed la klaĉantaj virinoj estis nun tiel malproksimaj, ke li ne povis plu kompreni ilian interparoladon, do li ekstaris kaj returnen iris laŭ la sama vojo al la digo, de tie al sia antaŭkorto kaj plue al sia ĉambro. Tie li sidis ĝis la mastrumistino alportis al li lian kafon, kiun li trinkis. Unu horon poste li refoje eliris kaj ne revenis antaŭ la vespero, sed neniu sciis, kie li dum tiu tempo estis, nek kie li tagmanĝis. Vespere li iris en sian dormoĉambron kaj enlitiĝis ne vespermanĝinte. Kiam la mastrumistino alportis tien la manĝaĵon, li jam kuŝis en la lito, kie li ne estis plu videbla, ĉar li estis kuntirinta ambaŭ litkurtenojn.

— — — — — — — — — — — — —

La sekvantan matenon Alings diligente plugis. Li direktis la pezan plugilon kvazaŭ ĝi estus ludilo, kaj klaketante li de tempo al tempo klaksvingis la longan vipon super la kapoj de la du tirantaj ĉevaloj por rapidigi ilin. En realo Alings ne bezonis uzi tiun vipon kaj li uzis ĝin nur tre malofte por bati, ĉar la ĉevaloj konis sian mastron kaj lia voĉo sufiĉis por ilin kurigi. La plugilo faris sulkon [190] post sulko, unu precize paralela al la alia, ĉar Alings estis lerta plugisto, neniu povus superi lin en tiu laboro, kaj li plugis volonte. Ĉe ĉiu sulko, kiun fosis lia plugilo, aro da blankaj marbirdoj malsupren flugis post li por forkapti la vermojn, kiujn la blanka plugfero ĵetis

supren sur la teron. Sed Alings ne atentis la birdojn, kiuj laŭte kriante sekvis lin kaj lian plugilon. La ĉevalojn ne timigis la birdoj kaj la birdojn ne timigis la ĉevaloj, ĉar neniam ili piedpremis ilin. Sentime la birdoj ŝvebis super la plugilo, super la ĉevaloj, eĉ super la plugisto.

Senlace kaj senhalte Alings faris siajn sulkojn dum li pensis pri la klaĉantoj virinoj, kiujn li estis aŭdinta la antaŭan tagon. Li estis en kolera humoro pro tiuj klaĉantaj langoj, pro la klaĉemaj vilaĝanoj kaj pro ĉio, kio ekzistas, eĉ pro si mem. Li vivis kiel duonsovaĝulo kaj li mem ne povis ŝanĝi tiun kutimon, kiu enradikiĝis en lia animo, kaj kiun li ne kapablis forpeli el ĝi. Tiuku timo estis tiel subfosinta [191] lian animon, estis tiel forte kaptinta lin, ke nur miraklo povus fari ŝanĝon en lia vivo kaj li antaŭvidis, ke tiu miraklo neniam fariĝos. Li kunpremis la lipojn kaj mokridis pensante pri Klaj, pri Bursma, kiuj laŭ la diro de la klaĉemaj kamparaninoj, fariĝis subite aliaj homoj, ĉar Klaj neniam plu ebriiĝis, li ne plu kondukis tirane kontraŭ sia edzino, kaj oni disrakontis ke la muelisto ne plu ŝtelas farunon el la sakoj al li konfiditaj.

Alings ridis pri ĉio tio kaj nomis tiujn virojn malsaĝuloj kaj superstiĉuloj, li nomis ilin homoj sen firma volo kaj sen firma karaktero. Alings ne nur mokridis pri tiu absurda vila mano, li eĉ ĝin provokis, [192] dezirante ke ĝi venu, ke ĝi ŝoviĝu trans lian ŝultron. Li pensis ankaŭ pri tiuj du virinoj, pri la fremda Dorotea kaj pri Truda. Li pensis:

— Ĉiu havas bastardon, sed ĉu knabinoj ne estas mem kulpaj? Kial ili serĉis interrilaton kun viroj ne apartenantaj al ilia rango. Kial la ekzemploj de tiom da aliaj knabinoj ne detenis ilin de samspeca interrilato kun ili? Ĉiu ja scias, ke riĉa farmisto aŭ terposedanto ne povas edziĝi kun ordinara servistino. Ili sekve zorgu por si mem, ili nun fosu sian sulkon kiel li mem fosas la sian.

— Huj! antaŭen, ĉevaloj!! — Li klaketis per la vipo super iliaj kapoj, sed ne tuŝis ilin; la bestoj ja laboris aŭdante nur lian voĉon, kaj li ne bezonis ilin bati kaj li ne batas, li nur svingis la vipon, aŭdigante ĝian klaketadon super iliaj kapoj, refoje sovaĝe kriante:

— Huj! hej! antaŭen! —

Kaj la ĉevaloj ankoraŭ pli forte ektiris antaŭen la pezan plugilon, kies akra brilanta soko faris sulkojn unu post alia kvazaŭ desegnitajn tie per liniilo.[193]

— Huj! hej! antaŭen!! —

Kaj antaŭen ili iris, tirante la plugilon tenatan de la sovaĝa luphomo, kiu direktis ĝin per fera, lerta mano. La ĉevaloj iris tiel rapide, ke apenaŭ li povis sekvi ilin per sia kutimaj paŝoj; li sekve devis rapidi kiel li rapidigis la ĉevalojn, puŝante antaŭ si la plugilon kaj klaketante per la vipo.

— Huj! hej! antaŭen!! —

La birdoj iom ektimis kaj kriis pli laŭte ol kutime, sed ili estis malsataj; ili bezonis vermetojn kaj serĉis ilin en la suprenĵetitaj longaj termontetoj, kiujn ĉiam denove kaj ĉiam pli rapide faris la brilanta plugfero.

— Huj! hej! antaŭen!! —

Tiel kriante kaj svingante la vipon, Alings daŭre laboris kvazaŭ li per tiu laboro volus silentigi la klaĉantajn langojn de la vilaĝanoj, kiujn li ĉiujn malamis kaj malestimis. Iliaj langoj tamen ne eksilentis kaj ŝajnis al li, ke stranga murmurado de voĉoj subite aŭdiĝas post lia dorso. Li rigardis posten sed vidis nur la birdojn kaj kelkajn nigrajn nubetojn en la aero alproksimiĝantajn unu post alia ĝis fine ili kuniĝis kaj fariĝis unu longa rubandforma nigra nubo, tiel longa ke li ne vidis ĝian finon. La stranga nubo ŝvebis malantaŭ li kaj ŝajnis al li, ke el ĝi venas tiuj murmuradoj. Sed Alings ne timis, li estis kuraĝa forta viro, kiun ĝis nun neniu kontraŭstaris, kaj tiu nubo, kiel ajn stranga ĝi aspektis, ne timigos lin. Li refoje rigardis posten kaj refoje svingis la vipon kriante:

— Huj! hej! antaŭen!! —

Ankoraŭ neniam li estis pluginta kiel en ĉi tiu mateno, neniam antaŭe li faris tiom da sulkoj en unu horo kaj ankoraŭ neniam li sentis sin tiel forta viro kiel en tiu momento.

— Huj! hej! antaŭen!! — Mi estas Alings, la riĉa bienposedanto kaj terkulturisto. Mi ridas pri ĉiuj klaĉadoj, mi faras nur kion mi volas, mi estas la mastro kaj ĉiuj klinu antaŭ mi sian nukon! —

Sed la nigra nubo fariĝis pli kaj pli nigra, de tempo al tempo ĝi estis tuŝonta la kapon de la pluganto, sed li ne volis ĝin atenti, li estis la nekontraŭstarebla Alings, li timis nenion, kial do tiu nubo kia ajn eksterordinara, devus lin ĝeni! Li ridis laŭ sia kutima sovaĝa maniero, svingis la vipon klakante per ĝi super la kapo kvazaŭ por fortimigi la longan nubon, kiu pli kaj pli ŝajnis lin alceli.

— Huj! hej!... for de tie!! —

Sed la nubo ne forŝvebis kaj stranga sento enŝteliĝis en la koron de la pluganto. Refoje li kriis:

— Huj! hej!... for de tie!! — Sed lia voĉo perdis sian fortecon kaj fariĝis pli mallaŭta, tiel mallaŭta, ke tio lin men mirigis. La vipo denove serpentumis tra la aero, tra la nubo, sed ĝi ne povis dispecetigi nek forpeli ĝin. La nubo ĉiam pli densiĝis, pli kaj pli nigriĝis, pli kaj pli konturiĝis kiel longa rubandsimila strio super lia kapo, fine ĝi prenis sur sin la formon de terura brako finiĝanta per mano kun kvin kroĉformaj fingroj ĉe kies ekstremaĵo elstaris akraj longaj terurigaj ungoj.

Alings ne plu atentis la ĉevalojn nek la plugilon, kiun li tamen tenis ankoraŭ per unu mano por resti sur la piedoj. Per la alia li lastfoje svingis la vipon, sed li ne plu kriis kiel antaŭe:

— Huj! hej!... Li sentis ke la mano, la terura vila mano, pri kiu li estis ridinta, nun kiel minacanta monstro estis atakonta lin kaj lastfoje li penis fortimigi ĝin, sed anstataŭ foriĝi, ĝi rapidis al li kaj dum li faligis la vipon, li sentis, ke la terura mano jam ŝoviĝas trans lian ŝultron. Lia koro kunpremiĝis pro teruro, ŝvito staris sur lia frunto kaj gutetis[194] de tie en liajn longajn ruĝajn harojn de sovaĝulo. Li penis ambaŭmane kapti la plugilon, sed la ĉevaloj tiel rapide kuris antaŭen ke la plugilo elglitis el liaj manoj, li falis surgenue sur la teron, meze de la sulkoplena kampo kaj sentis ke la mano pli kaj pli ŝoviĝas pluen. Subite la teruraj fingroj disstariĝis kaj kurbiĝante kiel ungoj de avida rabobirdo, ĉirkaŭprenis lian tutan kolon.

Alings volis krii, krii pri helpo, sed li ne povis dispartigi la lipojn. Kaj sidante surgenue, li sentis ke la vila mano lin ĉirkaŭas, ke la fingroj pli kaj pli premas lian kolon dum la

pintaj ungoj penetras la viandon. Alings pensis pri Truda kaj pri ŝia knabo, pri la stultulo, la bastardo, kiu pasigas laborante sian junecon sub fremda tegmento, kaj li sentis tian honton, kian li neniam antaŭe sentis. Li ne plu ridis pri Klaj, nek pri la muelisto. Volonte li promesus fariĝi alia viro, sed li sentis, ke estas tro malfrue, ĉar la mano ĉiam pli kaj pli premfermis lian gorĝon. Ho! li pensis: se ne estus tro malfrue! — Sed la ungego tute detranĉis lian spiron kaj sentante, ke la morto jam estas kaptonta lin, li falis surdorsen dum liaj fortaj manoj penis forŝiri de lia kolo tiun teruran vilan manon...

Alings kuŝis senkonscia, li estas sveninta, sed lia sveno daŭris nur mallongan tempon. Malrapide li rekonsciiĝis, kaj dum liaj fortoj iom post iom revenis, li sentis en si la kapablon malfermi la okulojn. Li rigardis supren... la vila mano estis malaperinta kaj li vidis, ke virino kliniĝas super li. Ŝi forigis liajn manojn de sur lia kolo kaj etendis ilin laŭlonge de lia korpo. Kelkaj sekundoj pasis kaj Alings pli bone povis distingi ĉion ĉirkaŭe. Liaj fingroj ekpalpis la teron kaj ŝajnis al li, ke tiu tere ŝanĝiĝis en ion tre molan. Li sidiĝis kaj terurite ĉirkaŭrigardis.

— Kio estas tio? — li flustris. — Kie mi estas?

La virino, lia mastrumistino staris ĉe lia flanko.

— Kio estas al vi? — ŝi demandis.

— Kie mi estas? — refoje demandis Alings.

— En via lito.

— En mia lito?... Kiu transportis min ĉi tien?

— Neniu.

— Neniu!? — Pli atente li rigardis antaŭ si, pripalpis sian frunton, kiu baniĝis en ŝvito, kaj diris plue:

— Kio do okazis?

— Eble terursonĝo...[195] premsonĝo.

— Premsonĝo!? Jes, premsonĝo, terura premsonĝo...

Alings atendis momenton, poste li kovris la okulojn per ambaŭ manoj.

La mastrumistino rigardis lin; kun miro, ŝi vidis ke larmoj kuras el tra la fingroj de la bienposedanto kaj ne sciis, kion pensi. Neniam li ploris; kial li nun ploras?

— Lasu min sola por unu horo; li fine diris — poste revenu. Mi nun volas ellitiĝi kaj poste paroli kun vi pri pri... tiu premsonĝo...

Ŝi foriris kaj li ellitiĝis, sin lavis kaj sin vestis.

Post unu horo ŝi revenis en la ĉambron.

— Sidiĝu, li diris, montrante seĝon. Ŝi obeis.

— Diru al mi, — li ekparolis, — kiel vi venis tien ĉi en la ĉambron kiam tiu premsonĝo min atakis.

— Vi vokis.

— Ĉu mi vokis?... Kion mi vokis?

— Tion mi ne povis klare aŭdi, sed vi kriis kelke da fojoj tiel laŭte, ke mi ektimis, pensante ke io terura okazis, mi rapidis ĉi tien kaj trovis vin... en tia stato.

Alings pripensis momenton, poste li demandis:

— Kaj kion vi pensas nun pri tio?

— Kion mi pensas?... Ke premsonĝo vin atakis kaj ke feliĉe vi ne malsaniĝis denove.

— Ne, mi ne malsaniĝis denove, sed...

Li eksilentis, kaj post kelka tempo parolis plue:

— Diru al mi sincere, kion pri mi parolas la homoj.

— Ĉu vi ŝatas iliajn opiniojn? — ŝi demandis kaj apenaŭ ŝi kuraĝis rigardi lin.

— Antaŭe mi jam ŝatis iliajn opiniojn sed mi ne volis tion al mi konfesi — li diris, kaj lia voĉo sonis iom dolĉe, tiel ke la mastrumistino mire lin rigardis kun pli multa kuraĝo. Li parolis plue:

— Mi ja konas ilian opinion pri mi. Sed ili eraras rilate al multaj aferoj, precipe rilate al iu interrilato kiu, laŭ la diskuranta famo, ekzistas inter mi kaj la fremda Dorotea. Ŝi loĝis en mia domo, sed rajte kaj prave mi povas certigi, ke Paŭl min tute ne koncernas.

— Ĉu li ne estas via filo?

— Li ne estas! —

Alings fikse rigardis la virinon kaj ŝi sentis, ke li parolas la veron. Li parolis plue:

— Krom tio: ŝi mem neniam tion certigis.

— Ŝi ja ne parolas nian dialekton.

— Vi pravas, sed ŝi povus sufiĉe bone komprenigi al ĉiu, ke mi ne estas la patro de ŝia filo.

— Antaŭe ĉiuj homoj kaj ankaŭ mi mem kredis, ke vi estas la patro de Paŭl; sed nun mi jam ne kredas tion.

Ŝi eksilentis, ekpensis pri Truda, sed ne kuraĝante paroli pri ŝi, eĉ ne aludi ŝin, sed Alings legis sur ŝia vizaĝo, kion ŝi pensas kaj li diris:

— Diru senkaŝe, ĉu vi kredas min malbona, malvirta homo?

Ŝi rigardis lin sed jam ne timis doni la respondon, ĉar liaj okuloj kviete sin direktis al la ŝiaj; ili ne esprimis koleron, nek minacon sed ion sinceran, kion ŝi ankoraŭ neniam estis vidinta en ili.

En Groningaj vilaĝoj eĉ riĉaj personoj ne havas sinjoran titolon, sed ĉiujn oni alparolas per ilia nomo; nur la vilaĝestro, la pastro, la resanigisto kaj la notario estas nomataj „sinjoro". Tial la mastrumistino diris:

— Alings! vi povus esti la plej feliĉa viro de la tuta ĉirkaŭaĵo...

— Sed mi estas la plej malfeliĉa, — li diris.

— Mi scias tion, sed tio povas aliiĝi.

— Jes, mi faros mian eblon por aliigi tion, sed mi timas, ke estos tro malfrue.

— Ho ne!

— Vi konas Truda'n, — li parolis plue.

— Jes, kompreneble, mi ŝin konas, ĉiu ja ŝin konas, ŝi...

— Nu, kion Truda devas pensi pri mi?

— Ho, Alings!... Se vi scius, kiom ŝi suferis pro vi.

— Diru, ke ŝi koleras kontraŭ mi...

— Ho ne! tute ne!... Virino, kiu vere kaj sincere amas viron, neniam koleras kontraŭ li, eĉ se li ŝin de si forpuŝis.

— Sed Truda... Li haltis, lia voĉo tremetis, ĉar li hontis eldirante ŝian nomon.

— Truda ĉiam vin amis.

— Se mi scius, ke tio estas vera.

— Mi bone ŝin konas, mi konas ŝian karakteron; ofte mi parolis kun ŝi, kaj al mi ŝi kuraĝis konfesi sian amon, sciante ke mi propraimpulse ne parolos pri tio. Truda povus esti la suno en ĉi tiu domo, feliciĝanta suno, kaj tian sunon vi bezonas.

— Ĉu vi volas diri per tio, ke...

— Alings, agu laŭ via propra volo kaj laŭ la instigo de viaj koro kaj konscienco; sed mi timas, ke vi tro multe agos laŭ la opinioj de la homoj. Vi timas ke oni ridos pri vi, aŭ primokos vin malantaŭ via dorso, se vi enkondukus en ĉi tiun malgajan domon tian feliĉigantan sunon, ĉar Truda estas simpla vilaĝanino, kaj filino de laboristo. Bone mi scias, la terposedantoj opinias, ke ŝi malhonorigos vian domon, kaj tial vi neniam kuraĝis pensi pri tio, ke geedziĝo de vi kaj ŝi povos esti io feliĉa kaj honorinda por vi. — Li ne respondis sed sentis, ke ŝi pravas. Ŝi parolis plue:

— Krom tio, Alings, ĉu vi neniam pensas pri ŝia filo?

— Jes, ofte mi pensas pri li.

— Jes, ofte vi pensas pri li, tion mi kredas... li do estas ankaŭ via?

— Ŝi atendis eksplodon de subita kolero, sed Alings restis kvieta kaj diris:

— Jes, Dirk estas mia filo.

— Ĉu vi do neniam sentis kian maljustecon vi faras al li?

— Ho jes, sed ĉiam mi forpuŝis de mi tiun penson.

— Pro la opinioj de la homoj.

— Eble.

Ambaŭ silentis momenton. La mastrumistino fikse rigardis la terposedanton, kiu ne deturnis la okulojn de la planko. Ŝi post kelka hezitado demandis:

— Ĉu vi neniam pensis pri tio, kion vi faros kun via posedaĵo, se neatendite la morto vin surprizus?

— Ĉu vi aludas ian testamenton?

— Jes, tion mi aludas.

— Mi ofte pensis pri tio kaj...

— Ankaŭ pri tio ke kelkaj personoj morale havas grandan rajton fariĝi viaj heredantoj...

— Tion mi ofte faris kaj eĉ mi pensis pri vi mem...

— Pri mi!?... Mi estas jam multaĝa kaj vi estas ankoraŭ juna viro, forta kaj sana. Pri mi ne pensu, min mem mi ja tute ne celis... Pensu pri Truda kaj pri Dirk... Eble vi jam tion faris, kaj tion mi esperas.

Refoje ambaŭ silentis. Fine ŝi volis foriri, sed li ŝin retenis per gesto de sia mano.

— Aŭskultu! — li diris.

Ŝi aŭskultis kun forte batanta koro.

— Iru ankoraŭ hodiaŭ matene al la vilaĝo kaj petu Blink, ke li venu ĉi tien.

Ŝi mire rigardis lin. Ŝi estis atendinta ion tute alian. Li diris plue:

— Kaj diru, ke li kunprenu sian tondilon.

— Ho! — Ŝi komprenis.

— Poste iru al Spiro, la tajloro, li ankaŭ venu. —

— Kion li devos kunpreni ĉi tien?

— Sian ruband-mezurilon [197] kaj specimenojn de bona drapo.

— Ho! — Refoje ŝi lin komprenis.

— Mi atendos ilin ĉi tiun vesperon.

— Ĉu estas ankoraŭ iu alia en la vilaĝo al kiu mi devos iri?

— Tiun alian mi invitos proprapersone, sed antaŭ ol fari tion mi volas iomete plibonigi mian eksteraĵon.

— Ho! — Ŝi komprenis lin kaj laŭte ekplorante ŝi falis surgenue antaŭ Alings, kaptis lian manon sur kiun falis kelkaj ĝojlarmoj, kaj diris:

— El duonsovaĝulo povas fariĝi viro, kiun ĉiuj estimos, spite la malsaĝaj opinioj de kelkaj, kredantaj ke via feliĉiganta suno ne povas brili por vi el logeĵo de malriĉulo.

ĈAPITRO XII.

Refoje ĉe la razisto. — Neatendita regalo. — Dirk kaj Alings. — Peĉjo en sia elemento. — Dirk ne dormas plu apud porkoj.

Pasis kelkaj tagoj post la okazintaĵo, kiun ni rakontis en la antaŭa ĉapitro, kaj en la vilaĝo diskuris neordinaraj famoj. Jam la estintan sabaton tiuj famoj ekĝermis ĉe la razisto, nun ili ricevis novan nutraĵon, ĉar kiam la kutimaj klientoj sidis kune, kviete parolante pri ovoj kaj bovoj, pri ŝtaloj kaj ĉevaloj, la razisto, mistere ridetante aperigis el la ŝranko, en kiu li

gardadis la sapumaĵojn de specialaj, riĉaj klientoj, paketon zorge envolvitan en luksa papero, kaj ĉirkaŭligitan per ruĝa rubando, metis ĝin sur unu el la tabletoj, dise starantaj en lia razejo, kaj diris okulumante al la dika buĉisto:

— Jen io, kio vere vin mirigos!

— He! — diris la buĉisto, kiu jam etendis la manon por esplori la paketon.

— Jes, sed ne tuŝu! — diris la razisto, forigante la kaptontan manon de la scivola buĉisto.

— Ĉu danĝere?... Ĉu dinamito!?

— Dinamito ne troviĝas en ĝi, sed io tute alia.

— Tamen eksplodebla? — demandis Erasmus.

— Eksplodebla ĝi ne estas, sed ĝi povas plenigi ĉi tiun razejon je fumo kaj cindro.

— Hu! mi timas! kriis alia.

— Ne timu! diris la razisto.

— Montru do! — ekkriis alia.

— Atendu ankoraŭ unu minuton, kviete diris Blink, kiu estis rigardinta la horloĝon.

— Unu minuton!?

— Jes, post unu minuto venos Vulkanus, ĉar li kutimas veni precize je la oka horo.

Oni atendis kaj vere, je la oka horo venis la forĝisto.

— Nun montru la surprizon! — ekkriis Erasmus, kiu en multaj cirkonstancoj estus diveninta la intencon de la barbiro, sed ĉi tiun fojon li vane cerbumis.

Blink gravmiene kaptis la kesteton kaj estis parolonta.

— Atentu kaj silentu, vi ĉiuj! — kriis Erasmus — la razisto faros paroladon, jen io eksterordinara!

— Mia parolado estos tre mallonga, sed des pli efika — diris Blink, kaj rigardante la buĉiston, kiu estis la plej scivola el ĉiuj li parolis plue:

— Blomsma — Erasmus, kaj ĉiuj aliaj ĉeestantoj en ĉi tiu mia malgranda, modesta razejo...

— Kiel solene vi komencas — interrompis lin la buĉisto, ion tian ni ne kutimas de vi aŭdi.

— Ne interrompu! — ordone diris Erasmus.

— ... de ĉi tiu mia malgranda, modesta razejo, — plue parolis Blink — grave rigardante ĉirkaŭ si — vi ĉiuj sen dubo memoras pri tio, kion ni interkonsentis antaŭ unu semajno, kiam mia razejo havis la honoron enteni vin ĉiujn inter siaj kvar muroj...

— Ĉu v i redaktis por li tiun paroladon, Erasmus? — interrompis Vulkanus.

— Ne interrompu! — ordonis Erasmus.

La barbiro parolis plue: ... kvar muroj; pri tiu interkonsento mi nun volas paroli... Ĉu vi scias ankoraŭ kio estas tio? — Subite li elpoŝigis papereton, kiun li malfaldis.

— He!... la nomoj!!

— Ĝuste! ĝi surhavas la nomojn de tiuj, kiuj la pasintan sabaton faris al mi la honoron submeti sin al miaj razantaj manoj...

— Jen! — diris alia, — la diablo min prenu, se Erasmus ne estas verkinta por li tiun belan paroladon.

— Ne interrompu! — refoje ordonis Erasmus.

Blink kviete parolis plue: — Unu el tiuj klientoj solene promesis al la aliaj, ke li regalus ilin per kesteto de bonaj havanaj cigaroj, se Alings fariĝus mia kliento, kaj jen mi havas la plezuron kaj la honoron sciigi al vi, ke io nekredebla evidentiĝis, ĉar jam de kvin tagoj mi povas konsideri la nomitan Alings, unu el miaj plej bonaj klientoj, kiujn mi iam havis. Antaŭ kvin tagoj li vokis min al si pere de sia mastrumistino; mi plenumis lian vokon, vizitis lin kaj kun helpo de miaj kombilo kaj tondilo, submetis lin al metamorfozo,[198] kiu el duonsovaĝulo faris la plej belaspektan viron el nia vilaĝo. Do konsiderante la promeson de nia honorata kaj honorinda buĉisto Blomsma, mi aĉetis je lia kosto ĉi tiun kesteton da cigaroj, por dividi ĝin inter ĉiuj klientoj, kies nomoj staras sur la papereto, kiun tenas en sia mano nia honorata skribisto kaj poeto Erasmus!

— Hura! — hura! — brave!! — kriis ĉiuj esceptinte la silentantan buĉiston.

Kiam la bruego kvietiĝis, la buĉisto diris:

— Tio ja estis nur ŝerco!...

Ĉiuj ekprotestis kaj fine li devis cedi. Blink malfermis la

kesteton kaj komencis disdoni la cigarojn, sed ne antaŭ ol li mem estis preninta la unuan.

— Rakontu detale! — diris Vulkanus — kiel ĉio fariĝis; kaj dum ĉiuj klientoj fumis kiel kamentuboj, li plenumis ilian deziron.

En angulo de la ĉambro sidis la tajloro Spiro. Li atente aŭskultis kaj kiam la barbiro finrakontis pri sia vizito ĉe Alings, Spiro diris:

— Feliĉe estas por mi, ke mi ne faris samspecan promeson kian faris Blomsma. Ĝis antaŭ hieraŭ mi neniam faris kostumon por Alings, sed hieraŭ mi portis al li la plej belan kaj la plej multekostan, kiun mi iam pretigis.

Ankaŭ la tajloro devis detale rakonti pri sia vizito al Alings, kaj vigla interparolado naskiĝis el tiuj du neordinaraj vizitoj al Alings, kiu ŝajne havis neatenditajn intencojn, kaj ĉiuj decidis are iri al la „Verda Ĉevalo" post kiam ili estis razitaj.

— — — — — — — — — — — — —

Dirk estis en la traveturejo de Peĉjo, kie staris tri veturiloj kun tri ĉevaloj. Dirk tenis la kundukilojn de unu el la bestoj kaj pacience atendis la revenon de la farmistoj, sidantaj en la drinkeja ĉambro, vigle, laŭte babilante kiel laŭkutime pri ĉiaj temoj, sed precipe pri siaj aveno, tritiko, hordeo,[199] pri ĉevaloj, aĉetitaj kaj aĉetotaj, pri bovinoj kaj iomete ankaŭ pri politiko.

De tempo al tempo ilian interparoladon interrompis laŭtega ridado, laŭtaj krivokoj, penetrantaj en la traveturejon, sed ili faris nenian efikon je la servisto, ĉar li ne aŭskultis; li eĉ ne aŭdis, ke Peĉjo kelkfoje brufrapis la manplatojn, dum li deklamis pecon de sia poemo. Dirk kiel kutime, refoje dronis en meditadon, starante kun kurbigita dorso kaj pintigitaj lipoj kvazaŭ por fajfi, tamen li neniam fajfis, tiun arton li ne praktikis.[200] Li praktikis nenian arton krom tiu de aerkastel-konstruado; li eĉ ne sciis legi, nek skribi. Li povis nur labori kaj ankaŭ ĉi tiun tagon li estis laborinta. Jam frue en la mateno li kaj Alino estis melkintaj la bovinojn, ili estis kune irintaj paŝtejon. Sed ŝi ne parolis kun li, nek atentis lin dum tiu promenado tien kaj

returnen. Reveninte, li unue estis nutrinta siajn kuniklojn, poste la porkojn kaj la ĉevalojn. Je la deka horo li devis iri kampon por elterigi saketon da terpomoj, kaj li estis farinta tion puŝante siajn manojn profunden en la teron sed samtempe li mem estis dronigante siajn pensojn en profundan abismon ĝis la saketo estis plenplena. Poste li subite ekpensis, ke li devas iri returnen al la „Verda Ĉevalo" por plenumi alian laboron, kaj kiel ĉiam, li reiris al la „Verda Ĉevalo", droninta en pensojn kaj reveninte en la ĉevalejon li purigis per akvo la terpomojn, pensante:

— Se mi estus riĉa, se mi estus Alings, mi volus havi..., kaj tiel plu, ĝis nova tasko lin atendis.

Poste li estis puriginta la ĉevalejon, senpolviginta la traveturejon kaj jen li denove staras en tiu loko konstruante al si novajn aerkastelojn en kiuj li, kiel Alings, la riĉa terposedanto, ludis la plej gravan rolon. Li pensis: Se mi estus Alings, aŭ la filo de Alings, mi volus havi belan veturilejon kaj belajn veturilojn. Ĉiutage mi veturus urbon, tra la urbo, returnen al la vilaĝo kaj mi mem kondukus la ĉevalojn. Veturante preter homojn de mia vilaĝo, mi haltus kaj invitus ilin veturi kun mi vilaĝon. Ili akceptus kaj kune ni babilus pri ĉio, pri la granda farmodomo, pri miaj ĉevaloj... kunikloj... pri...

Li dronis pli profunden en sian meditadon ĝis laŭta klaketado de du proksimiĝantaj duonpantofloj lin vekis. La bela aerkastelo malaperis, sed aperis antaŭ la stultulo Peĉjo Klakilo kun ridetanta vizaĝo kaj deklamante:

En ĉerk' ripozis Ŝercemul'
Li kuŝis sterniĝinta
Kaj ĉiuj plendis: Ŝercemul'
Nun estas jam mortinta!
Ho ve! ho ve! ho ve!!

Peĉjo laŭte kunfrapis la manplatojn, poste li frapetis la ŝultron de Dirk kaj diris:

— Iru en la drinkejan ĉambron, via p a t r o vin atendas.

— Mia p a t r o?... Dirk ripetis tiujn vortojn kvazaŭ ilin ne komprenante.

— Jes, rapidu, li havas malmultan tempon.

Ankoraŭ neniam iu estis parolinta al li pri lia p a t r o. Li sciis, ke aliaj knaboj kaj fraŭloj havas patron, ke li mem estas la sola, kiu neniam havis patron, sed ĉar li opiniis tion tre natura, li neniam cerbumis pri tio; li ja posedis siajn kuniklojn, kial do li cerbumadus pri patro?

Dirk ne iris drinkejan ĉambron, sed firme tenadis la kondukilojn de la ĉevalo, kies posedanton li baldaŭ povos atendi, kaj kiu eble donos al li arĝenton moneron.

— Nu, Dirk, iru do!...

— Kien?

— Al via p a t r o.

Peĉjo ŝajnis ĝojigita ke li esprimis tian feliĉan sciigon al la stultulo, ĉar lia vizaĝo montris grandan internan feliĉon, dum la arĝenta aŭreolo ĉirkaŭanta lian kapon, brilis en la lumo de la lampo, kiu ĵetis dise siajn flavajn striojn en la traveturejo, metante post la ĉevalojn kaj veturilojn, sur la plankon larĝajn nigrajn ombrojn, pluen rampantajn supren sur la kalkŝmirita muro.

— Rapidu, Dirk!

Sed Dirk ne respondis; li ja ne komprenis sian mastron, kiu fine kaptis lian brakon kaj tiris lin for de la ĉevalo por konduki lin en la drinkejan ĉambron:

Dirk ne kontraŭstaris kaj ĵetante rigardon al la ĉevalo, restanta sen gardanto, li klaketante per la lignaj ŝuoj kaj ne sciante kion pensi, obeeme iris kun Peĉjo en la drinkejan ĉambron. Tie apud la stratpordo staris altkreska sinjoro, kiun li ankoraŭ neniam antaŭe vidis. Li estis bele vestita per porsinjoraj vestoj, tute nigraj kaj surhavis samkoloran rondan ĉapelon. Li havis belan ĵus tonditan barbon ruĝkoloran, kiu ĉirkaŭis lian mentonon, kaj super kiu dekstren kaj maldekstren elstaris supren torditaj lipharoj, tiel ke la bele formita buŝo restis videbla.

— Jen via patro! — diris Peĉjo.

La fremda sinjoro kaptis la manon de la knabego kaj estis ironta kun li eksteren, ĉar sur la strato staris veturilo kun du ĉevaloj.

— Ĉu vi tute ne rekonas min plu? — demandis la sinjoro.

— Dirk rigardis lin kaj diris:

— Neniam mi vin vidis...; mi reiru la traveturejon por gardi la ĉevalojn.

— Vi ne bezonas plu gardi ĉevalojn, diris Alings, — Blunt dungos alian serviston. Mi estas Alings, via patro, vi iros kun mi hejmen, la veturilo atendas nin sur la strato.

— Alian serviston?... Sed miaj moneroj...

— Mi donos al vi monerojn. Ĉu vi ne rekonas min? Mi ja estas Alings.

— Alings estas... tute alia viro.

— Jes, mi estas Alings. — Kaj li estis tironta kun si la stultulon, sian filon.

— Atendu... mi ja ne povas iri sen mia mono!

— Mi donos al vi tiom da mono, kiom vi bezonos.

— Mia kesteto!

Petro Blunt komprenis kion celas lia ĝisnuna servisto, kaj klarigis:

— Dirk gardas sian perlaboritan monon en kesteto, kaj tiun kesteton li celas.

— Nu, iru por preni ĝin, sed revenu tuj, intertempe mi atendos vin sur la strato, ĉar mi ne povas tie lasi solaj la ĉevalojn.

Alings eliris el la drinkejo, Dirk sin turnis malrapide al la traveturejo kaj la klakado de liaj lignaj ŝuoj perdiĝis en la ĉevalejo. Post unu minuto la klakado reaŭdiĝis kaj Dirk kun la kasteto sub la brako kaj kliniĝinta antaŭen kvazaŭ tiu kesteto pezus dek kilogramojn, trairis la drinkejan ĉambron, sed sur la sojlo de la domo li denove haltis, dirante:

— Miaj kunikloj!!...

— Mi prizorgos ilin — diris Peĉjo; — revenu post kelke da tagoj por transporti ilin al la „Granda Garbo", al la bienodomo de via patro...

— De mia patro?...

— Jes, Alings ja diris al vi, ke vi estas lia filo.

— Alings aspektas tute alie!

— Jes, antaŭe li aspektis alie, sed nun lin tuŝis — eble la vila mano, pensis Peĉjo, sed li diris: la mano de la barbiro.

Alings puŝis la knabegon en la veturilon kaj sidiĝante ĉe lia flanko, li ektiris la kondukilojn de la ĉevaloj, kaj la veturilo rapide ruliĝis laŭ la strato, laŭ la makadama vojo, ĝis la fera kradpordo de la „Granda Garbo".

Dirk sidis dum tiu tempo kaj lin atakis la plej strangaj pensoj; li nur komprenis ke li sidas en bela veturilo flanke de Alings, ke li kunportas kun si sian monkesteton, kiun li forte premis sub la brako, li komprenis ke morgaŭ aŭ postmorgaŭ li reiros al la „Verda Ĉevalo" pro la kunikloj, sed li ne komprenis kien meti sian kesteton, nek kie pendigi la kuniklojn, fine li pensis:

— Se mi estus ankoraŭ Dirk, la servisto de Peĉjo Klakilo, mi starus en lia traveturejo, gardante la ĉevalojn; hodiaŭ vespere mi glitigus aliajn monerojn en ĉi tiun kesteton, mi dormus en mia litŝranko kaj kaŝus sub la pajlo de mia lito ĉi tiun kesteton, kaj mi aŭdus la gruntadon de la porkoj, kiuj min konas, ĉar mi nutras ilin ĉiutage... Se mi estus Dirk, la servisto, mi... Sed, ĉu mi ne estas plu Dirk? Ĉu Alings estas mia patro? Kiel do oni tiel subite povas akiri patron? Mi aŭdis pli frue, ke knaboj en la vilaĝo perdis sian patron... se iu havis lin, sed neniam mi aŭdis, ke knabo akiras patron... Se mi estus...

Dume Alings, sidanta ĉe lia flanko, rigardis sian filon, ankaŭ lin ekregis strangaj meditadoj. Antaŭ tre longe, jam antaŭ kelke da jaroj li havis la intencon iri al Peĉjo, por forkonduki de li sian filon, sed neniam tiu intenco fariĝis realaĵo, ĉar ĉiam lia fiera koro kontraŭstaris tiun intencon; konstante li pensis pri la opinioj de la homoj, precipe pri tiuj de la terposedantoj, ĉar ili mallaŭdus tian agon; li bone sciis, ke ili konsiderus ĝin kiel ion malsaĝan. Ankaŭ ofte li havis la intencon iri al la patrino de Dirk por konduki ŝin en sian domon, sed ankaŭ tion konstante kontraŭstaris lia fiereco kaj ankaŭ tion li neniam efektivigis pro la opinioj de aliaj homoj. Ĉiam li ŝin amis, sed timante ke ŝi ne amas lin, li prokrastis sian intencon de tago al tago, de semajno al semajno, de unu jaro al alia, kaj dum ĉiuj tiuj jaroj li sentis sin malfeliĉa kaj ĉiam vivis

tute sola en sia riĉa bienodomo kiel monaĥo en sia ĉelo. La vila mano fine instigis lin ridi pri la opinioj de aliaj homoj, kaj ĉi tiun vesperon li kondukis hejmen sian filon, tiun stultulon, el kiu li intencas fari (se eble) alian homon. Morgaŭ li iros al lia patrino. La mastrumistino estis dirinta al li, ke Truda povus esti la suno en lia hejmo kaj tiun sunon li aspiras, ĉar ĝis nun nur mallumo, nur malgajeco kaj malfeliĉo estis ĉirkaŭintaj lin; li esperas ke tiu suno ilin forpelos anstataŭante ilin per la jam tiel longe sopirata feliĉo.

Alings sin direktis al Dirk.

— Ĉu vi ĝojas iri kun mi, Dirk?

— Ĉu vere vi estas Alings?

— Mi estas Alings kaj vi estas mia filo.

— Vi do estas mia patro?

— Jes.

— Kaj mia patrino laboras ĉe Bekman, ĉu ne vere?

— Jes, sed eble morgaŭ ŝi venos al ni.

— Por labori?

— Ne por labori sur la kampoj, sed por konstante loĝi tie ĉi, same kiel vi de nun ĉi tie loĝos. Kaj instruisto de la vilaĝa lernejo ĉiutage venos por vin instrui.

— Kion li instruos al mi?

— Li instruos al vi skribi kaj legi. Ĉu vi tion amas?

— Se mi povus skribi, mi notus kion mi perlaboras en la traveturejo.

— Vi povas noti kion vi ĝis nun perlaboris, sed vi ne plu gardos la ĉevalojn, Peĉjo dungos alian serviston.

— Kion do mi devos fari?

— Lerni kaj... ĉion kion vi deziras.

— Ankaŭ havi kuniklojn?

— Jes...

Ili atingis la feran kradopordon, la mastrumistino post kelke da minutoj ĝin malŝlosis. Ŝi tuj vidis ke Dirk sidas en la veturilo kaj ekĝojis.

— Morgaŭ la suno prilumigos la domon — ŝi pensis. La veturilo enruliĝis la grandan grenejon kaj Alings poste kondukis

la ĉevalojn al la ĉevalejo dum la mastrumistino lumigis per la lanterno. La hundoj ĉirkaŭflaris Dirk'on sed unu vorto de Alings sufiĉis por peli ilin en la hundejojn.

Kvazaŭ en sonĝo Dirk rigardis ĉiuloken. Neniam li estis en la „Granda Garbo". Tiu „Granda Garbo" apartenis al Alings kaj Alings estis lia patro. Li miris pri tiu miraklo kaj kvazaŭ en sonĝo li sekvis sian patron kaj la mastrumistinon en la vastan ĉambron, kie ĉio estis tiel bela, kie staris belaj mebloj kaj kie Spiro, la tajloro de la vilaĝo sidis sur seĝo.

— Kion do Spiro devas fari tie ĉi? — li pensis. Sed la tajloro iris al Dirk kaj diris:

— Staru momenton rekte kaj senmove, Dirk; mi devas almezuri...

Li eltiris el la poŝo longan mezur-rubandon kaj mezuris la knabegon sur la brusto, ĉirkaŭ la talio, ĉirkaŭ la brakoj, laŭ la brakoj kaj kruroj, post ĉiu mezurado li notis ion en notlibreton.

— Spiro faros por vi novan kostumon — diris Alings.

— Ĉi tiu tamen ankoraŭ ne eluziĝis — diris Dirk, kiu staris rekte kiel kandelo — eble je la unua fojo en multaj jaroj.

— Filo de bienposedanto devas havi decajn porsinjorajn vestojn — klarigis la mastrumistino, plej atente ĉirkaŭrigardante la stultulon.

— Morgaŭ vi ricevos ŝuojn kaj ĉapelon — ŝi diris plue.

— Ŝuojn!?

— Jes.

— Kion do mi devos fari kun la lignaj?

— Vi povas surmeti ilin, kiam vi iros en la ĝardenon.

— Por nutri miajn kuniklojn?

— Jes.

Alings silente sidis sur seĝo pensante:

— Kial do mi ne pli frue kondukis lin ĉi tien?

Tiun nokton Dirk dormis en sia nova dormejo. Malgranda dumnokta lampeto staris sur la tablo proksime de la lito kaj malhele lumigis la ĉambreton. Dirk kuŝis kun malfermitaj okuloj ĉien rigardante kaj turmentata de strangaj pensoj. Li kuŝis sur mola lito, sed la alia lito, kiu ne estis tiel mola, plaĉis al li multe pli bone.

Ĉiu homo havas siajn dezirojn kaj aspirojn; la almozulo, la laboristo, la reĝo; neniu estas plene kontenta kaj ĉiu deziras kaj aspiras ion alian ol kion la sorto al li oferis. Dirk nun ne estis almozulo, nek laboristo, nek reĝo, sed filo de riĉa terposedanto, sed la sorto, kiun fortuno destinis al li tiel subite kaj neatendite, ŝajnis al li tre stranga. Li ne povis dormi, ĉar en la ĉambro pendis horloĝo, kiu regule aŭdigis sian laŭtan unutonan tik-tak-adon kaj tiu nekutima bruetado malebligis lin fermi la okulojn kaj ekdormi.

Li ellitiĝis, haltigis la svingiĝantan pendolon kaj denove kuŝiĝis, sed refoje la dormo ne tuŝis liajn okulojn, ĉar antaŭ li pendis sur la muru granda portreto de fremda persono, konstante fikse rigardanta lin per grandaj nigraj okuloj. Dirk ne sentis timon, li ne sciis kio estas timo, sed tiuj okuloj lin ĝenis kaj ne estis al li eble deturni de ili la siajn.

Refoje li ellitiĝis, blovestingis la lampeton kaj refoje kusiĝis. La okuloj estis malaperintaj kaj ne ĝenis lin plu, sed nova ĝeno venis. Regis tia granda senbruo en la ĉambro, ke li estis mirigita. En la „Verda Ĉevalo" kuŝante sur sia lito, li de tempo al tempo aŭdis bruon de preteriranta veturilo, aŭ de la porkoj, kiuj gruntetis, kaj per tio li ofte endormiĝis, sed ĉar porkoj ne kuŝis en ĉi tiu nova ĉambro, la gruntado ne dormigis lin, kaj longe li restis kuŝanta... konstruante al si aerkastelon: — Se mi estus la servisto de Peĉjo Klakilo, mi kuŝus sur mia lito ĉe la porkejo... la gruntadon de la porkoj mi aŭdus kaj mi endormiĝus... Se mi estus la servisto de Peĉjo... mi..., kaj tiel plu, kaj tiel plu, ĝis fine liaj okuloj peziĝis kaj fermiĝis, kaj ĉar neniu zumetanta muŝo venis por ĝeni lin, li ekdormis...

ĈAPITRO XIII.

La festo de la Sankta Martino. — Stranga kanto. — Truda kaj Alings. — Kial Peĉjo Klakilo staras sub flirtanta standardo. — Novaj aerkasteloj de Dirk.

La dek-unuan de Novembro jam de centoj de jaroj, ciujare la infanaro de la vilaĝoj en la provinco Groningen festas la sanktan Martinan vesperon, kvankam neniu el la festantoj komprenas la signifon de la honoro, kiun per tiu festo ili faras al la sankta Martino, pri kiu ili neniam aŭdis, ĉar unue la loĝantoj estas protestantoj, sekve ne kutimas honori katolikajn sanktulojn, due la festo eĉ ne havas religian karakteron, sed povas esti konsiderata kiel sensignifa, simpla infanludado, kiu jam de longe perdis sian veran signifon kaj jam ne plu rilatas Martino'n, la rom-katolikan episkopon [202] el la kvara jarcento kaj protektanton de la hotelistoj.

Jam kelke da tagoj antaŭ la dek-unua de Novembro, ĉiuj knaboj kaj knabinoj de la vilaĝoj iras al farmistoj aŭ al legomĝardenistoj por ĉiun el ili peti pri unu dika, longa beto. [203] Tiu beto ne estas la sama kiel tiu el kiu oni faras sukeron, ĝi estas multe pli dika, pli longa, ruĝa aŭ flava kaj utilas kiel nutraĵo por bovinoj. Ofte ili estas tridek centimetrojn longaj kaj havas diametron de dek ĝis dek-kvin centimetroj. Ili ne taŭgas kiel nutraĵo por homoj, valoras nur malmulton kaj sen peno la geknaboj povas donace ricevi ilin por la estonta sankta Martino festo. Tiuj betoj estas transformatoj en vazojn aŭ lampionojn. [204] La kerno estas fortranĉata tiel ke restas nur la vazoforma ŝelo. En la malsupra parto, aŭ bazo, estas tranĉata truo tra kiu la knaboj ŝovas longan duonmetran brasikotrunkon el kies supraĵo estas forigita la pulpo. [205] La tiel formita lampiono estas tiel fortika, ke eĉ pluvo aŭ vento ne kapablas blovestingi la brulantan kandelon, starantan en la brasikotrunko.

La dek-unuan vesperon de Novembro, tuj kiam mallumiĝas, la kandeloj estas ekbruligataj kaj la geknaboj kun siaj belaj lampionoj rapidas eksterdomen. Multaj aroj da infanoj komencas trairi la stratojn kaj eĉ vizitas kun siaj lampionoj la farmo-

domojn ekster la vilaĝo. La lampionoj, alte portataj super la kapoj de la geknaboj, kvazaŭ ruĝaj kaj flavaj dancantaj fajreroj sin movas tremetante antaŭen. Jen oni vidas dekon, jen dudekon aŭ eĉ pli multon da tiaj fajreroj moviĝantaj tra la ordinare tiel mallumaj stratoj. Kelkfoje unu sola tia hela vazo kiel flirtanta papilio, penanta kuratingi [206] unu el la dise kurantaj aroj, kuras en la mallumo, sed je la oka horo oni vidas nur grupetojn, unu malproksima de alia, moviĝantaj tien kaj reen, irantaj de domo al domo, de pordo al pordo, de unu strato al alia. Kiam aro da tiaj dancantaj lampionoj, kies portantojn oni preskaŭ ne vidas pro la mallumo, reganta sur la stratoj, haltas antaŭ dompordo, unu el la knaboj sencermonie ĵetmalfermas la pordon kaj la tuta aro ekkantas sian unutonan, tirtonan kaj vere strangan kanton:

Sankta episkop' Martino;
Iras ni kun ilumino
Tra la stratoj de l'vilaĝo.
Petas ion kun kuraĝo
Por ĉi tiu kanto:
Bovoj portas kornojn,
Floroj portas dornojn,
Knaboj portas jakon,
Kaj sinjoroj frakon;
Knabinetoj kufojn,
Kaj ĉevaloj hufojn;
Turo sonorilon,
Kaj tajlor' tondilon;
Dume maljunuloj
Sidas en anguloj
Portas antaŭtukojn,
Bakas pezajn kukojn. —
Loĝas en ĉi tiu domo
Riĉa malavara homo.
Li donacu do moneron,
Aŭ fromaĝon aŭ buteron,
Poste iros ni najbaron,
Ne revenos tutan jaron!

Nenie la kantantoj petas kaj kantas vane, ĉar ĉe ĉiu pordo ili ricevas aŭ monereton, aŭ piron aŭ pomon, sed neniam buteron aŭ fromaĝon, ĉar tiujn manĝaĵojn la geknaboj petas nur pro la rimo de la kanto. La bakisto tamen ofte disdonas en tiu vespero panetojn, speciale bakitajn por tiu festo.

Ĉiuj infanoj povantaj porti lampionojn, partoprenas en la festo daŭranta de la sepa ĝis la naŭa horo. Neniu loĝanto rigardos la lampionportantojn kiel almozulojn, ĉar eĉ riĉaj infanoj aliĝas al la grupetoj da kantantoj, kiuj la dek-unuan de Novembro ĝojigas la vilaĝon. Tiu festeto iom interrompas la unutonecon tutan jaron regantan en la vilaĝaj stratoj, ĉar esceptinte la du kermestagojn, tiu unutoneco daŭre kaj senĉesinterrompe estas mastro de ĉiuj stratoj en le vilaĝoj de la provinco.

Truda jam dekfoje festis tian vesperon kaj ŝi povis rememori ilin ĉiujn. La plej bone ŝi memoris la unuan. Ŝia patro kaj patrino tiam vivis ankoraŭ kaj li estis farinta por ŝi belan lampionon el sangruĝa beto, ornamitan per du grandaj literoj T. V. (Truda Vonk) sub kiuj brilis kelkaj ornamaĵoj, kiuj same bone povis prezenti arbojn kiel pluvombrelojn. Bone ŝi memoris kiel ŝi tiun unuan fojon iris flanke de riĉa farmistknabino kaj kiel ili kune konkuris pro tio, kiu el ili ambaŭ ricevos la plej multajn monerojn kaj la plej multajn pomojn. Ŝi memoris, kiel la predikisto estis doninta al ŝi belan arĝentan monereton, kaj Peĉjo Klakilo grandan kupran moneron, kaj kiel li ĉe tiu okazo laŭte kunfrapis la manplatojn, laŭte ridante kaj ĝoje, bonhumore deklamante sian:

Kaj ĉiuj kantis: Ŝercemul'
Vi estas stranga homo!
Brave! brave! brave!! —

Ŝi estis ridinta pro tiu stranga kanto kaj pro la ricevita monero, ne komprenante la deklamaĵon de la drinkejmastro, same kiel ŝi ne komprenis grandan parton de sia propra festokanto, ĉar pri ĝi ŝi neniam povis formi ĝustan ideon. Sed infanoj ne longe pripensas tiajn aferojn. Ŝi estis foririnta kun la aliaj lampionportantoj al aliaj domoj,

al aliaj stratoj eĉ al farmodomoj, kunkantante la unutonan kanton:

Sankta episkop' Martino,
Iras ni kun ilumino
Tra la stratoj de l'vilaĝo,
Petas iom kun kuraĝo
Por ĉi tiu kanto:
Bovoj portas kornojn,
Floroj portas dornojn.

ĝis: Poste iros ni najbaron,
Ne revenos tutan jaron!

Ŝi memoris, kion ŝi estis ricevinta tiun vesperon, ankaŭ ke ŝi ricevis plimulte ol la filino de la riĉa farmisto.

Infanoj baldaŭ kontentiĝas, precipe kiam ili ne kutimas regule ricevi multon. Ankaŭ ŝi estis tiam kontenta eĉ feliĉa. Ŝi memoris la postajn vesperojn de la sankta Martinofesto, sed kun korpremo ŝi pensis pri la lasta en kiu ŝi partoprenis, ne kiel infano petanta moneron, fromaĝon aŭ buteron, sed kiel disdonantino.

Kiam ŝi estis dek-dujara, ŝi forlasis la gepatran domon por servi ĉe farmisto. De unu farmisto ŝi poste iris al alia, ĉar preskaŭ ĉiujare ŝi havis alian mastron kaj mastrinon; fine ŝin dungis Alings. Ŝi estis tiam dek-okjara knabino; la patrino estis jam mortinta kaj la patro loĝis en izolita dometo ĉe la mardigo.

Refoje venis la dek-unua de Novembro kaj ŝi staris ĉe la fera kradopordo sur la antaŭkorto de la „Granda Garbo", disdonante moneretojn al la kantantaj infanoj. Vole nevole ŝi kunkantetis:

Loĝas en ĉi tiu domo
Riĉa malavara homo,
Li donacu do moneron
Aŭ fromaĝon aŭ buteron.
Poste iros ni najbaron,
Ne revenos tutan jaron!

Ŝi disdonis moneretojn, ĝojante kun la geknaboj, kaj post-

rigardante ilin, kiam ili foriris, atendante novajn aretojn ĝis fine proksimiĝis la naŭa horo. Ankoraŭ kelkaj aretoj venis kaj ĵus la lasta foriris, returnante sin al la vilaĝo, ŝi rigardis la dancetantajn malproksimiĝantajn helajn lumpunktojn sur la vojo ĝis ili iom post iom malaperis. Poste ŝi estis ironta en la bienodomon. Sur la sojlo de la bovinejo staris Alings, kiu de malproksime estis estinta la atestanto de la ĝoja sceno ĵus finiĝinta ĉe la kadropordo.

Li admiris la belan knabinon, kiun li jam kelkan tempon antaŭ tiu vespero admiris, ĉar pli bela knabino ne estis en la vilaĝo.

Kune ili iris en la bovinejon, ŝi portanta la lanternon, li sekvanta ŝin de proksime.

Ŝi memoris kiel tiun vesperon li parolis al ŝi pri sia amo, kiel ili kune pasigis kelke da horoj kaj kio estis la rezultato. Kelkajn semajnojn ŝi sentis, ke io eksterordinara subfosas ŝian sanon kiel io sekreta, io ĝis tiu tempo al ŝi nekonata sento ŝin malesperigis, fine ŝi kuraĝis paroli pri sia gravedeco [207] al Alings. Komence timo lin kaptis, sed iom post iom tiu timo ŝanĝiĝis en indiferentecon, poste en koleron. Du monatojn post tiu sankta Martinovespero, li forpelis ŝin el sia domo kaj ŝi iris hejmen, al sia patro. Sed kion devos fari ŝia patro? Li estis malriĉa laboristo, povis influi neniun kaj eĉ ne klopodis fari tion, ĉar li sciis antaŭe, ke Alings neniam fariĝos la edzo de Truda, kaj ke tia geedziĝo estos io neebla, io ankoraŭ neniam okazinta en la vilaĝo, kie ĉiu terposedanto konsideras geedziĝon kun malriĉa kamparanino kiel mezaliancon, [208] kiel malhonoron, kiel ion, kio faros lin ridinda ĉe la aliaj terposedantoj kaj farmistoj. La patro de Truda kuraĝe portis sian sorton, sian malfeliĉon, eĉ ne riproĉante sian filinon, ĉar tio ne plibonigus ŝian situacion.

Sep monatojn poste naskiĝis Dirk. Ĉu estas mirinde, ke la knabo estis stultulo? Dum tiuj monatoj la kompatinda Truda preskaŭ ne eliris el la domo de sia patro, preskaŭ freneza pro ĉagreno kaj malespero, ŝi pensis pri la estonto, pri la naskiĝonta infano, pri la bastardo, pri sia honto. Ofte ŝi pensis, ke estus plej bone sin ĵeti en la apudan maron kaj malaperi en ĝi; ofte

ŝi kun tia intenco vagadis vespere sur la digo, kaj sur la ŝlimaĵo, sed ĉiam kuraĝo mankis al ŝi plenumi sian inteneon; ĉiam ŝi imagis la ĉagrenon, kiun kaŭzus tia faro al la patro, kaj ĉiam ŝi reiris hejmen, ne plenuminte ĝin. Dum multaj sendormaj noktoj ŝi sidis sur sia lito, rigardante sencele, sed fikse antaŭ si iun nedifinitan lokon de la ĉambro, kaj ne sciante kion fari.

Fine la knabo venis en la mondon. Kun teruro ŝi baldaŭ rimarkis kiel stulte la infano rigardas ĉirkaŭe, kaj poste kiel stulte li ridas kaj ridetas kaj ŝia ĉagreno fariĝis ankoraŭ pli granda. Sed pri la honto ŝi ne pensis plu, ŝi pensis nur pri la malfeliĉa bastardo kaj pri lia estonteco.

Dum du jaroj ŝi restis hejme ĉe la patro. Subite li mortis, lasante al ŝi nenion, krom kelkaj preskaŭ senvaloraj mebloj; la dometo en kiu ili loĝis, apartenis al farmisto. Truda de tiu tempo dungiĝis al farmisto, kaj nur kun peno ŝi perlaboris sufiĉe por povi zorgi pri si mem kaj pri sia infano. La knabo kreskis, li ne estis idioto sed kompatinda stultulo, li ne vizitis la lernejon kaj estante okjara, li eklaboris ĉe la sama farmisto ĉe kiu servis ankaŭ lia patrino. Fine li fariĝis servisto ĉe Peĉjo Blunt, kaj ankoraŭ nun li estas tie kaj li estis kontenta, sed spite tio li kaŭzis multan malkvietecon al sia patrino, kiu konstante timis ke tia stultulo kia estis Dirk, nur kun peno povos trabati al si la vojon tra ĉi tiu mizerplena mondo...

Kaj en ĉi tiu vespero, tiom da jaroj post kiam ŝi la unuan fojon partoprenis en la Martina festo, ŝi staris eksterdome, sur la vojeto, kondukanta al la farmodomo de Bekman.

Ŝi medite rigardis la dancantajn lumpunktojn, are proksimiĝantajn kaj malproksimiĝantajn sur la sabla vojeto, kaj ŝi refoje pensis pri la unua fojo, kiam ankaŭ ŝia lampiono sin movadis inter tiom da aliaj: ŝi klare rememoris ĉion, kio koncernis tiujn vesperojn, precipe tiun, kiu kaŭzis ŝian malhonoron. Ŝi nun aŭdis la kantantajn voĉojn de la geknaboj, de malproksime venantaj al ŝiaj oreloj:

Sankta episkop' Martino,
Iras ni per ilumino

Tra la stratoj de l'vilaĝo.
Petas ion kun kuraĝo
Por ĉi tiu kanto:
— — — — — — — —

Kaj ŝi pensis pri sia knabo, kiu ankaŭ ofte kunkantis treniĝante inter la aliaj infanoj. En ĉi tiu momento li eble staras en la traveturejo de Blunt, gardante ĉevalojn.

Ŝi rigardis la dancantajn lumetojn, aŭdis tiun kanton, ne rimarkante ke ĝuste en tiu momento nigra figuro proksimiĝas, la sola kiu ne portas lampionon, la sola, kiu ne kunkantas.

Fine li estis apud ŝi. Ŝi ekvidis lin... sinjore vestitan personon kun ĉapelo sur la kapo. Ŝi rigardis lin kaj li ŝin, li haltis.

— Truda! — li diris.

Truda ektremetis, ektimis; ŝi ne vidis la parolanton, sed ŝi rekonis lian voĉon, ne kredante al siaj oreloj. Ŝi pli atente alrigardis lin, sed en la mallumeco de la vespero ŝi vidis nur la nigran figuron — sinjoron kun ĉapelo kaj kun mallonga barbo.

— Truda!

Ŝi refoje tremetis; ŝajnis al ŝi, ke tiu voĉo apartenas al Alings, sed samtempe ŝajnis al ŝi neeble ke tiu persono estas Alings. Ŝi vidis lin nur tre malofte dum la lastaj jaroj kaj kiel eble plej multe lin evitis, sed kiam ŝi vidis lin la lastan fojon, ŝin timigis la sovaĝa aspekto de tiu viro, kiun ŝi tamen ĉiam kore amis.

En la malproksimeco refoje aŭdiĝis fragmento de la festokanto:

Bovoj portas kornojn,
Floroj portas dornojn,
Knaboj portas jakojn
Kaj sinjoroj frakojn,
— — — — — —

— Truda! — diris tiu sama voĉo.

Ŝi ne aŭdis plu la kanton, ŝi volis forkuri, sed Alings rapide aliris al ŝi.

— Alings! — ŝi ekkriis.

— Ĉu vi min rekonis?

— Pere de la voĉo... kion vi volus?... Lasu min!

Ŝi preskaŭ svenis, sed li ŝin subtenis, dirante plue:

— Ne foriru, mi venis por paroli kun vi.

— Pri kio?

— Pri tio, ke mi devas peti vian pardonon kaj mi venis ankoraŭ por peti, ke vi venu kun mi...

— Iri kun vi?... kien?

— Al mia bienodomo:

— Lasu min...

— Mi ne lasos vin... Ne timu! Mi ne estas plu la sovaĝulo de antaŭe.

— Kion do vi volas de mi?

— Ĉu vi rememoras tiun vesperon... antaŭ tiom da jaroj... kiam vi disdonis monerojn al la kantantaj infanoj ĉe la antaŭkorto de mia domo?

— Dio! Jes!... Sed kial paroli pri tio?

— Truda! En tiu vespero mi ĵetis vin en mizeron, sed en la hodiaŭa vespero mi volas retiri vin el tiu mizero...

Venu kun mi!

Ŝi ne parolis. Preskaŭ sen forto ŝi apogis sin al li kaj li klinis sin super ŝi, flustrante:

— Mi ĉion pripensis, Truda, mi rememorigis al mi ĉion, kio okazio en tiu vespero, ĉion, kio poste okazis al vi kaj al mi, ĉion, kion diros la homoj, kaj mi...

En tiu momento deko da geknaboj preteriris. Ili kun miro rigardis la nigre vestitan sinjoron, kiun ili ne konis, kaj Truda'n, de ili bone konatan kaj kelkaj ion flustris, kion ŝi ne povis kompreni. Refoje ŝi volis forkuri, sed Alings, kaptante ŝian manon, kaj ne atentante la infanojn, mallaŭte parolis plue:

— Ĉion ĉi mi rememorigis al mi kaj mi komprenis, ke ne estas ankoraŭ tro malfrue por rebonigi tion, kion mi pekis kontraŭ vi kaj kontraŭ... mia filo.

— Vi parolas pri Dirk?

— Jes, hieraŭ mi alkondukis lin hejmen; nun mi venis por vin mem tien konduki. En mia domo estas tiel malĝoje,

tiel mallume, tie ne brilis la suno dum tiom da jaroj, kaj maljuna Helena diris ke mi bezonas la sunon...

En la malproksimeco nun aŭdiĝis:

Loĝas en ĉi tiu domo,
Riĉa, malavara homo,
Li donacu do moneron
Aŭ fromaĝon aŭ buteron.
Poste iros ni najbaron
Ne revenos tutan jaron!

— Venu al mi, Truda, kial vi silentas?... Ĉu vi volas esti tiu suno?

Ŝi ne respondis, sed alrigardis supren en liajn okulojn, ĉirkaŭprenis lian kolon kaj ekploris. Li premis ŝin al sia brusto flustrante.

— Kredu al mi Truda, ĉiam mi vin amis, sed mia koro estis tro fiera por ĝin konfesi.

Malrapide ili laŭiris la sablan vojeton al la makadama vojo. Aro da infanoj kun lampionoj preteriris de antaŭe kaj de malantaŭe. Iliaj lumoj dance flirtadis antaŭen inter la longfosoj super la vojo ekhaltante tie kaj tie ĉi antaŭ la dise starantaj dometoj. Refoje la kanto rekomenciĝis:

Sankta episkop' Martino,
Iras ni kun ilumino
— — — — — — —

Truda kaj Alings malrapide irante pluen pensis ambaŭ pri tiu sama vespero antaŭ tiom da jaroj, pri ĉio, kio okazis poste... pri Dirk la stultulo, fine pri la feliĉo ilin atendonta.

— — — — — — — — — — — — —

Kelkajn tagojn poste Peĉjo Klakilo staris sur la strato ĉe la „Verda Ĉevalo". Super lia kapo flirtis granda flago[209] pendigita sur lia domo. Tiu flago anoncis ke io feliĉa okazas en la vilaĝo. Kelkaj scivolaj vilaĝanoj staris ĉirkaŭ li kaj babilis pri la ĵus okazinta geedziĝo de Alings kaj Truda.

La vizaĝo de Peĉjo lumis pro kontenteco, ridetante la drinkejmastro fiksis la grizajn okulojn al la fino de la strato sur unu

lokon, ĉar ĉe ĝia angulo ĵus aperis la veturilo de la geedziĝinta paro; fine ĝi alvenis. Scivole ĉiuj plenatente rigardis la proksimiĝantan veturilon. Alings tenante la kondukilojn sin turnis al Truda, sidanta ĉe lia flanko kaj ambaŭ ridis. Kiam la veturilo preteriris la „Verdan Ĉevalon" la flirtanta flago preskaŭ tuŝis ĝian supran parton. Alings kaj Truda mansalutis kaj Peĉjo per unu ekmovo deprenis sian silkan ĉapon kaj dum li sin klinis antaŭen por saluti la ĵus geedziĝintojn, liaj harbukloj brilis al ili kiel lumanta aŭreolo. La veturilo forrapidis kaj Petro reirante sian drinkejan ĉambron, laŭte klaketis per la manplatoj deklamante:

En ĉerk' ripozis Ŝercemul'
Li kuŝis sterniĝinta,
Kaj ĉiuj plendis: Ŝercemul'
Nur estas jam mortinta
Ho ve! ho ve! ho ve!!

Sidiĝante sur sian kanapon li daŭrigis ĝis la fino:

Kaj ĉiuj kantis Ŝercemul'
Vi estas stranga homo,
Brave! brave! brave!!...

La scivolaj homoj sur la strato ankaŭ iris hejmen ridante pri Peĉjo Klakilo.

Samtempe la veturilo de Alings laŭiris la makadaman vojon. En la posta parto sidis Dirk, sinjore vestita. Li sidis kun pintigita buŝo, kliniĝinte laŭ sia kutimo iom antaŭen kaj li ne sciis kion pensi:

Tie antaŭ li, unu flanke de la alia sidas liaj „gepatroj". Li havas nun patron kaj patrinon, kaj li estas riĉa... Li cerbumadis pri tiu nekomprenebla miraklo, dronis pli kaj pli en profundan meditadon kaj fine konstruis al si aerkastelon:

— Se mi estus la servisto de Peĉjo, mi portus ordinarajn, oportunajn vestojn, mi havus sur miaj piedoj dikajn lanajn strumpojn kun oportunaj lignaj ŝuoj, kaj mi havus varmajn piedojn. Mi dormus nokte en la bovina ŝtalo apud la porkoj, kaj la porkoj gruntetus kaj mi dormus... kaj dormus... kaj en

la traveturejo eble starus benketo por sidiĝi, se mi devus gardi la ĉevalojn... Se mi estus la servisto de Peĉjo, mi matene irus melki kun Alino kaj reveninte mi nutrus miajn kuniklojn. —

ĈAPITRO XIV.

Paŭl — Lia juneco — Paŭl sur la digo. — Liaj revoj kaj aspiroj. — Paŭl kaj Eva. — Juna amo.

Paŭl plenan jaron loĝis ĉe Blink; post tiu tempo li devis reiri al sia patrino, kiu estis forlasinta la urban malsanulejon. Ŝi ne tute resaniĝis, sed ŝi estis sufiĉe forta por reveni al la vilaĝo, kie ŝi denove enloĝiĝis en la antaŭan dometon. Regule ŝi pagis de post tiu tempo la luprezon de sia ĉambreto, sed neniu komprenis, kiel ŝi akiras la monon por subtenadi sin kaj la knabeton, ĉar ŝi ankoraŭ ne laboris ĉe farmisto kiel ŝi antaŭe de tempo al tempo faris kiam ŝia sanstato tion permesis. Por Paŭl ree komenciĝis tiu sama antaŭa vivo en la izolita dometo, sed tion li ne bedaŭris. Li amis la solecon kaj ĝojis ke li povas forlasi la domon de la razisto, kvankam Blink ĉiam estis por li tre bona kaj amika, sed la infanoj estis liaj veraj turmentantoj, uzantaj ĉiun momenton ataketi kaj inciteti lin; ilia patro ne ĉiam povis esti lia protektanto, ĉar ofte li estis eksterdome aŭ en sia razejo, kaj lia edzino neniam malhelpis la infanojn, kiam ĉi tiuj turmentetis kaj ĝenis la knabeton.

Paŭl estis ankoraŭ tre juna, sed pli ol kapon pli altkreska ol la infanoj de lia aĝo. Krom tio, li estis forta kiel juna urso, sed neniam li bezonis uzi sian forton por defendi sin kontraŭ la incitetantinoj. Se ili volis bati lin, li ne tion atentis kaj batata li estis preskaŭ neniam, ĉar en tiaj okazoj, li levis la pugnigitan manon aŭ montris per minacanta mieno, ke li tuj repagos ĉiun ricevitan baton. Do li estis nun denove ĉe sia patrino.

Post monato li devis iri lernejon, sed li vizitis ĝin nur mallongan tempon. Ŝajne la patrino refoje devos labori, ĉar subite ŝi estis senmona kaj serĉis laboron ĉe farmisto en la ĉirkaŭaĵo de sia dometo.

Fremda Dorotea estis pala virino kun nigraj haroj kaj okuloj. Ŝi parolis malmulte, ĉar ŝi estis fremdulino, parolanta tre kriple[210] la dialekton de la provinco. Neniu sin okupis pri ŝi kaj reciproke ŝi sin okupis pri neniu. Ŝajnis kvazaŭ mistero ĉirkaŭas tiun fremdan, strangan virinon; eĉ la maniero laŭ kiu ŝi edukis la knabon, estis stranga. Ŝi ne traktis lin malbone, sed ŝi montris pri ĉio, kio lin koncernis, grandan indiferentecon, tiel ke kelkfoje la najbaroj diris, ke ŝajne ŝi ne estas la patrino de Paŭl. Sed, ĉar fremda Dorotea estis stranga en ĉio, oni opiniis tre natura, ke ŝi estas ankaŭ tia rilate sian propran infanon. Paŭl lernis nur malmulton, en la publika lernejo la instruado estis malbona, kaj neniu instigis la knabon fari sian eblon, kiam li sidis sur la lerneja benko. Kiam unu jaro pasis, multaj lernantoj transiris la duan klason, sed Paŭl, kvankam li estis la plej altkreska kaj la plej forta el ĉiuj lernantoj, montriĝis la malplej diligenta kaj la malplej sukcesinta. Anstataŭ lerni aŭ skribi diligente kiel aliaj infanoj, li preskaŭ ĉiam sidis meditante, farante nenion. Post la dua jaro li transiris la duan klason, sed spite la dujara lernado en la unua klaso, li montriĝis tre malbona lernanto en la dua. Post la tria jaro li ne transiris la trian klason kaj kiam la kvara jaro pasis, kaj li povus transiri en la trian, li devis forlasi la lernejon pro financaj aferoj de la patrino. De post tiu tempo li estis fordungata al la sama farmisto, ĉe kiu laboris lia patrino. La vivo de la knabo, kiel ni jam diris, ĝis tiu tempo estis tre unutona. Li ĉiutage vizitis lernejon, de tie revenadis al sia dometo kaj tiel pasis unu tago post alia sen ia ŝanĝo. Neniam li iris pli malproksimen ol la vilaĝo, konstante li vidis la samajn homojn kaj la samajn domojn, la samajn stratojn, kaj ĉar neniu rakontis al li pri tio, kio okazas ekstervilaĝe, li konsideris la vilaĝon kvazaŭ ĝi estus la tuta mondo. Paŭl tamen ne estis knabo senigita je ĉiaj interesoj, ĉar kvankam li malofte ludis kun kamaradoj, des pli multe li ludis kun bestoj. Lia patrino estis strangulino en ĉio, sed Paŭl estis strangulo pri bestoj. Li amis ilin ĉiujn, la katinon de la najbaroj li adoris kaj trodorlotis, kaj la samon, li faris al ĉiuj bestoj, kiujn li povis proksimiĝi. Li amis ĉevalojn, ŝafojn, birdojn kaj volonte li fordonus ĉion, kion li posedas por havi

birdeton aŭ ŝafideton aŭ katon, sed lia patrino ne toleris bestojn en sia ĉambreto. Paŭl estis tre sentema al ĉio, kion por li oni faris. Koro de infano estas sentema kaj plej multe influas ĝin bona, justa traktado. Se iu bone traktis Paŭl'on, li neniam pri tio forgesis kaj spite sia juna aĝo, li volonte repagus ĉian bonan agon de aliulo. Ofte li pensis pri la barbiro, kiu ĉiam estis defendinta kaj protektinta lin kontraŭ maljustaĵoj de siaj propraj infanoj, kaj tiu protektado estis kvazaŭ engravurita en lian koron.

Paŭl do estis fordungita al farmisto. Matene jam tre frue li devis ellitiĝi por iri kun la patrino farmejon. Tie li devis helpi en nutrado de la brutaro, melkado de la ŝafoj, fari komisiojn en la vilaĝo, kaj ne antaŭ ol la sesa horo vespere, li rehejmiĝis kun la patrino por ĉiam kiel eble plej baldaŭ enlitiĝi, ĉar la sekvantan tagon jam frumatene ili denove devis iri al sia laboro. Pli unutona vivo ne estis pensebla, sed Paŭl ĉiam estis kontenta, neniam grumblante, neniam pensante, ke aliaj infanoj samaĝaj havas pli bonan, pli agrablan vivon ol li. Sed jam de longe li spertis, ke nenio estas farebla kontraŭ lia sorto, ke ĉiu kontraŭstaro estus vana, tial li volonte sin submetis al ĝi, eĉ ne pensante ke Fortuna maljuste agas kontraŭ li, kiam li komparis sian vivon kun tiu de aliaj infanoj. Paŭl estis sana knabo, ĉar konstante li laboris en la saniga aero. Li kreskis pli forte ol la aliaj knaboj. Konstante liaj vestoj estis tro malvastaj kaj tro mallongaj, sed spite tio, li devis tute eluzi ilin, ĉar lia patrino perlaboris nur malmulton, kaj la monsumon, kiun li recevis pro sia ĉiutaga laboro (tagmanĝon li ricevadis en la farmejo) estis ridinde malgranda kaj pagata nur unu fojon jare, nome ĉe la fino de Aprilo, kiam servistoj devas decidi ĉu ili volas restadi ĉe la sama mastro, aŭ serĉi alian servon. Kiam en Majo la fremda Dorotea ricevis la monon, perlaboritan de la knabo, ĝi foriĝis kiel neĝo sub la varma suno, ĉar ŝi ĉion aĉetis antaŭe kaj kredite, kaj paginte la faritan ŝuldon, la virino havis nur malmulte por si mem.

Aliaj servistoj needziĝintaj, kaj eĉ la junaj, regule dimanĉe iris vilaĝon por serĉi tie iun ŝanĝon en la unutoneco daŭre ĉirkaŭanta ilin, sed Paŭl ne vizitis la vilaĝon, kaj ĉar la ĉambreto

de lia patrino ne oferis hejmecon, li en tiuj tagoj, se estis bona vetero, vagadis sur la mardigo kuŝanta apud lia dometo. Sur la digo li sidis aŭ vagadis multajn horojn, rigardante en la maron, kiu sin etendis en la malproksimecon antaŭ liaj okuloj. Li postrigardis la ŝipojn, la vaporboatojn, li observadis la rapidan gracian movadon de marbirdoj, konstante ŝvebpendantaj super la maro aŭ super lia kapo. Li admiris tiujn belajn birdojn kaj li amis ilin kiel li amis ĉiujn bestojn.

Ofte kiam li dimanĉe sidis sur la digo, ŝafoj venadis al li, kaj li karesis iliajn kapojn. Ŝajnis kvazaŭ ili lin konus, same kiel la ĉevaloj, libere pastiĝantaj sur la deklivo de la digo.

Tiel pasis tri jaroj. Paŭl fariĝis junulo tiel altkreska, ke ĉiu lin rigardis kiel plenkreskulon. Paŭl kreskis kaj kreskis konstante, fariĝante pli kaj pli forta, pli muskola. Artisto aŭ skulptisto, vidante lin, povus lin kompari kun estonta atleto, ĉar liaj korpo kaj membroj evoluis kiel ĉe vira bovido, iam ili estas malgraciaj kaj malagrablaj por la okuloj de nesperta rigardanto, sed iom post iom fariĝis videblaj liaj vere belaj formoj. Multaj tion ne vidis kaj Paŭl kredis mem esti malbela junulo, tute alia ol multaj fraŭloj de la vilaĝo, pli malgrandaj ol li kun membroj pli delikataj kaj vizaĝkoloro malpli sunbruna ol la lia.

Kiam li estis ankoraŭ ĉe Blink, ties edzino unu tagon nomis lin malbelulo. Paŭl ne estis ofendita pro tiu nomo, sed li komparis sian vizaĝon kun tiu de Berta, ĉar sinjorino Blink ĉiam nomis ŝin sia belulino. Paŭl, kiu estis infano malmulte parolanta, des pli multe pensis, kaj tiun aferon li pripensis kun infanaj scivolemo kaj naiveco. Li rigardis la strabantan palvizaĝan knabinon kaj ne povis kompreni kiel ŝi povas esti tia belulino, ne nur pro sia vizaĝo sed ankaŭ pro sia karaktero, ĉar Berta estis vera maliculino, ĉiam insultanta lin kiam ŝi troviĝis sub la protekto de sia patrino.

Paŭl estante sola, grimpis sur seĝon antaŭ la spegulo kaj atente rigardis sian vizaĝon por kompari ĝin kun tiu de la knabino. Li vidis grandan diferencon: Li havis grandajn brunajn okulojn, larĝan buŝon kun diketaj lipoj, rondan grandan mentonon, altan frunton, kaj ĉe Berta, la belulino, li vidis

ĉion malgranda kaj alikolora. Li mem opiniis ke li havas malbelan tro grandan buŝon kaj pensis ke eble lia tuta vizaĝo estas malbela. Vespere, estante duope kun Blink, li subite demandis al li:

— Ĉu mi estas malbela?

— Ho ne, Paŭĉjo; vi ne estas malbela.

— Ĉu Berta estas malbela?

— Kia stranga demando, Paŭĉjo.

— Ĉu ŝi estas malbela? — refoje li demandis.

— Ho ne! tute ne!

— Ĉu ŝi estas bela?

Infanoj ofte persistas, tion Blink sciis, tial li respondis por kontentigi la knabon, dirante:

— Nek bela ŝi estas, Paŭĉjo.

La knabo ĉesis demandi; li sciis, ke li mem ne estas malbela kaj ke Berta ne estas bela. Li pripensis kia diferenco estas inter: „ne bela" kaj: „ne malbela". — Ĉu tio estas la samo? — li pensis. La solvon [211] li ne trovis, sed li bone vidis ke estas granda diferenco inter liaj brunaj okuloj kaj la strabaj helaj okuloj de la „belulino". Poste, kiam li estis kelkajn jarojn pli aĝa, li estas certa pri tio, ke li estas malgracia junulo, sed tio ne impresis eĉ ne ĉagrenigis lin kaj li ne multe pensis pri tio. Li sciis ankaŭ, ke li estas forta, multe pli forta ol aliaj junaj homoj samaĝaj; pri tio li kelkfoje ĝojis, ĉar ju pli oni estas forta, des pli bone oni povas labori, kaj labori li ja volis. Li deziris fariĝi plugisto, falĉisto, rikoltisto kaj ĉio, kio koncernas la agrikulturon, kredante ke li estos kapabla atingi tiun celon. Kuraĝe do li iris antaŭen, laborante kiel ĉevalo kaj... kreskante... kreskante.

Jaron poste li dungiĝis al alia farmisto, maljuneta viro kun negranda farmejo kaj malmultaj servistoj. Ĉe tiu farmisto, nomata Baŭman, li havis multon por fari, sed kun plezuro li dediĉis sin al sia tasko, plugante, falĉante kaj rikoltante la tutan jaron, malofte vizitante la vilaĝon kaj dimanĉe vagante sur la digo inter ŝafoj, ĉevaloj kaj kun la marbirdoj super sia kapo.

La farmejo de Baŭman kuŝis dekon da minutoj malproksime

de la mardigo kaj duonhoron malproksime de la dometo en kiu loĝis lia patrino.

Kiam oni laŭiras la dorson de la digo eĉ du aŭ tri horojn de oriento al okcidento, oni vidas ĉe sia maldekstra flanko nenion krom kampoj kaj paŝtejoj kuŝantaj tie en formo de grandaj kvadratoj, paralelogramoj, kiujn ĉiuflanke limigas longfosoj, kaj tie kaj tie ĉi farmodomojn ĉirkaŭitajn de arboj kaj inter tiuj farmodonoj la loĝejojn de la terlaboristoj. Tiuj loĝejoj, ĉiuj malgrandaj dometoj, estis ŝajne trafe maltrafe dissemitaj tien kvazaŭ de kaprica giganto,[212] kiu per tio volis ankoraŭ plibeligi la panoramon. Ĉe la dekstra digoflanko sin etendas ĉe la piedo de la digo la eksterdigaĵo, konsistanta el paŝtejoj inter kiuj rampas el la maro multaj golfetoj.[213] Kelkaj estas profundaj; dum la alfluo[214] ĉiuj tiuj golfetoj malaperas sub la ondoj de la maro, sed ĉe refluo[215] ĉiuj iom post iom reaperas.

Ili estas danĝeraj kaj perfidaj tiuj golfetoj, kiuj kiel serpentiĝantaj brakoj de polipo[216] sin etendas de la maro tra la ŝlimaĵo, tra la paŝtejo kaj preskaŭ ĝis la digo.

Ĉe refluo oni povas promeni centojn da paŝoj en la direkto al la maro, sed tia promenado estas danĝera, ĉar ĉe subita alfluo la maro superverŝas la serpentiĝantajn golfetojn tiamaniere, ke reiro al la digo kelkfoje estas malebla. Nur kamparanoj, loĝantaj ĉe la digo kaj konantaj la kurbaĵojn de la perfidaj polipobrakoj, povas sendanĝere sin movi inter ili kaj eviti esti detranĉataj de la tero. Ofte ŝafoj irintaj tro proksimen al la maro, estis kaptataj de la golfoj kaj pereus sen savo, se kuraĝa kamparano ĝustatempe ilin ne rimarkus kaj ne forkondukus la beston el tiu danĝera loko.

Paŭl jam kelkfoje tiamaniere savis ŝafon de certa morto, ĉar li konis ĉiujn danĝerajn lokojn inter la golfetoj, kaj superruzi ili ne povis lin. Unu el tiuj golfetoj, tre profunda ŝoviĝis el la maro al la eksterdigaĵo, proksime de la farmejo de Baŭman.

Kiam somero venis, Paŭl ofte sin banis tie; en tiu golfo li lernis naĝi kiel rano. Li estis fraŭlo, kiu atentis ĉiujn bestojn, ankaŭ la ranojn. Ili estis montrintaj al li kiel ili naĝas kaj kiel eble plej bone li imitis ilian naĝmanieron. Li povis subakviĝi, resti longan tempon sub la akvo, subite reaperi super la akvon;

li povis naĝi surdorse, kuŝi longan tempon senmove kun la kapo levita supren, tiel ke nur la supra parto de lia vizaĝo elstaris el la akvo; en tiu pozo li ofte dum longa tempo rigardis supren al la ĉielo, kie centoj da marbirdoj, eligantaj laŭtajn akrajn kriojn, ŝvebis tien kaj reen tra la aero.

Paŭl en ĉiuj rilatoj estis taŭga laboristo, kaj Baŭman, tion ŝatanta, pagis al li bonan salajron kaj Paŭl ne fordrinkis, nek elspezis ĝin malsaĝe, kiel kelkaj aliaj junaj servistoj. Paŭl havis siajn iluziojn[217] kaj volonte revadis pri ili. Tiuj iluzioj tamen ne estis delikataj, malfortikaj aerkasteloj sed realiĝeblaj deziroj kaj aspiroj. Li volis fariĝi feliĉa posedanto de kelke da hektaroj da bona tero kaj kulturadi por si mem; li volis havi bovinon, du aŭ tri ŝafojn kaj kaprinon kaj aron da kokinoj. Pri ĉi tiu riĉaĵo (ĉar por li ĝi estis vera riĉaĵo) li ofte meditis kaj revis, opiniante ke li povos atingi tiun celon; tial li konfidis la plej grandan parton de sia salajro al sia mastro. Baŭman promesis aĉeti por li akciojn,[218] por ke li ricevu kelkan renton[219] de la mono; tiel, la juna viro povus post kelke da jaroj de diligenta laborado vendi siajn akciojn por aĉeti la deziratajn hektarojn da bona tero.

Do Paŭl laboradis, pasigis siajn dimanĉojn sur la digodorso, rigardante la maron kaj la teron, kiun eble li poste posedos, kaj li estis kontenta, feliĉa. Li fariĝis dek-sepjara, sed neniu povis diveni, ke tiu longkreska junulo estas nur dek-sepjara kaj eĉ Paŭl mem ofte pri tio forgesis, ĉar ĉiuj liaj samaĝuloj estis kompare kun li nuraj pigmeoj,[220] kiuj povis, ne klinante la kapon stari sub lia etendita brako.

Paŭl fine fariĝis du metrojn alta, li aspektis kiel atleto kun larĝa brusto kaj fortaj membroj; ĉiuj rigardis lin kun miro kaj surprizo.

Ne malproksime de la farmejo, kie li laboris, staris malalta dometo en kiu loĝis la kamparano Roos, posedanto de peco da bona tero, kiun li prilaboris en sia libera tempo. Li servis kiel neregula laboristo jen ĉe unu jen ĉe alia farmisto. Roos estis bona, simpatia viro. Lian mastrumadon prizorgis lia sola filino Eva, delikata dek-sepjara knabino kun nigraj haroj, nigraj okuloj kaj freŝa ruĝvanga vizaĝo. Eva estis la pupilo[221] de

Roos, ankaŭ la knabino kore amis sian patron; kune ili vivis kontente kaj nenio maltrankviligis ilian feliĉan vivon. La edzino de Roos mortis antaŭ pli ol dek jaroj. Sed lo tempo batas, la tempo flatas; ĝi ankaŭ kuracis la doloron kaj ĉagrenon de Roos kaj de Eva, kaj fine ili submetiĝis al sia sorto.

Ofte Paŭl vidis Eva'n, kaj ofte Eva vidis Paŭl'on, sed malofte ili interparolis, ŝajnis kvazaŭ ili evitas sin reciproke. Paŭl tion alskribis al sia eksterordinara kresko, larĝa brusto, granda buŝo kaj al ĉio, kion li mem trovis nebela, dum Eva ĉiam pensis, ke Paŭl ŝin malŝatus pro ŝia malgrandeco, pro ŝiaj nigraj okuloj kaj haroj, kiujn ŝi mem tute ne trovis belaj. Ŝi pli multe amis brunajn, ŝi deziris esti pli altkreska, pli larĝbrusta; sed ĝemante ŝi sciis, ke la sorto ne destinis por ŝi tiajn korpajn belaĵojn. —

Estis refoje dimanĉo kaj Paŭl sidis sur la digo. Li revadis pri sia idealo kaj image vidis sin laboranta sur sia propra tero; image li vidis sian bovinon, siajn ŝafojn kaj kokinojn kaj sencele li rigardis antaŭ si. La krurojn li etendis antaŭen, la kapon li ripozigis sur ambaŭ manplatoj. Tie sidante li revis. Ĉirkaŭe sin paŝtis ŝafoj kaj ĉevaloj, ĉie estis senbruo, de tempo al tempo interrompata nur de kelkaj kriantaj, ĉirkaŭe ŝvebantaj marbirdoj. Post momento li sin turnis, suprentiris kaj ĉirkaŭkaptis la genuojn, kaj liaj okuloj vagadis trans la kampojn sin dendantaj antaŭ li transe de la larĝa longfoso serpentumanta [222] je kelka distanco de la digo, kaj kuranta paralele al ĝi laŭ tuta ĝia longo.

Paŭl sidis kaj revadis pri la kampoj, kiujn li posedos kaj la tempo rapide pasis. Tiel li sidis kviete, vidante neniujn homojn, ĉar dimanĉe neniu laboris sur la kampoj, ĉiu sidis hejme aŭ iris al la vilaĝa preĝejo por aŭskulti predikon.

Subite lian atenton vekis laŭta bojado de hundo, malproksime malantaŭ lia dorso. Komence li ne multe atentis tiun bojadon, ĉar ofte okazas, ke promenanta farmisto aŭ servisto, aŭ vilaĝano vizitas kun hundo la marbordon, promenante tie dum kelka tempo, serĉante konkojn aŭ banante siajn piedojn en la marakvo. Tamen ĉar la bojado ne ĉesis, sed fariĝis pli kaj pli laŭta kvazaŭ

la hundo estus de iu incitata kaj koleriĝas, Paŭl fine etendis la krurojn kaj sin turnis, ripozante per sia flanko sur la kurbigita brako. Liaj akraj okuloj penetre traflugis grandan distancon, ĉar de granda distanco aŭdiĝis la bojado. Fine li rimarkis, ke meze de kvazaŭa insuleto, formita de du el la maro venantaj golfetoj, staras virino kun nudaj piedoj, kun ŝtrumpoj kaj ŝuoj en la mano. Ĉe ŝia flanko tien kaj reen kuretis hundeto, laŭte bojante, kvazaŭ por peti pri helpo. La virino, kvankam ne troviĝanta en tuja danĝero, estis izolita kaj fortranĉita de la aluviaĵo kaj de la paŝtejo, ĉar ŝin ĉirkaŭis la du golfetoj kaj malantaŭ ŝi sin etendis la maro, kies akvo malrapide sed senhalte plialtiĝis, tiel ke post momento ŝi staros ĝis la genuoj en la akvo. Salti trans la golfeton ŝi ne kapablis, travadi ĝin ŝi ne kuraĝis, ĉar ŝi ne sciis kia estas ĝia profundeco. Ŝi sekve staris sendecide sur la ĉiam pli kaj pli etiĝanta insuleto. Nun Paŭl aŭdis ke ŝi komencas krii, kvankam ŝia voĉo apenaŭ estis aŭdebla pro la bojado de la hundo. Paŭl salte leviĝis kaj kuris al la insuleto. Li sciis, ke tuja helpo povos savi la virinon, ĉar li precize konis la travadeblajn lokojn kaj ĝustatempe povos alveni por eltiri ŝin el la danĝera situacio.[224] Li estis vigla juna viro, povis rapide kuri kaj baldaŭ staris antaŭ la golfeto, kiu disigis lin de la krianta virino kaj bojanta hundo.

— Tio estas Eva — li diris al si, ĉar li jam rekonis ŝin dum sia kurado.

— Restu staranta! — li nun kriis, — mi travados la golfeton kaj portos vin transen... atendu min!

Li okulserĉis la lokon kie la golfeto estis travadebla kaj ensaltis la akvon ĝis la brusto, trapuŝante sin antaŭen ĝis la bordo de la insuleto.

Eva aliris la lokon kie Paŭl estis surbordiĝonta, sed li restis staranta en la akvo kaj simple diris:

— Iru ĉi tien kaj kliniĝu por ke mi povu kapti vin sur la brakojn.

Eva ruĝiĝis sed obeis. Ŝi kliniĝis antaŭen kaj Paŭlo kaptis la knabinon sur siajn etenditajn brakojn.

— Feliĉe, ke mi vin vidis — li diris.

— Feliĉe, ke vi sidis sur la digo — ŝi diris.

Paŭl sin turnis en la akvo kaj portante la knabinon kiel oni portas infanon, li malrapide trapuŝiĝis tra la akvo iom post iom suprenirante el la golfeto, li baldaŭ atingis la sekan teron, kie li kviete kaj ridetante remetis Eva'n sur ŝiajn piedojn.

Dum la travado ŝi devis per unu brako ĉirkaŭi lian kolon, dum per la alia ŝi kaptis lian ŝultron.

— Kiel malgranda mi estas, ke li povas porti min kiel ŝafidon — ŝi pensis.

— Kiel malpeza ŝi estas, kaj kiel delikata estas tuta ŝia korpo, mi apenaŭ sentas ke ŝi kuŝas sur miaj brakoj — pensis Paŭl.

Ŝiaj elspiroj dolĉe tuŝis lian vangon, ŝiaj lipoj duone malfermiĝis dum ŝia brusto moviĝis parte de la sentita ektimo, parte pro honto, ke tiu grandegulo tiel ŝin portas sur la brakoj.

— Kian belan malgrandan buŝon ŝi havas, kiajn brilajn dentojn — li pensis.

— Kian belformajn lipojn, kian belan fortan kolon li havas, — ŝi pensis. Ambaŭ silentis dum la travagado, sed sekrete unu admiris la alian, ne kuraĝante montri tion kaj hontante pro tiu penso; ĉar Paŭl opiniis, ke li estas tia malgracia giganto, ke neniu knabino lin atentos, kaj ke Eva precipe povas rigardi lin nur per indiferentaj okuloj. Dume Eva opiniis, ke tiu forta belforma fraŭlo ne atentos ŝin pro ŝia malgrandeco, ke li atentos nur altkreskajn fraŭlinojn, tiajn, da kiaj multaj troviĝas en la ĉirkaŭaĵo.

Jen ili staris unu antaŭ la alia dum la hundo estis naĝatinginta ilin kaj ĝoje saltadis tien kaj reen por montri sian feliĉon pro la neatendita savo.

De Paŭl marakvo rivere fluis sur la ŝlimaĵon; sed li ridetis, de supre rigardante la knabinon, kies kapo atingis la duonon de lia brusto.

— Ho, kiel malseka vi estas, Paŭl... pro mi, ŝi diris rigardante lin de malsupre. Iliaj okuloj sin renkontis.

— Feliĉe ke mi povis veni ĝustatempe — simple respondis Paŭl.

— La alfluo subite surprizis min — ŝi diris mallevante la okulojn. — Mi volis bani la piedojn kaj ĉar mi staris kun la

dorso turnita al la maro, mi tro malfrue ekvidis, ke la akvo min ĉirkaŭas.

— Feliĉe ne estis tro malfrue — li refoje diris.

— Viktoro bojadis tiel laŭte, ke vi povis ĝin aŭdi.

— Jes, mi ĝin aŭdis.

— Ĉu vi min ne aŭdis? — Eva pensis pri sia malforta voĉo kaj pri la forta sonora [225] voĉo de Paŭl, kiun ŝi ankaŭ pro tio admiris.

— Vin mi aŭdis poste — diris Paŭl, pensante pri la dolĉa melodia voĉo de la knabino, kaj li komparis ŝian voĉon kun la sia tiel laŭta kaj sonora.

— Nun vi povas denove surmeti la ŝtrumpojn kaj la ŝuojn — diris Paŭl, kaj dum unu sekundo li admiris ŝiajn delikatajn maleolojn [226] kaj la malgrandajn graciajn piedojn. Komparante ilin kun tiuj de Cindrulino, pri kiu li iam aŭdis en la lernejo; li pensis:

— Kion ŝi devas pensi pri la miaj?

Eva denove ruĝiĝis kaj kliniĝis por surmeti la ŝtrumpojn kaj la ŝuojn dum ŝi pensis:

— Miaj piedoj estas kvazaŭ tiuj de tre malgranda knabino. Kial mi estas tiel malgranda? Kial mi ne estas kiel aliaj knabinoj?

Fine ŝi estis surmetinta la ŝtrumpojn kaj la ŝuojn. Ambaŭ rigardis la digon, ambaŭ konfuziĝis. Post kelka tempo ŝi diris:

— Paŭl, pardonu, mi ankoraŭ eĉ ne dankis vin.

— Kial danki?

— Vi ja savis min!

— Feliĉe ke mi povis fari tion — li diris — sed kial danki min pro tio?... Mi ja ne almetis min al danĝero, kaj sammaniere mi savis jam multajn... ŝafojn. Ĝi estis tute simpla kaj malfacila, sendanĝera laboro.

— Ĉu vi povas same porti ŝafon el la akvo? — ŝi ekkriis, pensante pri lia forteco.

— Ŝafoj ja ne estas tiel pezaj.

Eva sentis korpremon pensante ke Paŭl komparis ŝin kun ŝafo kaj vole nevole ŝiaj lipetoj iom tremetis.

— Sed povus ja okazi ke tia savo estus danĝera — ŝi diris.

— Ho ne! mi konas la danĝerajn lokojn.
— Sed imagu, ke la golfetoj estus tro profundaj por travadi.
— Mi povas naĝi.
— Ankaŭ kun ŝafo?
— Jes, mi ja kelkfoje tiamaniere savis ŝafon.

Refoje Eva sentis la antaŭan korpremon. Ŝi mem ne povus diri al si kial ŝi sentis ĝin kaj refoje tremetis ŝiaj lipoj kaj refoje ŝi ruĝiĝis.

— Kiel malseka mi estas — li diris ridetante. — Jen la akvo ŝprucas supren el miaj suoj.
— Vi povus malsaniĝi Paŭl.
— Ho ne! — mi jam tiel ofte malsekiĝis per la marakvo.
— Kaj viaj vestoj tute malboniĝis... pro mi!
— Nur iom la pantalono.
— Kaj la ŝuoj — ŝi diris.
— Nu, mi sekigos ilin, almetos aliajn kaj ne pensos plu pri la afero.

Refoje ŝi sentis la saman korpremon. Kial li ne pensos plu pri tio? Ŝi mem ja neniam forgesos kiel li savis ŝin kaj kiel li portis ŝin sur la brakoj tra la akvo.

Paŭl sentis bedaŭron pro tio, kion li ĵus diris, ĉar li sentis, ke io en lia brusto forte batis, kiam li portis Eva'n sur la brakoj kaj li estas certa, ke li neniam forgesos pri tio; tial post momento li diris:

— Mi tamen ĝojas, ke mi povis veni ĝustatempe, alie vi eble estus droninta.
— Nu! kio do?... Mi estas nur... nur ordinara knabino... kion vin interesus mia pereo?
— Jes, ĝi tre multe tuŝus min!... Sed feliĉe, mi povis helpi...

Eva malrapide reiris la mardigon. Paŭl iris ĉe ŝia flanko. Ŝi estis aŭdinta kion li laste diris kaj ŝia koro ekĝojis. Povas esti — ŝi esperis — ke li ne estas tute indiferenta rilate al mi, sed certe mi tion ne scias; mi estas nur tiel malgranda... tiel tute alia kiel la aliaj knabinoj...

Ili supreniris la digon kaj kune staris tie dum kelka tempo.
— Mi devos reiri hejmen — ŝi diris mallaŭte.
— Kaj mi devos surmeti sekajn vestojn — li diris.

— Kiel feliĉa estos mia patro, Paŭl, ke vi savis min.
— Kompreneble.
— Nu Paŭl, mi dankas vin. — Ŝi etendis al li sian manon.

Li etendis la sian en kiun tute malaperis la malgranda mano de Eva; li malforte ĝin premis, timante fari al ŝi doloron kaj ellasante ĝin, li diris:

— Ĝis revido, Eva.
— Ĝis revido, Paŭl.

Ambaŭ iris hejmen, Eva pensante pri Paŭl, kaj Paŭl pensante pri Eva.

ĈAPITRO XV.

Lotado kaj kolektado de rekrutoj — Paŭl devas loti — Kion Idoj de Cereso pensas pri Marso — En la lotejo — Paŭl lotas — La katido — Idoj de Cereso kaj Idoj de Marso — La hundo ĉaro — Peĉjo refoje en sia elemento.

La kolektado de rekrutoj, tiu invento [227] de la franca registaro dum la granda revolucio, kaj kiu devigis ĉiujn dudek ĝis dudek-kvinjaraj burĝojn al la milita servado, tiu fatala leĝo de la 19a tago de Fruktidoro de la VIa jaro de l'franca respubliko, [228] ankaŭ transiris en Nederlandon post kiam Napoleono en la jaro 1810a faris ĝin provinco de la granda franca imperio .

En 1813a, post la batalo ĉe Leipzig, la francoj foriris el Nederlando, sed la fatala kolektado de rekrutoj ne foriris kun ili. Ĝi restis kaj ankoraŭ nun devigas ĉiujn junulojn dek-ok-jarajn al la milita lotado. Tiu lotado okazanta unu fojon ĉiujare, decidas, kiuj el la lotantaj junuloj estos enregimentigataj [229] kiel rekrutoj.

En ĉiuj vilaĝoj tiu okazo estas atendata kun tre malsamaj sentoj. Kelkaj lotontoj scias jam antaŭe, ke la lotado por ili estas io negrava, ĉar lotonto, kies frato pliaĝa fariĝis soldato antaŭ li, kaj kiu per tio plenumis la militan servadon, estos libera, indiferente kian ajn malaltan numeron li prenos el la lotujo. Tiuj lotantoj sen ia timo aŭ emocio partoprenas en la lotado, ĉar la kolektado ilin ne kaptos. Sed aliaj, precipe tiuj,

kiuj malamas la militan servadon, ĉu pro specialaj religiaj ĉu pro aliaj motivoj, kun batanta koro, ofte tremante iras en la lotoĉambron, per hezitanta mano prenas la papereton, kiu decidos pri ilia sorto. Inter ili estas junuloj, kiuj povas esti konsideritaj kiel la subtenantoj de la gepatroj, aŭ de malsana patrino, por tiuj la rezulto [230] de la lotado estas gravega. La leĝo kelkfoje senigas kelkajn el tiuj lotantoj de la milita servado, sed ofte la patrino ne estas sufiĉe grave malsana por liberigi la lotanton de la milita servado. En okazo de milito aŭ de atendota milito, la timo kaj la malinklino al milita servado estas ankoraŭ multe pli granda. Unuj klopodas forkuri el la lando, aliaj anstataŭigas sin de pagato, sed nur malmultaj estas sufiĉe riĉaj, por tiamaniere seniĝi de la soldateco, do preskaŭ ĉiuj devas forlasi la hejmon por esti enrigimentigotaj. La tago de la lotado estas do grava okazantaĵo en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj, precipe se enlotontoj malamas la vivon en la kazerno, [231] kaj en la grandaj urboj, kie ili sin sentas fremduloj kaj kie ili preskaŭ neniam povas kutimiĝi. Al tiuj lastaj apartenis Paŭl. Kun premanta koro li jam ofte pensis pri la tago de la lotado; li estis vera ido de Cereso, sentis sin terkulturisto kaj kamparano laŭ la veraj signifo kaj senco de tiu vorto kaj kun abomeno li pensis pri la kazernovivo kaj al granda urbo, kie li devos eble pasigi longan tempon por dediĉi sin al io, kion multaj nomis la devo, sed kion li ne konsideris kiel ion tian. Kun abomeno li vidis la proksimiĝantan tagon en kiu li kaj multaj el liaj kamaradoj devos iri apudan vilaĝon por tie partopreni en la lotado. Fine tiu tago venis. Vestita per siaj dimanĉaj vestoj li jam frue en la mateno estis eksterdome, post kiam li estis prizorginta siajn kanarietojn, (ĉar dum kelka tempo li posedis kanarietojn), li laŭiris la sablan vojeton, kondukantan preter la dometon de Roos, esperante ekvidi Eva'n, pri kiu li estis pensinta la tutan nokton. Ĝis tiu ĉi tago preskaŭ ĉiuvespere aŭ ĉiumatene li ŝin vidis kaj ŝi vidis lin, kvankam ĉiu el ambaŭ ŝajnigis ne vidi la alian.

Se li prenus malaltan numeron, li devos foriri por kelke da monatoj; pri tio li pensis jam longe kun timo kaj abomeno.

Preterirante ŝian domon li ne vidis ŝin, sed Eva staris en

la ĉambro, rigardante tra la malsupra parto de la fenestro, kiun preskaŭ tute kovris blanka kurteno; kaj de malproksime ŝi vidis lin alveni, sed ju pli multe li proksimiĝis des pli multe ŝi retiriĝis por ne esti vidata ĉar ŝi pensis: li povus imagi ke mi kaŝe rigardas lin, kaj tiu penso naskis en ŝi senton de honto.

— Kiel forta, kiel altkreska li estas — ŝi diris al si, rigardante lin; — kiel rekte li marŝas, kia bela soldato li estos. Ŝin kaptis timsento kaj ŝia koro kuntiriĝis, ĉar se li fariĝus soldato, li forirus por kelke da monatoj, kaj revenante li eble tute ne atentos ŝin plu.

— Sed estas eble, ke li lot-liberiĝos de la servado... Jen li preterpaŝis la ĉambron kaj ŝi kuris en angulon por ne esti rimarkata.

Sed ankaŭ Paŭl atente estis rigardinta kaj ĵus kiam ŝi forkuris en la angulon li ŝin ekvidis kaj pensis:

— Ĉu ŝi staris tie por vidi min?

Li iris pluen, baldaŭ estis sur la makadama vojo kaj sin direktis vilaĝon. Tie jam deko da lotontoj staris ĉe la „Verda Ĉevalo" kaj atendis ĝis ĉiuj estos kune por are iri al la apuda vilaĝo kuŝanta je distanco de hora marŝado. Peĉjo Blunt staris sur la sojlo de sia domo, sed la flago ne flirtis nun super lia kapo. Peĉjo ne amis la militistan fakon, li ne amis la militan servadon, kiun li ĉiam konsideris kiel elpenson de la diablo. Peĉjo, kiu estas jam multaĝa viro, ofte rakontis pri la tempo, kiam la francaj soldatoj estis en la lando. Kiom multe da mono ĉiu holanda burĝo devis pagi por la subtenado de tiuj soldatoj! Ofte Peĉjo rakontis pri Napeleono, pri la militiro al Rusujo en kiu partoprenis tri el liaj onkloj, kaj kiel nur unu estis reveninta kun froste difektitaj-amputitaj [232] piedfingroj.

Blunt kun kompato rigardis la junulojn, kiujn kelkaj nomis „spes patriae" — la espero de la patrujo, sed kiujn aliaj nomis kanono-nutraĵo; li pensis pri siaj onkloj kaj pri la patrinoj de la junaj viroj.

Peĉjo ĉi tiun fojon ne kunfrapis laŭte la manplatojn, ne deklamis sian: Brave! brave! brave!! sed li pensis pri la lotado, kiu estis sendinta liajn onklojn al la granda armeo de Napoleono kaj poste Rusujon. Li eniris sian domon, sidiĝis sur la kanapon

kaj estis en malbona humoro, eble je la unua fojo en tuta monato.

Intertempe Paŭl kaj la aliaj junuloj iris kune pluen kaj de tempo al tempo nova kamarado, venanta de alia flanko de la vilaĝo, aliĝis al ili, tiel ke post horkvarono la aro konsistanta el dudek junuloj, eliris el la vilaĝo. Kelkaj lotontoj estis bonhumoraj, ili estis tiuj, kiuj jam de antaŭe sciis, ke la lotado ne kaptos ilin, aliaj kontraŭe iris kun gravaj mienoj kaj kelkaj estis eĉ iom palaj, ĉar ili pensis pri malsana patrino, kiu eble montriĝis ne sufiĉe malsana por savi ilin de la milita servado.

Paŭl elstaris el ili kiel giganto el aro da pigmeoj, kaj ĉiuj de malsupre rigardis al li, mirante pri lia alta kresko.

— Vi estos la plej longa el ĉiuj —, diris al li unu el la aro.

— Mi dezirus esti la plej mallonga — diris Paŭl, kaj li pensis pri Eva.

— Kial do? Oni sendos vin al Hago inter la grenadistojn, [233] vi estos la plej altkreska el ĉiuj. La Haganoj rigardos vin ĉiuj.

— Mi dezirus ke neniam unu Hagano rigardu min — diris Paŭl, denove pensante pri Eva.

— Nu! — diris alia — vi povos kapti altan numeron.

— Kiom da ni oni prenos? — demandis alia.

— Nur tri estos liberaj — certigis pala junulo, filo de la vilaĝestro.

— Kiel vi scias tion?

— Tion diris al mi mia patro. Li faris la kalkulon, li precize scias, kiuj lotos, kaj li scias ankaŭ, kiuj estos liberaj pro la fratoservado.

Paŭl kiel kutime malmulte parolis; aŭdante, ke nur tri estos liberaj li pensis pri la altaj numeroj 28, 29 kaj 30.

— Vi ankaŭ estas libera — sin turnis unu el la junuloj al Paŭl.

— Mi!?

— Jes, vi estas solfilo, ĉiuj solfiloj estas liberaj.

— Kiu diris tion?

— Neniu bezonas tion diri, solfiloj neniam devas servadi.

La filo de la vilaĝestro de flanke rigardis Paŭl'on, sed li nenion diris; li sciis, ke Paŭl estas solfilo, sed li sciis ankaŭ

ke Paŭl ne havas laŭleĝan[234] patron, kaj ke pro tio lia solfileco lin ne liberigos.

Paŭl, kiu sciis nenion pri la militaj leĝoj, ekĝojis, esperante ke tiu ĵus parolinto pravas.

— Nu do! — diris ĉi tiu — la Haganoj sekve ne rigardos vin.

— Des pli bone — respondis Paŭl.

Tiel parolante la aro alvenis en la lotejon, kie jam multaj aliaj junuloj el la ĉirkaŭaj vilaĝoj estis kunvenintaj. Kelkaj ridis, aliaj laŭte parolis, aliaj diris nenion kaj eksidis silentante sur la benkojn, starantajn en la granda lotejo. Ĉiuj admire rigardis Paŭl'on, la plej altkreskan el ĉiuj.

En la fundo de la salono staris longa tablo, post ĝi sidis tri militistoj: kapitano, leŭtenanto kaj serĝento.[235] Meze de la tablo staris granda vazo, tia, kian oni ofte uzas por orfiŝoj. En tiu vazo kuŝis aro da rulaĵoj el papero, ĉirkaŭitaj de kupraj ringetoj. Tiuj paperetoj devis decidi pri la sorto de la lotantoj; tion la lotantoj sciis, kaj multaj kun premanta koro rigardis la vazon.

— Ĉu ĉiuj ĉeestas? — fine demandis la kapitano.

— Jes kapitano — respondis la serĝento.

La kapitano leviĝis, prenis la vazon, intermiksis la rulaĵojn kaj remetante la vazon sur la tablon, ordonis:

— Ni komencu!

La serĝento legis la nomojn:

— Hendriko Berkman!

Hendriko Berkman paŝis antaŭen al la tablo.

— Lotu! — komandis la kapitano, montrante la vazon.

Hendriko ridetante enmetis la manon en la vazon, prenis paperrulaĵon kaj ĵetis ĝin sur la tablon.

— Donu ĝin al la leŭtenanto! — ordonis la kapitano.

Hendriko, kiu sendube estis ŝercemulo, prezentis la paperrulaĵon al la serĝento.

— Al la leŭtenanto! kriis la kapitano.

— Mi ne povas diferencigi leŭtenanton de kapitano, nek kaporalon de generalo — sektone diris Hendriko, sed ĉar la leŭtenanto etendis la manon, la ŝercemulo donis al li la elektitan papereton, murmurante ion, kion neniu komprenis.

La leŭtenanto disrulis la papereton kaj legis:

— Unu!

— Soldato! — kriis la kapitano — Jam atendu, ni instruos al vi la diferencon inter generalo kaj kaporalo!

— Oni tion ne instruos al mi, ridetante kaj sektone diris Hendriko, triumfe rigardante la kapitanon, kaj li daŭrigis: Fratservado!

— Ho! — kial vi antaŭe tion ne diris? — kolere demandis la kapitano, kiu sin sentis ofendita.

— Kial vi pri tio ne demandis ? — triumfe kaj sektone demandis la junulo.

Li estis libera, sed spite tio li devis stariĝi sub la mezurilon por esti mezurata. Intertempe la leŭtenanto vokis alian. Li lotis, kaj donis la paperrulaĵon al la leŭtenanto.

— Kvar! — diris ĉi tiu, leginte la numeron.

La junulo paliĝis.

— Ankaŭ fratoservado? — demandis la kapitano.

— Ne... sinjoro... malsana patrino.

— Ni ekzamenos la sanstaton de via patrino.

La leŭtenanto notis la deklaron, aliaj junuloj lotis unu post alia.

— Paŭl... Mi... tro... po... — Kia nomo!... Mi... tro... polij... Mitropolijoka! — legis la leŭtenanto.

Paŭl paŝis al la tablo.

— Kia giganto! — murmuris la kapitano, kun miro rigardante la grandegulon.

— Solfilo! — diris Paŭl, kaptante rulaĵon.

— Solfilo!? — diris la kapitano, ĵetante rapidan rigardon unue al Paŭl, poste al la paperoj, kuŝantaj antaŭ li.

— Solfilo! — denove diris Paŭl, transdonante la rulaĵon al la leŭtenanto.

— Kiel nomiĝas via patro? — demandis la kapitano, fikse rigardante lin.

— Mia patro?

— Jes, kiu estas via patro?

— Mia patrino nomiĝas Dorotea.

— Jes, ...Dorotea. Mi... Mitro-polijoka, sed kiel sin nomas via patro?

Paŭl paliĝis. Kion li devos respondi? Li ne sciis, kiu estas lia patro; li sciis, ke en la vilaĝo kelkaj rigardas lin kiel la filon de Alings, sed tio ne estis motivo por nun diri ke Alings estas lia patro. Li mem neniam kredis al la patreco de Alings rilate al li, ankaŭ lia patrino ĉiam silentis pri tiu afero, kaj, li mem malamis informiĝi pri ĝi. Li sekve ne sciis kion respondi.

— Respondu! — arogante[236] diris la kapitano.

Paŭl ofendiĝis, tiom pli, ĉar mallaŭtaj subpremitaj ridoj aŭdiĝis post lia dorso. Li de supre fiksis siajn brunajn okuloj minace sur la filon de Marso kaj subite firmtone demandis:

— Kion koncernus aliulon mia patro?

— Respondu! — denove diris la kapitano.

— Kion koncernas vin mia patro!? — kolere ekkriis Paŭl.

— Eksilentu, senhonta mallertulo!... Vi bone scias ke via patro estas nekonatulo, kaj ke vi estas bastardo... kaj ke via solfileco...

— Vi mem estas senhonta mallertulo! — ekkriis Paŭl.

— Numero tridek! ekkriis en tiu momento la leŭtenanto, donante la papereton al Paŭl.

La kapitano estis salte leviĝonta por denove komandi al Paŭl, kiu ŝajne ne timis lin, sed la alta numero, la plej alta el la vazo, lin retenis, li restis sidanta sed sin turnante al Paŭl li diris:

— Vi povas gratuli vin mem... pro tiu numero!

— Tion mi jam faris! firmtone diris Paŭl, ŝovante la numeron post la rubandon super la viziero[237] de sia ĉapo. Li estis jam forironta, ne pensante plu pri la kapitano sed al Eva.

— Haltu! — kriis la kapitano.

— Komandu viajn subulojn, ne min! — kriis Paŭl, sin turnante.

— Haltu, mi diras!

— Mi ne estas via subulo... mi estas libera!

— Spite tio vi devas esti mezurata!

— Kun plezuro!

Paŭl ekstaris sub la mezurilon.

— Vi povas konsideri vin feliĉa, ĉar vi eltiris tiun altan numeron! — ekkriis la kapitano, ruĝa pro kolero.

— Tion mi jam ĵus faris! — denove respondis Paŭl.

— Ĉar en la kazerno ni do instruus vin kiel konduti kaj ni repagus al vi tian arogantecon!

— Pri tio mi tute ne dubas, sed mi mokegas ĉiujn viajn kazernojn! — kriis Paŭl, kiun en tiu momento mezuris la serĝento, kiu sekrete kaj kaŝe okulumis al la grandegulo. Estis klare, ke la serĝento ne tre amis sian kapitanon kaj ĉar li en ĉi tiu momento turnis al li la dorson, li eble uzis la okazon por kuraĝigi la altkreskan lotanton, instigi lin al pluaj tiaj respondoj por kolerigi la kapitanon.

— Vi estas krudegulo! — ekkriis la kapitano, kiu preskaŭ ne povis plu sin regi. Paŭl respondis:

— Kaj vi estas...

— Du metrojn! — interrompis la serĝento, mokante per tio sian superulon, ĉar la kapitano estis dikega, ruĝkapa malgranda viro.

Laŭtegaj ridoj eksplodis tra la salono kaj denove la kapitano estis salte leviĝonta.

Ĝuste en tia momento malgranda katido, bela neĝblanka besteto, kiu jam kelkan tempon promenis en la lotejo, sed de neniu atentata, nun saltis sur neokupitan seĝon, de tie sur la tablon kaj kun rekte levita vosto kaj iom kurbiĝinta dorso aliris al la paperoj, kuŝantaj antaŭ la kapitano. La leŭtenanto estis etendonta la manon por remeti la besteton sur la plankon, sed la kapitano, ne ŝatanto de katoj kaj kolerincitita de la ridoj, vidinte la kateton, kiu venis al li por ricevi kareseton, etendis sian dekstran manon, dikegan manon kun dikaj fingroj el kiuj tri estis ornamitaj per grandaj oraj ringoj kun juveloj, movis ĝin flanken kaj per unu forta, rapidega bato forbalais la katidon de sur la tablo; la besto flugŝvebis tra la salono trafis per la kapo kontraŭ la muro, konvulsie [238] movetiĝis kelke da fojoj sur la planko, vidigis la blankon de la okuloj kaj restis kuŝanta senmove, ŝajne senviva.

Murmuroj de malaprobo aŭdiĝis kaj la leŭtenanto kies vizaĝo esprimis kompaton pri la besteto kaj miron pro tia agado de sia estro, kunpremis la lipojn, sed silentis.

Paŭl sentis ke li mem paliĝas. Furioza pro la insultaj paroloj

de tiu ore ornamita viro, kies tuta eksteraĵo montris senkorecon kaj senkompaton, la juna viro unu momenton staris senmove rigardante unue la katidon, poste la kapitanon, kiu ne atentis plu sian viktimon. Subite li per tri longaj elastaj paŝoj fulmrapide kuris al li, haltis antaŭ la tablo, kaj penetre rigardante la kapitanon, metis ambaŭ manojn sur la tablon, sin klinis antaŭen preskaŭ ĝis la nazo de la terurita militisto, kiu sin reĵetis ĝis la dorso de sia seĝo, kiam Paŭl ekkriis al li rekte en la vizaĝon:

— Vi nomis min bastardo kaj demandis, kiu estas mia patro, mi povus demandi vin: Kia do estis la p a t r i n o, kiu tiel vin edukis?... Sed mi ne demandas tion, ĉar tio tute ne koncernas min, same kiel tute ne tuŝas vin, kiu povas esti mia patro... Mi nur sciigas vin ke mi mokegas vin, vian kazernon kaj tutan vian soldataron kaj ke mi ĝojas, ke viro kia vi... ne estas mia patro!!

Paŭl sin turnis kaj ĵetante lastan rigardon al la katido, kiu senviva kuŝis sur la planko, eliris el la lotejo, brufermante post si la pordon. Rapide li reiris al sia vilaĝo, tutsola sed feliĉa kaj pensis pri Eva demandante sin, kion ŝi diros eksciante pri lia alta numero, kiu lin liberigis de la milita servado kaj pri tio, ke li ne iros kazernon sub la komandon de la aroganta fiera kapitano, sed kiel antaŭe restos en la vilaĝo, sur la kamparo penante ŝpari la bezonan monon por iam aĉeti propran pecon de la tero.

Mezvoje li aŭdis malantaŭ si ĉareton, kiun tiris du grandaj hundoj. La bestoj kuris rapide kaj baldaŭ kuratingis Paŭl'on. Li flankeniĝis por ke ili povu preteriri, sed en la sama tempo li ĵetis rigardon sur la ĉaron kaj sur la hundojn. La bestoj spiregis pro laciĝo, iliaj langoj pendis el la buŝoj kaj estis kovritaj de gutanta salivo.[239] Paŭl konis la viron, sidantan en la ĉaro, kaj kiu de sur sia sidloko de tempo al tempo frapadis per la piedoj en la direkto al la spiregantaj bestoj, sed ne tuŝante ilin kvankam la efiko estis la sama, ĉar la hundoj kuris laŭ sia povo.

— Bolhojs! — ekkriis Paŭl.

— Paŭl! — responde kriis Bolhojs.

— Haltu momenton! diris Paŭl.

— Mi ne havas tempon!

— Haltu! — refoje kriis Paŭl.

La viro eksaltis el la ĉaro kaj la hundoj ekhaltis.

Paŭl iris al la ĉaristo, dirante:

— Mi volas doni al vi bonan konsilon!

— Bonan konsilon? Kiun do?

— Rigardu viajn hundojn!

— Nu!... kio do estas pri la hundoj?

— Aŭskultu Bolhojs; vi ne estas malbona viro, sed ŝajnas al mi, ke vi ne havas kompateman koron.

La viro kun miro rigardis Paŭlon kaj estis resaltonta sur sian ĉaron sed Paŭl kaptis lin je la brako.

— Mi ankoraŭ ne tute eldiris al vi mian konsilon — parolis plue Paŭl, tamen ĝi povus esti al vi tre profita.

Bolhojs, ankoraŭ ne komprenante kion celas la juna viro, rigardis lin de malsupre, ĉar Paŭl estis duonan metron pli altkreska ol li.

— Mi diros al vi mian konsilon — kviete parolis Paŭl, sed antaŭe diru al mi de kie vi nun venas kun la ĉaro kaj la hundoj.

Paŭl rigardis la bestojn, kiuj ambaŭ kuŝis sur la vojo, laŭte spiregante.

— De la urbo.

— Sekve viaj hundoj tiel kuris pli ol du horojn?

— Tion ili faras ĉiutage kaj ili jam kutimiĝis al tio.

— Al tio eĉ ĉevalo ne povas kutimiĝi, kiel do hundoj, tirantaj tian ĉaron kun tiom da pakaĵoj kaj kun via korpo. Ĉu vi ne vidas ke ili estas ellaciĝintaj ...[240] jen rigardu, ili kuŝas sur la vojo kaj kio estas pli malbone, ili soifas.

— En la vilaĝo mi ja donos al ili akvon.

— Vi devus trinkigi ilin jam antaŭ horo.

— Mi ja ne kunportas akvon — ridetante diris la ĉaristo, sed lia rideto ne estis sincera, ĉar la okuloj de Paŭl penetris ĝis lia animo.

— Akvon vi povas trovi en la longfoso.

— Ili tamen ne povas iri tien por trinki, la akvo estas tro malalta.

— Sed vi povas.

— Mi ja ne havas ujon por ŝerpi akvon.

— Jes, vi havas ujon — diris Paŭl kaj li kaptis la ĉapon de la kapo de la ĉaristo, paŝis al la longfoso, sin klinis, ĉerpis plenan ĉapon da akvo kaj iris kun ĝi al la hundoj, kiuj flarante la akvon, tuj ekstaris, moviĝante la vostojn.

— Nun donu al ili akvon! — parolis plue Paŭl.

— Vi strangulo estas! — diris la viro, sed li obeis. La hundoj trinkmalplenigis la tuton ĉapon.

— Nu! — diris Paŭl. — Ĉu ili soifas?... Sed tio estas nur la duono de mia konsilo. Ne sidu plu sur la ĉaro de ĉi tiu loko ĝis la vilaĝo. Mi jam diris al vi, ke vi ne estas malbona viro, vi ne batas la hundojn, sed vi ellacigos ilin kaj tio estas pli malbona ol bati.

Paŭl ekiris pluen kaj ankaŭ la ĉaristo promenis.

— Tiel trolacigante viajn hundojn, — daŭrigis Paŭl — vi ĉiujare bezonos novajn hundojn, sed donante al ili akvon mezvoje kaj ne ĉiam sidante sur la ĉaro, vi povas uzi ilin kvar jarojn kaj tio estas pli profitodona... Ĉu vi komprenas nun mian konsilon?

— Jes, mi komprenas ĝin.

— Ĉu vi estonte sekvos mian konsilon?

La ĉaristo refoje ridetis embarasite; post momento li respondis:

— Vi pravas, Paŭl, kaj mi sekvos la konsilon, kiun vi donis, sed sincere dirite, ĝis hodiaŭ mi tute ne pensis pri io tia.

— Ekzistas homoj — diris Paŭl — kiuj pensas nur pri si mem, kaj neniam pri bestoj, kaj ili forgesas pri tio, ke sen tiuj bestoj, ili ne povas prosperi en la mondo. Ili ekiris plue ĝis la vilaĝo; tie la ĉaristo sin turnis al alia strato kaj Paŭl marŝis rekten...

Peĉjo refoje staris sur la sojlo de sia domo kiam Paŭl proksimiĝis la „Verdan Ĉevalon"; la akraj okuloj de la drinkejestro tuj vidis la altan numeron, kiu sidis ankoraŭ sur la ĉapo de la junulo.

— Mi gratulas vin, Paŭl! — li ekkriis, irante al li kaj etendante la manon.

— Dankon! — diris Paŭl, tiel forte la manon premante de la drinkejestro, ke ĝi kraketis.

Paŭl ridetante iris pluen kaj Peĉjo, ankaŭ ridetante reiris en sian domon. Li sin direktis al sia kanapo, laŭte brufrapante la manplatojn kaj deklamis:

En ĉerk' ripozis Ŝercemul',
Li kuŝis sterniĝinta,
Kaj ĉiuj plendis: Ŝercemul
Nun estas jam mortinta!
Ho ve! ho ve! ho ve!!

El ĉerko saltis Ŝercemul'
Li dancis tra la domo,
Kaj ĉiuj kantis: Ŝercemul,
Vi estas strange homo!
Brave! brave! brave!! —

Poste li ekstaris kaj pensante pri siaj onkloj pereintaj en Rusujo kaj pri la soldatemo, li iris nutri siajn porkojn, forpelante per la silka ĉapro la muŝojn, kiuj svarmis sur la korpoj de la bestoj.

Dume Paŭl laŭiris la sablan vojeton al sia hejmo, jam de malproksime rigardante la dometon de Roos. Sed li ne vidis Eva'n, kvankam ŝi el post la fenestra kurteno lin vidis. Ŝi tuj rimarkis ke la papereto, kiu decidis pri lia sorto, sidas sur lia ĉapo, sed la distanco estis ankoraŭ tro granda por deĉifri la numeron. Kun batanta koro ŝi ekgenuis antaŭ la fenestro, iom supren ŝovis la kurtenon, premis la frunton sur la vitron por pli bone vidi. Fine ŝi povis deĉifri la feliĉ-alportintan numeron kaj plorante pro ĝojo ŝi rapidis en angulon de la ĉambro.

Paŭl rimarkis la moviĝantan kurtenon, sed ŝin li ne vidis. Kiam li preteriris la dometon, ŝajnis al li, ke denove la kurteno de la fenestro iom ŝoviĝas supren, sed ŝajnigante vidi nenion, marŝis pluen kaj iris hejmen por sciigi al siaj kanarietoj, ke la feliĉa numero, kiun li portas sur la ĉapo, liberigis lin de peza ŝarĝo, kiu jam de longe premis lian bruston.

ĈAPITRO XVI.

Kion Eva pensas pri Paŭl — Kion Paŭl pensas pri Eva — Kiel knaboj de vilaĝo sin amuzas kun ranoj kaj kiel ilia amuzo subite estas interrompita. — Paŭl kaj Eva.

La sekvanta tago estis dimanĉo. Eva jam frue ellitiĝis por iom senpolvigi la ĉambron kaj pretigi matenmanĝon por si kaj por sia patro. En tia tago ŝia patro kutime iris preĝejon. Ŝi iris nur malofte kaj la patro ne devigis ŝin iri tien.

Laborante ŝi pensis pri Paŭl. Li estis libera de la milita servado kaj ŝi ĝojis pro Paŭl kiu, kiel ŝi bone sciis, malamis la militan servadon kaj la vivon en granda urbo, kie li ne povus plugi, semi, rikolti, sed kie li devus fari marŝadojn kun tornistro sur la dorso kaj pafilo sur la ŝultro; krome ŝi sciis, ke Paŭl neniam fariĝus heroo; li estis forta kiel urso sed neniam malbone uzis siajn fortojn; li povus batali kontraŭ aliaj junuloj nur se oni incitus aŭ atakus lin, sed tion neniu faris pro la potencaj pugnoj de Paŭl. Eva sciis, ke li estas kvieta, bonkora, sentema kaj pacema. Laŭ ŝia opinio Paŭl estus sentaŭga soldato kaj sentaŭga militisto kaj ĉar li estis tre ŝatata kiel laboristo sur la kamparo, por li estus speciale grave liberigi sin de la milita servado pere de alta numero, kaj tian numeron li portis sur la ĉapo, kiam li reiris hejmen la antaŭan tagon. Volonte ŝi volus lin gratuli, sed eble li pensus ke tia gratulo estas ridinda, ĉar laŭ ŝia opinio, Paŭl ja tute ŝin ne atentas... pro ŝia malgrandeco; eble li povus pensi, ke ŝi volas altrudi sin al li; tiu penso pelis la sangon de ŝia koro al ŝia kapo. Eva tamen ĝojis ankaŭ pro alia kaŭzo: Se Paŭl devus fariĝi soldato, li irus en la kazernon, li vespere elirus kun siaj kamaradoj kaj ofte tiuj kamaradoj konatiĝos kun knabinoj de la urbo. Paŭl, kiu estis la plej altkreska, la plej belaspekta, povus elekti, ŝi imagis, el ĉiuj knabinoj, kiuj en la urbo kutimas konatiĝi kun la soldatoj de la garnizono. Eble li enamiĝus kaj li estus perdita por ŝi.

Pensante pri io tia, ŝi paliĝis; neniam ŝi estis montrinta per

vortoj aŭ per agoj kiel ŝi amas lin, kaj neniu sciis ke ŝi lin amas, ĉar tio estis ŝia sekreto, kuŝanta en la fundo de ŝia koro, kaj tiun sekreton ŝi volis gardi tie.

— Kial do mi ne estas pli altkreska? — ŝi sin demandis — eble li atentus min... eble li...

Eva laboris, senpolvigis la ĉambron, pretigis la kafon, la matenmanĝon ĉiam pensante pri Paŭl...

— — — — — — — — — — — — —

Paŭl ankoraŭ ne leviĝis je la oka horo de tiu dimanĉa mateno. Lia patrino jam unu horon estis el la lito, laborante dum Paŭl pensis pri Eva.

Li ĝojis, ĉar la alta numero savis lin de la milita servado, unue li ne amis la militan servadon, li ne amis loĝi en kazerno inter arogantaj kaporaloj kaj kapitanoj, kies kapriĉojn li devus toleri sen kontraŭstaro, kaj li sentis en sia koro ion, kio ne ĉiam povus reteni kaj regi lin kontraŭ tia kontraŭstaro. La antaŭan tagon li volonte estus rompinta la ripojn de tiu ore-ornamita kapitano, kaj en aliaj cirkonstancoj li eble tion farus. Sed li sciis, ke io tia en la milita servado estas severe punata kaj plej volonte li ne volus servi kiel pun-ekzemplo. Li sentis do, ke tiu alta numero, kiun li gardos kiel memoraĵon pri tiu feliĉa lotado, savas lin de multaj malagrablaĵoj; krome, li estis kamparano, ne sentante same kiel ankaŭ multaj aliaj kamparanoj — la plej malgrandan inklinon al la soldatemo. Li do sin gratulis, ĉar li povos resti kamparano. Li ĝojis pro io alia: Se li forirus kazernon, alia servisto dungiĝus al Baŭman. Eble li estus servisto pli malaltkreska ol li, servisto kun belaj bluaj okuloj, blondaj haroj, malpli grandaj piedoj kaj malpli grandaj manoj ol la liaj, kaj eble Eva enamiĝus je li. Li kredis ke Eva povus — se ŝi volus — elekti el ĉiuj junuloj, kiujn ŝi renkontos, ĉar Evan ĉiu konsideros kiel la plej belan kaj ĉarman el ĉiuj knabinoj.

— Ho! — li pensis plue, — kial mi ne estas pli malaltkreska? Kial mi ne havas bluajn okulojn, blondajn harojn, kial mi estas tia urso, kia povas plaĉi al neniu kaj precipe ne al Eva... Eble ŝi estas indiferenta pri mia liberiĝo el la milita servado kaj eble ŝi eĉ ne gratulos min.

Paŭl kuŝis en la lito, revante kaj pensante pri Eva...

Fine li ellitiĝis, sin lavis, sin vestis, matenmanĝis kun sia patrino, kiu kiel kutime estis tre silentema. Post la matenmanĝo li purigis la kaĝon de la kanarietoj, ĉar la patrino ne plu malpermesis al li havi birdojn en la ĉambro. La kaĝon li purigis ĉiudimanĉe. La birdetojn li amis kaj ili ne timis la grandegulon. Kiam li ŝovis la larĝan manon tra la malfermitan pordeton, ili plenfide sidiĝis sur ĝin, eĉ manĝis el ĝi pecetojn da sukero.

Post la purigado de la kaĝo, li iris eksterdomen sur la digon por pasigi la liberan tempon, ĉar li legis neniam, li apenaŭ sciis legi. Li lernis tiom malmulte en la tempo kiam li vizitadis la lernejon kaj ĉar li neniam ekzercadis sin poste, li estis forgesinta preskaŭ ĉion, kion li estis lerninta. Li sciis skribi sian nomon „Paŭl" per grandaj, malregulaj literoj, sed skribi leteron aŭ ion alian li neniam provis.

Paŭl do iris sur la digon kaj sidiĝis tie alrigardante la maron. La vetero estis bela, la suno jam ekbrilis. Pensante pri la hieraŭa tago kaj pri Eva, li sencele rigardis antaŭ si. Neniu estis sur la digo, nek sur la paŝtejo, sterniĝanta inter la digo kaj la slimaĵo de la maro. Nur aretoj da ŝafoj kaj kelkaj ĉevaloj kviete sin paŝtis tie kaj tie ĉi, kaj marbirdoj kiel ĉiam kaj seninterrompe ŝvebis en la radioj de la iom post iom supreniranta suno. De tempo al tempo li ĵetis rigardon malantaŭen al la dometo de Eva, sed li ne vidis ŝin.

— Ĉu ŝi ne venos por min gratuli? — li pensis, sed li baldaŭ forigis de si tiun penson, sciante ke por Eva estas indiferente ĉu li fariĝos soldato aŭ io alia.

— Eble aliaj knabinoj, okaze min renkontante, gratulos min — li pensis plue, sed tiaj gratuloj estos por li tute indiferentaj, li ŝatus nur ŝian gratulon, la gratulon de la malgranda Eva, kiu kompreneble jam aŭdis de sia patro, kiel finiĝis la tuta lotado, ĉar tio en malmultaj horoj disflugis en la tuta vilaĝo...

Ju pli klera la homo estas, des pli multe li pensas kaj meditas. Iu, kiu legis Shakespeare, Goethe, Schiller, Scott, Dickens, Tolstoj kaj multajn aliajn fame konatajn verkistojn, ĉiam povas

enpense iri de unu el tiuj verkistoj al alia kaj pensi pri iliaj verkoj; krome li pensas pri siaj ĉiutagaj aferoj kaj pri ĉio lin ĉirkaŭanta, sed ordinara viro kiel Paŭl, kiu neniam legas, neniam vizitas urbon, sed nur sian vilaĝon, kie nur malmulte da intereso okazas; viro kiel Paŭl, nur okupanta sin pri sia laboro, havas ĉiam la samajn pensojn, nome pri la brutaro, pri sia simpla ĉirkaŭaĵo. La hieraŭa lotado do estis por li io eksterordinara kaj li pensis pri ĝi, pri sia alta numero, pri tiu lotanto, kiu mokis la kapitanon, pri tiu kapitano mem, kiu agis tiel arogante kaj kiu per unu ekbato de sia ringornamita mano mortigis tiun katidon... Ho! kiel volonte Paŭl estus rompinta la ripojn aŭ disbatinta la kapon de tiu viro. Li ne povis kompreni kiel homo povas esti tiel sensenta, tiel senkompata pri bestoj. Ŝajnis al li ke tiuj homoj havas specialan koron, specialon karakteron, aŭ eĉ neniun karakteron. Paŭl denove rigardis al la maro kuŝantan trans la paŝtejo kaj iom post iom liaj pensoj forŝoviĝis de la konvulsie sin tordanta katido kaj de la lotejo al lia hejmo, al sia ĉiutaga laboro kaj... al Eva. Poste li pensis pri la mono, kiun li jam perlaboris dum la lastaj jaroj kaj kiel Baŭman gardas por li tiun monon kun escepto de sumeto, kiun li nepre devis elspezi por vestoj kaj ŝuoj. Image li vidis la akciojn, kiujn Baŭman montris al li dirante: Per tiuj paperetoj vi ricevos ĉiujare dek procentojn da rento, ne laborante por ĝi eĉ unu minuton; kaj Baŭman estis ridinta, kiam li post tiu certigo refoje metis tiujn paperetojn en sian ŝrankon. Paŭl ne povis kompreni kiamaniere li povas ricevi kvazaŭ donace tiujn procentojn; li sciis nenion pri la akcioj, nek pri la komerco de akcioj, nek pri la borso. Li ne sciis ke miloj da spekulantaj [241] homoj ĉiujare fariĝas riĉaj aŭ malriĉaj per tiaj paperetoj. Li plene fidis sian mastron kaj estis certa, ke ĉe la unua postulo li povos reakiri la tutan monon, kiun li konfidis al Baŭman.

Jam multfoje Paŭl kalkulis kiom da kampoj li povos aĉeti per sia mono kaj li atendis nur la favoran okazon por aĉeti ilin. Tuj post tiu aĉeto li intencos labori por si mem, sed li ne sciis ankoraŭ precize kiel li tion aranĝos. Ĉu resti servisto ĉe Baŭman kaj vespere prikulturadi sian propran teron? Ĉu

foriri de li por fariĝi ĝardenisto, plantante legomojn [242] sur siaj propraj kampoj?... Kiel li loĝos?... Li de malproksime rigardis la dometon de Eva. Tian dometon li tiel dezirus, tian homecan dometon kun... li preskaŭ ne kuraĝis pensi pri tio... kun Eva kiel mastrumantino. Kiel feliĉa li estus kun Eva!... Li havis nur unu idealon: tiujn kampojn, tian dometon kaj tian malgrandan edzinon... Ho! kial do li estas tia altkreska urso?...

Li ekstaris, ĵetis lastan rigardon sur la dometon kaj malsupreniris la digon sin direktante al la maro trans la herbejon, kie ŝafoj iris renkonte al li. Li karesis iliajn kapojn, ŝovis la grandajn manojn en ilian molan lanon, sed liaj manoj ilin ne timigis. La ŝafoj ne forkuris de li, ĉar ĉiu ŝafo tien sin paŝtanta konas lin kaj rigardas lin kiel amikon. Paŭl promenis pluen, fine liaj ŝuoj profundiĝis en la molan malsekan sablon de la marbordo, dum la akvo jam malsekigis iliajn plandojn. Li haltis kaj restis staranta kelkan tempon, rigardante la ŝipojn en la malproksimeco. Li vidis kelkajn grandajn vaporŝipojn trenantajn post si kvazaŭ longan voston da nigra fumo. Li sciis ke tiuj ŝipoj rapide moviĝas antaŭen kvankam ŝajnis kvazaŭ ili kŭsus senmove.

Multaj ŝipetoj de fiŝistoj sen aŭ kun veloj kuŝis tie kaj tie ĉi kiel makuletoj sur vasta spegulo. Tiajn ŝipetojn li tie vidis ĉiutage kaj li ne povis kompreni kiel ili kapablas ien enhaveniĝi, ĉar la distanco inter la haveno kaj ili estis, laŭ lia opinio, tiel granda ke ŝajne ili bezonos jaron por reveni. Paŭl iris returnen, ĉar la akvo plialtiĝis, sed li havis longajn krurojn kaj baldaŭ atingis la paŝtejon, kies nivelo kuŝas tiel alta, ke nur ĉe uraganoj [243] la ondoj ĝin superverŝas. Li iris inter la golfetoj, kiuj kiel brakoj de granda polipo entranĉiĝis de la maro al la digo, sed li konis tiujn brakojn, lin ili ne povos superruzi [244], li sciis kiam la marakvo ilin malaperigos, sed antaŭ tiu tempo li jam longe staros sur la paŝtejo. Unu fojon tiuj brakoj preskaŭ englutis Eva'n, sed feliĉe li povis ŝin savi.

Li iris pluen kaj nun estis sur tiu sama loko, kie li prenis ŝin sur la brakojn kaj portis tra la golfeton. Li rigardis la golfeton, iris pluen pensante: Ĉu ŝi ankoraŭ fojon pensos pri tiu

momento?... Jen li refoje staris sur la deklivo de la mardigo kaj ĝin supreniris. Iom post iom dum la suprenirado li ekvidis kelkajn turpintojn, poste la tegmentojn de la preĝejoj kaj kelkajn aretojn da arboj dise starantajn en la malproksimeco transe de la digo. Sur la digodorso li restis momenton, rigardante la dometon de Eva; poste li malrapide malsupreniris. —

— — — — — — — — — — — — —

Dimanĉe kelkaj junaj knaboj ofte promenas de la vilaĝo marbordon por tie sin amuzi banante siajn piedojn, serĉante konkojn kaj aliajn senvalorajn objektojn, kiujn la ondoj postlasas ĉe la forfluo.

Ankaŭ ĉi tiun dimanĉon areto da knaboj laŭiris la sablan vojeton, kondukantan de la makadama vojo al la mardigo. Suprenĵetante nubetojn da sablo per siaj rapidaj piedoj, la knaboj promenis kune laŭte babilante.

— Klaas Baners lotis sin soldato — diris unu el ili, subite ekparolante pri la hieraŭa lotado, kiu estis por vilaĝanoj grava okazintaĵo.

— Jes, lia patrino ploris kiam Klaas rehejmiĝis.

— Ĉu Klaas mem ne ploris?

— Li estis ebria, tiel ebria, ke Petro de la porkobuĉisto veturigis lin en ĉareto; li estis tiel ebria, ke li ne povis iri kaj lian numeron oni pingle fiksis sur lian ĉapon.

— Kiun numeron?

— La numeron du.

— La aliaj lotantoj almiksis cigarocindron en lian brandon, tial li tiel ebriiĝis.

— Mia patro diris, ke tio estas danĝera; cigarocindro en brando efikas kiel veneno, ĝi povas kaŭzi frenezecon.

— Ili enmiksis nur malmulton.

— Kion diris la patro de Klaas?

— Kion li dirus? Lia patro ja preskaŭ ne povas marŝi, li iras per lambastonoj.

— Ĉu li ne batis lin per lambastono?[245]

— Ho ne!... li bezonas ambaŭ bastonojn por resti sur la piedoj.

La knaboj ridis.

— Paŭl estas libera — diris post momento alia knabo.

— Jes, li kaptis la plej altan numeron.

— Sen tio li estus libera; li ja estas solfilo.

— Ho ne, mia patro diris ke li ne estas libera, ĉar li estas bastardo.

— Kio estas bastardo? — demandis unu el la knaboj, la plej juna, kiu ankoraŭ neniam aŭdis tiun vorton.

— Ĉu vi ne tion scias? Tio signifas ke li ne havas patron.

— Nu! — diris la knabeto, pripensinte momenton. — Nu! mia nevo, kiu loĝas en la urbo, ankaŭ ne havas patron, tamen spite tio li estis libera.

— Jes, li estis libera, sed lia patro ja estis mortinta.

— Kaj la patro de Paŭl?

— Paŭl neniam havis patron.

— Ĉu li neniam havis!? — mirigite demandis la knabeto.

— Neniam li havis, kaj ĝuste tial li estas bastardo, kaj ĝuste tial li ne estus libera se li ne estus kaptinta tiun altan numeron.

La knabeto tute ne povis kompreni kiel estas eble, ke oni neniam havis patron, sed li ne demandis klarigon, timante ke oni ridos lin pro lia nesciado.

— Feliĉe ke Paŭl estas libera — diris alia knabo, — ĉar li insultis la generalon dum la lotado...

— Tio estis kaporalo — interrompis alia.

— Ne, tio estis kapitano, diris la filo de la notario, kiu ŝajne povis pli bone diferencigi la militistajn rangojn.

— Paŭl ne timas nek generalon nek kapitanon.

— En la kazerno tio estus alia afero!

— La lotintoj diris, ke tiu kapitano unua insultis Paŭl'on.

— Li ne insultis lin, li simple diris al li, ke li estas bastardo.

— Nu! Ĉu tio ne estas insulto? Krome tiu kapitano mortigis katidon kaj tio kolerigis Paŭl'on.

— Ĉu tiu katido estis lia? — diris unu el la knaboj, malbela lamanta bubo kun malagrabla eksteraĵo kaj malicaj grizaj okuloj.

— Tiu katido ne estis lia, sed tiu viro ne havis ja la rajton mortigi ĝin.

— Nur la posedanto povas enmiksi sin en tion — diris la lamanta knabo, kaj post momento li daŭrigis, ĉar neniu el la aliaj ekparolis:

— Ni povas kaj rajtas fari kion ni volas kontraŭ besteto, kiu ne havas mastron.

— Vi eraras, la leĝo pri la bestprotektado malpermesas, ke ni malbone traktas bestojn — diris la plej juna knabo, kiu ŝajne amis bestojn.

— Ĝi protektas nur utilajn bestojn — diris la lamanto.

Parolante ili venis al la dometo de Roos; antaŭ tiu dometo kuŝis longfoso kun multaj ranoj, kiuj laŭte blekadis.

— Ranoj!! — subite kriis la lamanto.

Ĉiuj knaboj haltis antaŭ la longfoso kaj starantaj unu flanke de alia, rigardis la ranojn, kiuj disnaĝis inter la akvokreskaĵoj. Kelkaj eligis la kapon super la nivelon de la akvo, sed la lamanta knabo celante unu el tiuj kapoj, ĵetis al ĝi ŝtonon kaj ĉiuj kapoj subite subakviĝis.

— Kial do ĵeti ŝtonon al ranoj? — diris la juna knabo.

La ĵetinto ridis moke kaj sin klinis por kapti ranon, sed la besteto estis pli vigla ol li; rapide ĝi etendis la postajn krurojn kaj kiel sago malaperis en la profundaĵon. La knabeto ridis; antaŭvidante ke la lamanto faros al ĝi malbonon, li ĝojis ke la rano ĝustatempe sin savis.

La lamulo ne ridis sed pensis: — Ĉi tiun mi maltrafis, sed jam atendu, mi kaptos alian.

Ĉiuj knaboj scivole rigardis la lamulon, kiu senmove staris surgenue. Sin klinante super la akvo kaj etendante unu manon por kapti ranon li sin apogis per la alia sur la deklivo de la longfoso. Multaj ranoj naĝis tien kaj reen tra la klara akvo, fine unu sin riskis sub la etenditan manon kaj rapide la disstarantaj fingroj ĝin kaptis.

— Hura! — kriis la knaboj. Sed la plej juna ne kunkriis; li sentis kompaton antaŭvidante, ke la rano ne malkare pagos sian sengardemon.

— Ne faru al ĝi malbonon! — ekkriis la knabeto.

La lamulo alte tenis la ranon per unu el ĝiaj postaj kruroj kaj laŭte ridis.

— Ne mortigu ĝin! — ekkriis la knabeto.

— Ne timu, mi nur detiros ĝian jaketon.

— Kiel do? — demandis alia knabo, ne divenante la kruelan intencon de la lamulo.

Intertempe Eva estis elirinta el sia dometo kaj je kelka distanco regardis la knabojn.

— Atenton! — triumfe kriis la lamulo. Per la ungo de sia dika fingro li tratranĉis la haŭton de la rano sub ĝia piedeto, poste li prenis la piedeton inter du fingroj, per la alia mano li kaptis la tratranĉitan haŭton de la postapiedo, kaj per forta ektiro senhaŭtigis la ranon kiel oni senhaŭtigas angilon.

— Jen! — li kriis, svingante per unu mano la malplenan haŭton kaj per la alia la beston, kiu tordiĝis de doloro.

Laŭta krio de abomeno de l'knabeto kaj alia pli mallaŭta krio post lia dorso resonis. La lasta estis de Eva, kiu estis atestintino de tiu abomenaĵo.

— Tion mi diros al la policano! — kun indigno diris la knabeto, kiu volonte estus atakinta kaj puninta la kruelan lamulon. Tamen nek la ekkrioj nek la minaco de la knabeto lin efikis. La lamulo forĵetis la senhaŭtigitan ranon en la akvon kaj kaptis alian.

— Ne refaru tion!! — diris kelkaj knaboj.

— Ne maltrankviliĝu!... Mi faros el ĉi tiu belan balonon! triumfe ekkriis la lamulo.

— Ne mortigu ĝin! — minace diris kelkaj. Sed la lamulo, kiu estis la plej forta el ĉiuj knaboj, ĉiam agis kaj faris laŭ sia propra plaĉo, ankaŭ nun li tion intencis. Li ŝiris el la akvo dikan kanon, derompis la plej grandan parton, tiel ke restis el ĝi speco de tubo, dika kiel grifelo.[246] Tiun tubon li ŝovis en la postaĵon de la besto kriante:

— Jen atentu, mi faros el la rano aerbalonon!

Ĉiuj atente alrigardis, sed grandaj ektimo kaj abomeno kaptis la malplej junan knabeton, kiu refoje ekkriis:

— Pri tio mi plendos al la policano!!

La lamulo ne atendis; li kaptis la ranon ambaŭmane kaj enbuŝigante la kantubon, komencis plenblovi la besteton:

— Ĝi krevos!! — kriis la knaboj.

Sed la lamulo blovis plue dum lia vizaĝo ruĝiĝis pro streĉeco.

— Ekhaltu do!! — kriis alia knabo; ne krevigu ĝin!!

Terura ekkrio refoje aŭdiĝis post la knaboj. En la sama tempo, antaŭ ol iu povis atenti tiun krion, fulmorapide kuris al la lamulo longkreska viro, kaj antaŭ ol la bubaĉo povis sin turni, li sentis sin levata de la tero kaj fluganta super la akvo. Li etendis la brakojn, ellasis la besteton kaj falis en la longfoson meze de la ranoj, kiuj kun teruro disnaĝis ĉiuflanken. La knaboj forkuris kun surprizo kaj Paŭl kun vizaĝo kadavre pala, staris sur la bordo de la longfoso, rigardante la lamulon, kiu kun larĝe malfermitaj okuloj staris ĝis la buŝo en la akvo.

— Mi instruos al vi turmenti ranojn kaj fari el ili aerbalonojn! — li kriis, tremante de kolero. Poste ne atendante plu la bubaĉon, li sin turnis kaj rapidis al Eva por subteni ŝin, ĉar pro abomeno ŝi estis svenonta.

— Ho Paŭl!... kia abomenaĵo!! — ŝi diris apenaŭ aŭdeble. Paŭl ŝin levis de la tero kaj portis hejmen dum li pensis: Kian delikatan kaj senteblan koron ŝi havas.

Li sidigis ŝin sur seĝon kaj alŝovante al ŝi duan seĝon, eksidis ĉe ŝia flanko.

Kvietiĝu! — li diris.

— Ĝustatempe vi savis la ranon — ŝi diris ridetante kaj ruĝiĝante.

— Jes, ĝustatempe.

— Ĉu li ne povas droni?

— La bubaĉo?... ho ne! — lia nazo elstaris ankoraŭ el la akvo, li ja elrampos el la longfoso.

— Kie vi do staris? — ŝi demandis post momento.

— Mi estis preterironta vian domon kaj staris post la angulo, sed estis tro malfrue por eviti la torturon de la unua rano.

— Jes, tro malfrue... la kompatinda besto.

— Do mi kaŝis min post la angulo de via domo por rigardi kion li faros plue.

Ili silentis kelkan tempon kaj refoje Paŭl pensis: Kian senteman koron ŝi havas, dum Eva pensis: Kiel li kompatas ĉiujn bestojn... tiaj estas nur malmultaj viroj... neniu estas kiel Paŭl.

— Sed vi preskaŭ svenis? — li demandis post momento.

— Pro abomeno... jes, sed feliĉe vi kaptis min... sur la brakojn...

— Same kiel antaŭ nelonge — li diris.

— Jes, ĉu vi tion memoras? — ŝi demandis.

— Tion mi ĉiam memoros, Eva.

— Ankaŭ mi neniam pri tio forgesos, Paŭl.

Li prenis ŝian manon kaj ŝi ne retiris ĝin.

— Eva — li diris mallaŭte. — Kion vi opinias pri mi? Ŝi rigardis supren kaj iliaj okuloj renkontis sin reciproke.

— Ĉu vi rigardas min kiel urson? — li demandis.

— Kial do Paŭl?

— Ĉar mi estas tiel altkreska kaj tiel... malbela.

— Ho Paŭl, ne diru tion... Sed kio povas interesi al vi mia opinio?

— Kial do, Eva?... tio ne interesus min?

— Ĉar mi estas tiel malgranda... tiel sensignifa...

— Ho Eva, ne diru tion... Neniu knabino estas kiel vi... Refoje ili rigardis unu la alian.

— Mi ne komprenas vin Paŭl... ŝi diris mallaŭte kaj time, kaj ĉerpante iom da kuraĝo el liaj grandaj brunaj okuloj, kiuj amplene rigardis en la ŝiajn, ŝi diris plue:

— Ĉu vi ne rigardas min kiel tute sensignifan knabinon?

— Ne Eva, tion mi neniam faris... Neniu knabino estas kiel vi... kaj li premis ŝian manon. Ŝi iom sin klinis al li kaj malforte li premis ŝin al sia brusto.

— Ĉu vi povus iom... ami min, Eva? — li hezite demandis. Ŝi tremetis kaj kaŝis la vizaĝon je lia brusto dum ŝi flustris:

— Ĉu vi povus iom ami min Paŭl?... Mi ĉiam opiniis ke mi estas tro...

Paŭl ne respondis, sed pli forte ŝin premis al sia larĝa brusto, kaj post momento li flustris en ŝian orelon:

— Ĉu vere vi povus ami min?

— Jes Paŭl, nur vin!... sed pri io mi devas peti vian pardonon, kaj ŝi ekludis kun la plej malsupra butono de lia veŝto.

— Pri kio? — li demandis kun miro.

— Vi savis min de tiu insuleto... ŝi diris, kaptanta duan butonon.

— Jes.

— Mi venis tien... intence,[247] ŝi diris, kaptante la trian butonon.

— Intence!?... Kial?

— Mi sciis, ke vi sidas sur la mardigo kaj ke vi venos por forporti min sur la brakoj... ŝi flustris, kaj ŝiaj tremetantaj fingretoj rampis al la plej supra butono.

— Vi estas ruzulino! — li diris... sed volonte mi pardonas!

Ŝi ellasis la plej supran butonon, ĉirkaŭprenis lian dikan kolon kaj premante vangon sur la lian, diris tre mallaŭte.

— Ho Paŭl!... mi estas tiel feliĉa!

— Kaj vi ĉiam min amos?

— Ĉiam Paŭl!...

ĈAPITRO XVII.

Paŭl malfavore konsiderata, sed ne ĉe ĉiuj — Paŭl, Baŭman kaj akcioj — Paŭl iras urbon kaj pri tio, kion li spertas tie.

Pasis ankoraŭ unu jaro en kiu okazis malmulte sciiginda, sed ĉiu en la vilaĝo estis aŭdinta pri la strangaj faroj de Paŭl. La famo diskuris, ke li iom post iom fariĝis danĝera individuo,[249] ne ordinara perfortulo,[250] ĉar ĉiu sciis, ke Paŭl estas ĝentila kaj servema al homoj, kiuj ankaŭ al li estis tiaj, sed la famo diskuris ke oni estu singarda rilate al li, ĉar Paŭl, la fortega Paŭl, la grandegulo kun la pezaj pugnoj senkompate kaj senpripense ekatakis ĉiun, kiu ofendetis lin aŭ eĉ estis al li malagrabla.

Oni rakontis pri lia konduto kontraŭ la kapitano, kiun li geste kaj parole estis minacinta kaj kiun li estis renversonta de la seĝo en ĉeesto de leŭtenanto, de serĝento kaj ĉiuj lotantoj, nur ĉar tiu kapitano diris al li, ke li estas bastardo, kaj ĉar tiu kapitano estis foriginta katon de la tablo. Oni rakontis ankaŭ, ke Paŭl devigis la ĉariston ekhalti mezvoje nur por doni iom da akvo al la hundoj kaj tian agadon multaj vilaĝanoj konsideris ion ridinda: Paŭl tute ne rajtis sin enmiksi en la aferojn de tiu ĉaristo, kiu mem pagas siajn hundojn kaj kiu povos fari

kun la hundoj kion li deziras. Paŭl konstante ĉiam kaj ĉie ŝovis sian nazon en fremdan vazon. Ankaŭ oni disrakontis ke vera kompatindulo ludis kaj sin amuzis per ranoj. Paŭl subite ne riproĉante, nek avertante lin, ĵetis tiun lamulon en la mezon de larĝa kaj profunda longfoso, eĉ ne savante lin poste el tiu longfoso en kiu la knabo preskaŭ dronis, kaj sendube estus droninta, se aliaj knaboj ne estus helpintaj lin elrampi el la akvo. Paŭl estis do malfavore konsiderata de preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj, kaj nur malmultaj homoj kredis lin honesta, dece kondutanta juna viro. Inter tiuj malmultaj estis unue Erasmus, due la razisto, kiu kvarfoje ĉiujare tondis la harojn de Paŭl kaj kiu konis lian karakteron, trie Peĉjo Klakilo, kiu ŝatis la junulon, kompatis lin pro lia bastardeco kaj kiu konsideris lin kiel junan viron kun ora koro sub iom kruda eksteraĵo.

Paŭl mem sciis nenion pri ĉio, kion oni rakontis pri liaj faroj. Se li estus aŭdinta pri tio, li ridus pro tia sensensaĵo.[251] Li iris sian propran vojon, agis laŭ sia plaĉo, diligente laboradis la tutan tagon sur la kampo de Baŭman, kaj utiligis ĉiujn okazojn por renkonti Eva'n, kiu ridis pri la klaĉadoj, cirkulantaj[252] pri Paŭl kaj eĉ ne parolis pri ili al Paŭl. Eva bone konis, bone komprenis kaj kore amis sian Paŭl'on. Li estis por ŝi vera heroo (heroo sen glavo) protektanto de bestoj, junulo kun sentema, kompatema koro, kiun ŝi amos ĉiam kaj sen kies amo ŝi estus la plej malfeliĉa knabino en la mondo. Ofte ili sin renkontis ĉe ŝia domo, sed nur malofte li eniris tiun domon, ĉar iliaj amrilatoj ne estis publikaj, kvankam la patro de Eva jam delonge rimarkis, ke Paŭl atentas nur Eva'n kaj ke Eva atentas nur Paŭl'on, sed li faris kvazaŭ li rimarkus nenion, ĉar li ŝatis la junulon, kies karakteron li bone konis.

Paŭl dum tri jaroj, kiujn li laboris ĉe Baŭman, estis perlaborinta sufiĉe grandan monsumon, li opiniis, por aĉeti kelkajn kampojn, li interparolis pri tio kun Eva. Ili interkonsentis ke Paŭl aĉetos la kampojn, kaj ke tuj poste ili geedziĝos. Iun dimanĉon li iris do al Baŭman, demandis ĉu li estas inklina vendi al li la deziratajn kampojn, sed la farmisto diris al Paŭl, ke li estas nur farmisto kaj ne terposedanto, kaj ke nur la

posedanto rajtas vendi tiujn kampojn. Paŭl iris al la posedanto, sed tiu ne deziris vendi eĉ unu kampon, ĉar li deziris ke lia posedaĵo restu kia ĝi restis jam de pli ol du cent jaroj; sed li konsentis farmigi kelke da hektaroj da bona tero, kuŝantaj proksime de la dometo de Eva, kiujn la nuna farmanto ne volis refoje farmi pro sia multaĝeco.[253] Paŭl do farmis tiujn hektarojn, kelkaj el kiuj estis herbejoj kaj jam la sekvantan tagon parolis al Baŭman, kiu anstataŭ gratuli sian serviston, alrigardis lin iom moke kaj iom mistere. Je Paŭl tamen tiuj rigardoj ne efikis kaj li postulis la monon, kiun por li Baŭman gardadis.

Kutime la subuloj de la farmistoj kaj de la terposedantoj neniam eniras la familian ĉambron de siaj mastroj, sed ĉe tiu ĉi okazo al Paŭl estis permesite eniri tiun ĉambron, kaj li eksidis ĉe la tablo kun la ĉapo sur la kapo, ĉar kamparano preskaŭ neniam deprenas sian kapkovrilon antaŭ ol li enlitiĝas.

Baŭman malŝlosis grandan malnovmodan ŝrankon, kies malsupra parto enhavis tri profundajn kaj larĝajn tirkestojn kaj kies supra parto estis provizita je du skulptitaj pordoj. Tiujn pordojn li malŝlosis. Kelkaj tirkestetoj videbliĝis kaj unu el ili Baŭman tiris al si kaj elprenis paketon ĉirkaŭvolvitan per ruĝa rubando.

— Mia mono! — pensis Paŭl. Samtempe li pensis pri siaj farmotaj kampoj, paŝtejoj kaj pri Eva.

Baŭman reŝlosis la pordojn de la ŝranko, sidiĝis antaŭ Paŭl kaj malrapide forigis la rubandon de la paketo dum li diris:

— Kiom da mono vi repostulas nun?

— Ĉion — kviete respondis Paŭl.

— Sed kiom vi bezonas por tiuj farmotaj kampoj kaj paŝtejoj.

— Kvar cent guldenojn, kaj ducent mi bezonos por kelkaj laboriloj. La monon, kiu al mi mankas, mi prunteprenos de Roos.

— Vi scias, ke mi aĉetis per via mono — sescent guldenoj — tri akciojn; mi sekve enmanigos nun al vi tiujn tri akciojn kun la kvitanco, kiun mi ricevis de la bankisto en la urbo. Kontrolu[254] mem, ĉu ĉio estas en bona ordo.

— Jam donu; mi komprenas ja nenion pri akcioj, nek pri tiaj kvitancoj...

— La afero estas tre simpla: Mi aĉetis por kvar cent guldenoj la jenajn du akciojn — komparu ilin kaj rigardu la kvitancon! — Baŭman montris du akciojn po ducent guldenoj kaj kvitancon, [255] kiu indikis la saman sumon, poste li daŭrigis:

— Vi povas vidi kaj kontroli ke mi pagis por tiuj du akcioj kvarcent guldenojn.

Paŭl komparis kaj opiniis ke ĉio estas en ordo.

— Kaj jen ankoraŭ unu akcio je ducent guldenoj kun la kvitanco. Komparu ilin...

Paŭl komparis ilin nur por kontentigi sian mastron, kiun li plene fidis.

— Bone! — li diris; sed mi preferas la monon.

— La bankisto ŝanĝos ilin je mono, transkalkulante laŭ la nuna kurso, [256] la nuna valoro de la akcioj.

— Ili tamen devos valori kune ses cent guldenojn! — diris Paŭl.

— Jes, eble ili valoros ankoraŭ pli multe; tio dependas de cirkonstancoj, ĉar akcioj altiĝas aŭ malaltiĝas, dependante de la kurso. Sed mi ŝuldas al vi ankoraŭ la renton, kiun pagis al mi por la akcioj la bankisto. Jen la kalkulo pri tiu rento; rigardu: kune kvardek kvar guldenoj... kontrolu mem.

Paŭl prenis la paperetojn kun la prinotaĵoj, sed tute ne komprenis tiujn ciferojn kaj la skribitajn vortojn. Li sciis iom legi presitajn literojn, sed nur tre malbone skribitaĵon, sed la du ciferojn: unu „kvaro" kaj ankoraŭ unu „kvaro", li bone vidis kaj li sciis, ke tiuj du ciferoj estas kune kvardek-kvar.

— Nu, bone! — li diris prenante la akciojn kaj la renton; sed kiel mi ricevos la monon?

— Iru al la bankisto; li loĝas en la urbo kaj li povas pagi al vi la monon interŝanĝe por la akcioj.

— Sed kie... en kiu strato loĝas tiu bankisto?

— Jen! — diris Baŭmon, fingre montrante la adreson, kiu staris presita sur la kvitanco.

— Heerestraat, numero 28!? — legis Paŭl.

— Jes! Iru tien; la oficejo estas malfermita matene de la naŭa horo ĝis la kvara de la posttagmezo.

— Mi tuj tien iros — kviete diris Paŭl.

— Antaŭe subskribu ĉi tiun papereton.

— Subskribi!?

— Jes; mi gardadis vian monon, kaj nun mi redonis ĝin al vi. Mi do devas havi la ateston, ke mi redonis al vi vian proprajon kaj ke mi ŝuldas al vi plu nenion.

— Tio estas justa, sed iom stranga! Mi ja ankaŭ ne postulis de vi la pruvon, ke vi gardos mian monon?

— Tion vi ne faris, sed se vi estus postulinta, mi tuj estus doninta al vi subskribitan pruvon.

Paŭl rigardis la subskribotan papereton kaj penis legi la enhavon.

— Mi legos kion mi skribis, diris Baŭman, kaj ŝovante la montrofingron laŭ la vortoj, li malrapide legis:

„La subskribinto atestas per sia subskribo ke Teodoro „Baŭman ŝuldas al li plu nenion kaj ke li rericevis de li „la tutan monsumon — sescent guldenojn (kaj la renton —) „kiujn li konfidis al la nomita Teodoro Baŭman."

— Nu, bone! — diris Paŭl, kaj li prenis la plumon, kiu estis por liaj fingroj tiel maldika kaj malfortika, ke li timis rompi ĝin ĉe la unua ektuŝo kaj singarde kaj kunpremante la lipojn, li per grandaj ŝanceliĝantaj literoj subskribis „Paŭl".

— Ankaŭ vian familian nomon.

— Tiun mi ankoraŭ neniam skribis, mi eĉ ne sciias ĝin silabi, — diris Paŭl, pensante pri la stranga nomo, laŭtlegita de la kapitano dum la lotado.

— Mi ĝin skribos krajone por ke vi povu kopii la literojn — diris Baŭman, kaj per grandaj klaraj literoj li skribis: „Mitropolijoka."

Paŭl kopiis literon post litero la tutan nomon kaj ekstaris.

— Jen ni kvitiĝis[257] unu kun alia Paŭl!...

La farmistoj kaj vilaĝanoj ĉiam sencermonie agas unu al alia, ankaŭ Paŭl tute sencermonie foriris el la domo de Baŭman kaj rehejmiĝis por surmeti siajn dimanĉajn vestojn kaj tuj poste iri al la urbo, al la bankiero, kiu elpagos al li la sescent guldenojn interŝanĝe por tiuj akcioj. Li antaŭe ne volis paroli pri tio al Eva, ĉar en la vespero li intencis surprizi ŝin per la

multa mono, kiun li perlaboris kaj per kiu li farmos la kampojn kaj paŝtejojn.

Kun vizaĝo lumanta de feliĉaj esperoj kaj atendoj kaj kun malpeza koro, Paŭl ekiris laŭlonge de la sabla vojeto, preter la dometo de Eva, kiun li ne vidis, poste laŭlonge de la makadama vojo al la vilaĝo kaj de tie li komencis sian piedan vojaĝon al la urbo. Neniam li estis ĝin vidinta, li nur sciis kien li devos direkti la paŝojn kaj kiun vojon li devos laŭiri por alveni post trihora marŝado en Groningen. Sed li paŝis tiel rapide, ke li bezonis nur du horojn. Tio estis por li vera ĝuiga promenado; neniam li estis irinta laŭlonge de la longa vojo al la urbo, kie ĉie ĉe ambaŭ vojflankoj li vidis belajn kampojn kaj paŝtejojn kun paŝtiĝantaj bovinoj, dum la kamperanoj tie kaj tie ĉi diligente laboris apud la farmodomoj, ĉie dissemitaj laŭ grandaj distancoj, komenciĝante tuj trans la longfosoj, paralele kurantaj ĉe ambaŭflankoj de la malmola makadama vojo. Paŭl pensis pri sia estonteco kaj li estis en tiu momento la plej feliĉa kaj la plej kontenta viro en la mondo. Li ne estis ambicia,[258] nek aspiris riĉaĵojn; li aspiris nur simplan kamparanan dometon en kiu li povus loĝi kun sia Eva, kiun li ne ŝanĝus kontraŭ princino, ĉar laŭ lia opinio estis nur unu knabino, kiu povus lin feliĉigi. Paŭl pripensis kiel li proponos siajn planojn al ŝia patro kaj jam de antaŭe sciis, ke li aprobos liajn intencojn. Li dezirus loĝi en la domo de Eva kune kun ŝi kaj ŝia patro, sed se la patro pli volonte dezirus restadi sola... nu, en tiu okazo Paŭl luus alian dometon; ĉio tio ja aranĝiĝos sen peno kaj per si mem.

Paŭl estis cedema kaj kontraŭis neniun kaj agis ĉiam dece al aliulo, kiu agis al li, laŭ deca maniero. Paŭl estis tre honesta junulo, li postulis nur honestecon de aliaj homoj, ne dezirante ke oni faru al li servojn, kvankam li ĉiam estis preta kaj inklina servi aliulojn. Tia estas la karaktero de ĉiuj homoj kiel Paŭl; ĝuste la malon oni spertas ĉe egoistoj, kiuj konstante postulas kaj atendas servojn de aliuloj, al neniu iam farante servon, se tiu servo atendigus por li nenian profiton. Paŭl propramove, proprainiciate[259] prilaborus kampon por malfeliĉa viro aŭ por virino, kiu pro malsaneco aŭ pro alia kaŭzo ne povus mem prizorgi tiun laboron; por tiu sia laboro li postulus nenion, lia

koro instigas lin al tia agado, sed des pli multe li ŝatus la bonan traktadon de aliaj personoj rilate al si. Li estis sentema je amikaj agoj kaj neniam forgesis ilin, eĉ bagateloj restis engravuritaj en lia sentema animo. Ofte li pensis pri la pupo, kiun donis al li Erasmus, pri la protekto, kiun la barbiro ĉiam al li montris, kaj pri liaj amikaj paroloj. Male ofte, kvankam sen venĝosento, li rememoris la akrajn parolojn de la razistedzino, kiuj efikis je li pli multe ol je multaj aliaj malpli sentemaj infanoj. Paŭl estis giganto, kiun delikata mano povis regi kaj eĉ komandi; sed al persono, kiu intence lin trompis, li povus rompi la ripojn. Certe li ne estis heroo, li ne povus trapiki per bajoneto iun nekonatulon, kiun la sorto subite starigus antaŭ lin. Politikajn kaj naciajn malamikojn Paŭl ne konis, kaj li ne volus ilin koni. Se ĉiuj devige servantaj militistoj estus tiaj gigantoj kiel Paŭl, kaj havus samajn opiniojn, Napoleono ne estus gajninta la batalon ĉe Aŭsterliz kaj ĉe Wagram. Sed se deko da viroj perforte enirus lian domon, tiam el la pacema kaj cedema Paŭl estiĝus subite heroo pli granda ol la senmakula kaj senriproĉa heroo, pri kiu tiel ofte rakontas al ni la historio. Paŭl timis neniun kaj neniu bezonus timi lin. Tia estis Paŭl kaj tia lin konis Eva kaj ŝi estis fiera ke tia knabego, tia bonkora kaj honesta juna viro konsideris ŝin kiel la solan, kiun li deziris por si kiel sian edzinon.

Paŭl ankoraŭ nenion sciis pri karakteroj kaj ne sin okupis pri tiu temo. Li sciis nur, ke ekzistas malbonaj kaj bonaj homoj, la lastajn li estimis ne demandante ĉu ili estas generaloj aŭ almozuloj. Paŭl iris sian vojon kiel Don Kiĥoto iris la sian, ne demandante ĉu iu leĝo aŭ registaro eble sin levus antaŭ li por kontraŭstari liajn agojn, ĉar konstante li opiniis, ke la justeco estas ĉiam ĉe la flanko de la honestulo kaj neniam naskiĝis en lia kapo la ideo, ke maljustaĵoj povos esti protektataj de leĝoj. Paŭl neniam aŭdis pri la ebleco, ke fripono kelkfoje povas uzi ekzistantajn leĝojn por prirabi aliajn homojn aŭ malutili al ili. Io tia estus laŭ lia opinio la plej granda absurdaĵo.[260]

Laŭ lia opinio nur honesteco kaj justeco povas triumfi kaj lia morala leĝo estis: estu honesta kaj fidinda; helpu al tiu, kiu bezonas vian helpon se vi kapablas tion fari.

Je tagmezo li eniris la urbon kaj demandis al policano pri la vojo al la banko.

— Kiu strato? — demandis la policano kun miro rigardante la altkreskan fremdulon.

— Heerestrato — respondis Paŭl.

— Jen, atentu! Iru rekten ĝis tiu placo tie antaŭ vi, poste turnu vin dekstren kaj iru ĝis vi atingis preĝejon kun maldika, sed alta turo, poste turnu vin maldekstren kaj baldaŭ vi vidos antaŭ vi la Heerestraton.

Paŭl dankis la policanon kaj iris pluen. Tiajn altajn domojn, unu flanke de la alia tute sen ia interspaco, li ankoraŭ neniam vidis, nek tiajn grandajn butikojn kun elmontro[261] post la fenestroj, kie dise kuŝis ĉiaj objektoj... Sed li iris pluen ne rigardante la elmetitajn objektojn pro timo ke li forgesos la indikitan direkton, fine li atingis la maldikan turon. Ĉe la turo li sin direktis maldekstren kaj eniris larĝan straton. Preterirantan knabon li demandis ĉu tio estas la Heerestrato.

Stratobuboj en urboj sin sentas ofte inklinaj iom moki vilaĝanojn, sed ĉi tiu vilaĝano estis tiel neordinare altkreska kaj lia voĉo estis tiel laŭta (ordinare vilaĝanoj kaj precipe kamparanoj parolas laŭtvoĉe, ĉar ili kutime parolas unu al alia je distanco) ke la bubo simple jesis la demandon, aldonante neniun ŝercaĵon aŭ mokaĵon. Kun miro li rigardis la fremdulon, restis momenton staranta por postrigardi lin kaj diris al si:

— Tian grandegulon mi ankoraŭ neniam vidis; li povus admirigi sin ĉe Barnum kaj Baly. *)

Paŭl laŭiris la dekstran flankon de la strato por serĉi la numeron 28 kaj vidis la numeron 123; la najbara domo portis sur la pordokadro la numeron 121. Li preteriris tiujn du domojn, rigardante la sekvantajn numerojn kaj iris ĝis li trovis la numeron 1.

Tie li miris nenie vidante la serĉatan numeron 28. Li ne sciis, ke ĉe la unua stratflanko troviĝas nur la paraj kaj ĉe

*) Barnum kaj Baly (elparolu Beli) estis ĉiekonataj direktoroj de granda cirko kun ordinaraj rajdistoj, akrobatoj, sovaĝaj brutoj kaj nenormalaj homoj, ekzemple: virino kun barbo, viroj de eksterordinara forteco, grandeguloj, pigmeoj kaj tiel plu. Tiu cirko vojaĝis de urbo al urbo.

la alia flanko la malparaj numeroj. Laŭtrafe [262] li returneniris rigardante la domnumerojn ĉe la alia stratoflanko kaj ekvidis la numerojn 2, 4, 6 kaj tiel plu ĝis 28.

— Jen la banko [263] — li pensis kaj supreniris la peronon. La pordo malfermiĝis kaj enirante li staris antaŭ livree vestita viro, kiu post li fermis la pordon.

— Mi havas akciojn por ŝanĝi kontraŭ mono, diris Paŭl al la pordisto. Ĉi tiu montris longan koridoron ĉe kies unu flanko estis kvar fenestretoj malantaŭ kiuj staris po unu pupitro [264]. Li iris al la unua. Skribisto kun plumo en la mano suprenŝovis la fenestreton:

— Kion vi deziras, sinjoro? — li demandis Paŭl'on.

— Mi deziras monon por ĉi tiuj akcioj.

— Steels! *) — diris la skribisto, ekzameninte la akciojn. Poste li foriris kun ili kaj revenis post momento.

— Ili tre malaltiĝis, sinjoro, la kurso de ĉi tiuj kvar estas hodiaŭ dek, kaj tiu de tiuj du aliaj estas dudek... Ĉu vi deziras nepre arĝentigi [265] ilin?

— Arĝentigi?

— Vendi?

— Jes, mi bezonas monon.

La skribisto denove foriris kaj revenis post kelke da minutoj kun kalkulo kaj mono.

— Tre okaze ni havas aĉetanton por Steels — li diris, kalkulante al Paŭl sur breto, sub la suprenŝovita fenestreto, okdek guldenojn.

Paŭl pensante ke tio estas nur parto de la pagota sumo atendis, sed la skribisto foriris kaj ne revenis. Fine vidante, ke Paŭl restas staranta li reiris al li kaj demandis:

— Ĉu vi deziras ankoraŭ ion alian, sinjoro?

— Jes — diris Paŭl.

— Kion do?

— La ceteran monon!

— Jen via mono, laŭ la aldonita kalkulo.

---

*) Steels, multenombro de Steel (elparolu stil): akcioj de kompanio ekspluatanta fer-minejon; tiuj akcioj estis tre spekulativaj.

— Kion vi diras?... Ĉu mi ne povas ricevi tutan mian monon?

— Mi pagis la tutan sumon... laŭ la hodiaŭa kurso... kune: okdek guldenojn.

— Sed mi transdonis al vi por sescent guldenoj.

— Vi pravas, sed la kurso estas tre malalta kaj ni ne povas pagi pli altan sumon.

— Tion mi ne komprenas! diris Paŭl.

— Ĉu vi mem ne aĉetis tiujn akciojn tie ĉi?

— Tion faris por mi la farmisto Baŭman, kies servisto mi estis.

— Kian Baŭman?

Paŭl nomis sian vilaĝon kaj montris la kvitancon, kiun Baŭman estis doninta al li.

— Mi tuj serĉos lian nomon — diris la skribisto, refoje forirante sed tuj reaperante ĉe la giĉeto.[266]

— Vi pravas! — li diris post momento. Sinjoro Teodoro Baŭman aĉetis ilin antaŭ du jaroj... sed por si mem...

Jen rigardu!

Paŭl rigardis la liston sed komprenis nenion pri tiu longa vico da nomoj unu sub la alia, nek pri la notaĵoj, datoj kaj ciferoj, tial li fine diris:

— Mi fidis Baŭman kaj konfidis al li mian tutan monon, kiun mi perlaboris ĉe li; li promesis al mi jaran renton... kial do li aĉetis tiajn paperojn!?

— Li aĉetis ankaŭ aliajn.

— Ĉu tiuj aliaj ankaŭ tiom multe...? Paŭl serĉis la ĝustan vorton sed ne plu memoris ĝin.

— ... tiom multe malaltiĝis? vi volis diri?

— Jes.

— Ne ĉiuj, sed la „Steels" estas tre spekulativaj.[267]

— Kion signifas spekulativa?

Alia skribisto, verŝajne superulo de la alia, intertempe aliris al la interparolantoj kaj sin enmiksis. Li baldaŭ komprenis, ke li parolas kun trompito kaj rigardante kun kompato la honestan grandegulon, li fine diris:

— Tiu Baŭman spekulis[268] per via mono.

— Kio estas „spekuli"? — demandis Paŭl, iom paliĝante kaj komprenante ke li estas viktimo de trompaĵo.

— Ĉu vi neniam spekulis?

— Mi eĉ ne scias kio estas spekuli!

— Nu, mi tion klarigos al vi... Ĉi tiuj akcioj estas jen de alta, jen de malalta valoro. Baŭman aĉetis ilin per sescent guldenoj, esperante ke post kelkaj monatoj ili valoros la duoblan monsumon, sed malfeliĉe por li, ĝuste la malo okazis, kaj mi timas ke ili malaltiĝos ankoraŭ pli multe.

— Sed supozu ke ilia valoro estus duobliĝinta?

— Tiam verŝajne Baŭman estus vendinta ilin kaj aĉetinta aliajn akciojn.

— Sed la gajno?

— Li povus eniposigi tiun gajnon... aŭ doni al vi.

— Sekve li riskis mian monon kaj kvazaŭ ludis per ĝi en loterio?

— Jen la ĝusta esprimo.

— Kion mi nun devos fari? — demandis Paŭl kiu paliĝis de kolero kaj indigno.

— Vi decidu mem. Vi povas repreni la akciojn kaj paroli pri la afero kun Baŭman... aŭ akcepti la monon.

— Redonu la akciojn, mi petas! — diris Paŭl. — Tiun monon mi ne volas... mi postulas miajn sescent guldenojn.

— Ĉu vi posedas pruvojn?

— Pruvojn?

— Ke li agis malhoneste?

— Mi ne havas pruvojn... sed li havas skribitan pruvon de mi.

— Kion do?

— Ke mi ŝuldas al li nenion kaj ke li ŝuldas nenion al mi... alivorte... ke ni kvitiĝis reciproke. Ion tian mi subskribis kiam li redonis al mi la ses akciojn.

— Vi estas la viktimo,[269] sinjoro.

— Viktimo?... Paŭlo ne komprenis tiun vorton.

— La trompito.

— Sed li repagos al mi la sescent guldenojn.

— Vi subskribis ja ke li ŝuldas al vi plu nenion.

— Ĉu li subskribigis min por... por...

— Por havi en la mano la armilon sin defendi kontraŭ vi kaj por leĝe pruvi, ke vi kaj la estas kvitaj.

— Li sekve ne bezonos repagi al mi mian monon?

— Li ja repagis.

— Jes, per akcioj, valorantaj preskaŭ nenion.

— Vi subskribis ke li ŝuldas al vi plu nenion... Nenio estos farebla kontraŭ li.

Paŭl pugnigis ambaŭ manojn kaj tremante ekkriis.

— Tion mi instruos al li!!...

— Estu singarda, sinjoro... Vi havas neniajn pruvojn, vi ja subskribis dokumenton, ke li ŝuldas al vi nenion.

— Sed li trompis min!!

— Morale sed ne laŭlege.

— Tion mi montros al li!

Paŭl iris for kaj la skribistoj kun kompato postrigardis lin.

ĈAPITRO XVIII.

Baŭman kaj lia familio — Pri geedziĝo kaj doto.

Baŭman sin sentis tre maltrankvila, kiam Paŭl eliris lian domon kun la akcioj en la poŝo. Tiujn akciojn li estis aĉetinta per la mono de Paŭl, bone sciante, ke li riskos ties perlaboritan salajron, sed Baŭman, kiu estis malhonestulo, volonte spekulis kaj li konsideris la okazon tre favora; li ne bezonos riski sian propran monon, kaj se la fortuno decidus ke la akcioj plialtiĝos, li havus belan profiton, ĉar li povus redoni al Paŭl la al si konfiditan monsumon, sciante ke lia servisto komprenas nenion pri borsaferoj. La Steel-akcioj tamen estis preskaŭ senvaloriĝintaj kaj donante al Paŭl tiujn akciojn anstataŭ la sescent guldenoj, Baŭman estis spekulinta je liaj kostoj kaj malgajno, kaj la papereto subskribita de la servisto, protektis lin kontraŭ ĉiu leĝa persekuto. Sed kvankam li ne bezonos perdi eĉ unu cendon, li estis tre malkvieta kaj postrigardis Paŭl'on, antaŭvidante ke ĉi tiu revenos post kelke da horoj por repostuli sian al li konfiditan monon.

Li ne parolis pri ĉio tio al sia edzino, nek al sia sola filo Johano, kaj iris al la kamparo. —

Lia filo estis irinta brutarejon por nutri la ĉevalojn, la porkojn, poste li volis sekvi sian patron, sed ne trovis lin. Reveninte por matenmanĝi li trovis nur sian patrinon en la familioĉambro.

— Patro ankoraŭ ne revenis — ŝi diris pretigante la manĝotablon.

Johano ne respondis, li ne estis babilema, kaj pensis ke la patro ja baldaŭ revenos por matenmanĝi, sed ĉar li ne revenis eĉ post duonhoro, ili komencis kune matenmanĝi sen la farmisto.

La edzino de Baŭman estis sesdekjara fortkorpa virino kun dika, ruĝa vizaĝo kaj jam grizaj haroj. Ŝi estis laŭ eksteraĵo kaj laŭ manieroj vera kamparanino kaj nur tre malofte eliris el la farmodomo. Ŝi, tute kiel Johano, parolis malmulte. Johano estis tre malbela fraŭlo kvardekjara kaj ĉiu pensis ke li neniam edziĝos kaj eĉ li mem pensis tion ĝis antaŭ kelkaj tagoj, ĉar neniam li sentis inklinon ligi sin al edzino; virinojn li tute ne ŝatis. En la lastaj tagoj tamen li kelkfoje vizitis la „Verdan Ĉevalon" kaj ĉe ĉiu eble favora momento li parolis kun la dikvanga Alino, kies tuta eksteraĵo (kun escepto de la haroj) ŝajnis simili tiun de lia patrino. Li interparolis kun Alino, ne tial ke li trovis ŝin aminda aŭ bela, ĉar pri io tia li ne pensis; li pensis pri la mono, kiun laŭ la kuranta famo, posedas Peĉjo Blunt, la posedanto de la „Verda Ĉevalo". Ofte li en la lastaj tagoj pensis, ke Alino kaj li eble estos bona paro, kiu duope povos kolekti beletan monsumon. Li ne tre deziris fariĝi drinkejestro, ĉar tio ne konformiĝis je lia farmista rango, sed li ja povos farmi ie en la ĉirkaŭaĵo de la vilaĝo bonan farmejon. Li sciis, ke lia patro ne senvestiĝos antaŭ ol enlitiĝi *); tio estas ke lia patro ne donos al li ĉiun sian monon por instali sian filon en farmejon, kvankam eble li helpos per malgranda kapitalo; sekve la filo bezonos alian monon, tial li de tempo al

*) Nederlanda esprimo kiu signifas: Li ne fordonos sian kapitalon dum li vivas ankoraŭ.

tempo komprenigis al Alino siajn intencojn, aludante ŝian freŝan vizaĝon, ŝiajn kapablecon kaj taŭgecon pri la mastrumado, melkado, buterfarado kaj pri tio, ke ŝi estus lerta farmistino kaj tiel plu, sed neniam tuŝante la financan aferon, komprenante ke ŝi mem tion prizorgos, ĉar la tuta vilaĝo konis ŝiajn avarecon kaj avidecon, ĉiu sciis, ke neniam ŝi donas al malriĉuloj, ke ŝia sola devizo estas: „Ĉiu zorgu por si mem." Ĉar ankaŭ Johano havis la saman devizon; li opiniis, ke la filino de Petro Blunt kaj la filo de Teodoro Baŭman estos bona paro. Pri tio li denove nun pensis, sidante ĉe la tablo kaj atendante la revenon de sia patro. Post momento li diris tion saman, kion antaŭ kvaronhoro estis dirinta lia patrino:

— Patro ankoraŭ ne revenis.

— Estus bone ke ni komencis matenmanĝi.

— Jes.

Ili komencis manĝi buterpanojn kaj trinki kafon. Post momento ŝi diris:

— Mi aŭdis, ke Paŭl sin svatas Eva'n.

— Jes, tion mi ankaŭ aŭdis.

— Eble baldaŭ ili geedziĝos.

— Jes.

— Ĉiuj geedziĝos; unu post alia. — Ŝi diris post momento de silentado kaj manĝado.

— Jes.

— Ĉu ankaŭ vi ne pensas pri edziĝo.

— Jes.

— Vere? — ŝi diris mirigite.

— Jes.

— Kaj kun kiu?... Ĉu vi jam longe pensis pri tio?

— Ne.

— De post kiam?

— Mi ne scias precize.

— Kompreneble vi tion ne scias precize, sed vi do scias kun kiu.

— Jes, kompreneble.

Ambaŭ refoje silentis momenton; ambaŭ manĝis kaj trinkis. Li, pripensante kiel li rakontos siajn planojn kaj intencojn, kaj

kion la patrino opinios pri tio, ke liaj okuloj falis sur vilaĝaninon (en realo sur ŝian monon) kaj ne sur filinon de farmisto. Ŝi, pripensante, kiu do povas esti ŝia estonta bofilino... kaj ĉu ŝi kunprenos bonan doton, ĉar la doto estos la ĉefa afero.

Dum kelke da minutoj ambaŭ pripensadis, sed neniu ekparolis ankoraŭ. Ili manĝis kaj trinkis: li, atendante ke ŝi faros novan demandon; ŝi, atendante, ke li ekparolos. Sed demandon ŝi ne faris kaj li ne ekparolis. Oni aŭdis nenion krom la tiktakanta malnovmoda horloĝo, pendanta sur la muro. Fine ŝi ne povis plu regi sian scivolon kaj diris:

— Kial do vi neniam parolis pri tio?

— Pri kio?

— Kompreneble pri viaj edziĝaj intencoj!

— Ho! — Nu, do... ili ja ne estas ankoraŭ tre certaj... mi proponis al ŝi ankoraŭ nenion.

— Al kiu?

— Kompreneble al ŝi!

— Sed kiu do ŝi estas!?... Al mi vi ja povas tion diri.

— Jes... Ŝi estas Alino.

— Alino Blunt!? — ŝi ekkriis mirigite.

— Jes! — li respondis sektone.

— Hm!... Mi havas nenion kontraŭ Alino; sed ĉu vi ne povas elekti filinon de iu farmisto?

— Kiun do!?

— Estas sufiĉe da ili.

— Ne estas sufiĉe da ili, patrino; unu estas tro... kion diri?... tro maljunaj... aliaj estas tro junaj... aŭ tro multopaj... Bonema ekzemple havas ses filinojn... Ĉe tiom da filinoj la rekremento[270] fariĝas malgrasa...*) Nomu al mi solfilinon de farmisto... ne tro maljunan, nek tro junan... Mi konas nur unu, nome Jenjo Rinders, sed ŝi ne akceptos min.

— Nu, serĉu en aliaj vilaĝoj.

---

*) Nederlanda proverbo: Rekremento estas nutraĵo por porkoj. Ju pli multe da porkoj fermisto havas des pli multe da akvo li kutime miksas en la nutraĵo kaj ju pli multe da filinoj li havas, des pli malgrandaj estos la dotoj.

— Ankaŭ en aliaj vilaĝoj mi ne konas solfilinon de farmisto, kiu akceptos min... kvankam mi estas solfilo.

Eble unu estas trovebla, sed ĉiu scias ke mia patro ne estas kapitalisto, kaj ke li ne senvestiĝos antaŭ ol enlitiĝi... Se patro volus aŭ povus helpi finance...

— Tion li ne povos, aŭ nur per malmulta mono.

— Jes, kaj tial mi jam ne pensas pri solfilinoj de farmistoj, sed pri Alino.

— Kion diros pri tio via patro?

— Se li konas pli taŭgan, mi volonte elektos alian, sed li bone komprenas ke mi estas sen mono, kaj sen mono oni kaptos nur filinon idiotan aŭ sendotan, sed tian mi ne volas.

La patrino de Johano ankaŭ tion komprenis kaj ĉar ankaŭ ŝi ne volonte senvestiĝos antaŭ ol enlitiĝi, ŝi diris post momento:

— Ĉu Blunt estos inklina doni bonan doton al sia filino?

— Tion mi ne scias, sed se necese, ni povus enloĝiĝi ĉe li... provizore.[271]

— Vi do volus fariĝi drinkejestro?

— Ho ne! Sed Peĉjo estas jam multaĝa... preskaŭ... naŭdekjara... li ja povos prizorgi la drinkejon, aŭ Alino povos tion kaj mi povus farmi kelkajn kampojn kaj paŝtejojn... poste ni povos vendi la „Verdan Ĉevalon".

— Sed Peĉjo havas filon!

— Tiu instruisto? Ho, tiu tute ne okupas sin pri monaferoj, li ne multe ĝenos aŭ malhelpos nin. Se ni loĝos ĉe Peĉjo, ni faros kion ni volos... Alino estas sufiĉe ruza, rapidfara kaj lerta. Neniu forkaptos la fromaĝon de ŝia buterpano.

— Sed ĉu ŝi akceptos vin?

— Mi kredas ke jes. Ŝi ne estas sentimentala, ŝi pensas kiel mi: Oni klopodu kunkolekti sufiĉan monon por trabati sian vojon en la mondo.

— Nu!... parolu pri ŝi kun patro.

— Tion mi faros...

Ili manĝis kaj trinkis plue, esperante, ke la patro baldaŭ revenos, sed li ne revenis, kaj pri tio ili ambaŭ estis tre mirigitaj, ĉar neniam li malestis ĉe la matenmanĝo.

ĈAPITRO XIX.

En „la Verda Cevalo" — Paŭl kaj Baŭman — La ackioj — Du strangaj bildoj — Peĉjo solvas malfacilan problemon — Alino denove en kolera humoro.

Baŭman irante laŭlonge de siaj kampoj sin direktis al la vilaĝo. Li estis ankoraŭ pli malkvieta ol antaŭ kvarono da horo, ĉar pli kaj pli li timis la revenon de Paŭl. Li volis se eble eviti, ke lia ĝisnuna servisto tuj ŝovos sub lian nazon la preskaŭ senvaloriĝintajn akciojn kaj prokrasti tion ĝis la kolero de Paŭl iom retrankviliĝos. Kompreneble Paŭl fariĝos furioza kiam li ekscios pri la malmulta mono, kiun valoras la akcioj, sed la longa promenado de la urbo al la vilaĝo iom retrankviligos lin, eble eĉ tiom, ke Baŭman jam ne bezonos timi subitan eksplodon, ĉar ĝuste tian eksplodon li tiel timis. Ĉiu sciis pri la konduto de Paŭl kontraŭ tiu kapitano, pri lia konduto kontraŭ tiu knabo ludanta per rano kaj ke certe Paŭl estos kapabla disbati per siaj fortaj pugnoj lian kapon; tamen Baŭman tre amis sian propran kapon tiel plenan je ruzo, kapon kiu ĉiam elpensis kaj ŝpinis la rimedojn protekti sin kontraŭ laŭleĝaj persekutadoj, ĉar laŭleĝajn persekutadojn la farmisto tre abomenis; tial li konstante prenis siajn antaŭzorgojn pri ĉiuj tiaj persekutadoj, tial ankaŭ nun kontraŭ Paŭl li posedis necesan armilon, se Paŭl volus kulpigi lin pri trompaĵo. Eble Paŭl furiozados, eble li minacos sed li furiozadu kaj minacu tiom, kiom al li plaĉos. Volonte Baŭman jam nun irus al la policano por antaŭanonci lin pri eventualaj malagrablaĵoj kun Paŭl, sed timante ke li per tio kulpigos sin mem, li ne iris tien.

Baŭman kalkulis kiom da tempo Paŭl bezonos por reveni en la vilaĝon kaj li spionobservis tiun revenon en la „Verda Ĉevalo", ĉar la junulo devos preteriri la fenestrojn de la drinkejo por rehejmiĝi. Li do rapidis al la „Verda Ĉevalo".

La leganto jam vidis la furiozan animstaton de Paŭl dum lia revenado al sia vilaĝo. Paŭl iris tre rapide, liaj viglaj longaj kruroj alportis lin returnen en la daŭro de malpli ol du horoj. Ĉiaj pensoj lin atakis, sed kion fari li ne sciis. Se en tiu momento

li estus renkontinta la farmiston mezvoje, li sen dubo estus ĵetinta lin en la longfoson, aŭ disbatus lian kapon, sed Baŭman estis ruzulo kaj tre singarda, sekve li ne venis renkonte al Paŭl.

Ĝuste en la sama momento, kiam la furiozanta junulo iris de la makadama vojo sur la straton de sia vilaĝo, li vidis Baŭman, kiu eniris la pordon de la „Verda Ĉevalo".

— Jen li estas! — grumblis Paŭl, irante ankoraŭ pli rapide. Kvin minutojn poste ankaŭ li transiris la sojlon de la drinkejo kaj eniris la drinkejon ĉambron.

Tie sur la kanapo sidis Peĉjo Klakilo, kaj sur kvaro da seĝoj sidis liaj kutimaj klientoj, venintaj por trinki glaseton da brando.

Paŭl tuj ekvidis Baŭman kaj Baŭman tuj ekvidis sian serviston. Ambaŭ paliĝis: la unua pro bolanta renaskiĝanta kolero, la dua pro retenata timo.

Peĉjo, kiu havis ankoraŭ bonajn okulojn, tuj estis certa ke io ne estas en ordo inter tiuj du viroj, atente alrigardis Paŭl'on, kiu sidiĝis ĉe tableto rekte kontraŭ Baŭman.

Kvankam oni laŭte interparoladis pri ĉiaj ĉiutagaj aferoj, ĉiuj eksilentis vidante la grandegulon, kiu tremetante pro kolero kaj kadavre pala, tuj sin direktis al Baŭman:

— Baŭman! — li diris laŭtvoĉe. — Mi servis vin dum tri jaroj honeste kaj laŭpove, kaj anstataŭ pagi min per tintanta mono, vi ŝovis al mi en la manojn seson da preskaŭ senvaloriĝintaj ĉifonoj... kiujn mi al vi redonas en ĉeesto de ĉi tiuj niaj samvilaĝanoj!...

Dirinte tion, li eltiris el sia poŝo la akciojn kaj ĵetis ilin antaŭ la farmiston.

Ĉiuj fariĝis plenatentaj kaj scivolaj en la sama tempo. Io tia estis vere eksterordinara okazantaĵo en la drinkeja ĉambro de la „Verda Ĉevalo".

Peĉjo tuj komprenis la aferon, sed li silentis.

— Mi pagis al vi kion mi devis pagi! — respondis Baŭman.

— Vi devus pagi al mi sescent guldenojn, kaj vi pagis al mi nur la renton, krome vi donis tiujn akciojn, valorantaj nur okdek guldenojn. Reprenu tiujn ĉifonojn kaj pagu al mi, kion vi ŝuldas.

— Kion mi ŝuldis, mi pagis! — diris Baŭman, — kaj vi anstataŭe donis al mi skribitan kvitancon.

— Tiun kvitancon tuj redonu al mi. — Jen viaj akcioj!

— Vi akceptis tiujn akciojn: ili do jam ne apartenas al mi! — diris Baŭman, returnen ŝovante la paperojn. Paŭl denove ŝovis ilin al la farmisto, dirante:

— Ĉu vi kredas, ke vi povas pagi al mi mian perlaboritan monon per tiaj ĉifonoj?

— Vi akceptis ilin kaj kontentiĝis je ili.

— Tion mi faris kredante, ke ili valoras ses cent guldenojn.

— Kial do vi subskribis, ke ni kvitiĝis unu kun alia?

— Ĉar mi kredis vin honesta viro.

— Mi estas honesta viro!

— Fripono vi estas!! Vi spekuladis per mia mono.

— Mi povus gajni por vi.

— Gajni por mi?... Gajni por vi mem?... En la banko oni klarigis al mi la tutan friponaĵon.

— En la banko oni scias nenion pri nia interkonsento.

— Interkonsenton ni tute ne havis.

— Jes, ni ĝin havis; mi proponis al vi, ke mi aĉetos akciojn per via mono.

— Jes: aĉetos, sed ne spekulos.

— Tion mi tute ne faris.

— Tion vi tamen faris, ĉar tion oni diris al mi en la banko. La bankestro certigis, ke vi aĉetis multajn akciojn, ankaŭ aliajn, kiuj ne senvaloriĝis. Donu al mi tiajn kaj mi estos kontenta, aŭ donu la monon.

— Ĉu vi dezirus, ke mi pagu duan fojon? Mi deponis vian monon en la banko kaj la banko povas repagi al vi. Mi ne akceptas tiujn akciojn. Ili estas viaj, ĉar vi tion kvitance subskribis kaj atestis.

— Vi bone scias, ke mi nenion komprenas pri akcioj. La bankestro diris al mi, ke mi estas la dupo de via friponaĵo!

— Se la bankestro tion diris, li devos pruvi tion; alie mi laŭleĝe lin persekutos!

— Laŭleĝe!? — moke demandis Paŭl.

— Jes, laŭleĝe!

— Nur friponoj, kia vi estas, parolas kaj minacas per laŭleĝaj persekutadoj! Sed mi kraĉas sur viajn laŭleĝajn persekutadojn! Se vi tuj ne redonos al mi la kvitancon, kiun mi subskribis...

Paŭl salte leviĝis kaj minace liaj brunaj okuloj penetris la animon de la terurita farmisto.

— Vian ateston mi ne havas en mia poŝo.

— Mi iros kun vi en vian domon por reakcepti ĝin; anstataŭe enpoŝigu tiujn akciojn! — kriis Paŭl, ankoraŭ starante kaj minace rigardante la farmiston.

— Mi ne enpoŝigos la monon de aliulo.

— He! he! ĉu vi ne faros tion? Tamen vi enpoŝigis la mian.

— Tiun mi poste deponis en la banko.

— Por kvazaŭ ludadi per ĝi en loterio!

— Mi agis nur laŭ nia interkonsento.

— Enpoŝigu tuj tiujn akciojn! — kriis Paŭl kaj lia vizaĝo aspektis tiel kadavre pala, ke ĉiuj ektimis.

Sed Baŭman, bone sciante, ke multaj atestantoj ĉeestas, ne enpoŝigis la akciojn, sed refoje ŝovis ilin al Paŭl.

Paŭl estis ĵetonta sin sur la trompinton, sed subite Peĉjo ekstaris, kaptis la jam levitan brakon de la juna viro kaj diris kviete, admone:

— Paŭl! sidiĝu! mi eble scias kiel vi ambaŭ plej bone povos aranĝi tiun aferon. Kvietiĝu, sidiĝu kaj precipe estu singarda.

Paŭl eksidis, daŭre fiksante siajn okulojn sur tiujn de Baŭman, kiu ne kuraĝis alrigardi lin.

— Kiaj estas tiuj akcioj? — demandis Peĉjo.

— Steels! — kriis Paŭl.

— He! — kviete diris Peĉjo, — Steels?... Ĉu Baŭman aĉetis por vi Steels?

— Li faris tion, sed neniam li diris al mi, ke tiuj akcioj estas — kiel certigas la bankisto — tiel spekulativaj.

— Ĉu vi ne povis aĉeti aliajn akciojn? — sin turnis Peĉjo al Baŭman.

— Kiu sciis antaŭe, ke ili tiel malaltiĝos?

— Nu! — kviete parolis plue Blunt. — Vi aĉetis ja ankaŭ aliajn, kial do vi destinis ĉi tiujn por Paŭl?

— Kial mi devis destini por li aliajn? Mi deponis[272] tutan lian monon en la banko, li do ne rajtas postuli ke mi refoje pagu.

— Eble li ne rajtas tion postuli, — diris Blunt, kiu kompatis la junan viron kaj kiu jam de la komenco komprenis la tutan aferon, — sed kial vi a n t a ŭ e ne donis al Paŭl la pruvon, ke tiuj Steel-akcioj kaj ne aliaj estas la liaj...

— Ho, tion mi scias! — interrompis Paŭl. La bankisto tion al mi klarigis: Se ilia valoro altiĝus, Baŭman povus ricevi kaj enpoŝigi la gajnon kaj pagi al mi nur la sescent guldenojn. Li sekve lotadis per mia mono. Sed mi repostulas mian posedaĵon!

— Jen via posedaĵo! — diris Baŭman, montrante per la fingro la akciojn kaj ne respondante la demandon de la drinkejestro, kiu tamen refoje demandis:

— Sed kial vi ne donis al li la pruvon, ke ĝuste tiuj Steel-akcioj apartenas al Paŭl kaj ne la aliaj?

— Ĉar li ne postulis tiun pruvon.

— Mi vin plene fidis! — kriis Paŭl. Sed mi ĵuras, ke vi repagos al mi mian monon.

— Eble Baŭman faros tion! — diris Peĉjo, okulumante al Paŭl, kiu iom rekvietiĝis, sed kiu refoje ŝovis la akciojn al Baŭman.

Ĉiuj, vidante ke Paŭl ne plu montris sian koleron per sia pugnoj, komencis sin amuzi, sed ĉiuj opiniis la tion saman, nome: Baŭman agis fripone kaj spekulis per la mono de la juna viro. Inter la ĉeestantoj ankaŭ sin trovis Erasmus, sed li silentis, atente aŭskultante la disputon en kiun li ne volonte sin enmiksis.[273]

— Jes, sendube Baŭman tion faros — nun sin enmiksis alia ĉeestanto.

— Ne ŝovu vian nazon en fremdan vazon! — diris al li Baŭman, kiu sentis ke ĝenerale oni rigardas lin kiel trompinton kaj Paŭlon kiel la viktimon de lia ruzaĵo.

— Mi samopinias kiel vi — diris Peĉjo, sin turnante al la ĵus parolinto; Baŭman reprenos siajn akciojn kaj donos aliajn... aŭ la sescent guldenojn.

— Nenion plu mi donos! — diris la farmisto.

— Mi ĵuras ke vi donos! — kriis Paŭl, refoje ekstarante.

— Kvietiĝu Paŭl! — diris Blunt, duan fojon kaptante lian brakon kaj lin sidigante... Li pagos, mi estas certa pri tio.

Tamen ŝajnis ke Baŭman havas aliajn intencojn. Volonte li tuj elirus el la „Verda Ĉevalo", kie honta sento lin eksposedis, sed sciante ke Paŭl ankaŭ elirus kun li, la farmisto ne kuraĝis kaj restis sidanta.

Ju pli longe la disputo daŭris, des pli multe la ĉeestantoj sin amuzadis. Tia io ankoraŭ neniam okazis en la „Verda Ĉevalo" kaj neniu pensis pri foriro kaj iom post iom novaj vizitantoj aliĝis al la ĉeestantaj. Sed la akcioj kuŝis ankoraŭ sur la tablo kaj nek Paŭl nek Baŭman volis enpoŝigi ilin.

— Kion do vi faros kun la akcioj? — fine demandis Erasmus.

— Mi scias! — subite diris Peĉjo kaj liaj grizaj okuloj ekbrilis.

— Kion nome? — demandis multaj voĉoj.

— Mi tuj diros tion, sed antaŭe mi devas scii ĉu Baŭman konsentos ilin akcepti.

— Ili ne estas miaj! — diris Baŭman.

— Aŭ ĉu Paŭl volos enpoŝigi ilin — diris plue Blunt.

— La diablo enpoŝigu ilin! — kriis Paŭl. — Mi postulas nur mian monon!

— Jen via mono! — diris Baŭman.

— Tio ne estas mono! — kriis Paŭl, refoje ekstarante, tio estas ĉifonoj, kiujn vi uzis por...

— Kviete!! — admonis Peĉjo kaj refoje li sidigis la junulon, dum li okulumis al li, kvazaŭ por komprenigi ke ĉio estiĝos laŭ liaj deziro kaj postulo.

Ankaŭ Erasmus, sidanta malantaŭ la dorso de la farmisto, okulumis al Paŭl, kaj ĉi tiu refoje kvietiĝis.

— Neniu do akceptos la akciojn!? — demandis Peĉjo.

Paŭl responde ŝovis ilin al Baŭman kaj Baŭman ŝovis ilin returnen al Paŭl.

— Neniu!? — diris lastfoje Peĉjo.

Neniu respondis, Paŭl estis denove ŝovonta la paperojn al Baŭman, sed Peĉjo retenis lian manon dirante:

— Per tia ŝovado tien kaj returnen ni ne povos aranĝi ĉi tiun aferon, kaj tamen ĝi devas esti aranĝata.

— Sed kiel? — demandis Erasmus.

— Mi scias! — respondis Peĉjo.

Ĉiuj estis scivolaj.

— Ĉu mi volas esti via juĝisto? — diris Blunt.

— Mi ne bezonas vian juĝdecidon! — respondis Baŭman.

— Elektu advokaton! — ekkriis alia.

— Advokaton!? — ridante diris Peĉjo, kaj li estis deklamonta parton de sia poemeto, sed tion li ne faris. Li salte leviĝis, iris al unu el la bildoj, en kadro pendanta sur la muro kaj montrante ĝin, diris:

— Jen, atentu kiel advokato agas.

Sur la bildo staris bovino, kiu dise streĉis ĉiujn kvar piedojn por ne perdi la ekvilibron, ĉar ĝian voston tiris al si farmisto kaj ĝiajn kornojn tiris al si brutokomercisto. Sub la bovino sidis sur amaso da leĝolibroj advokato, kviete melkanta.

— Jen, rigardu! — ridetante diris la drinkejestro. — Tiuj du viroj interdisputas pri bovino; la advokato devas reguligi la disputon, sed li melkas ĝis la tuta besto apartenos al li. Nun legu la subskribaĵon:

La farmisto:

Por mia bovino vi al mi oferis
En jaro pasinta guldenojn ducent,
La bruto de post tiu temp' tre prosperis
Vi kial ne pagas en nuna moment? —
Per ruzoj vi volas kredigi al ĉiu,
Ke l'beston mi vendis por cent kvardek-tri,
Sed oni ne kredos al hom' kiel vi,
Mi agis honeste en afero ĉi tiu.

La komercisto:

Vi kiel ŝtelist' kaj trompist' volas agi:
Nur cent kvardek-tri vi postulis de mi,
Kaj nur tiun sumon mi volas nun pagi
Nu donu la beston! — mi diras al vi!

Kaj se vi ne cedos ĝin, mi vin devigos
Per ĉi advokato, li helpos min tuj,
Li estas tre fama en nia patruj'
Per sia pledado al dev' vin instigos!

La advokato:

Mi melkos nur dum la disputo
Ĝis mia estos via bruto!

Ĉiuj laŭte ridis.

— Ne ĉiuj advokatoj estas tiaj, — diris Erasmus; mi konas honestan, kiu volonte sin prezentos kiel arbitracianto.[274]

— Mi ne bezonas tian arbitracianton! — diris Baŭman, kiu sidis kvazaŭ sur pingloj, konsciante ke oni mokas lin; refoje li volonte forirus, sed li ne kuraĝis pro Paŭl, kaj samtempe li timis ke Paŭl foriros pli frue al li, ĉar en tiu okazo pendos super lia kapo la danĝero esti ĵetita en longfoson.

— Se vi ne akceptos la akciojn — diris Peĉjo, — ni povos agi kun ili kiel ni volos, ĉar pri Paŭl mi estas certa, ke li mian proponon akceptos.

— La akcioj ne estas la miaj — diris Paŭl. — Se Baŭman ne reprenos ilin, vi faru kun ili laŭ via plaĉo.

— Bone! — diris Blunt, kaptante la akciojn; poste li ekstaris kaj denove okulumante al Paŭl, li sin turnis al Erasmus.

— Erasmus, iru kun mi en mian familian ĉambron. Ambaŭ iris tien kaj ĉiuj estis scivolaj pri la intenco de la drinkejo-mastro.

Sed Baŭman antaŭvidis ion hontindan por si.

Paŭl tamen estis plena je fido kaj restis sidanta, seninterrompe per flamantaj okuloj rigardante la farmiston. Ĉiuj aliaj ĉeestantoj sun amuzadis, ridadis kaj kriadis.

Post kelke da minutoj la arbitracianto revenis kun sia sekretario. Li portis en la mano grandan kadron kun vitro, malantaŭ kiu estis elmetitaj la akcioj tiel, ke la nomo „S t e e l" estis bone videbla. Supre malantaŭ la vitro sidis tri, kaj ĉe la flankoj po unu akcio. En la mezo brilis folio da blanka papero kun la sekvanta rimaĵo de Erasmus:

Ĉiu scias pri Paŭlo,
Ke li estas honesta fraŭlo.
Tri jarojn li laboris
Ĉe Baŭman, kiu lin honoris
Por tiu laboro
Ne per oro,
Sed per ĉi tiuj S t e e l a j akcioj. —
Paŭl ne kontentiĝis je tiaj gratifikacioj[275]
Dirante: Mi ne estas S t e e l-isto
Dum Baŭman diris: Mi ne estas ŝ t e l-isto.
Por doni koncilon en ĉi tiu stranga stato
Oni devas esti pli ruza ol iu advokato. —

Blunt kviete kaj ridetante pendigis tiun strangan bildon sur la muron apud la melkanta advokato, poste li iris al sia kanapo, klaketante per la manplatoj kaj deklamis:

En ĉerk' ripozis Ŝercemul'
Li kuŝis sterniĝinta,
Kaj ĉiuj plendis: Ŝercemul'
Jam estas —

— La diablo sufoku vian Ŝercemulon! — furioze ekkriis Baŭman, paliĝante kaj ekstarante por forigi la ĵus pendigitan kadron, sed Paŭl ankaŭ ekstaris, dirante:

— Ne tuŝu! tiuj akcioj ja ne estas viaj!

Baŭmon refalis sur sian seĝon, ĉar li jam sentis sub sia nazo la pugnon de la juna viro.

— Paŭl pravas, — diris Erasmus sin turnante al la junulo, kiu ankaŭ ree sidiĝis, rigardante la belan skribaĵon de Erasmus, kiun li tamen ne tuj povis deĉifri.

— Laŭtlegu vian novan poemon! — kriis iu al Erasmus. Ĉi tiu obeis kaj ĉiuj aplaŭdis.

— Mi protestas! — kriis Baŭman.

— Kontraŭ kio? — demandis Peĉjo.

— Kontraŭ tiu kalumniaĵo!

— Ĝi ne estas kalumniaĵo, sed nura vero! — diris Peĉjo —

tiu poemo tute ne kalumnias vin, ĝi eĉ laŭdas vin sciigante, ke vi ne estas Ŝtel-isto.

Ĉiuj ridis, eĉ Paŭl, kvankam li ne bone komprenis la intencon de siaj protektantoj. Sed li fidis la posedanton de la „Verda Ĉevalo" kaj li fidis Erasmus'on.

— Vi tamen tion forprenu! — diris Baŭman.

— Mi vendos ĝin al tiu, kiu donos al mi por ĝi sescent guldenojn, — ridetante diris Peĉjo, refoje okulumante al Paŭl, kiu iom post iom lin komprenis.

— Kaj se mi ĝin ne aĉetos?

— Se vi ne aĉetos ĝin, ĝi restos tie tiel longe ke mi estos la posedanto de la „Verda Ĉevalo"... Sed vi ja ĝin aĉetos.

Ĉiuj refoje ridis, treege sin amuzante. Ĉiuj admiris la ruzaĵon de Peĉjo kaj ĉiu komprenis, ke Paŭl ricevos sian monon.

— Mi iros plendi ĉe la vilaĝestro.

— Ju pli laŭte kaj ju pli multe vi plendos, des pli baldaŭ ĉiu venos en mian drinkejon por admiri mian novan bildon — diris Peĉjo... — Sed vi ne plendos, vi pagos al mi por tiuj akcioj sescent guldenojn, kaj mi enmanigos al Paŭl tiun monon.

Baŭman fikse rigardis la plankon, sed la planko ne donis al li bonan konsilon kiamaniere eviti la pagadon; fine li ekstaris. Ankaŭ Paŭl ekstaris, sed Peĉjo refoje sidigis lin okulumante.

— Kiam mi devos pagi? — post momento diris Baŭman.

— Morgaŭ, — respondis Peĉjo.

— Nu, mi pagos kaj reprenos tiujn akciojn, kvankam tio estas kontraŭleĝa... sed mi proponas kondiĉon.

— Kiun? — demandis Peĉjo.

— Ke vi tuj forprenu de tie tiun kalumniaĵon.

— Ĝi ne estas kalumniaĵo.

— Indiferente, ĉu ĝi estas kalumniaĵo aŭ io alia, sed mi postulas ke vi tuj ĝin forigu.

— Bone! Sed morgaŭ je la deka horo en la mateno vi revenos kun la mono; ankaŭ Paŭl venos. Vi donos al li la monon kaj mi redonos al vi la akciojn.

Furioze Baŭman ekstaris kaj foriris, dirante:

— Mi venos!

Paŭl restis sidanta post kiam Peĉjo per gesto tion al li ordonis.

Ĉiuj ridis; kelkaj eĉ sin tordis pro nura plezuro. Peĉjo, kiu bone konis la farmiston, estis laŭ ruza maniero deviginta lin fari sian devon. Ankaŭ Paŭl nun komprenis tion kaj liaj admiro, ĝojo kaj danko estis legeblaj sur lia vizaĝo. Sed Paŭl malofte esprimis siajn pensojn por danki iun per belaj paroloj; li simple etendis la manon al la drinkejestro kaj premis la lian tiel forte, ke refoje ĉiuj laŭte ridis, ĉar la vizaĝtrajtoj de Peĉjo subite sanĝiĝis kvazaŭ por komprenigi al la grandegulo, ke ĉi tiu ne premu tiel forte.

Iom post iom la vizitantoj iris for kaj Paŭl foriris lasta, dum Peĉjo diris al li:

— Mi devas konsili al vi Paŭl: evitu tiun farmiston en la unuaj tagoj; vi eble ĵetos lin en longfoson...

— Aŭ disbatos lian kapon... parolis plue Paŭl.

— Tial estas plej bone ne renkonti lin; morgaŭ vi ricevos vian monon kaj post kelke da tagoj vi povos edziĝi kun Eva.

Paŭl miris.

— Kiel vi tion scias? — li demandis.

— Ne demandu pri tio; mi scias ĉion, kio okazas en la vilaĝo, sed mi gratulas vin, ĉar Eva estas bona, bela kaj virta knabino; ŝi feliĉigos vin kaj vi feliĉigos ŝin.

Paŭl emociiĝis, refoje premis la manon de Peĉjo, nun ne tiel forte, kaj eliris el la „Verda Ĉevalo". Peĉjo restis sola, dronante kelke da momentoj en pensoj, poste li subite ekstaris kaj ĵetante rapidan rigardon al la melkanta advokato, iris la porkejon brubatante la manplatojn kaj deklamante:

Sed jen subite Ŝercemul'
En sia ĉerk' sidiĝis,
Kaj ĉiuj kriis: Ŝercemul'
El morto reviviĝis,
Hura! hura! hura!! —

En la traveturejo staris lia filino kaj li haltis, ĉar ŝi kolere lin rigardis, kriante.

— Bela afero!... Kial vi tiel enmiksas vin en aferojn de aliuloj. Tion Baŭmon repagos al vi!

— Kion? — diris Peĉjo, ŝajnigante nenion kompreni.

— Vi ankoraŭ demandas? ...Mi aŭdis ĉion...
— He, vi aŭskultis?
— Jes... Kial do interesas vin tiu Paŭl?
— Paŭl estas honesta knabego.
— Tamen sovaĝulo li estas...
— Je friponoj kaj je homoj sen koro.
— Ĉu Baŭman estas tia fripono?
— Pli granda ol oni scias...

Peĉjo ŝtreĉe rigardis sian filinon kaj diris plue:

— Mi konsilas ĉiujn ne tro fidi tiun farmiston, nek lian filon; la frukto ne falas malproksime de la arbo.

Alino paliĝis, kio ne ofte okazis.

— Kial aludi lian filon? — ŝi demandis kunpremante la lipojn.

— Mia kara infano; mi estas preskaŭ naŭdekjara viro, sed miaj okuloj — dank'al Dio — estas ankoraŭ sufiĉe akraj por bone ĉirkaŭrigardi, kaj por tuj ekvidi tion, kio fariĝas kaj eble fariĝos. Paŭl similas elefanton; se oni turmentas aŭ malbone traktas lin, li piedpremas sian turmentanton, eble li frakasas lin; sed por persono, kiu traktas lin bone, li sin oferos kaj eĉ mortos. Kia diferenco inter Paŭl kaj Johano Baŭman.

— Kion malbonan vi scias pri Johano? — ŝi demandis kolere, samtempe timante aŭdi ion malagrablan.

— Johano estas trudemulo[276] kaj egoisto.

— Trudemulo kaj egoisto?... Vi nomas lin egoisto ĉar li zorgas pri si mem...

Peĉjo interrompis sian filinon, kviete parolante plue:

— Kaj trudemulo li estas, ĉar li havas la intencon trude enŝteliri en ĉi tiun mian domon, por iom post iom elŝovi min eksteren... sed mi avertas vin...

— Neniu bezonas min averti; mi scias kion mi faros.

— Jes, viaj deziroj estas fortaj, kaj ne ĉiam kontraŭstareblaj, sed mi jam nun diras al vi baldaŭan okazontaĵon kaj aŭdinte ĝin, vi neniam plu atentos nek rigardos tiun trudemulon; lia patro ne restos plu longe farmisto...

Alino mire rigardis sian patron dum ĉi tiu parolis plue:

— Mi atentis lin kaj mi scias kia spekulisto li estas... li

ankoraŭ povos pagi la sescent guldenojn al Paŭl', sed mi supozas ke lia bankroto estas proksima... nur miraklo povos lin savi, sed mirakloj estas maloftaj precipe en la borso...

Alino reiris en la kuirejon, falsidiĝis sur seĝon, ambaŭmane kovris la okulojn kaj laŭte ekploris... ne pro ĉagreno, tion bone komprenis ŝia patro, sed ĉar malaperis de antaŭ ŝiaj okuloj tiaj revoj pri kiuj ŝi ne volonte parolus, sed kiuj jam de longe enradikiĝis en ŝia avida koro.

Petro Blunt malrapide iris al sia porkejo; per du fortaj batoj de sia silka ĉapelo li forpelis la muŝojn de la grasaj dorsoj de la gruntantaj porkoj kaj pensante pri Johano kaj Alino, li diris:

— Kiaj karakteroj! kiaj karakteroj!

ĈAPITRO XX.

Ĉe Baŭman, refoje pri geedziĝo kaj doto — Interparolado de Peĉjo kaj Paŭl kaj kial Paŭl iros al Haag — Lasta aminterrilato inter Alino kaj Johano.

La farmisto Baŭman rehejmiĝis en la plej malbona humoro. Li spertis ke Peĉjo Klakilo superruzis lin, kaj eĉ tiel, ke ĉiuj moke parolos pri la akcioj kaj pri la maniero, laŭ kiu li (Baŭman) volis trompi sian serviston. Sed li ne vidis elirejon [277] laŭ kiu li povus konservi la sescent guldenojn, do li decidis pagi ilin en la sekvanta mateno. Tiu elpago tamen venis tre maloportune, ĉar li multe spekuladis kaj preskaŭ ĉiuj liaj akcioj terure malaltiĝis; la kurso de nur du aŭ tri fariĝis iom pli alta, sed tiu altiĝo ne povis antaŭsavi lin de certa ruino, se ne baldaŭ ŝanĝiĝus la borsaj aferoj. Tamen li timis laŭleĝan persekutadon se li al Paŭl ne pagos kaj se Peĉjo pluen ŝovus sian nazon en tiun vazon. La farmisto ja antaŭvidis, ke la drinkejestro helpos al Paŭl. Ofte Baŭman jam spertis, ke Peĉjo estas pli ruza ol advokato; li estis certa, ke Blunt, kiu diris A, ankaŭ diros B, alivorte, ke li levis la piedon kaj ankaŭ ekpaŝos; kaj tiu ekpaŝo povus esti fatala por la farmisto.

Enirante la familian ĉambron, li vidis tie siajn edzinon kaj filon; ambaŭ grave mediteme rigardis antaŭ si. Baŭman sidiĝis.

— Vi venas tre malfrue — diris lia edzino.

— Jes, mi havis komision ĉe Blunt.

Patrino kaj filo interŝanĝis unu rapidegan ekrigardon, sed tuj poste refoje mallevis la palpebrojn.

— Mi ĵus parolis kun Johano pri Peĉjo Blunt, — ekparolis la edzino; sed Baŭman silentis, same kiel lia filo.

— Kaj pri Alino... ŝi diris post momento, unue rapide rigardante sian filon, poste la edzon.

— He!

— Jes; Johano eble havas iujn intencojn rilate al ŝi.

— He!

— Jes, ĉu ne vere, Johano?

La filo ŝovis la piedojn tien kaj reen sur la planko, kvazaŭ por pentri tie iun nekonatan figuron kaj fine diris:

— Eble.

Baŭman tuj divenis tiujn intencojn kaj du ekpensoj interfrapiĝis en lia cerbo. La unua estis: Mi malebligos tiujn intencojn, mi tro multe abomenas tiun viraĉon por helpi, ke lia filino fariĝus la edzino de farmisto. La dua estis: La mono de Peĉjo povus savi min el estonta mizero... Kion fari? Fine li konsideris ke la prospero de lia filo valoras pli multon ol la deziro malebligi al Alino, ke ŝi fariĝus la edzino de farmisto; do li diris, turnante sin al Johano:

— Ĉu vi jam parolis pri tio al Alino?

— Mi ofte parolis kun ŝi.

— Sed, ĉu vi aludis viajn intencojn?

— Jes, sed mi ne rekte ilin eldiris.

— Tio estas saĝa: neniam rekte eldiri viajn intencojn se vi dubas ankoraŭ pri certa sukceso... Homo devas esti prudenta.

— Mi estis prudenta; mi nur „sondis",[278] nur iom esploris ŝiajn pensojn.

— Tio estis tre saĝa, sed ĉu ŝi akceptos vin?

— Ŝi sendube akceptus se ŝi antaŭe scias, ke vi iom helpos min en financaj aferoj, kaj se ŝi povos atenti sufiĉan grandan... kiel diri?...

— Heredaĵon... aŭ eventualan heredaĵ-parton...

— De via patrino se mi mortos unua?

— Nu, jes... ion tian...

— Kompreneble mi helpos laŭ mia povo; sed mi povas nenion promesi kaj ĉiuokaze, mi ne senvestiĝos antaŭ ol enlitiĝi.

— Kompreneble! — diris la patrino.

— Kompreneble! — poste diris la filo.

Tiel tiuj tri homoj parolis pri la estonta feliĉo... pri la estonta edziĝo de Johano, eĉ ne parolante pri la estonta edzino, ĉar la financa parto estis laŭ ilia opinio, la animo de tiu afero.

Baŭman ekmanĝis kaj la interparolado finiĝis. Johano kredis nun, ke lia patro laŭpove helpos al li kaj lia patro silentis pri sia malbona financa stato, pensante ke la edziĝo de lia filo povos havi du bonajn flankojn: Sin venĝi kontraŭ Peĉjo Klakilo kaj savi sian filon el estontaj monaj malfacilaĵoj.

Post la manĝo ĉiu iris al sia laboro kaj neniu parolis plu pri la intencoj de Johano...

La sekvantan tagon Baŭman pagis al sia servisto en la „Verda Ĉevalo" la tutan monsumon, kiun li ŝuldis al li kaj tuj poste foriris dum Paŭl kaj Blunt restis kune. Ambaŭ estis kontentaj.

— Blunt! — diris Paŭl. — Kion mi nun ŝuldas al vi?

— Nenion! — respondis Peĉjo kun miro rigardante la junan viron.

— Vi ja helpis min — diris plue Paŭl.

— Ĉu v i ĉiam postulas rekompencon se vi helpas al iu, Paŭl?

— Ne ofendiĝu Blunt... Vi pravas... pri tio mi tute ne pensis.

— Tion mi scias Paŭl kaj tial mi ne ofendiĝas, sed vi povos fari al mi grandan servon.

— Mi faros al vi tiun servon.

— Antaŭ unu jaro mi aĉetis du lotojn de granda ĉevaloloterio, kaj mi akiris la unuan premion.

— He!... Mi gratulas vin.

— Dankon!... Mi gajnis du ĉevalojn kaj kaleŝon — sekve luksaferojn, kiujn mi mem ne povos uzi. Sed anstataŭe mi

povos ricevi trimil guldenojn en tintanta mono — feliĉe ne en akcioj — kaj tiujn mi akceptos. Mi estas tro multaĝa por persone ricevi tiun monon, sed rajtigito [279] povos ricevi ĝin por mi. Ĉu vi volas esti tiu rajtigito?

Paŭl ne bone komprenis, kion celis la drinkejmastro, kaj ĉi tiu legis tiun nekomprenon en liaj grandaj brunaj okuloj; li klarigis:

— Rajtigito ricevos de mi paperon, subskribitan de mi, per kiu mi atestas, ke la mono povas esti pagata al rajtigito, ekzemple al vi.

— Mi komprenas, sed kie mi devos ricevi tiun monon?

— En Hago.

— En Hago!? — Paŭl larĝe malfermis la okulojn, post momento li diris:

— Sed mi neniam estis en Hago; neniam mi iris pli malproksimen ol Groningen kaj neniam mi vojaĝis vagonare.

— Nenio estas pli facila ol vojaĝi vagonare.

— Kiam mi devos tien veturi?

— Post tri tagoj.

— Nu, mi volonte faros al vi tiun servon.

— Bone!... Vi havos belegan vojaĝon kaj povos ankaŭ viziti Scheveningen... vi eĉ povos bani vin tie.

— Bani min?

— Jen, en la maro, meze de multaj sinjorinoj kaj sinjoroj.

Paŭl ridis, pensante ke Peĉjo lin mokas.

— Jes Paŭl, meze de multaj sinjorinoj haj sinjoroj, ĉar ili sin banas tie kune; tio ŝajnas al vi stranga kaj nekredebla, sed en tiuj grandaj urboj, kaj precipe en la banlokoj okazas tiaj strangaĵoj, ke mi konsilas al vi, ankaŭ tien iri... vi amuzos vin.

Paŭl ridis.

— Mi iros ankaŭ tien — li diris.

Feliĉa kiel reĝo, li iris fari surprizon al Eva.

— — — — — — — — — — — —

Tiun posttagmezon Johano Baŭman trairis la traveturejon de la „Verda Ĉevalo" kaj komencis interparoladon kun la servisto de Blunt. Sed li ne venis por paroli kun la servisto, sed por se eble paroli kun Alino. En aliaj okazoj Alino tre

baldaŭ sin montris, sed nun ŝi longe restis en la kuirejo, kaj kiam ŝi fine devis iri ĉevalejon por pumpi akvon, ŝi preskaŭ ne atentis Johanon kaj ĵetis al li tian indiferentan rigardon, ke li ne kuraĝis ŝin alparoli.

— Kian fierecon ŝi vidigas — li pensis, kaj forirante li grumblis:

— Alia burĝa knabino estus feliĉa kaj fiera se filo de farmisto tiel humiliĝus atentante ŝin, kiel mi atentis jam tiel longe ĉi tiun ruĝvangan pupon, dum Alino pensis:

— Li nun komprenas ke estonte li povos amindumi alian knabinon, ĉar filon de bankrotonta farmisto mi ne bezonas; prefere mi prenus la stultan Dirkon de Alings.

Tiel finiĝis la amrilatoj inter Alino kaj Johano.

ĈAPITRO XXI.

Paŭl al Haag — Liaj aventuroj en granda urbo — Kion li pensas pri tiaj urboj — La gasflamo.

Paŭl, dimanĉe vestita sidis en la triaklasa vagono, kondukonta lin al Hago. Peĉjo alveturiginta lin al la stacidomo de Groningen kaj aĉetinte por li la iran kaj revenbileton, adiaŭdiris lin per lasta manmovo.

La vagonaro laŭte fajfante foriris laŭlonĝe de la perono, rapide malproksimiĝis, faris angulon kaj poste rekte rapidis antaŭen.

Paŭl sidis en angulo de sia kupeo [280] kaj rigardis eksteren. La telegrafpalisoj preterglitis konstante. De tempo al tempo li vidis dometon kaj kelkajn arbojn, kiuj ŝajnis forkuri de antaŭ liaj okuloj. Neniam li estis vidinta vagonaron kaj li miris ke, vidante ĝin je la unua fojo, li sidas en ĝi. Kiu pensus ke li, la simpla kamparano entreprenos tian vojaĝon. La tamburado [281] de la radoj en la komenco strange lin impresis, sed baldaŭ li ne plu atentis ĝin kaj rigardis eksteren pensante pri Eva, pri Baŭman, pri Peĉjo kaj pri la tasko, kiun Peĉjo metis sur liajn ŝultrojn. Tiu tasko ŝajnis al Paŭl tre grava; unue li devos trovi la vojon tra la granda urbo, due li devos trovi la straton, kie li ricevos la premion, fine li devos veturi al Scheveningen.

Plej volonte li irus returne tuj post la recivo de la monsumo por kiel eble plej baldaŭ enmanigi al Peĉjo, sed la drinkejmastro tiel insistis ke li iru al Scheveningen, ke Paŭl jam ne kuraĝis rifuzi. Li akceptis do ankaŭ tiun lastan taskon, nur por kontentigi Peĉjon, kiu sendube atendis ke tiu vojaĝo al la banloko faros al Paŭl multan plezuron.

En la kupeo, kie li sidis, troviĝis ankoraŭ tri aliaj vojaĝantoj: unu el ili senparole sidis kontraŭ Paŭl, la du aliaj sidis ĉe lia flanko. Tiuj du vigle interparolis pri ĉiaj aferoj; fine unu el ambaŭ eltiris el sia poŝo ludkartojn kaj komencis ludi kun la alia. Li prenis tri kartojn unu en la dekstran kaj du en la maldekstran manon. Antaŭe montrinte tiun unu karton: Karoan [282] ason, [283] li ĵetmiksis la tri kartojn sur la benko inter li kaj sia kunvojaĝanto kaj diris al li:

— Serĉu la karoan ason!

Tuj kaj senhezite la alia montris la karton kaj ĝuste divenis. Ili ludis refoje kaj refoje kaj ĉiam la alia vojaĝanto trafe montris la karoan ason.

— Ankoraŭ unu fojon! — diris la ĵetanto, metante guldenon sur sian genuon kaj dirante: mi vetas ke vi ĉi tiun fojon maltrafos. Metu guldenon sur la mian, la gajninto enpoŝigos ambaŭ guldenojn.

La alia momenton hezitis, sed poste konsentis, metante unu guldenon sur la jam kuŝantan. Refoje li gajnis kaj estis enpoŝigonta la du guldenojn, sed la alia diris:

— Atentu! — kaj metante du guldenojn flanke de la aliaj, li daŭrigis: — La gajnonto enpoŝigos tiujn kvar guldenonjn.

Li denove ĵetmiksis la kartojn, antaŭe montrante la elektotan karoan ason. Unue la gajninto hezitis, sed rigardante la kartojn kaj estante certa, ke li facile povos montri la celitan karton, li denove cedis kaj refoje gajnis.

— Diablo! — kriis la malgajninto, — vi havas bonajn okulojn. Ni ludu plue.

Ili ludis plue. Jen unu gajnis jen la alia. Fine la ĵetanto diris: — Vi nun gajnis de mi jam dek guldenojn. Ni nun lastfoje vetos, kaj li metis papermonon sur sian genuon, kaj antaŭe montrinte la elektotan karton, li alrigardis sian kunludanton.

Post kelka tempo la alia elpoŝigis samspecan monbileton kaj metis ĝin sur la unuan, tiel ke kvindek guldenoj tie kuŝis.

— Montru la karoan ason! — diris la ĵetinto, rigardante Paŭl'on, kvazaŭ por diri: — atentu por ke vi juĝu, ke mi honeste ludas.

Paŭl atente rigardis, sed ne povis kompreni kiel oni kuraĝas tiel riski sian monon; li mem neniam tion farus, li ne amis ludi pro mono, eĉ ne amus gajni tiumaniere altan monsumon de kunludanto. La kunludanto de la ĵetinto tamen ne ŝajnis opinii kiel Paŭl, ĉar li riskis sian monon, fingre montrante karton... sed trafis malĝuste. Lia kunludanto enpoŝigis la kvindek guldenojn kriante:

— Jen vi perdis! Sed nun mi vetas per cent kontraŭ cent guldenoj.

La alia rifuzis, ĉar tiu sumo estis por li tro alta. Sed la posedanto de la kartoj jam ĵetmiksis kaj metis cent guldenojn sur sian genuon.

Paŭl atente observinte pensis: La karto kuŝanta en la mezo estas la karoa aso: tion saman pensis la alia ludanto, tial li pripensis momenton kaj avide dezirante tiujn cent guldenojn, li fine elpoŝigis cent guldenan paperon kaj metante ĝin sur la alian li fingre montris la mezan karton. La ĵetinto kaptis ambaŭ monpaperojn, turnis la montritan karton, sed ĝi ne estis la karoa aso, sed pika damo.

— Turnu ĉiujn kartojn — diris la alia ludanto, kredante ke li estas trompita.

— Turnu ilin mem, kaj vi vidos ke mi ludas laŭ honesta maniero.

La perdinto turnis la kartojn kaj vidis ke li malpravas. Li miris, same kiel Paŭl.

— Ĉu vi kunludos, sinjoro? — sin turnis la ĵetinto al Paŭl.

— Mi neniam ludis.

— Ludu nun!

— Mi neniam ludos!

La vagonaro haltis. La vojaĝantoj estis en Utreĥt.

La ludantoj restis sidantaj kaj eniris du junaj viroj. Unu el ili tuj komencis legi ĵurnalon, la alia ekparolis pri la bela vetero.

— Al Haag? — lin demandis la gajninta kartludisto.

— Jes.

Granda movado regis sur la perono. Paŭl rigardis eksteren, mirante pri la granda homamaso kiel formikejo svarmanta [284] tien kaj reen. Gazetvendistoj laŭte kriis, ĉaroj preterruliĝis inter la interpuŝiĝantaj vojaĝantoj, kelneroj diskuris prezentante siajn limonadon, bieron; nervaj sinjorinoj serĉis bonan sidlokon en kupeo nur por virinoj; militistoj rapidis tien kaj reen... fine la vagonaro ekmoviĝis, la radoj denove ektamburis, kaj laŭta fajfado de la lokomotivo preskaŭ disŝiris la timpanan membranon [285] de Paŭl, kiun preskaŭ surdigis tiu tuta bruo, kiun li tute ne amis.

Post kelkaj minutoj la kartoj reaperis kaj baldaŭ la ludado rekomenciĝis, sed nun inter la ĵetanto kaj la juna ne leganta viro. Komence ĉi tiu gajnis, sed post kvarono da horo la fortuno turnis al li la dorson, ĉar antaŭ ol la vagonaro haltis en Gouda, li perdis multe da mono. Paŭl miregis; tia ludado ŝajnis al li tia malspritaĵo, ke li ne povis deturni la rigardon de la malgajninto; sed kiam la vagonaro knarante haltis, lia surprizo fariĝis pli granda ankoraŭ, ĉar la leganta sinjoro subite ekstaris, malsuprenigis la kupeofenestreton kaj ŝovis eksteren la kapon. Ŝajnis ke li okule serĉas iun sur la perono; post proksimume unu minuto li reiris al sia loko; samtempe la pordo de la kupeo malfermiĝis kaj eniris policano. La ludanto kiu estis gajninta tiom da mono, iom malkvietiĝis, sed li ne havis la tempon pensi pri tio, ĉar la juna viro lin kaptis ĉe la ŝultro dirante:

— Vi estas mia arestito!

— Mi... Kion do mi...

La juna viro, sendube sekreta policano, puŝis la kartludiston al la ĵus enirinta policano, kiu tuj kondukis lin for. La juna viro poste residiĝis, notis la nomojn de la malgajnintoj dirante:

— Kiel nesingarde vi agis fidante tian trompiston.

— Trompiston? — ili diris mirigite.

— Jes, jam de longe li tiamaniere priŝtelas vojaĝantojn, sed feliĉe ni lin kaptis ĉe la freŝa faro. [286]

En Haag ĉiuj elvagoniĝis kaj Paŭl, sekvanta la moviĝantan homamason, baldaŭ staris antaŭ la stacidomo, rigardante

dekstren kaj maldekstren, ne sciante kiun vojon elekti. Ĉie li vidis kurantajn homojn, ruliĝantajn ĉarojn, veturilojn, biciklojn, sed ne sciante kien sin direkti, li dum kelka tempo restis staranta. Sed Peĉjo estis doninta al li bonan konsilon, nome: ke li konstante sin turnu al policano, ĉar policanoj, tiel estis dirinta la drinkejestro, scias kaj ĉiam volonte diras al vojaĝantoj, kiun direkton ili iru, kie plej bone oni pasigus la nokton en Haag, kie kuŝas tiu aŭ tiu ĉe strato aŭ placo; ĉion tion ili ĝentile sciigas al ĉiuj senpage.

Paŭl fine rimarkis policanon, altkreskan personon kun bele ornamita maniko, tiun manikon li preskaŭ seninterrompe etendadis dekstren — maldekstren — dekstren — maldekstren por reguligi la stratan interkomunikon.[287]

Paŭl iris al li kaj demandis pri la direkto al la Wagenstrato.

— Iru rekte antaŭen dum deko da minutoj, kaj vi ĝin vidos ĉe via maldekstra flanko — diris la policano, eĉ ne rigardante la demandinton, sed senhalte movante la brakon dekstren — maldekstren — dekstren — maldekstren. Paŭl sekvis la montritan direkton kaj baldaŭ trovis la Wagenstraat. Li ĝin laŭiris kaj serĉis la numeron 327. En Groningen li estis spertinta, ke la paraj numeroj de domoj troviĝas ĉe unu sama flanko de la strato kaj la malparaj ĉe la kontraŭa flanko. Li serĉis do la malparajn numerojn ĝis li atingis la serĉatan. La konstruaĵo, portanta sur sia pordokadro la numeron 327 estis speco de kontoro[288] kun larĝaj pordoj starantaj malfermitaj. Paŭl eniris kaj montris al pordisto sian ŝanĝotan bileton de la ĉevala loterio.

— Revenu morgaŭ matene je la deka horo — diris la pordisto.

— Ĉu mi nun ne povos ricevi la monon?

— La pagadoj de la kontoro okazas nur antaŭtagmeze.

Paŭl foriris pensante: — Kie kaj kiel mi devos pasigi tiun tutan tempon? —

La homplenaj stratoj tute ne plaĉis al la vilaĝano; li pli amis labori sur la kamparo ol promeni en tia urbego, kie li ne konis la stratojn kaj kie ĉiumomente aŭtomobiloj, tramveturiloj, biciklantaj servistoj de buĉistoj minacis renversi lin. Ĉar ofte li aŭdis pri Haag, pri tiu belega granda urbo, kien

miloj da fremduloj regule iras por sin amuzi, sed nia vilaĝano ne povis kompreni en kio konsistas tia amuzo. Neniam li dezirus loĝi en tia labirinto[289] de stratoj kaj stratetoj, kiujn li nur kun peno povis diferencigi unu de la alia, ĉar ĉiuj havas, laŭ lia opinio, la samaspektajn, altajn domojn; ĉie oni vidas samspecajn butikojn kun legomoj, viando, infanludiloj, pipoj, cigaroj, ĉapeloj kaj ŝuoj: li miris kiu do devas aĉeti ĉiujn tiujn komercaĵojn. Ŝajnis al li, ke ĉiuj tiuj ŝuoj, ĉapeloj kaj tiel plu, neniam estos finvenditaj; krome la prezoj estis, laŭ lia opinio, tiel altaj, ke nur kapitalistoj povos ĉion ĉi aĉeti, tamen ĉie li vidis personojn tute ne aspektantajn kiel kapitalistoj. Male: sur la anguloj de iuj stratoj li rimarkis malfeliĉulojn kun nur unu kruro, kun nur unu brako, eĉ sen brakoj, aŭ blindulojn kun petskribo sur la brusto, petanta per ĝi al la preterirantoj ke ili ne malatentu la malfeliĉulon. Sed nur malmultaj piedirantoj atentis la petskribon kaj la blindulo staris senmove, etendante antaŭ si ladan monujon, kiun li de tempo al tempo movadis tintante per la moneretoj por atentigi la vidantoj, ke li, la blindulo, tie staras, vidante neniun, petante de ĉiu unu solan monereton. Paŭl ĵetis arĝentan monereton en la monujon, iris pluen kaj post kelkaj paŝoj sin trovis en strato aspektanta kiel belege hela tunelo.[290] Ĝi estis longa, larĝa galerio de butikoj, unu flanke de alia. La pavimo konsistis el ŝtonoj tiel glataj kaj tiel regule lokitaj, ke la tuto ŝajnis koridoro de palaco. Rigardante supren de kie venis la lumo, Paŭl ne vidis la liberan ĉielon, sed nur kupolkurbigitan[291] vitraĵon, kovrantan la tutan tunelon. Li estis en la „Passage".

Subite alproksimiĝis ruliĝanta ĉareto kun malgrandaj radoj. En la ĉareto, ne pli granda ol tiaj, kiajn ofte oni donacas al infanoj, sidis senkrura viro. Per unu mano li ŝovis antaŭen sian veturileton kaj en la alia li tenis ladan monujon, kiun li etendis al la piedirantoj. Multaj eĉ ne atentis la viron, sed Paŭl kompatis lin kaj enĵetis arĝentan monereton en la monujon. La senkrurulo dankis kaj ŝoviĝis pluen.

— Ne donu al tiu viraĉo! — subite diris al Paŭl viro, vestita kiel policano sed kun alia kapkovraĵo.

Paŭl rigardis la parolinton, kiu diris plue:

— Li estas sentaŭgulo kaj drinkulo.

— Tiu senkrura viro?

— Jes, krom tio, li ne estas tiel malriĉa kiel li volas kredigi al la homoj. Li posedas dekon da domoj. La urba registaro oferis al li lokon senpagan en filantropejo, sed li malakceptis.

— Kial?

— Ĉu vi demandas?... Ĉar almozpetante li ricevas pli multe da mono, kaj li povas drinki se plaĉas al li...

Paŭl promenis pluen, rigardante post si al la senkrura, domposedanta almozulo, sed li estas jam for. Elirinte el la galerio, li vidis du statuojn unu starantan, unu sur ĉevalo, Paŭl naive demandis al policano:

— Kio estas tio?

— Statuoj.

— Statuoj?... Kies ili estas?

— De la urbo.

— Tiu estas Johan de Wit! — klarigis stratabubo, fingre montrante la starantan statuon.

— Kaj tiu alia? — demandis Paŭl.

— Tiu alia estas Vilhelmo la Silentema! — dirante tion, la bubo ridetante kaj okulumante rigardis la policanon.

— Tiu alia ne estas la Silentema — diris la policano.

— Ĉu tiu ne estas la Silentema!? — demandis la bubo —

— Ne — Vilhelmo la dua.

— Li tamen konstante silentas! — moke diris la bubo kaj rapide forkuris.

La policano ridis, Paŭl ne komprenante la ŝercaĵon, daŭrigis sian promenadon al la „Gevangenpoort", iama malliberejo, en kiu oni montras ankoraŭ nun la turmentilojn el pasintaj jarcentoj, la ĉambrojn, kie la fratoj de Wit pasigis siajn lastajn vivotagojn kaj aliajn vidindaĵojn. Amaso da homoj, plejparte fremduloj staris antaŭ la pordo, atendante ke le klarigisto malŝlosos ĝin por ilin enirigi. Paŭl fariĝis scivola.

— Kio okazis tie ĉi? — li sin turnis al unu el la atendantoj.

— I do not understand — *)

---

*) Mi ne komprenas.

— Kion vi diras? — demandis Paŭl.
— Tio estas anglo, — diris alia atendanto.
— Ho!
— Jes, li diras, ke li vin ne komprenas.
— Sed kio do okazis tie ĉi? — refoje demandis Paŭl.
— Nenio.
— Sed kial ĉiuj tiuj homoj ĉi tie staras?
— Ili volas eniri por rigardi.
— Kion rigardi?
— Ho, vi ne scias? — Ĉi tiu konstruaĵo estas la Gevangenpoort.
— Kaj kion oni vidas tie?
— Vidindaĵojn.

La pordo malfermiĝis kaj ĉiuj eniris, unu antaŭen-puŝante la alia. Ankaŭ Paŭl eniris por rigardi la „vidindaĵojn", ĉar li estis scivola pri vidindaĵoj; neniam aŭdinte pri ili.

La klarigisto, vigla vireto kun pala vizaĝo rapide kaj unutone rakontis al la vizitantoj pri la dise starantaj turmentiloj uzataj antaŭ cento da jaroj, por ke kulpigitoj konfesu krimojn, kiujn ili eble tute ne faris; li klarigis kiel la turmentistoj senkapigis, pendigis, radŝiris [292] la kondamnitojn kaj kiel la fratoj de Wit estis mortigataj de la kanajlaro; [293] kiel tiuj du fratoj pasigis la lastajn tagojn en ĉi tiu malliberejo kaj fine kiel alia malliberulo, kondamnita al multjara malliberecо, forkuris kun la servistino de la malliberejestro.

— Ili forkuris — tiel la klarigisto finis sian klarigon — antaŭ pli ol cent jaroj kaj ĝis hodiaŭ ili ne revenis. Ĉiuj — ekceptinte la anglon — laŭte ridis pro tiu ŝercaĵo, per kiu la klarigisto jam dum deko da jaroj kaj dekfoje ĉiutage regaladis la vizitantojn.

Paŭl pensante pri tiu unu statuo, demandis:
— Ĉu tiu de Wit estas la sama kies statuo staras sur la placo ekster la konstruaĵo?
— La sama.
— Kial do oni metis tie lian statuon?
— Ĉar oni mortigis lin.
— Kaj kial oni faris tiun statuon por Vilhelmo la Silentema?

— Ĉar ankaŭ oni lin mortigis.

Stranga afero! — pensis Paŭl.

— Ni iru pluen en alian ĉambron — diris la klarigisto.

— Ĉu la vidindaĵoj estas tie? — demandis Paŭl.

— Vidindaĵoj!!... Mi do jam montris vidindaĵojn!

— Sed kio estas en tiu alia ĉambro?

— Aliaj vidindaĵoj, nome abomenindaĵoj *).

— Ĉu vi nomas tion vidindaĵoj? — kun miro demandis Paŭl.

La ofendita klarigisto ne respondis, sed iris pluen; lin sekvis la vizitantoj, sed Paŭl, kiun tute ne interesis tiaj vidindaĵoj, turnis al ili la dorson kaj reiris al la elirpordo por foriri, sed la pordo estis ŝlosita kaj nova aro da scivolaj vizitontaj staris sur la strato, atendante por eniri tuj kiam la pordo estos malslosita. Sed ĉar la klarigisto ankoraŭ ne finis sian taskon, la homamaso sur la strato ĉe unu flanko de la pordo kaj Paŭl ĉe la alia flanko, devis atendi ankoraŭ kvaronhoron. Post tiu kvaronhoro la pordo denove malfermiĝis kaj la juna viro eliris el la konstruaĵo.

Promenante sencele laŭlonge de la „Vijverberg", li sidiĝis sur benkon kaj rigardis la larĝan belan longfosaĵon, nomitan „Lago". Ĝi sterniĝis antaŭ li inter la „Vijverberg" kaj la konstruaĵoj de „Binnenhof". Meze de la lago kuŝas insuleto kun arbetaĵoj. Super la lago ŝvebis amaso da marbirdoj, ili rememorigis al Paŭl lian digon super kiu ankaŭ la tutan jaron flugas samspecaj birdoj. Ili laŭte eligis akrajn kriojn kaj Paŭl pensis: — Kiel do ili povas serĉi tie sian nutraĵon? — Post kelka tempo alvenis de sub la „Gevangenpoort" infanvartistino kun tri infanoj. Ankaŭ tiuj haltis, rigardis la birdojn kaj ĵetis super la akvon pecetojn da pano, kiujn la birdoj flugante kaptis kaj englutis. Ili kaptis ilin tiel lerte, ke eĉ ne unu peceto da pano falis en la akvon.

En tiu sama momento maljuna viro sidiĝis flanke de Paŭl.

— Ĉu oni ĉiam nutras tiujn birdojn per panpecetoj? — demandis lin Paŭl.

---

*) *Gruwelkamer*, ĉambro plena je abomenindaj turmentiloj.

La viro ridetis, prenis sian pipon el la buŝo kaj diris:

— Kelkfoje; ili tamen devas serĉi sian nutraĵon aliloke. La vartistino kun la infanoj nun estis forĵetintaj sian tutan panon kaj promenis pluen preter la du sidantoj.

— Jen la cikonio! — kriis unu el la infanoj kaj denove ili haltis.

Paŭl rigardis en la direkto, montrita de la infano kaj vidis grandan cikonion starantan flanke de la insuleto kaj ĝis la duono de la piedoj en la akvo. Pikildrato [294] malebligis la birdon iri pluen. Paŭl ekmiris kaj sin turnante refoje al la maljunulo, li demandis:

— Ĉu tiu cikonio neniam forflugas?

— Ĝi ne povas.

— Kiel do ĝi venis tien?

— Oni metis ĝin tien kaj fortranĉis parton de ĝiaj flugiloj.

— He!...

— Ĉar alie ĝi kompreneble forflugus, sed ĝi devas restadi kaj konstante loĝadi sur la insuleto.

Paŭl miris pli kaj pli; la maljunulo tion vidis kaj daŭrigis:

— La cikonio estas la emblemo [295] de nia urbo, tial oni deziras, ke ĝi daŭre loĝu en la urbo.

— Sed... Ĉu ĝi ne forflugas al varmaj landoj, kiam alproksimiĝas la aŭtuno?

— Ĝi ja ne povas forflugi pro la mallongaj flugiloj.

Paŭl opiniis ke estas honto tiel kontraŭstari al kompatinda birdo forflugi tien, kien ĝin vokas la naturo, sed li silentis.

— Kio estas tio? — li demandis post momento, etendante la manon al „Gevangenpoort" el sub kiu aperis vico da strange vestitaj viroj, unu post alia, ĉiu portanta sur la ŝultro longan bastonon sur kiu sidis nigra tabulo.

— Viroj, kiuj trairas la urbon kun reklamiloj.

— Kio estas reklamiloj?

— Anonco de komercisto, kiu rekomendas siajn komercaĵojn.

— He! Ĉe ni oni anoncas en la gazetoj!

— Ĉu vi ne loĝas tie ĉi?

— Dank'al Dio mi ne logas tie ĉi, sed en vilaĝo.

La maljunulo ridetis elblovante kelkajn densajn fumnubojn.

— Kio do staras sur tuj tabuloj? — demandis Paŭl.
— Ni tuj povos legi tion, ili preteriros...
Ili preteriris post momenteto kaj Paŭl legis:



— Sed! — li diris kun miro, — ĉiuj tabuloj havas sur si la saman anoncon!
— Jes, por pli bone atentigi la preterirantojn.
— Ĉu tiuj viroj promenas tiel la tutan tagon?
— Jes... ridetante respondis la maljunulo denove elblovante siajn fumnubojn.
Paŭl leviĝis; li ankoraŭ volis promeni, sed li postrigardis la virojn, kiuj ne laboradis, sed pasigadis sian tempon por tia sensencaĵo.
— Kial ili ne laboras? — li grumblis kaj sin direktis al la bela vasta „Tournooiveld" *) kaj „Lange Voorhout". **)
Rapide alkuris renkonte al li laŭte tintante tramveturilo. La kondukisto faris rapidan geston per la mano, sed Paŭl promenis pluen ne sciante, kion celas tiu direktilisto. Sed tuj poste li aŭdis laŭtan ekkrion.
— He!... atentu!!
Paŭl ne sciante ke la krianto celas lin, promenis pluen, sed du sekundojn poste iu kaptis lian brakon, kaj tiris lin flanken; en la sama momento preterkuris de malantaŭe alia tramveturilo.

---

* Turnirejo.
**) Komenco de la haga arbaro.

— Atentu!! — refoje kriis la sama voĉo, — la tramo renversus kaj frakasus vin!

Paŭl paliĝis.

— Ankoraŭ unu sekundo kaj estus tro malfrue, — diris la sama voĉo.

Paŭl rigardis la parolinton, kaj tiel ektimis, ke li ne povis tuj respondi.

— Neniam iru inter la tramreloj...

— Mi ne aŭdis la tintadon pro tiu alia tramo, — fine diris Paŭl. — Kial do ili tintadas samtempe?

— Ĉu vi ne estas urbano?

— Vilaĝano mi estas... sed mi dankas vin, ĉar vi savis mian vivon, — diris Paŭl.

La viro ridetis kaj daŭrigis sian vojon.

— Malbenita urbo! — grumblis Paŭl kaj suriris la „Lange Voorhout". Tie li promenadis kelkan tempon, dezirante ke li estu en sia vilaĝo aŭ sur la kamparo, ĉar la vivo en la urbo al li tute ne plaĉis. En Groningen li estis mirinta pri la bruado kaj la movado sur la stratoj, sed en ĉi tiu urbego Haag ĉio estis centfoje pli terura. Ĉiuminute lin minacis motorcikloj, tramoj kaj bicikloj. Veturilojn kun ĉevaloj li vidis nur malmultajn kaj li demandis sin, kion oni do faris kun ĉiuj ĉevaloj, antaŭe uzataj por tiri la tramojn kaj la aliajn veturilojn. Promenante pluen li trairis la „Lange Voorhout", la „Kneuterdijk" kaj atingis la straton „Noord Einde". Ĉe sia dekstra flanko li rimarkis belan statuon: ĉevalon kun kavaliro.[296] Li iris tien por ĝin rigardi. Ĉevaloj, eĉ bronzaj, same kiel ĉiuj aliaj bestoj, ĉiam altiris lian atenton, kaj li venis al la statuo.

Ĉe la unua rigardo ĉiu tuj vidas, ke ĝi estas vera skulptartaĵo, meritanta plenan atenton. La statuo estas unu el la famaj verkoj de grafo van Nieuwerkerke. En la jaro 1845*a* ĝi estis inaŭgurita[297] kun granda ceremonio en ĉeesto de la tiam reganta reĝo Vilhelmo III*a*.

Sur alta piedestalo la fiera ĉevalo ŝajnas esti marŝanta. Atente ekzamenante la beston, oni vidas ĉie la vejnojn sur ĝia korpo; ĉio estas tiel nature imitita, ke nur la koloro kaj la senmoveco diferencigas ĝin de vivanta ĉevalo. La princo „Vilhelmo la Silen-

tema" en generala kostumo de sia epoko kaj kun „bastono" en la mano, rigardas rekte antaŭ si al la palaco, kie nun loĝas lia lasta ina posteulo, la reĝino Vilhelmina kun la juna reĝidino Juliana.

Paŭl plenatente ĉirkaŭiris la statuon kaj sin klinis por legi la subskribon, starantan reliefe malsupre sur la piedestalo,[298] sed li ne povis deĉifri tiujn latinajn vortojn. Li legis: Gulielmo — Primo Guber...

— Tion la diablo eĉ ne povas... li diris sed en la sama tempo preskaŭ lin renversis preterrapidanta motorciklo. La motorciklisto kubute tuŝegis lian postaĵon kaj Paŭl trafis per la nazo sur unu el la feraj ĉenoj, kunigantaj la malaltajn marmorajn kolonetojn, kiuj staras ĉe la anguloj de la piedestalo.

Furioze li sin levis, etendis la pugnon al la forrajdanta motorciklo kaj grumblis:

— Atentu do... viraĉo!

Sed la viraĉo lin ne aŭdis, sed rapidis pluen laŭlonge de la „Noord Einde" kie li malaperis.

Policano, deĵoranta ĉe la palaco, kviete kaj ridetante proksimiĝis Paŭlon kaj demandis:

— Ĉu la falo dolorigis vian nazon?

— Mi nur ektimiĝis, — diris Paŭl, sed tio ne estas grava.

— Li povus tute renversi, eĉ mortigi vin.

— Jes, li povus... Kiu do estas tiu rajdisto?

— Vilhelmo la unua.

— Kial oni faris por li tiun statuon?

— Ĉar oni mortigis lin.

— He!... ankaŭ lin?... Ĉu oni faras ĉi tie statuojn nur por mortigitoj?

— Ĉu vi ne estas urbano? — ridetante demandis la policano, kiu admiris Paŭlon pro lia alta kresko.

— Vilaĝano mi estas!

— Nu; mi konsilas al vi esti iom singarda en ĉi tiu urbo, ĉar tie ĉi okazas multaj akcidentoj.[299]

— Jes, tion mi spertis jam dufoje en duonhoro.

La policano ridetis kaj iris pluen. Ankaŭ Paŭl volis daŭrigi sian promenadon, sed li ne sciis kien iri. Fine li elektis la direkton al la „Hoogstraat", sed ne iris plu sur la mezo de la strato sed

laŭ la flanko por eviti pluajn „akcidentojn". Li penis legi la surskribaĵojn de la fenestroj de la butikoj, sed tiujn francajn vortojn li ne povis kompreni, kaj li miris ke nederlanda urbo havas nederlandajn butikojn kun francaj nomoj kaj francaj surskriboj kaj ke eĉ la nederlandaj statuoj portas sur si skulptitajn vortojn, kiujn preskaŭ neniu nederlandano scias legi nek kompreni.

Estis nun la kvara horo posttagmeze kaj Paŭl ekmalsatis. En la vagonaro li estis manĝinta kelkajn buterpanojn kaj refoje lia stomako komencis peti pluajn, sed ĉar li formanĝis ĉiujn, li okulserĉis panbutikon, sed ne vidis ĝin. Li vidis nur butikojn kun ŝuoj, ĉapeloj, pluvombreloj, horloĝoj kaj tiel plu, sed panbutikon li nenie renkontis. Eble en alia strato mi ĝin trovos — li pensis. Li promenis pluen kaj baldaŭ estis en la „Veenestraat", poste refoje en la „Wagenstraat", kie li trovis la serĉaton panbutikon. Li aĉetis dekon da bulkoj, enpoŝigis ilin kaj denove promenis, manĝante. Trairinte multajn stratojn li venis sur la „grandan vendejon", kaj sur la „Prinsegracht", kie li sidiĝis sur benketon. Tiu strato ne estis tiel homplena kiel la aliaj, tial ĝi plaĉis al li iom pli. Li restis tie longan tempon ĉirkaŭrigardante kaj dezirante, ke la tago jam estu pasinta por kiel eble plej rapide returnen vojaĝi al Peĉjo kaj por enmanigi al li la monon, kiun li la sekvantan tagon ricevos por li.

La tempo pasis malrapide kaj komprenante ke li ne povos resti la tutan posttagmezon sur tiu benko, li fine ekstaris kaj trafe maltrafe promenadis ĝis la sepa horo de la vespero. Tiam li denove estis en la „Wagenstraat" kaj pensante, ke li devos ie pasigi la venantan nokton, li sin turnis al policano kaj petis informon pri gastejo. La policano diris:

— Iru al la Heerestraat, tie estas gastejo, kie vi per malmulta mono povos pasigi la nokton kaj matenmanĝi.

— Kiom mi devos pagi? — demandis Paŭl.

— Eble du guldenojn, li diris kaj montris la direkton al la nomita strato.

La gastejo, celita de la policano estas malnova konstruaĵo kun deko da ĉambretoj por dormantoj.

— Ĉu mi povos dormi ĉi tie venantan nokton? — demandis Paŭl al fraŭlino, staranta post la bufedo.[300]

La fraŭlino malfermis dikan kajeron kaj diris:

— Jes, sinjoro, ni havas ankoraŭ neokupitajn ĉambrojn, bonvolu enskribi vian nomon en ĉi tiun kajeron.

— Ĉu tio estas necesa? — kun miro demandis Paŭl, pensante ke li apenaŭ povas skribi sian nomon.

— Jes, sinjoro, la polica dekreto[301] tion ordonas.

Paŭl kun peno kaj kun premitaj lipoj enskribis: „Paŭl."

— Ankaŭ la familian nomon — diris la fraŭlino.

Paŭl elpoŝigis la papereton, sur kiu Peĉjo estis notinta lian plenan nomon kaj Paŭl ĝin kopiis literon post litero, tiel gratante la paperon per la plumo, ke la inkeroj ĉien disŝprucis. Fine lia familia nomo: „Mitropolijoka", ĉirkaŭita de aro da longvostaj steletoj estis kopiita. La fraŭlino apenaŭ povis deteni rideton kaj kaŝis al si la buŝon per la mano, por ne montri kiel ŝin amuzas tiu longkreska junulo, kiu preskaŭ ne sciias tenadi la plumon. Ŝi legis la nomon kaj demandis:

— Ĉu vi estas Polo?

— Mi estas Nederlandano... el vilaĝo en Groningen, — respondis Paŭl enpoŝigante sian papereton kaj eksidante ĉe fenestro apud tableto. Li miris ke ĉiuj estas scivolaj pri li kaj demandas ĉu li estas urbano, vilaĝano, alilandulo aŭ Nederlandano. Por eviti pluajn al li malagrablajn demandojn, li prenis ĵurnalon de sur la tableto kaj eklegis, sed la legado prosperis tre malbone, li renkontis tiom da francoj vortoj, kiujn li ne komprenis, ke post kelka tempo li formetis la ĵurnalon, kaj rigardis eksteren sur la straton. De tempo al tempo venis kaj foriris homoj en la gastejo, sed ilin tute ne interesis Paŭl, kaj ili lin ne atentis. Tiel sidante kaj enuante li atendis la dekan horon, tiam li petis la fraŭlinon ke ŝi montru al li lian ĉambron. La fraŭlino supreniris mallarĝan ŝtuparon; Paŭl supreniris ĉe sia flanko. Veninte supren, ŝi laŭiris longan koridoron, haltis antaŭ pordo, surhavanta la numeron 8, ĝin malfermis, eniris, bruligis gaslampeton kaj forirante demandis:

— Je kioma horo oni devos veki vin, sinjoro?

— Mi ja vekiĝos per mi mem. Ne necesas min veki, je la deka horo mi devos esti en la „Wagenstraat".

La fraŭlino foriris. Paŭl restis sola kaj ĉirkaŭrigardis sian

dormejon. Ĝi estis malgranda kaj tiel malalta, ke lia kapo preskaŭ tuŝis la plafonon. Unu larĝa fenestro kun mallevita kurteno elrigardis al la strato. Ĉe la fundo de la ĉambreto staris lito kaj tualeta tablo kun lavopelvo, akva kruĉo super kiuj pendis mantuko kaj spongo. Antaŭ la lito kuŝis sur la planko litotapiŝo. En unu el la anguloj staris seĝo kaj en la pordo troviĝis kelkaj najloj por pendigi la vestojn. La gaslampeto, aŭ pli precize dirite: la gasflamo sur la muro tre apud la pordo aspektis kiel fluganta vesperto kaj fantome lumigis la tuton, ĵetante sian longan moviĝantan ombron de sur la planko sur la kontraŭan muron. Paŭl rigardis tiun nigran fantomon ŝoviĝantan tien kaj reen kaj restis momenton staranta pensante:

— Ĉu mi devas d o r m i en tiu lito?... Ĝi estas por mi multe tro mallonga.

Li eksidis kaj lia ombro malaperis de sur la muro kaj sterniĝis sur la plankon.

— Mi eĉ ne povas s i d i oportune sur tiu lito — li pensis, estos pli bone meti la matracon [302] kaj la kusenojn sur la plankon.

Li kuŝigis ilin laŭlonge de la muro pensante:

— Mi dormos ne senvestigante min; la vetero estas sufiĉe varma, mi ne bezonos litokovrilon.

Li kuŝiĝis sur la matracon, metis du kusenojn sub la kapon por provi ĉu li povos dormi en tia pozo kaj esperante ke sukcesos al li tiel pasigi la nokton, li fermis la okulojn. Sed la flagranta gasflamo lin ĝenis, li vidis ĝin tra la palpebroj kaj ŝajnis al li, kvazaŭ tiu moviĝanta vesperto vekas ĉe li strangajn pensojn kaj ke ĝi malebligos al li ekdormi. Li ekstaris kaj estinginte ĝin, reiris al sia matraco kaj denove kusiĝis.

Sur la strato veturiloj ruliĝis, tramoj tintante kuris tien kaj returnen kaj malsupre en la hotelo de tempo al tempo pordoj estis kun bruo fermataj, ĉiaj aliaj bruoj penetris en liajn orelojn, tamen li malfermis la okulojn, dezirante ke la nokto estu jam pasinta kaj ke li baldaŭ povu returnen vojaĝi al sia vilaĝo por neniam plu viziti grandan urbon. Kiam li tiel kuŝis kaj pripensis, stranga odoro de li nekonata — eble dumnokta urba odoro — penetris lian nazon, sed li ĝin ne multe atentis;

li penis forpeli el sia kapo ĉiujn pensojn por tuj ekdormi, sed ju pli li penadis forpeli ilin, des pli grandamase ili revenis, unu forpuŝante alian. Jen li image vidis antaŭ si Peĉjon laŭte brubatantan siajn manojn deklamante:

En ĉerk' ripozis Ŝercemul'
Li kuŝis sterniĝinta
Kaj ĉiuj plendis: Ŝercemul'
Nun estas jam mortinta,
Ho ve! ho ve! ho ve!! —

Ŝajnis al Paŭl, ke li mem estas tiu Ŝercemul', ĉar ankaŭ li mem nun kuŝas sterniĝinta kvazaŭ en ĉerko.
Kaj Peĉjo deklamas plue:

Sed jen subite Ŝercemul'
En sia ĉerk' sidiĝis,
Kaj ĉiuj kriis Ŝercemul'
El morto reviviĝis,
Hura! hura! hura!! —

Ankaŭ Paŭl volis sidiĝi, sed io, kiel peza ŝtono kuŝis sur lia brusto; li ne povis sin movi dum Peĉjo deklamis plue:

El ĉerko saltis Ŝercemul'
Li dancis tra la domo,
Kaj ĉiuj kantis: Ŝercemul'
Vi estas stranga homo,
Brave! brave! brave!! —

Volonte Paŭl volus salti de sia lito por danci tra la ĉambro, sed la ŝtono, fariĝanta pli kaj pli peza, malhelpis kaj eĉ malebligis al li tion fari. Li volis forigi la ŝtonon, sed ĝi estis tro peza; li volis krii helpon, sed li ne povis. Li restis kuŝanta, rigardante antaŭ si kaj ŝajnis al li kvazaŭ la gasflamo flagras ankoraŭ fantome lumiganta la ĉambreton. Subite la moviĝanta vesperto disetendis siajn flugilojn, fariĝis pli kaj pli granda, kaj ŝanĝiĝis en anĝelon kun longaj blankaj flugiloj sur la ŝultroj. Tiu anĝelo estis Eva. Ŝi moviĝis dancante, etendante al li la brakojn, sed li ne povis ilin kapti. Refoje li volis krii, sed ne unu sono eliris

el lia buŝo. Fikse kaj ŝtreĉe li rigardis la dancantan, ridetantan Eva'n, sed iom post iom ŝi malheliĝis kaj fine malaperis; en la sama momento la gasflamo estiĝis kaj la ĉambreto dronis en la plej profundan mallumon. La pensoj de Paŭl konfuziĝis; lastfoje li penis forigi la pezan ŝtonon de sur sia brusto, sed liaj brakoj kuŝis senfortaj sur la matraco; liaj pensoj pli kaj pli nebuliĝis, fine li aŭdis, vidis kaj sentis plu nenion.

ĈAPITRO XXII.

Paŭl vekiĝas sub strangaj cirkonstancoj — Paŭl en banurbo kaj lia aventuro — Piedoj kun ses piedfingroj.

Kiam liaj sentoj kaj interalie lia aŭdkapablo revenis, li levis la pezajn palpebrojn. La mallumon austataŭis hela tago. Dolĉa freŝa venteto, venanta tra la larĝe malfermita fenestro, kies kurteno estis tirita supren, karesis lian frunton, penetris liajn nazon kaj bruston kaj li konfuze rigardis antaŭ si. Komence li distingis nur malklarajn figurojn, li aŭdis nur malklarajn sonojn, kiuj iom post iom ŝanĝiĝis en flustradon. Al Paŭl estis strange. Kio do fariĝis? Kie li estas? Kien estis fluginta Eva? Kial tiu fenestro estis larĝe malfermita kaj kiel tiel subite fariĝis hela tago .Ŝajnis al li, ke nur antaŭ kelke da minutoj li estingis tiun gasflamon, kaj jen subite hela taglumo lin ĉirkaŭas. Li kolektis la pensojn, enspiris la freŝan aeron kaj malrapide eksidis, ĉar la pezo ŝtono ne kuŝis plu sur lia brusto.

— Kio okazis? — li diris.

— Kiel vi sentas vin? — demandis voĉo super li.

Paŭl rigardis supren kaj vidis nigre vestitan sinjoron.

— Kio okazis? — denove demandis Paŭl.

— Vin preskaŭ sufokis la gaso — respondis la sinjoro, ŝovante seĝon al la matraco kaj sidiĝante.

— Sufokis?

— Vi ne bone turnis la kranon [303] de la gastubo; feliĉe, ke vi kuŝis tiel malalte kaj ke vi ne tute fermis la pordon, alie vi estus venenita de la gaso.

Paŭl ne bone komprenis pri kio parolas la sinjoro, ĉar pri gasokranoj kaj gasotuboj li ankoraŭ neniam aŭdis.

— Vi ne zorge turnis — aŭ eble iom returnis la kranon, — diris plue la sinjoro.

— Sed mi turnis nenion.

— Vi tamen estingis la gasflamon.

— Jes, ĝi min ĝenis.

— Kiel vi estingis ĝin?

— Sammaniere kiel mi estingas ĉian lampon.

— Kiel do? — demandis la mirigita sinjoro.

— Mi blovestingis ĝin.

— Blovestingis!?... Ĉu vi ne scias ke per tio la gaso povas disetendiĝi en la ĉambro?

— Tion mi ne sciis...; mi simple blovestingis la flamon — kviete respondis Paŭl.

— Kiel vi nun sentas vin?

— Mi sentas ke mia kapo estas iom peza, tamen mi sentas min bone.

— Provu ekstari, — diris la sinjoro.

— Paŭl obeis.

— Ĉu vi ne sentas malfortecon en la kruroj?

— Nur iomete.

— Nu, mi gratulas vin, juna sinjoro. Mi estas resanigisto, sed mi tre miras, ke vi tiel rapide reakiris la sentojn.

Krom la doktoro estis en la ĉambreto la fraŭlino, kiu la pasintan vesperon estis montrinta la vojon al Paŭl. Ŝi rigardis la grandegulon pensante: — Kia bela junulo, sed kia senspertulo li estas!

— Ĉu vi neniam loĝis en urbo? — demandis plue la doktoro.

— Ne, sinjoro; nur en mia vilaĝo.

— Nu!... estonte pripensu ke estas danĝere blovestingi la gasflamon. Antaŭ ol foriri, mi devas doni al vi alian konsilon. Promenu al Scheveningen, la promenado kaj la freŝa aero faros al vi bonon kaj banu vin dum kvaronhoro en la maro, ankaŭ tio bone efikos.

— Mi dankos vin, doktoro; mi faros laŭ via konsilo.

— Bone, sed mi devas ankoraŭ diri, ke mi neniam sendas

kalkulon al pacientoj, loĝantaj ekster la urbo, kaj ĉar mi ne revenos al vi, mi volonte tuj ricevos de vi la pagon pro ĉi tiu mia vizito. Ĝi estas tri guldenoj.

Paŭl pagis. La doktoro foriris kaj lia paciento, kiun nur miraklo savis de certa morto, malsuprenis la ŝtuparon por matenmanĝi.

La fraŭlino refoje staris malantaŭ la bufedo kaj paroletis kun la hotelmastro, staranta ĉe la alia flanko. Kiam Paŭl sidiĝis ĉe tablo ili eksilentis, sed la hotelisto diris al Paŭl:

— Tio finiĝis bone sinjoro.

— Jes, diris Paŭl iomete honte.

Rapide li matenmanĝis, pagis kaj petis informon pri la vojo al Scheveningen. La hotelmastro kiel eble plej bone donis la informon kaj Paŭl foriris, intencante neniam reveni en hotelon, kie li preskaŭ estis venenita de gaso. Li ekpromenis sekvante la vojon al li indikitan. Li sentis sin jam tute resaniĝinta kaj ekiris per elastaj kruroj al la Scheveninga vojo, kiun li atingis post kvaronhoro da promenado. Li miris pri tiu bela larĝa vojo kaj laŭiris la plej altan parton, kuŝanta ĉe la dekstra flanko. Tie ne kuris tramoj nek motorcikloj nek aliaj veturiloj por renversi kaj eble frakasi piedirantojn. Li promenis sub la altaj arboj kaj post horeto estis en Scheveningen. Tie li vidis la maron kiel ankoraŭ neniam antaŭe. De sur la digo, malantaŭ sia dometo, li ofte apenaŭ povis vidi ĝin, sed ĉi tie la ondoj ruliĝis senhalte preskaŭ ĝis la altaj dunoj, tiel ke la surirebla loko inter dunoj kaj maro, la sablaĵo, estis tre mallarĝa. Li laŭiris la kajon [304] al la bela supermara promenejo [305] sur kies ekstremaĵo staras koncertejo, povanta enhavi pli ol mil vizitantojn. Estis labortago kaj nur malmultaj homoj estis sur la marbordo, sed ĉe la alia flanko de la supermara promenejo jam multaj naĝantoj sin movis en la akvo. Kelkaj staris ĝis bruste en la maro, aliaj naĝis tien kaj reen. Banservistoj observadis la naĝantojn kaj per laŭtaj fajfadoj revokis tiujn, kiuj sin riskis tro malproksimen. Paŭl preteriris la supermaran promenejon kaj sidiĝis sur unu el la bankoj sur la alta kajo; de tie li povis oportune rigardi la baniĝantojn kaj la maron. Malantaŭ lia dorso sin etendis vico da hoteloj, plejparte uzataj de alilanduloj, kiuj

pasigis ĉe tie la someran sezonon ĝis la mezo de Septembro.

Peĉjo estis dirinta al Paŭl, ke nenio estas pli bela ol la banloko Scheveningen kaj Paŭl certiĝis nun, ke la drinkejestro estas prava. Li admiris ĉion, kion li vidis: la pentrindan marbordon oblikve kaj iom post iom malkrute malaltiĝantan de la dunoj en la maron; li admiris la longan kajon pavimitan per belaj ŝtonoj, la deklivon konsistantan el pezaj ŝtonoj, kiujn eĉ la plej furiozaj ondoj ne povis forigi de sia loko; li admiris la vicon de domoj kuŝantaj malantaŭ li tre alte sur la dunoj, de kie oni ĉiam povis rigardi la maron. Silente li sidis sur la banko rigardante post si kie promenis grupetoj de bangastoj, preskaŭ ĉiuj fremduloj, kies lingvon li ne komprenis .Sed plej multe li admiris la maron, kiu senhalte rulis siajn krispajn ŝaŭmkovritajn ondojn preskaŭ ĝis la dunoj, de kie ili ĉiam returnen ruliĝis por tuj reveni kovrante kaj kelkfoje renversante la baniĝantojn.

Kelkaj el la naĝantoj apenaŭ estis videblaj kaj de tempo al tempo ilin returnen vokis la banservistoj per siaj akraj fajfiletoj.

Paŭl vidis kiel tiuj baniĝantoj senvestiĝas en malgrandaj banveturiletoj [306], kiel ili reiras en ilin post la baniĝado por sin revesti. Li vidis longan vicon de tiaj veturiloj kaj rimarkis ke ĉevaloj ilin tiras en la maron kaj poste al la marbordo.

Fine Paŭl ekstaris; la doktoro estis konsilinta ke li sin banu. Li aĉetis bileton kaj eniris en unu el la budetoj. Vestita per banpantaloneto li baldaŭ saltis sur la marbordon, kaj estis kuronta en la maron, kiam amaso da homoj ĉe la supermara promenejo vekis lian atenton. Li aŭdis laŭtajn kriojn, fajfadon, vokadon; li vidis ke kelkaj baniĝantoj sin ĵetis en la maron, kvazaŭ por konkuri, kiu el ili povos plej rapide naĝi. Li sin direktis al la kriantaj kaj vokantaj homoj kaj vidis virinon, kiu elŝiris siajn harojn dum ŝi malespere ekkriis:

— Helpu ŝin!... helpu ŝin!... helpu mian filinon!!... Ho Dio! Dio!!...

— Kio okazis? — diris Paŭl al unu el la baniĝantoj.

— Knabino estas drononta.

— Kie?

— Tie!... Ŝi naĝis tro malproksimen kaj eble neniu sukcesos ŝin savi.

Paŭl havis akrajn okulojn, li vidis ke en la malproksimeco kiel makuleto sur la ondoj naĝas io; nenion plian li povis distingi, la distanco estis tro granda.

La malesperanta virino kriis pli kaj pli laŭte.

Paŭl diris nenion, sed kiel sago el pafarko li sin ĵetis en la maron. Li estis fortega kaj bonega naĝanto kaj per siaj longaj kruroj kaj brakoj povis moviĝi antaŭen pli rapide ol eĉ bonegaj spertaj naĝantoj. Li ne naĝis laŭ la reguloj de la naĝarto, sed la ranoj estis montrintaj kiel devas uzi siajn membrojn por rapide antaŭeniri en la akvo kaj li antaŭeniris kiel fiŝo kaj ne perdante el la okuloj la dronontinon. Jam post kelkaj minutoj li klare vidis, ke ŝi ŝtreĉas ĉiujn siajn fortojn por resti super la akvo. Kun ĉia ebla peno ŝi klopodis naĝi kontraŭ la ondoj, kiuj ĉiumomente minacis fortiri ŝin pli malproksimen en la maron. Vidante ke helpo alproksimiĝas, ŝi duobligis siajn fortojn. Paŭl volis krii al ŝi, sed timante ke la sala marakvo eniros lian buŝon, li silentis, batante la ondojn kiel furiozanto. Kiel ŝarko [307] li rapidis antaŭen; li volis savi ŝin, li estis vidinta la angoron kaj malesperon de ŝia patrino kaj fidante siajn fortojn kaj sian lertecon pri la naĝado, li estis decidinta savi la dronontinon. La distanco inter li kaj la knabino estis nun nur kelkaj metroj.

— Kuraĝon! — li kriis, sed tuj eksilentis por malebligi al la marakvo eniri lian buŝon.

La knabino vidis alproksimiĝi sian savonton, streĉis siajn elŝerpiĝontajn fortojn, sed si sentis ke li venas tro malfrue. Kun laŭta, lasta ekkrio levante la brakojn al la ĉielo ŝi malaperis sub la ondojn.

Paŭl tamen ĝustatempe mergis [308] kaj kaptante per unu mano ŝiajn harojn, li tuj elakviĝis. [309] Li ne estis tre laca de la naĝado, ĉar la ondoj ĝis nun estis helpintaj kaj puŝintaj lin antaŭen, sed la malfacila tasko estis komenciĝonta. Li devis naĝi returnen kontraŭ la refluo kaj samtempe ne nur tenadi duone svenintan knabinon, sed teni ŝian kapon super la akvo. Li sin ĵetis sur la dorson kaj naĝis trenante kun si la knabinon. Ŝi estis ferminta la okulojn, aspektis pala kiel vaksa figuro kaj

ne donis plu signon de vivo, sed Paŭl sciis, ke ŝi vivas kaj tenadis ŝian kapon super la akvo. Li naĝis el ĉiuj fortoj, sed la refluo estis tiel forta, ke li antaŭeniris nur malrapide. Ĉiaj pensoj lin atakis en tiu momento. Laŭvice ŝvebis preter lia imago lia patrino kaj Eva, precipe Eva, kaj vole nevole li pensis pri ĉiuj danĝeroj, kiuj en la lasta tago estis minacintaj lin, unue pri la tramo, preskaŭ frakasinta lin, plue pri la gasflamo kaj nun pri ĉi tiu penado savi knabinon, al li tute nekonatan. Dume li naĝis, ne perdante la esperon kaj fidante siajn fortojn. Jam ofte li savis ŝafon, sed nur malofte je risko de sia vivo. Nun li estis savonta tiun knabinon je risko de sia propra vivo, sed li sentis ke li elŝiros ŝin el la ungegoj de la morto. Li aŭdis nenion krom la plaŭdado de la ondoj; li vidis nur la ĉielon super si, la maron ĉirkaŭ si, kaj la kapon de la knabino kaj ŝian neklaran korpokonturon sub la akvo. Li streĉe aŭskultis ĉu alproksimiĝas de malantaŭe aliaj naĝantoj por helpi, aŭ boateto, sed nenion li aŭdis. Li sciis nenion pri la distanco kuŝanta inter li kaj la marbordo, sed li esperis, ne timis kaj daŭrigis sian naĝadon. Post kvaronhoro li sin turnis sur la ventron kaj naĝante plue en tiu sintenado, li penis rigardi antaŭ si por esplori ĉu la marbordo estas proksima, sed refoje li vidis nur la ĉielon kaj la akvon. Tamen li devis naĝi antaŭen, ĉar ĉiun minuton, dum kiu li ripozus, li nepre malproksimiĝus de sia celo, tiel forte la refluo tiris lin malantaŭen. Li ne ripozis, do naĝis kaj naĝis, kvankam li antaŭeniris nur malrapide. Fine, iom post iom, sin levis antaŭ lia okuloj la dunoj super la nivelo de la maro, kaj tio estis pruvo, ke li ne vane naĝis. Sed helpo ankoraŭ ne venis, nek boateto por ricevi lin kun la knabino. Tion li ne komprenis. Li jam timis, ke li naĝis en malĝusta direkto sed post kelka tempo li vidis la koncertejon sur la supermara promenejo kaj tiu vidaĵo donis al li novajn fortojn, kvankam li sentis, ke laceco komencas kapti lin, sed en la sama momento li sentis, ke ankoraŭ longan tempon li povos uzi siajn membrojn. En tiu momento kelkaj bonaj naĝantoj lin atingis, sed li ne bezonis ankoraŭ ilian helpon. Li naĝis pluen, ĉiam pluen kaj fine atingis lokon, kie li eble povus ekstari. Tirante per ĉiuj fortoj la knabinon antaŭ si, li lasis malleviĝi la piedojn

kaj je sia neesprimebla ĝojo sentis ke ili tuŝas la fundon de la maro. Pro la refluo de la akvo, la distanco inter li kaj la dunoj estis nun pli granda ol antaŭ duonhoro kaj tio estis feliĉa fakto, ĉar li sentis, ke liaj fortoj komenĉis iom post iom lin forlasi. Li staris ĝis la brusto en la akvo, prenis la nun svenintan knabinon sur la brakojn kaj kliniĝante antaŭen, komencis travadi tra la ondoj. Li vidis je kelka distanco la homojn, kiuj ĝis tiu ĉi tempo en granda espero kaj en granda timego estis okule sekvintaj ĉiujn liajn movadojn.

Kiam ili antaŭ kvaronhoro estis vidintaj lin malaperi sub la akvon, ili kredis lin kaj la knabinon perditaj, sed ĉe ilia elakviĝo la esperoj denove kaptis ĉies koron, kaj vidante ke la juna viro el ĉiuj fortoj sin movas antaŭen, ĉiu kredis ke li estas gajninta ĉi tiun teruran batalon inter la maro kaj la viro, inter la morto kaj la vivo. Kelkaj lertaj naĝantoj komence volis sin ĵeti post li, sed aliaj opiniis, ke tio estas nur malhelpo, eĉ fatala. Ili sekve ne postnaĝis lin sed restis kie ili staris, senspire atendante la rezultaton de ĉi tiu danĝera savo. Ili vidis kiel la forta naĝanto proksimiĝas, ili vidis, ke li ne montris signon de laceco, tiel ke post kelkaj momentoj ĉiuj kredis la savon efektiviĝonta.

Kaj kiam la grandegulo staranta en la akvo kun la knabino sur la brakoj, iom post iom sin levis el la ondoj, ĉiuj sentis sin kaptataj de emocio kaj neesprimebla ĝojo. La virinoj ploris, la viroj kriis al li por kuraĝigi lin. Paŭl alproksimiĝis la homamason kiel venkinto, kiel la heroo de la tago. La maro atingis en ĉi tiu momento liajn genuojn kaj balancante la knabinon sur siaj fortaj muskolaj brakoj, li iris renkonte al la homoj, ne atentante iliajn kriojn, sed okule serĉante la patrino ĉe kies piedoj li volis kuŝigi la filinon, kiu sen lia savado estus fariĝinta viktimo de sia propra nesingardemo.[310] Dume la maro kvazaŭ hontante pro sia malvenko forruliĝis plaŭdante, grumblante, retirante siajn avidajn ungegojn, kiuj ĉiujare superruzas kaj fortiras kun si kelke da trokuraĝuloj kaj nesingardaj naĝantoj, kaj nur redonas ilin por ke la tombo povu transpreni ilin kiel kadavrojn. Ĉi tiun fojon ĝiaj ungegoj vane estis penantaj alproprigi al si novan viktimon, ĉar Paŭl subite estis aperinta

kiel savanto kaj ankoraŭ spiregante pro streĉeco, li aliris al la laŭte krianta kaj pro ĝojo ploranta patrino kaj metis antaŭ ŝiajn piedojn la filinon, kiun ŝi kredis jam perdita.

La virino falis surgenue, sin klinis al la knabino, kiu ne donis vivosignon kaj samtempe sin klinis maljuna viro por esplori ĉu la knabino vivas. Li tuŝis ŝian bruston, aŭskultis ŝian spiron kaj okaze liaj okuloj trafis la piedojn de la savinto. Kun videbla miro li rigardis de liaj piedoj supren al la antaŭ li staranta grandegulo. Li estis rimarkinta ion eksterordinaran, li estis vidinta ke ĉiu piedo de Paŭl havas anstataŭ kvin, ses piedfingrojn.

Antaŭ ol la patrino de la savitino povis turni sin al Paŭl por esprimi al li sian dankon, li iris al sia veturilo por sin vesti. Li estis sekvinta la konsilon de la doktoro; li estis baninta sin. Li ne atendis dankesprimojn, nek de la patrino, nek de iu alia; li tute simple estis savinta knabinon de certa morto; li tute simple estis farinta sian devon kaj li sentis sin kontenta.

Kiam li estis revestinta sin, li vidis ke la homoj kun la savita knabino estas for, ili estis irintaj en la Kurhaŭs por revoki ŝin al la vivo. Li sciis ke ŝi vivas, li estis vidinta, ke ŝi estis nur momenteton sub la akvo, kaj ke neeble ŝi povus esti droninta, kaj ĵetanta ĉirkaŭ si rapidan rigardon, li suriris la ŝtuparon kondukantan al la kajo kaj foriris. —

ĈAPITRO XXIII.

Petro Blunt en sia ĝardeno — La reveno de Paŭl — Stranga ĵurnalanonco [311] — Neatendita korespondo de Petro Blunt.

Petro Blunt ĉiam „enterigis", tio estas: ĉiam plantis mem siajn fazeolojn kaj tion li ĉiam tre zorge faris. Je egalaj distancoj li faris truetojn en la tero per pinta bastonego, poste enĵetis unu fazeolon [312] en ĉiun trueton, kovris ilin per tero kaj jam kelke da tagoj post la „enterigado" li iris en sian ĝardenon, tre apud sia domo, por rigardi ĉu la junaj verdaj kreskaĵoj ekĝermis.

Li nun denove estis en sia ĝardeno, ne por planti, sed por

ŝirkolekti sitelon da tiuj de li mem plantitaj legomoj. La plantoj nun portis tiom da fazeoloj, ke Peĉjo en duona horo povis kolekti plenan sitelon. Ŝirkolektante, li babilis al si mem, ĉar aŭskultantoj aŭ interparolantoj nun ne estis apud li.

Kiam Peĉjo tiel babiladis, kvazaŭ flustrante — murmurante, li iafoje plifortigis siajn parolojn per gestetoj, gestoj kaj gestegoj de la ŝiranta mano; per gestoj de la ĉapkovrita kapo, eĉ de la piedoj. Pensante pri aferoj aŭ homoj, kiujn li ne ŝatis, li per unu forta ektiro disigis la fazeolojn de la trunketo kaj per unu rapida ĵeto enigis ilin en la sitelon, balanciĝantan ĉe la tenilo sur lia maldekstra brako. Pensante kontraŭe pri homoj aŭ aferoj, kiujn li ŝatis, li delikate ŝiris la fazeolojn de l'trunketo, delikate faligis ilin en la sitelon sur la jam ŝirkolektintajn fazeolojn. Rapida kapmovo konstante indikis ke Peĉjo iom koleretas, dum milda rideto atestis ke li pripensas ion ŝatatan aŭ amatan. Peĉjo estis rilate al tio kiel infano; ĉiuj liaj muskoloj parolis kaj neniam ili mensogis nek montris ion, kio ne estis en interkonsento kun liaj pensoj. Nun li pensis pri la farmisto Baŭman, pri liaj friponaĵoj rilate Paŭl, kaj per forta ektiro li deŝiris fazeolon kaj per unu ĵeto faligis ĝin en la sitelon dum liaj lipoj sin premis unu sur alian. Baldaŭ tiuj lipoj, kiuj dum tiu unu sekundo ne eligis flustradon, denove malfermiĝis kaj novaj sonoj apenaŭ aŭdeblaj de li mem, eliris el ili. Kiam li dum kelkaj momentoj tiel estis pensinta pri Baŭman, li subite forpuŝis tiujn pensojn kaj la figuro de Johano, la filo de Baŭman aperis antaŭ lia imago. Peĉjo ŝiris per unu ankoraŭ pli forta movo alian fazeolon kaj la pendanta sitelo sur lia brako ektremis. Li haltis momenton, rigardis ĉirkaŭen. Li vidis neniun sur la apuda strato kaj denove deŝiris fazeolojn, pensante dum kelke da sekundoj pri neniu. Regule falis fazeoloj en la sitelon, kiu ne plu tremetadis, sed baldaŭ ili komencis fali pli malrapide, pli delikate... Peĉjo pensis pri Paŭl, kiu estis revenonta el la urbo. Li piede revenos de Groningen, ĉar li estis rifuzinta, ke Peĉjo veturigos lin de la stacidomo al la vilaĝo. Ĉiuj movadoj de la drinkejestro montris, ke li pensas pri la grandegulo, pri lia Eva kaj pri ilia estonteco. Post kelke da tagoj Paŭl edziĝos kun Eva, kaj Peĉjo jam antaŭe decidis, ke la

standardo flirtos de sur la tegmento de la „Verda Ĉevalo". Kun plezuro li pensis, ke tiuj du homoj sin amas reciproke kiel junaj gefianĉoj devas ami sin reciproke. Ili amas sin ne pro la mono sed pro la persono. Paŭl estis malriĉa, Eva estis malriĉa kaj eĉ ne posedis doton, sed Paŭl neniam estis pensinta pri doto, li pensis nur pri Eva kaj li ne interŝanĝus ŝin je princino. Same Eva amas nur Paŭl'on kaj ŝi ne interŝanĝus lin je princo. Peĉjo ridetis kaj la fazeoloj falis en la sitelon unu post alia, malrapide, delikate.

La sitelo fine estis plena kaj la drinkejestro iris en sian ĉevalejon, metis la sitelon sub la pumpilon por pumpi akvon sur la fazelojn, sed en la sama momento venis tien el la traveturejo lia filino Alino.

— Tion mi mem faros! — ŝi diris neĝentile kaj ŝi brue pumpis la akvon en la sitelon, tiel ke la akveroj disŝprucis ĉiuloken.

— Kia knabino!! — pensis Peĉjo, kaj komparante ŝin kun Eva, li silente foriris al la traveturejo, de tie en la drinkejan ĉambron. Dum tiu mallonga irado li nenion diris sed li pensis — kaj ĉiuj liaj movoj klare esprimis ke li pensis — pri sia filino; ĉar li klinis la kapon, iom kunpremis la lipojn kaj liaj duonpantofloj nur mallaŭte tuŝis la plankon. Li ne koleris nun; li sentis korpremon kaj maldolĉan senton de malĝojo, pensante: — Kia knabino!... kia karaktero!!...

Sed li ne estis viro, kiun longe regis tiaj pensoj. Li portis en sia koro la devizon: Post pluvo venos sunbrilo, post ĉagreno festeno, li sciis, ke ĉiu nebulo fine estos forpelita de bela vetero, mallonge dirite: post sufero venos prospero. La nubo ŝvebanta super la frunto de Peĉjo Klakilo baldaŭ foriĝis, la frunto denove sereniĝis,[313] liaj okuloj ekbrilis, rideto ludis sur lia buŝo kaj brubatante la manplatojn li estis deklamonta. Sed la stratpordo malfermiĝis, altkreska viro sin klinis por eniri, refoje rektiĝis, refermis la pordon kaj aliris al Peĉjo, kiu ĵus sidiĝis sur sian kanapon. Ridetante Peĉjo etendis la manon al la nova veninto:

— Paŭl! —

— Mi revenis!... diris Paŭl, kaj eltirante kelke da monbiletoj el sia poŝo, li diris plue: — Kaj jen la premio. —

Peĉjo enpoŝigis la monon, demandante:
— Ĉu la vojaĝo ne estis amuza?
— Neniam mi travivis tiom en unu tago!
— Tion mi jam antaŭe diris al vi.
— Tramo preskaŭ frakasis min.
Peĉjo demande lin regardis.
— Motorciklo preskaŭ rompis mian nazon.
Peĉjo mire lin alrigardis.
— Gaso preskaŭ min venenis kaj sufokis.
Peĉjo sentis timon.
Paŭlo detale rakontis pri ĉiuj tiuj aventuroj.
— Sed kiel vi trovis Haag'on? — demandis Peĉjo.
— Mezvoje al Haag, mi estis en societo de ŝtelisto, kiun policano arestis kaj en Haag mi renkontis multajn strangajoĵn: Tie viroj trapromenas la stratojn ne laborante sed ludante rolon de gazetanonco; mi vidis „vidindaĵojn", kiuj hirtigis la harojn pro teruro. Mi vidis surskribojn, kiujn neniu nederlandano povoscias legi nek kompreni. Mi vidis cikonion, kies flugilojn oni fortranĉis por malebligi ĝin flugi al varmaj landoj. Mi vidis tie je la nnua fojo resanigiston, kiu ne resanigis... sed nur vizitis min, kaj lia vizito kostis al mi tri guldenojn.
— Mi repagos tiujn guldenojn al vi — lin interrompis Peĉjo. Paŭl ne atentis tiun proponon kaj parolis plue:
— Mi promenis kelke da horoj tra la urbo meze de miloj da nenion farantaj virinoj kaj viroj. Mi vidis milojn da ĉapeloj, milojn da ŝuoj, kiuj eble neniam estos portataj... kaj mi terure enuis. Eĉ se mi fariĝus grafo aŭ barono, mi ne volus loĝi en tia urbo; mi spertis ke nenio superas niajn kampojn kaj paŝtejojn.
— ... kaj vian Eva'n!
— ... kaj mian Eva'n! — Paŭl eksilentis, sed Peĉjo, kiu estis scivola, demandis:
— Kaj kion vi diras pri Scheveningen?
— Ĝi ravis min... precipe la maro.
— Ĉu vi naĝis en la maro?
— Jes, kun bela fraŭlino.

Peĉjo laŭte ridegis, brufrapis la manplatojn kaj estis deklamonta, sed Paŭl kaptis liajn manojn, dirante:

— Mi vere naĝis kun fraŭlino.

— Tion mi ne komprenas...

— Mi mem eĉ ne komprenas ke iam io tia okazos, sed mi estis devigita... kaj detale li rakontis pri sia aventuro. — Se mi ne estus tirinta ŝin el la maro (tiel li finis) ŝi estus droninta, ĉar el ĉiuj naĝantaj sinjoroj, neniu kuraĝis savi ŝin el la danĝero; ŝi estis jam tiel malproksime, ke apenaŭ oni povis ŝin vidi. Sed mi pensis: Mi savis jam tiom da ŝafoj... Kial mi ne povus savi tiun dronontan fraŭlinon? Kaj mi naĝis al ŝi kaj rekondukis ŝin al la marbordo.

— Kiu ŝi estas?

— Tion mi ne scias; mi foriris, ĉar la rigardoj de ĉiuj tiuj homoj min konfuzis. Feliĉe mi estis for, antaŭ ol unu el ili povus min alparoli. Sed mi estas feliĉa, ĉar mi feliĉigis la patrinon, la baldaŭ rekonsciiĝontan fraŭlinon kaj ŝian fianĉon, se fianĉon ŝi havas sed pri tio mi ne dubas, ĉar ŝi estis tre bela.

— Pli bela ol Eva?

— Neniu estas pli bela ol Eva.

Peĉjo frapis la junan viron sur la ŝultran, dirante:

— Paŭl, vi estas vera viro!... Iru rakonti ĉion al Eva kaj ŝi estos ankoraŭ pli fiera ol iam.

— Pli fiera?

— Jes, ĉar ŝi fariĝos via!

Paŭl ridetis, ekstaris, iris for kaj Peĉjo, sidanta sur sia kanapo laŭte deklamis:

El ĉerko saltis Ŝercemul'
Li dancis tra la domo,
Kaj ĉiuj kantis: Ŝercemul'
Vi estas stranga homo.
Brave! brave! brave!!

Peĉjo Klakilo estis do en sia elemento. —

Du tagojn poste vespere, li ricevis sian gazeton kaj eklegis: unue la anoncojn pri ĉevaloj aĉeteblaj, pri ĉiaj aferoj, koncernantaj la vilaĝon, tiam pri la okazintaĵoj en la urbo, poste

tiujn ekster la provinco... pri politiko... subite liajn okulojn trafis stranga anonco:

La juna viro, kiu antaŭ du tagoj savis la vivon de knabino ĉe la marbordo de Scheveningen, estas petata tuj sciigi al la subskribinto siajn nomon kaj adreson, por ke li — la subskribinto — povu malkovri al li tre gravajn cirkonstancojn rilate al liaj naskiĝo kaj deveno, kiuj ĝis nun restis al li kaŝitaj pro ankoraŭ ne solvitaj, sed misteraj kaŭzoj.

Zdenko Baĉiĉ.
Medicina doktoro.
„Kurhaus" — Scheveningen.

Peĉjo salte leviĝis, kuris kun la gazeto al la fenestro por pli bone legi tiun anoncon, residiĝis, faligis la gazeton, laŭte kunfrapis la manojn kaj ekkriis:

— Jen ni havas!!

Tuj li denove leviĝis, kuris en sian familian ĉambron kaj skribis leteron al Zdenko Baĉiĉ, sciigante al li ĉion, kion li povis skribi pri Paŭl, poste li senprokraste kuris al la poŝtejo kaj ĵetis... tre delikate... la leteron en la leterkeston murmurante:

— Mi ĉiam pensis kaj ĉiam diris, ke Paŭl ne estas ordinara farmisto aŭ kamparano; en li sin kaŝas eble grafo aŭ barono; sed pacience ni atendos... eĉ dirante ankoraŭ nenion al Paŭl mem.

ĈAPITRO XXIV.

Kio okazis en la dometo de Fremda Dorotea — Fremdaj gastoj — La gepatroj de Paŭl — Dorotea konfesas — Paŭl sur la digo — Liaj meditadoj — Paŭl kaj Eva.

Pasis tri tagoj kaj estis dimanĉa posttagmezo. Paŭl ĵus revenis de Eva kaj staris antaŭ siaj birdokaĝoj en kiuj la kanarietoj senhalte saltadis de l'bastoneto sur la ringeton, pendantan en ĉiu kaĝo, kaj de la ringeto sur la bastoneton. Kelkaj el la birdetoj laŭte kantis, kelkaj eligis krietojn, kiujn Paŭl de tempo al tempo imitis ne tute sukcese, ĉar lia basvoĉo havis multe da peno aŭdigi tiajn altajn sonojn. Ĉe la tablo sidis lia patrino, la pala nigr-okula Dorotea.

Kvankam ŝi loĝis jam dudek jarojn en la provinco Groningen, ŝi parolis nur kripligite la dialekton de la provincanoj, tiom pli, ĉar ŝi tute sin ne okupis pri aliaj homoj. Neniam ŝi vizitis la vilaĝon se tio ne estis necesa, kaj vizitante ĝin pro komisioj, ŝi kutimis kiel eble plej baldaŭ reiri al la farmejo por labori, parolante nur se oni sin turnis al ŝi kun demandoj. Paŭl estis iom silentema, sekve li kaj lia patrino interparolis nur tre malofte, kaj se ili parolis unu kun la alia, tio fariĝis per mallongaj frazoj. Kiam Dorotea estis hejme, ŝi ofte kudris, ĉar neniam ŝi konfidis tiun laboron al la vilaĝaj kudristinoj, kiuj laŭ ŝia opinio, laboris tro malbele, tro vilaĝane kaj tro malnovmode, ĉar la modo de vilaĝanoj ofte datumas el la dek jarojn jam pasinta tempo. La fremda Dorotea ne amis la modon, regantan en la provinco, sed ĉiam sekvis, modon regintan antaŭ dudeko da jaroj en la lando, kie ŝi naskiĝis. Tial ŝi aspektis tute alia ol la virinoj de la vilaĝo, kiuj eble ankaŭ tial ankoraŭ konstante ŝin nomis „fremda Dorotea". Al Paŭl estis indiferente kiel sin vestas lia patrino; ankaŭ ŝi ne okupis sin pri la elekto de liaj vestoj. Ĉiu agis laŭplaĉe, tial la harmonio inter tiuj du homoj neniam estis rompata. Ili vivis kune sed kvazaŭ kiel fremduloj. Li nomis ŝin patrino, sed patrinan amon li neniam estis spert-

inta; ŝi bone lin traktis, sed kvazaŭ li estus filo de aliulo, kvankam ŝi nomis lin sia filo.

Post la disputo, kiun Paŭl havis kun sia mastro Baŭman, li ne plu servis lin. Li estis farminta kelke da kampoj, kelke da herbejoj, laboris sur ili kaj aranĝis ĉion laŭ sia propra deziro. Bovinojn li ankoraŭ ne havis, li volis atendi ĝis post sia edziĝo kun Eva; la geedziĝo okazos post monato. Provizore la junaj geedzoj loĝos en la dometo de Roos, ĝis bona okazo sin prezentos ke ili povos aĉeti dometon en la proksimeco de la farmitaj kampoj.

Estis la kvina horo posttagmeze kaj Paŭl estis elironta, kiam neatendite la pordo malfermiĝis kaj eniris Petro Blunt. La drinkejestro aspektis gaja kaj lia vizaĝo montris, ke li venas kun bona sciigo.

— Peĉjo! — diris Paŭl.

— Paŭl!... Dorotea! — resalutis Blunt.

Nek Paŭl, nek Dorotea estis mirigita pro la vizito de Blunt, ĉar li vizitis ĉiujn loĝantojn de la vilaĝo kaj ĉiam li estis bonvena pro sia kvieta, ĉiam bona humoro. Paŭl kaj Dorotea eĉ ne atendis ion eksterordinaron.

— Sidiĝu! — diris Paŭl, alŝovante seĝon al la tablo. Blunt sidiĝis ridetante kaj alrigardante la giganton, kiu restis staranta ĉe siaj kaĝoj dum lia kapo preskaŭ tuŝis la plafonon de la ĉambro.

— Mi havas strangan novaĵon! — diris Blunt, kaj li eltiris el sia poŝo ĵurnalon. Malvolvante ĝin sur la tablo li legis, samtempe, kiel eble plej multe atentante la kudrantan virinon:

> La juna viro, kiu antaŭ du tagoj savis la vivon de knabino ĉe la marbordo de Scheveningen, estas petata sciigi al la subskribinto siajn nomon kaj adreson, por ke li (la subskribinto) povu malkovri al li tre gravajn cirkonstancojn rilate al liaj naskiĝo kaj deveno, kiuj ĝis nun restis al li kaŝitaj, pro ankoraŭ ne solvitaj sed misteraj kaŭzoj.

— He! — kriis Paŭl. — Mi estas tiu juna viro. Kiu presigis en la ĵurnalon tiun anoncon?

— Medicina doktoro kun tre stranga nomo, — diris Peĉjo, oblikve alrigardante Dorotea'n.

— Kiu estas lia nomo? — demandis Paŭl, ankaŭ rigardante Dorotea'n, kiu donis signon de malkvieteco kaj kiu pikis sian fingron per la kudrilo.

— Li sin nomas: Zdenko Baĉiĉ, — diris Peĉjo, malrapide silabante la nomon de la doktoro.

Paŭl kaj Blunt ambaŭ rimarkis la konfuziĝon de la virino, sed neniu diris unu vorton al ŝi.

— Strange! — fine diris Paŭl.

— Kiu estas tiu Zdenko Baĉiĉ? — diris Peĉjo, sin turnante al Dorotea, kiu ektremetis.

— Ĉu vi konas lin? — ekkriis Paŭl, ankaŭ sin turnante al ŝi.

— Mi ne scias, — ŝi balbutis... eble mi lin konas.

— Kion plue? — demandis Paŭl al Peĉjo.

— Nun, jen kion mi faris — respondis Blunt, ĉiam atente observante Dorotea'n. — Mi skribis al tiu doktoro, ke mi konas tiun junan viron kaj ke li loĝas en ĉi tiu vilaĝo.

— Bone! — diris Paŭl — kaj kion li respondis al vi?

— Li nenion skribe respondis al mia letero sed... li venis... proprapersone.

— Kie li estas? — balbutis Dorotea, ekstarante sed refalante sur sian seĝon.

— Li venis kun la savita knabino kaj kun ŝia patrino.

— Kial ili venis? — demandis Paŭl.

— Unue la patrino kaj la knabino volas danki vin pro via kuraĝa savado, plue tiu doktoro volas doni al vi informojn pri via deveno.

— Deveno? — diris Paŭl, ne klare komprenante, kion la drinkejestro celis.

— Naskiĝo — klarigis Peĉjo.

— Kie ili estas nun? — kun miro demandis Paŭl.

— Ili staras ekstere kaj petas la permeson eniri —

Paŭl pli kaj pli miris, sed Dorotea, kadavre pala, eligis ekkrion, glitis de sur sia seĝo kaj falis sur la plankon. Paŭl rapidis al ŝi kaj levante ŝin, residigis la teruritan virinon.

— Kion do signifas ĉio tio ĉi? — li diris, kaj li alrigardis unue sian patrinon, poste Blunt, kiu gravmiene sidis ĉe la

tablo, ne sciante, kion pensi pri tiu stranga konduto de la fremda Dorotea.

Post kelke da momentoj ŝi rekonsciiĝis, terurite ĉirkaŭrigardadis kaj ĝemdiris:

— Ho, Dio!

— Ĉu ili povas eniri? — fine demandis Peĉjo, ekstarante. Paŭl iris eksteren, kaj antaŭ ol li povis diri unu vorton, bela fraŭlino ĉirkaŭprenis lin laŭte kriante:

— Jes! estas li, kiu savis min!... ho, mi dankas!...Kviete Paŭl staris kaj atendis ĝis la belulino lasos lin libera, sed apenaŭ li sin sentis libera, dika sinjorino falis je lia brusto laŭte kriante:

— Jes!... estas li!... Ho, pardonu, ke mi ne tuj vin dankis; sed mi estis tro ekscitita... la nervoj kaj la timo tro min atakis... ĉar mi timis ke mia filino jam ne plu vivis... Ho, dankon!... dankon!!

Refoje Paŭl staris senmove kaj atendis ĝis la fremda sinjorino forigos la brakojn de li, poste li demandis:

— Kaj ŝi tute resaniĝis?

— Jes, jes! — kriis la belulino. Ŝi volis denove esprimi sian dankemon, sed Paŭl diris:

— Bonvolu eniri.

Ili eniris kaj ilin sekvis maljuna grizhara sinjoro kun alta ĉapelo sur la kapo, kiun li deprenis, dirante germane:

— Mi estas doktoro Zdenko... kaj li ekhaltis; tie antaŭ li ĉe la tablo sidis la fremda Dorotea, kiu rigardis lin kun teruro. Dum momento li fiksis siajn nigrajn okulojn sur la virinon kaj fine diris:

— Fraŭlino Branka Ljubiĉ?... se mi ne eraras? Dorotea leviĝis kaj komencis paroli al la doktoro en lingvo, kiun nek Paŭl, nek Peĉjo iam aŭdis. Poste ŝi kaptis la manon de la fremdulo kaj tiris lin kun si eksterdomen.

— Kion do ŝi faras? — demandis Paŭl.

— Vi sciiĝos tion baldaŭ — diris Peĉjo, sed jam nun sciu, ke ŝi ne estas via patrino.

— Ŝi ne estas mia patrino!?... Sed kio do ŝi estas?

— La doktoro tion klarigos al vi.

— Sed kiu estas mia patrino?
— Grafino Jankoviĉ estas via patrino.
— Grafino Jankoviĉ?
— Jes.
— Kaj... mia patro?...
— Grafo Jankoviĉ.
— Sed... kie tiu grafo loĝas?
— Li estas mortinta antaŭ dudeko da jaroj, sed via patrino vivas kaj loĝas en Zagreb, ie en Aŭstrujo.

Paŭl serioze rigardis la drinkejestron, la fremdan sinjorinon kaj la fraŭlinon ankoraŭ starantajn en la ĉambro kaj li sentis kapturniĝon;[314] subite li ekkriis:
— Sekve Alings ne estas mia patro?
— Ne, Paŭl, ĉiuj malĝuste lin kulpigis.
— Mi ĝojas! — diris Paŭl.
— Kaj li ĝojos, ke oni fine scios, ke li ne estas via patro — diris Peĉjo, kiu ekstaris kaj prezentis seĝojn al la fremdaj vizitantinoj. Post momento la doktoro revenis.
— Kie estas mia patrino? — demandis lin Paŭl.
— En Zagreb...
— Mi parolas pri la alia.
— Ho, ŝi estas ekstere kaj ne kuraĝas eniri... ŝi timas vian koleron.

Paŭl eliris sed ne vidis Dorotea'n. Li iris post la domon kaj trovis ŝin sidanta sur la fermita puto. Ŝi sidis kurbiĝinta kaj kaŝis la vizaĝon en ambaŭ siajn manojn. Paŭl iris al ŝi.
— Trankviliĝu kaj eniru la domon — li diris.

Ŝi kaptis lian manon, malrapide levis la kapon:
— Pardonu al mi Paŭl... Kredu al mi, mi neniam estis malbona... kaj neniam mi intencis fari ion malbonan kontraŭ vi...; ofte mi volis konfesi al vi la veron pri via naskiĝo... sed mi ne kuraĝis... Ho, Paŭl!... mi tiom suferadis,... li tiel maljuste, tiel kruele agis kontraŭ mi... eĉ piedpuŝe pelis min el sia domo.
— Kiu tion faris?
— Via avo; la patro de via patro... Kontraŭ li mi venĝis min, kiam mi entersanĝis mian mortintan infanon je vi... Sed

mi preskaŭ estis freneza pro mizero kaj ĉagreno... mi ne povis agi alie... iu malica spirito instigis min... ho, pardonu!

— Mi pardonas, — diris Paŭl, sed reiru kun mi en la domon; tie ni povos paroli plie kaj kviete, tie ni povos interkonsiliĝi pri tio, kion nun ni devas fari... Sed kiel tiu doktoro povis rekoni min?

— Per viaj piedfingroj. Li kiel akuŝisto ĉeestis vian naskiĝon kaj miris, ke vi havas ses fingrojn sur ĉiu piedo... li ankaŭ ĉeestis la naskiĝon de via duonfrato, kiu poste mortis.

— Kiu estis tiu duonfrato?

— Li estis mia filo, li mortis, kiam li estis duonjara... mi metis lin en la lulilon kie vi kuŝis kaj forkuris kun vi.

— Pro kio? — ekkriis la mirigita Paŭl, ne komprenanta la strangan motivon de tiu interŝanĝo.

— Por min venĝi kontraŭ la avo... Ho, poste mi ĉion detale rakontos.

— Sed nun iru kun mi en la domon.

Ŝi leviĝis kaj ambaŭ rehejmiĝis, Dorotea hontante kaj konfuziĝinte kaj Paŭl kiel iu, kiu ne scias ĉu li devas ekkoleri aŭ malĝoji aŭ eĉ ĝoji, kaj lin atakis strangaj emocioj.

Reveninte en la domon li ne sciis kiel konduti al tiuj fremdaj homoj, sed Peĉjo helpis lin farante kvazaŭ li estus la loĝanto mem. Li informiĝis pri la fremduloj kaj Paŭl eksciis, ke ili ankaŭ estas el Zagreb. Kune ili vizitis Scheveningen por pasigi tie kelke da semajnoj pro la sano de la sinjorino, kiu tamen havis tute sanan aspekton. La doktoro estis akompananta la sinjorinon kaj la fraŭlinon kiel amiko kaj protektanto kaj kiel resanigisto.

Fine la doktoro demandis Paŭl'on, kiujn intencojn li havas.

— Kiujn intencojn!? — diris Paŭl.

— Jes; via patrino vivas kaj kvankam ŝi ne scias ke vi vivas ankoraŭ, ŝi kompreneble atendos vin en sia kastelo tuj kiam ŝi ekscios, ke mi tiel neatendite retrovis ŝian filon.

— Ĉu tiu kastelo staras ĉe granda urbo?

— Proksime de Zagreb.

— Ĉu tiu Zagreb estas granda urbo?

— Ho jes, tre granda.

— Eble unu fojon mi iros tien, sed mi neniel deziras loĝadi tie; mi estas kamparano, ĉiam vivis kiel kamparano, kaj la vivo en urbego neniam plaĉos al mi.

— Kion do mi devas fari? — demandis la doktoro.

— Kion vi mem intencas fari?

— Unue tuj sciigi al ŝia grafina moŝto, ke mi trovis ŝian filon, kiun ŝi kredis mortinta... Due mi konsilas al fraŭlino Branka, ke ŝi iru al via patrino por pruvi, ke vere vi estas la filo de grafo Jankoviĉ... tion mi konsilas al ŝi por eviti malagrablajn sekvojn de ŝia... infanrabado, ĉar infanrabadon ŝi faris... Fine la leĝo devos deklari vin la laŭleĝa heredonto de la posedaĵoj de l' mortinta grafo Jankoviĉ; ni havos sufiĉajn pruvojn por efektivigi tiun deklaron. La posedaĵoj de la grafo estis multaj; ili konsistas ne nur el la kastelo en kiu nun loĝas la grafino sed krome el du grandaj tabakfabrikoj...

— Ĉiuokaze mi neniel konsentos loĝi tie, — lin interrompis Paŭl. — Mi volos loĝi kaj vivi kie mi loĝis ĝis nun; kaj se efektive mi posedos multe da monon mi aĉetos ĉi tie bienon.

— Kion pri ĉio tio ĉi diros Eva? — diris Peĉjo.

— Kiu estas Eva? — demandis la doktoro.

— La fianĉino de Paŭl...

La doktoro gravmiene alrigardis la junan viron.

— Ĉu via fianĉino estas...

— Simpla laboristino...

— Eble la grafino ne permesos, ke ŝia filo edziĝu kun...

Paŭl ekstaris, kaj denove interrompis la doktoron:

— Mian Evan mi ŝatas pli alte ol mian estontan grafecon, kaj mi edziĝos kun Eva spite al ĉiuj kasteloj, spite al ĉiuj tabakfabrikoj kaj spite al ĉiuj titoloj, kiuj min atendas.

La doktoro ridetis, dirante:

— Mi klarigos al la grafino la tutan aferon kaj tuj poste mi al vi skribos.

— Bonvolu skribi al Petro Blunt, li konas ĉiujn miajn intencojn kaj dezirojn.

— Kaj volonte mi respondos laŭ tiuj deziroj — diris Peĉjo.

La fremduloj ekstaris kaj foriris. La sinjorino kaj ŝia filino

refoje kore dankis Paŭlon kaj ĉiuj adiaŭis lin esperante revidi lin en Zagreb.

Peĉjo, kiu lasta eliris el la domo, sin returnis sur la sojlo kaj profunde sin klinante li diris:

— Mi humile salutas vian grafan moŝton kaj estas tute je viaj disponoj kaj ordonoj...

— Ne moku min! — ridetante kriis Paŭl, frapante lian ŝultron. — Vi bone scias ke mi estas Paŭl, la kamparano, kaj ke mi restos Paŭl, la kamparano.

— — — — — — — — — — — — —

Unu horon poste Paŭl supreniris la mardigon kaj sidiĝis tie. Strangaj pensoj lin atakis. Li estis travivinta tiom da strangaj aferoj dum la lastaj tagoj, ke li kviete volis ĉion pripensi kaj ripozante per la kapo sur la manplatoj, li enrigardis en la maron. Sed li ne vidis la maron, nek la ŝafojn, paŝtiĝantaj sur la deklivo kaj sur la dorso de la digo, nek li vidis la ĉevalojn, nek la blankajn marbirdojn, ĉie disflugantaj super lia kapo; li eĉ ne aŭdis iliajn akrajn kriojn. Li dronis en profunda meditado kaj image denove travivis ĉion, kion li estis travivinta en ĉi tiuj lastaj tagoj. Unue la friponaĵo de Baŭman sin trudis al li kaj dum momento liaj brunaj okuloj brilis pro kolero, sed Paŭl ne estis venĝema. Baŭman estis cedinta sub la ruzaĵo de Petro Blunt kaj Paŭl estis ricivinta sian tutan salajron. Kiel li estis danka al Blunt, kiel multe li ŝatis tiun honestan ĉiam gajhumoran grizulon kun la belaj bukloj ĉirkaŭantaj kiel arĝenta aŭreolo lian noblan kapon. Kiel volonte li volus rekompenci al Peĉjo lian bonecon, sed li sciis ke ne avideco estis la kaŭzo kaj la instigilo de liaj bonaj agoj; li sciis ke Peĉjo agis tiel nur ĉar lia koro lin al tio instigis. Blunt estis mokinta la farmiston, publike mokinta lin kaj tio sufiĉis al Paŭl. Sed li ne volis plu servi tiun viron; li volis de nun laboradi por si mem; li estis farminta kampojn kaj paŝtejojn kaj kiel farmisto li volis daŭrigi sian vivon. Li ekpensis pri sia vojaĝo al Haag, pri la danĝeroj, kiuj lin tie tiel subite minacis, kaj li miris ke li vivas ankoraŭ. Fine li pensis kiel li savis la vivon de tiu fremda knabino kaj kiajn strangajn sekvojn havis tiu savado. Li ne estis plu Paŭl Mitropolijoka, eble li eĉ ne nomiĝas Paŭl. Baldaŭ li ekscios

pri sia vera antaŭnomo, baldaŭ li ekscios pli multe pri sia patrino, kiu kiel grafino loĝas en malproksima lando, en urbo kies nomo al li estis tute nekonata... Kio fariĝos poste?... Paŭl dronis pli kaj pli profunde en siajn pensojn. Image li vidis sian patrinon... Kiel ŝi aspektos?... Lia patro estis mortinta... Alings ne estas lia patro, li ĝojas pri tio... Alings estis edziĝinta kun Truda kaj samtempe li estis akceptinta la stultan Dirkon kiel sian filon... li sekve ne estis tia malbona viro, kia oni lin konsideris dum tiom da jaroj. Lia reputacio[315] fariĝos pli bona, ĉar Paŭl ne estas lia bastardo... Nevole Paŭl tremetis...; li ne estas plu bastardo, neniu povos de nun nomi lin tia, kiel unu fojon estis farinta tiu kapitano... Kaj kion diros Eva? Li volis iri al ŝi kaj rakonti kiel subite li fariĝis viro kun nomo, pri kiu li jam ne bezonos honti, li volis diri al ŝi, ke li neniam estis bastardo...; li sciis ke ŝi ne amos lin pro tio pli multe, sed li antaŭsentis, ke tiu sciigo ŝin faros feliĉa. Li ekpensis pri la fremda Dorotea, kies vera nomo estas Branka Ljubiĉ, kaj kiu ĝis nun estis rigardata kiel lia patrino kaj strange impresis lin la penso, ke ŝi ne estas plu eĉ neniam estis lia patrino. Li ekpensis pri la stranga konfeso, kiun ŝi al li faris, kiun tamen li ne bone komprenis.

Li ekstaris, malsupreniris la digon, laŭiris la sablan vojeton al la dometo de Roos. Li malfermis la pordon, sin klinis transpaŝante la sojlon por ne frapkontuzi[316] la frunton ĉe la suprosojlo. Senbrue li malfermis la familian pordon, refoje sin klinis kaj eniris, fermante malantaŭ si la pordon.

Ĉe la tablo sidis Eva kun la dorso turnita al li. Ŝia kapo ripozis sur ŝiaj brakoj kaj ŝia dorso skuiĝis.

Paŭl ekmiris, vidante ke Eva mallaŭte ploras.

— Eva — li diris.

Ŝi levis la kapon kaj turnis al li siajn okulojn plenajn je larmoj.

— Kio okazis? — mirigite diris Paŭl.

— Ho, Paŭl!!... Ŝi ĉirkaŭbrakis lin kaj kaŝis la vizaĝon sur lia brusto.

— Kio do okazis? — ree li demandis, karesante ŝian kapon.

— Ĉu vi ne scias, kion oni disrakontas en la vilaĝo?

— Ĉu vi venis de la vilaĝo?... Kion do oni rakontas tie?

— Ke vi subite fariĝis grafo... ke vi savis ĉe la marbordo de Scheveningen fremdan fraŭlinon... ke tiu fraŭlino vin vizitis... ke...

Paŭl alrigardis Evan per siaj grandaj brunaj okuloj en kiuj brilis nur amo kaj fideleco.

— Kion oni rakontas krome?

— Ho, Paŭl!! Mi ne kredas plu tiujn klaĉparoladojn!...

Paŭl sidiĝis sur seĝon, Eva ankaŭ sidiĝis... sur liajn genuojn kaj refoje kaŝante la postlarmajn okulojn sur lia larĝa brusto, si diris:

— Ĉu vi vere savis tiun fremdan fraŭlinon?

— Jes, same kiel mi savis vin, sed ŝi ne i n t e n c e elmetis sin al tiu danĝero.

Eva ridetis, ruĝiĝis kaj flustris:

— Paŭl, ĉu vere vi fariĝis grafo?

— Tion certigis al mi tiu fremda doktoro.

— Ĉu vi forvojaĝos fremdan landon?

— Jes, sed mi revenos tuj kaj poste restos tie ĉi.

— Ĉu vi ne edziĝos kun... grafino?

— Mi edziĝos kun mia Eva.

Ŝi metis ambaŭ brakojn ĉirkaŭ lian kolon, premis la ruĝiĝintan vangon al la sia kaj flustris en lian orelon:

— Ho, Paŭl, pardonu al mi.

— Kion?

— Ĉar mi iomete dubis pri vi.

— Ĉu vi neniam dubos plu?

— Neniam!

Li premis ŝin sur sian bruston, ŝi ne kontraŭstaris; post momento si flustris plue:

— Paŭl.

— Kio estas?

— Mi estas tiel feliĉa.

— Kaj ni geedziĝos post monato.

— Jam post monato?

— Jes... kaj kiujn ni invitos al nia edziĝofesto?

— Mi ne scias Paŭl... decidu nur mem... kiujn?

— Alings! —

Ŝi alrigardis lin, ĉar ŝi komprenis kial li volas inviti lin; post momento ŝi flustris.

— Jes, invitu lin, kaj lian edzinon kaj Dirk'on.

— Bone, kaj neniu plu konsideros min lia bastardo, neniu plu konsideros lin kiel oni faris ĝis nun.

— Kaj vi vere fariĝos grafo?

— Eble, sed tiam vi fariĝos mia grafino.

— Ho, Paŭl! — refoje ŝi sin premis al lia vango.

— Kio estas?

— Vi estas la plej bela, la plej bona el ĉiuj viroj!

ĈAPITRO XXV.

Pri fremda urbo — Neatenditaj okazintaĵoj — Branka Ljubiĉ kaj la tertremo — Grafo Pavao Jankoviĉ.

Agram, Zagreb aŭ Zagrab. — Kelkaj urboj havas pli ol unu nomon. Inter ili estas Agram, kiun la hungaroj nomas Zagrab kaj la kroatoj Zagreb, kio signifas: post la montoj, ĉar la urbo kuŝas ĉe la piedo de la Sljem-montoj, ne malproksime de Danuba brako Save.

Agram estas malnova urbo, konsistanta el tri partoj. Unu el ili amfitiatre konstruita, enhavas la fame konatan palacon de Banuso, proksime de la Grosmajer-promenadejo, sur la monteto Greĉ, kiun ĉiutage kelke da fojoj supren grimpas kaj malsupren iras vagonaroj.

Sur la nomita monteto kuŝas pentrinde belaj konstruaĵoj, kiuj plejparte datumas de post la terura tertremo, ruiniginta en la jaro 1880*a* grandan parton de la Grosmajer promenadejo kun ĝiaj vilaoj kaj aliaj konstruaĵoj.

Tiu tertremo malaperigis kelkajn antikvajn domegojn, sed ilin anstataŭis aliaj de novmoda strukturo.

Unu el ili kuŝanta meze de la deklivo de la Greĉ kaj apartigita de la fervojo pere de bela lukse aranĝita ĝardeno, estas la granda vilao: „La tri turegoj".

Tiu vilao pro la tri turegoj ĉe sia frunto kvazaŭ prezentas

la blazonon [317] de la malnova, libera kaj ĉefa urbo de la reĝolando Kroatujo-Slavonujo, kaj la preteriranto tuj vidas la grandan diferencon regantan inter ĉi tiu konstruaĵo kaj la aliaj, kuŝantaj ĉe ĝiaj dekstra kaj maldekstra flankoj sur la Greĉ.

„La tri turegoj" apartenis al la grafino Jankoviĉ, vidvino de la grafo Jankoviĉ, kiu perdis sian vivon dum la katastrafo en 1880*a*.

La kvindekjara vidvino loĝis tie kun nur malgranda servistaro kaj kvankam ŝi devenis de malnova, nobela familio, ŝi vivis tre simple kaj neniu, vidanta ŝin, dirus ke grafino Jankoviĉ estas la posedantino de tia bela vilao kaj de kelkaj fabrikoj, kuŝantaj en la alia parto de la urbo.

Ŝian vilaon ŝi mem mastrumadis; la fabrikojn administris lerta direktoro kaj du subdirektoroj.

La grafino estis altkreska bela virino, ankoraŭ en la plena forteco de la vivo. Personoj ne konantaj ŝin bone, ofte pensis, ke ŝi estas fiera virino, ĉar preskaŭ neniam ŝi okupis sin pri tio, kio okazis ekster ŝia vilao kaj ŝajne montris indiferentecon pri multaj aferoj en kiujn aliaj kaj precipe riĉaj virinoj de ŝia rango tiel volonte sin miksis pro ambiciaj aŭ aliaj kaŭzoj. Sed la grafino tute ne estis ambicia, kaj famo aŭ honoro ne alogis ŝin. Ŝi vivis sian kvietan vivon, farante bonon al ĉiu, kiu bezonis ŝian helpon kaj pasigante siajn tagojn kviete kaj senbrue en la mezo de sia geservistaro. Amikojn kaj amikinojn ŝi havis nur malmultajn inter siaj samranguloj; ŝi ne amis gravajn ceremoniajn vizitojn, tiel ke ŝi eliris preskaŭ neniam, ŝiaj samranguloj venis en ŝian vilaon, kvankam en la komenco de ŝia vidvineco multaj nobeloj aspiris ŝian manon, ne nur pro la amindeco de la rava vidvino, sed ankaŭ pro ŝia granda riĉeco. Sed ĉiuj vane klopodis akiri ŝian amon; la juna vidvino preferis resti en la stato en kiun la terura tertremo estis metinta ŝin.

Du virinoj konstante ĉirkaŭis la grafinon, unu estis jam maljuna servistino, nomita Barbara, kiu jam pli ol dudek jarojn servis ŝin. Tiu Barbara estis sesdekjara fraŭlino jam servinta en la antaŭa kastelo kaj kiu nur kun peno saviĝis el la ruinoj de la renversita konstruaĵo dum la tertremo, kiam

ŝi kiel vartistino de la juna Pavao, dormis en unu el la flugiloj de la kastelo, kiu preskaŭ tute kun ĉio, kion ĝi enhavis malaperis en la monton; nur la lulilo, kun la kadavro de la frakasita infano kaj kelkaj rompitaj mebloj restis starantaj sur rando de profundaĵo en kies faŭko estis malaperonta la terurigita vartistino, kiu tamen ĝustatempe sukcesis forkuri. La sekvintan tagon oni trovis la lulilon kun la infano, frakasitajn sub parto de enfalinta muro, tiel ke la kadavro estis tute nerekonebla. Ankaŭ la patro pereis sed lian kadavron oni trovis nur post du tagoj. El dek-du loĝantoj de la antikva kastelo mortiĝis kvin. La kompatinda vidvino en la komenco, preskaŭ freneza de doloro, kaŭzita de l'morto de ŝiaj edzo kaj solinfano, iom post iom resaniĝis; ŝia forta organismo fine triumfis kaj post unu jaro ŝi decidis rekonstrui sur la sama loko, kie iam staris la antikva kastelo, novan vilaon, donante al ĝi la saman nomon, kiun portis la malaperinta kastelo de la nobela familio Jankoviĉ. Sed el la iama formo kaj arhitekturo restis nur la tri turegoj, laŭ kiuj la vilao ricevis sian nomon.

Estis malgaja tago en Aŭgusto; jam pluvegis de la tagiĝo. Grandaj akveroj defalis de la arbofolioj en la ĝardeno antaŭ „la Tri Turegoj". Grandaj akveroj gutis de la statuoj starantaj en la florbedoj; akvostrioj sin etendis de la dentohavaj turoj ĝis la tero; striego da akvo arkforme fluis de la pluva defluilo sur la strateton ĉirkaŭantan la konstruaĵon kaj de tie rapide fluis pluen trans la tero al la florbedoj. Strioj da akvo gutante ŝoviĝis malsupren laŭlonge de la ĵaluzioj kaj strioj da akvo serpentlinie rampis malsupren laŭ la fenestroj, kies ĵaluzioj [318] estis tiritaj supren. Ĉie akvo... Ĉio aspektis melankolia, malĝaja; la tuta naturo ploris. Neniu birdo estis videbla, ĉiuj serĉis refuĝejon sub elstaraĵoj de la tri turoj, sub la larĝaj folioj de la arboj kaj aliloke, kie la flugantaj infanoj de la aero povus trovi protekton kontraŭ la pluvo. Tintadante la akveroj saltis sur la marmorajn ŝtupojn antaŭ la pordo de la vilao kaj sin miksis kun la tie kolektiĝinta akvo, forbalaante ĉiujn polverojn, kiujn la petola vento estis ĵetinta tien dum multaj sunplenaj tagoj. Neniu balailo tiel rapide purigas kiel povas purigi la rivere forfluantaj akveroj.

Sur la vojo al Greĉ vidiĝis preskaŭ neniu piediranto kaj nur kelkaj veturiletoj de sur kiuj strie gutis ĉielakvo, rapidis malsupren aŭ treniĝis supren sub la miloj da akvostrioj, kiuj kiel vitraj sagoj el la ĉielo ŝajnis minaci ilin per neevitebla pereo, same kiel sagoj de arkpafistoj starantaj sur remparo de sieĝata urbo minacas alproksimiĝantan malamikon.

En la koridoro de la meza parto de l'vilaĝo „La tri Turegoj" staris maljuna servisto de grafino Jankoviĉ .

Li rigardis eksteren tra la pordofenestreto kaj vidis kun miro, ke iu estas vizitonta lian mastrinon en ĉi tiu malbona vetero, ĉar transe de la ĝardeno staris veturilo. La ĉevalo, kiu altrenis ĝin tien, staris nun kun klinita kapo kaj kurbiĝinta kolo, el kies longaj haroj akveroj unu post alia gutadis sur la vojon en rapidega sinsekvado.

La veturilpordeto malfermiĝis kaj nigre vestita sinjoro kuris rapide por ne malsekiĝi, al la vilaĝo, tra la ĝardeno kaj spiregante haltis sur la perono antaŭ la pordo.

La servisto tuj malfermis ĝin.

— Ĉu ŝia grafina moŝto estas hejme? — demandis la venanto, forĵetante de sia ĉapelo kelkajn pluverojn.

— Jes, sinjoro.

La fremdulo prezentis sian nomkarteton kaj samtempe transiris la pordosojlon per eviti la konstante falantan pluvon.

— Bonvolu atendi unu minuton, sinjoro.

La servisto eniris salonon, troviĝantan ĉe la posta parto de la vilaĝo. La grafino sidis ĉe tablo, kontraŭ ŝi sidis juna legistino, kiu voĉe legis dum ŝia mastrino estis brodanta sur silka naztuko monogramon. Kiam la servisto prezentis la nomkarton, la knabino ĉesis legi.

— He! — ekkriis la grafino, — jen doktoro Baĉiĉ revenis — kaj sin turnante al la atendanta servisto, ŝi diris:

— Enkonduku tuj la doktoron.

La legistino fermis la libron kaj atendis; tuj poste eniris la doktoro; li paŝis al la grafino kaj sin klinis.

— Mi kredis ke vi estas en Scheveningen, kara doktoro — ŝi diris, ekstarante kaj donante al li manon.

— Mi ĵus venis el tiu banloko kaj eble reiros tien jam morgaŭ;

tio dependos de la ordonoj kaj deziroj de via grafina moŝto.

La grafino ridetis, dirante:

— Ĉu tio dependos de mia deziro?

— Jes, via grafina moŝto, kaj mi povas jam antaŭe diri, ke mi reiros Nederlandon kiel eble plej baldaŭ...

Refoje ŝi ridetis, sed la serioza, grava vizaĝesprimo de la doktoro interrompis ŝian ridadon.

— Sidiĝu, doktoro!—kaj sin turnante al la knabino, ŝi diris:— Mi eble ne bezonos vin plu ĉi tiun posttagmezon, fraŭlino Magda.

Fraŭlino Magda eliris el la salono kaj la doktoro sidiĝis kaj rekomencis paroli:

— Mia rapida reveno vin mirigis... kompreneble; sed mi revenas kun sciigo, kiu mirigos vin ankoraŭ pli multe.

— Vere?

— Mi ne revenis sola.

— Ĉu sinjorino Erdedi kaj ŝia filino ankaŭ revenis?

— Ili estas ankoraŭ en Nederlando. Mi revenis kun alia persono.

— Sed kiel tio povas interesi min?

— Tio interesos vin en plej alta grado, via moŝto.

— Kiel tio povas esti ebla... Mi konas neniun, kiu iris al Scheveningen kaj en Nederlando loĝas neniu, kiu povus min interesadi.

— Tion mi mem opiniis ĝis antaŭ kelke da tagoj, sed tre stranga cirkonstanco devigis min ŝanĝi tiun opinion kaj eĉ devigis min veni ĉi tien.

— Mi fariĝas scivola.

— Kaj prave, ĉar mi retrovis en Nederlando personinon,... pri kiu en aliaj cirkonstancoj mi neniam parolus, eĉ ne kuraĝus paroli al via moŝto, sed...

La doktoro haltis kaj medite rigardis la pintojn de siaj ŝuoj.

— Vi vere faras min pli kaj pli scivola, doktoro!

— Via moŝto devas vin prepari al stranga, tre neatendita okazintaĵo...

— Vi nun ektimigas min, doktoro... Ĉu malfeliĉa...?

— Mi diris: stranga, tre neatendita.

La grafino kun miro kaj eĉ kun maltrankvileco rigardis la

vizitanton, sed vidante la esprimon de lia vizaĝo, kiu ne antaŭdiris malbonan sciigon, ŝi trankviliĝis.

— Kiun vi do trovis tie? — ŝi fine demandis.

— Iun fraŭlinon, kiun vi eble jam de longe kredis mortinta aŭ por ĉiam malaperinta.

La grafino pripensis; post momento la doktoro mallaŭte diris:

— Mi retrovis, aŭ pli ĝuste dirite, mi neatendite renkontis fraŭlinon... Branka'n.

— Ĉu... Branka Ljubiĉ...?

La doktoro kapjesis, la grafino volis ekstari, sed la sciigo tiel subite kaptis ŝin, ke ŝi restis sidanta.

— Kara Dio!... Sed kiel tio estas ebla?...

— Tion mi ankaŭ diris.

— Sed doktoro... ĉu vi pro ŝi devis reveni ĉi tien?

— Jes, via grafino moŝto... ĉar mi ne nur neatendite renkontis Branka'n, sed el tiu renkonto sekvis ankoraŭ alia neatendita renkonto.

— Kiu do!? —

La grafino diris tiujn vortojn laŭtvoĉe kaj kvazaŭ ŝi timus ion teruran aŭ ion alian... ion misteran...

— Via grafina moŝto memoras, ke Branka Ljubiĉ subite malaperis kun sia infano.

— Jes!

— Ankaŭ tiun infanon, nun juna viro, mi renkontis.

— Ŝian filon?

— Mi vidis lin en Scheveningen post kiam li savis de certa morto fraŭlinon Erdedi. Ŝi estis naĝinta tro malproksimen en la maron, ne sciante, ke tio estas tiel danĝera, kaj ĉiuj kredis ŝin perdita, kiam subite junulo sin ĵetis en la maron kaj reportis ŝin savita al ŝia patrino. Li metis la savitan knabinon antaŭ la piedoj de la patrino kaj mi kliniĝis por ekzameni ŝin, kiam subite kaj okaze miaj okuloj trafis la piedojn de la junulo, kaj mi vidis ion tre eksterordinaran, ion, kion mi nur unu fojon antaŭe vidis dum mia tuta vivo.

— Kion do!?

— Ses piedfingrojn je ĉiu piedo...

La doktoro rigardis la grafinon, kiu refoje estis leviĝonta.

Ŝi estis kadavre pala kaj sidis ŝanĉeliĝante sur sia seĝo. La doktoro rapidis al ŝi kaj ŝin subtenis, dirante.

— Trankviliĝu, via moŝto!

— Ses piedfingrojn — ŝi flustris.

— Kaj veriĝis ke tiu junulo estas la infano, kun kiu Branka malaperis...

— Sed... ĉu ŝia filo ankaŭ havis...

— Mi kiel akuŝisto ĉeestis la naskiĝon de ŝia filo, kaj ankaŭ mi ĉeestis la naskiĝon de la via, sed nur via filo havis tiajn piedojn...

— Kara Dio!... sed tiu juna viro en Scheveningen...

— Tiu junulo estas rigardata en Nederlando kiel la filo de Marta... kun falsa familia nomo, aŭ: de fremda Dorotea, kiel oni nomas ŝin tie.

— Sed doktoro!... La grafino nerveme kaptis la manojn de la resanigisto, kiu diris:

— Mi retrovis ne nur Brankan, sed ankaŭ vian filon Pavao'n.

La grafino ekstaris, sed ŝiaj genuoj fleksiĝis kaj antaŭ ol la doktoro povis malhelpi tion, ŝi sidis surgenue, preskaŭ perdante la konscion. Li helpis al ŝi residiĝi dirante:

— Mi havis la intencon antaŭprepari vin iom post iom, por ke la ĝojo ne tro multe trafu vin, sed mi rimarkas ke mi ankoraŭ ne estis sufiĉe singarda... Retrankviliĝu, via moŝto... kaj pardonu al mi mian nesingardemon.

— Je tia sciigo oni neniam povas esti sufiĉe singarda, doktoro — ŝi diris kovrante la okulojn per la manoj. La doktoro alŝovis sian seĝon flanke de la ŝia kaj atendis momenton; fine ŝi relevis la okulojn demandante:

— Kie nun estas Pavao kaj Branka?

— Branka estas venonta ĉi tien kaj la juna grafo venos post kelke da tagoj.

— Kial ili ne venis samtempe?

— Mi intencis ankaŭ venigi lin hodiaŭ, sed li volis prokrasti la vojaĝon ĝis post sia... geedziĝo.

— Geedziĝo!?...

— Jes, ĉar kiam li venos por ĉirkaŭbraki sian patrinon, li volas samtempe prezenti al via grafino moŝto sian edzinon.

— Sed, doktoro; rakontu do... kie li nun estas... kion li faris dum tiu tuta tempo... kiel li aspektas?

La doktoro fingre montris la muron, kie pendis flanke de la spegulo, fotografaĵo de juna bela viro en uniformo de husara oficiro.

— Jen, rigardu! — li diris. — Neniam du personoj estis pli similaj unu al la alia kiel tiu portreto kaj via filo. Sed via filo estas edukita kiel simpla kamparano; la rabotilo de la civilizacio ne tuŝis lin ĝis hodiaŭ. Li tamen estas belaspekta, altkreska juna viro kun la samaj brunaj okuloj, kiajn havis lia patro, sed... pordonu al mi... en lia eduko mankas multe...

— Kaj lia estonta edzino?

— Simpla kamparanino.

— Ĉu ne estos eble malebligi tiun... mezaliancon?

— Mi jam antaŭvidis, ke tiu geedziĝo estos kontraŭ via deziro, kaj verŝajne via filo mem tion suspektis, ĉar li ne volis vojaĝi al Zagreb antaŭ ol tiu geedziĝo estos plenumita. Li eĉ diris, ke li multe pli multe ŝatas tiun geedziĝon ol ĉiujn titolojn kaj ĉiun riĉaĵon de la mondo.

La grafino eligis profundan ĝemon, fine ŝi demandis:

— Kaj Branka?

— Mi venigos ŝin tien ĉi; ĉar ŝi konsentis tuj vojaĝi kun mi, por detale rakonti al via moŝto, kial ŝi forkuris kun la juna grafo, lasante en lia loko sian propran infanon. Tiu infanrabo estis krimo, sed sen tiu krimo vi nun ne posedus vian filon, ĉar la renversiĝanta muro frakasis nur jam senvivan infanon.

Nevole ŝi savis vian infanon de alie neevitebla pereo. Ni do ne estu tro severaj kontraŭ ŝi.

— Kial ŝi ne venis pli frue?

— Ŝi ne kuraĝis... sed ŝi mem rakontos al via moŝto ĉion, kion vi deziras aŭdi... Se estas permesate, mi ŝin vokos tuj en ĉi tiun salonon; ŝi atendas ekstere en la veturilo per kiu ni alvenis al la kastelo.

La grafino kapjesis kaj la doktoro eliris el la salono. Intertempe pluvegis... pluvegis... la veturilo atendis ankoraŭ. La maljuna servisto de „la tri Ĉefturoj" refoje malfermis la pordon,

samtempe forvišante brilantan guton de sur sia nazo kvazaŭ ankaŭ tiu estus elmetita de la malbona vetero.

— Mi tuj revenos — diris la doktoro, elirante tra la pordo, atendu tie ĉi.

Li rapidis al la veturilo kaj minuton poste, refoje staris antaŭ la pordo de la vilao, enkondukante la fremdan Dorotea'n.

La servisto denove fermis la pordon, denove forvišis brilantan guton de sia nazopinto, kaj malrapide sin direktis al la flanka-ĉambro por purigi la arĝentan manĝilaron, dum la du vizitantoj eniris la salonon, kie ilin atendis la grafino.

Apenaŭ ili eniris, kiam la doktoro retiris sin, lasante Dorotea'n kun la grafino.

Hezitante la iama servistino faris kelkajn paŝojn al la grafino, sed subite ŝi haltis. Ŝajnis kvazaŭ la timo ŝin retenus, sed rigardante la virinon, kiu enmociigita staris ĉe la tablo, atendante ŝian proksimiĝon, ŝi subite kuris al ŝi kaj genuante antaŭ ŝiaj piedoj, ĉirkaŭbrakis ŝiajn genuojn eksplodante je laŭta plorado.

— Ho, pardonu! — ŝi kriis levante la okulojn.

La grafino ŝin levis kaj sidigis ĉe sia flanko.

— Mi ne atendis vin por vin riproĉi — ŝi diris, — mi pli volonte devus danki vin.

— Danki?

— Jes, ĉar via forkuro kun mia infano savis lin de certa morto. En la lulilo, kie ni kredis trovi mian frakasitan infanon, ni trovis vian jam antaŭe mortintan filon... Vi volis forrabi mian filon... sed nevole vi lin savis.

Dorotea iom retrankviliĝis.

— Mia krimo tamen restas krimo — ŝi diris, tial mi petas vian pardonon kaj sendube via moŝto konsentos pardoni al mi, post kiam mi klarigos tion, kio ĝis nun al vi estis nekonata.

— Mi pardonas — diris la grafino, kaj mi ne turmentas vin senutile. Mi ne bezonas, mi eĉ ne volas tion scii, kio ne koncernas min; volu nur respondi kelkajn demandojn.

— Mi respondos ĉiujn laŭ mia povo, via moŝto.

— Via filo estis ankaŭ la filo de mia edzo, ĉu ne vere?

— Li estis la filo de la juna grafo sed ne tiu de v i a e d z o,

ĉar en la tempo, kiam li kaj mi havis sekretajn amrilatojn, la juna grafo vin ankoraŭ ne konis; sed la maljuna grafo, lia patro, kiu okaze sciiĝis pri tiuj interrilatoj, forpelis min el la kastelo. Mi estis jam graveda kaj la juna grafo intencis sekvi min eksterlanden; li donis al mi sufiĉan grandan monsumon, por ke mi vivu kelkajn monatojn en Nederlando. Mi iris tien, sed li ne sekvis min... vane mi atendis lin dum kelke da monatoj, fine mi devis dungiĝi kiel servistino en vilaĝo. Mia mastro, riĉa terposedanto baldaŭ eksciis pri mia gravedeco, kaj timante, ke la vilaĝanoj kulpigus lin, ankaŭ li forpelis min el sia domo. Mi luis ĉambreton, mia infano naskiĝis kaj kelke da semajnoj poste, kiam mi estis perlaborinta kelkan monon, mi vojaĝis returnen al Zagreb por riproĉi al mia amanto lian perfidon, sed aŭdinte ke li jam edziĝis, mi estis forkuronta el la kastelo, kiam la maljuna grafo renkontis min en la vestiblo. Li furioziĝis, piedbatis min, nomis min senhonta malĉastulino, kaj malbenis min kaj mian infanon. Terurita sed plena je venĝosento, mi forkuris eksteren kun mia infano. La nokto falis kaj ne sciante kion fari, mi rifuĝis en la ĝardenon malantaŭ al kastelo. Tie mi sidiĝis en la ĝardendometo, atendante kaj ŝpinante venĝoplanon, sed ne sciante kiel ĝin efektivigi. Subite la urbo estis trafata de terura tertremo. Mi vidis ke la malantaŭa parto de la kastelo ruiniĝis kaj ke enfalis la muroj. Teruro min kaptis kiam ankaŭ la dometo en la ĝardeno ŝanceliĝis. Mi volis forkuri el ĝi kaj mi estis transsaltanta la sojlon, kiam la konstruaĵeto enfalis. Parto de la muro trafis min kaj mi kuŝis ekstere, kovrita de amaso da ŝtonoj. Kun peno mi ekstaris, sed mia infano kuŝis en miaj brakoj kun terura vundo sur la kapo. La kompatindulo tuj mortis. Mi rapidis antaŭen, mi volis min ĵeti sub la ankoraŭ falontajn murojn de la ruiniĝanta kastelo, sed la sorto decidis, ke mi ne pereu. La tegmentoj de la konstruaĵo estis ĉiuj falintaj kaj grandaj truoj estis videblaj en la ankoraŭ starantaj murrestaĵoj. Unu el tiuj truoj apud fenestro estis tiel malalta, ke mi povis trarampi ĝin. Mi faris tion kaj estis en unu el la ĉambroj de la dekstra kastelflugilo. Meze de la ĉambro kuŝis la juna grafo sed senviva; sendube li estis kurinta en tiun ĉambron por savi la minacatan infanon,

kies lulilo staris en angulo de la ĉambro, sed dika trabo frakasis lian kapon. Mi rapidis al la lulilo kaj trovis la ankoraŭ dormantan infanon. Subite ideo min kaptis. Mi volis venĝi min kontraŭ la maljuna grafo, kiu ne nur estis piedbatinta kaj forpelinta min el la kastelo, sed kiu dum mia forestado estis deviginta sian filon edziĝi kun juna grafino por malebligi al li daŭrigi siajn amrilatojn kun filino el la burĝa klaso. La filo devis cedi al la volo de la patro kaj li estis unuiginta sian vivon kun la via. Mi ne koleris lin nek lian junan edzinon, kiun mi ne konis, kaj kiu eble nenion sciis pri mi kaj pri mia infano. Mi volis venĝi min nur kontraŭ la maljuna grafo kaj mi venĝis min, rabante lian vivantan nepon, anstataŭante tiun de mia mortinta infano. Mi tuj efektivigis la interŝanĝon kaj forkuris kun la vivanta infano, mi revenis Nederlandon, kie mi restis ĝis nun, neniam konfidante mian sekreton al iu.

Ŝi eksilentis kaj denove eksplodis en larmoj kaj la grafino diris post momento:

— Tuj post via forkuro la tuta kastelo ruiniĝis. La sekvantan tagon ni trovis la frakasitan lulilon en kiu kuŝis la mortinta infano, sed amaso da ŝtonoj el la enfalinta muro faris lin nerekonebla. Mi kredis mian infanon mortinta, sed li vivis kaj estis ekster danĝero dank'al via venĝo... tamen venĝo ĝi restas, ĉar mia bopatro ne volis konsenti ke lia filo edziĝus kun knabino el alia rango... sed, jen lia nepo, la reaperinta juna grafo nun tion faras. Sed mi preferas mian vivantan filon kun burĝa edzino ol mortinton sen edzino. —

Dorotea refoje falis surgenuen, kaptis la manojn de la grafino en la siajn kaj kovris ilin per kisoj.

— Kaj kion nun intencas fari mia filo? — fine demandis la grafino.

— Unue edziĝi, poste veni ĉi tien por ĉirkaubraki sian patrinon kaj tion li volas fari en ĉeesto de sia Eva.

— Ĉu ŝi estas honesta, bona filino?

— Pli honesta kaj pli bona ne troviĝas en la tuta mondo.

— Nu bone! Ili venu kiel eble plej baldaŭ. Volonte mi tuj irus al ili, sed la doktoro tion al mi ne permesos, ĉar kvankam

mi aspektas sana, min atakis kormalsano, kiu malebligos al mi entrepreni tian longan vojaĝon.

Ŝi sonorigis; la maljuna servisto eniris post momento.

— Petu la doktoron, ke li venu al mi!

La servisto foriris kaj tuj poste reaperis la resanigisto.

— Vi pravis, doktoro — diris ridetante la grafino.

— Pri kio, via grafina moŝto? — li demandis, residiĝante.

— Pri tio ke vi morgaŭ, aŭ postmorgaŭ returnen vojaĝos al Scheveningen. Fraŭlino Branka samtempe povos reiri al mia filo por diri al li, ke mi kun malpacienco atendos lin kaj lian Eva'n. —

— — — — — — — — — — — — —

Monaton poste la standardo refoje flirtadis sur „la Verda Ĉevalo". Aro da homoj refoje staris sur la strato kaj scivole rigardis ĉiuj en la saman direkton. Ili atendis tri veturilojn, kiuj fine aperis ĉe la stratangulo.

En la unua sidis Paŭl kaj Eva. En la dua Roos kaj la fremda Dorotea kaj en la tria sidis Alings, lia edzino kaj Dirk.

Kiam la ĉevaloj atingis la pordon de „la Verda Ĉevalo", Petro Blunt transiris la sojlon de sia domo kaj stariĝis sub la flirtanta standardo, ridetante pro feliĉo; kurbiĝante preskaŭ ĝis la strataj ŝtonoj, li deprenis sian silkan ĉapon. La ĉevaloj preterrapidis. La aŭreolo ĉirkaŭ la kapo de la drinkejestro unue radiis al la okuloj de la ĵus geedziĝintoj, poste al tiuj de Roos kaj Dorotea kaj fine al la sidantoj en la tria veturilo.

Petro restariĝis rekte kiel kandelo, surmetis la ĉapon, kiun refoje ĉirkaŭis la arĝentaj harbukloj kaj reeniris sian drinkejan ĉambron laŭte klaketante per la manplatoj dum li deklamis:

El ĉerko saltis Ŝercemul',
Li dancis tra la domo,
Kaj ĉiuj kantis: Ŝercemul',
Vi estas stranga homo,
Brave! brave! brave!!

La veturiloj ruliĝis pluen.

— Ĉu vi vidis la standardon? — demandis Paŭl al Eva.

— Ĉu vi vidis Petron? — demandis Eva.

Samspecaj demandoj ŝanĝiĝis en la dua veturilo, kaj Dirk' sinjore vestita, refoje konstruis al si aerkastelojn. Li estis aŭdinta pri la grafeco de Paŭl kaj dronante en siaj meditadoj, li pensis:

— Se mi estus grafo kiel Paŭl, mi...

Kaj li konstruadis ĝis la veturiloj haltis, poste li eliris el la veturilo kaj sekvis la nove geedziĝintojn kaj siajn gepatrojn kaj la aliajn gastojn al la vasta salono de la „Granda Garbejo", kie atendis bela festeno, ĉar pro la malgranda domo de Roos, Alings estis proponinta, ke la edziĝofesto okazus en lia bieno, kio volonte estis akceptita.

Unu semajnon poste la geedziĝo de Paŭl kaj Eva, la juna paro kun Dorotea iris al Zagreb, sed iliaj nomoj estis ŝanĝitaj en tiujn de grafo Pavao Jankoviĉ, grafino Jankoviĉ kaj fraŭlino Branka Ljubiĉ. —

ĈAPITRO XXVI.

La maljuneco de Peĉjo Blunt — La nova servisto — Alino — La kandelo por la nokto — Prave punite laŭmerite.

Pasis deko da jaroj, sed ne multaj ŝanĝoj estis fariĝintaj en la vilaĝo, ĉar vilaĝoj longe restas tiaj kiaj ili estas. La loĝantoj malofte transloĝiĝas en aliajn domojn; ili estas preskaŭ ĉiuj la posedantoj de siaj hejmoj; la dometo en kiu ili naskiĝis, estis ankaŭ la naskiĝoloko de iliaj gepatroj kaj ofte de iliaj geavoj; tiaj domoj malaperas nur kiam pro malnoveco ili fariĝos neloĝeblaj. En la vilaĝo, kie staris „La Verda Ĉevalo" troviĝis do multaj tiaj malnovaj konstruaĵoj, sed unu el la plej malnovaj estis la drinkejo de Petro Blunt. Ĝi estis tiel malnova, ke la muroj restis starantaj nur dank'al sia malalteco, kaj la tegmento ne enfalis, ĉar nur paseroj, kornikoj kaj sturnoj sidiĝis kaj iris sur ĝi; sed se homo kuraĝus paŝi de unu kamentubo al la alia trans la supro de la tegmento, li eble trafalus rompante al si la krurojn sur la plankon de la subtegmentejo, aŭ eble li eĉ falus tra tiun plankon, ĉar ankaŭ tiu estis tiel malnova kaj

vermotruita, ke neniu homo kuraĝus plu suriri ĝin, kaj nur la musoj kaj ratoj longan tempon regis tie kiel mastroj ĝis la katino de Bursma formanĝis aŭ fortimigis ĉiujn.

La muroj tamen estis sufiĉe dikaj kaj fortikaj por porti ankoraŭ kelkan tempon la tegmenton, sed la pli alta pinta fasado de „la Verda Ĉevalo" jam tute kurbiĝis kaj ofte piediranto kun malfido rigardis ĝin de malsupre kvazaŭ timante, ke ĝi falus sur lian kapon. Sed Peĉjo plene fidis sian malnovan domon kiel fidelan kamaradon, kaj opiniis ke ĝi sen danĝero povos kontraŭstari ventegon kaj la tempon dum ankoraŭ multaj jaroj. Li sekve ne vokis masoniston nek ĉarpentiston, por ke ili riparu la malnovan konstruaĵon. Nek Alino pensis pri io tia, sed pro alia motivo. Ŝi pensis: riparado kostas multan monon kaj ŝi ne amis elspezi, ŝi amis nur enspezi kaj ŝi enspezadis kiel eble plej multe, elspezante preskaŭ nenion. Vespere antaŭ ol la patro enlitiĝis, ŝi prenis de li la monon, kiun li estis ricevinta dum la tago kaj metis ĝin flanken. Peĉjo ne kontraŭstaris; li ne demandis kiom da mono ŝi jam kolektis laŭ tiu maniero, ĉar li sciis ke ŝi evitus la respondon. Krome li pensis: mia filo, la instruisto havas sian oficon kaj sian ĉiutagan panon, li estas nun sana, do ne bezonas esti maltrankvila pri la estonteco; sed Alino, la jam maljuniĝanta Alino, ne havas oficon, sekve ŝi sentas maltrankvilon pri la estonteco; ŝi do ŝparu kaj gardu (kiel diras la proverbo) kandelon por la nokto.[319] Sed tiu kandelo fariĝis pli kaj pli dika, pli kaj pli longa. La tiel sparitan monon Alino bone kaŝis. Ŝi gardis ĝin kiel la pupilon de sia okulo, sed neniam venis en ŝian kapon la ekpenso, ke la duono de tiu kandelo laŭleĝe apartenus al ŝia frato post kiam la patro estos mortinta. Ŝi nur pensis: Ĉiu zorgu por si mem. Alino estis ankoraŭ fraŭlino, la filon de Baŭman ŝi estis fortimiginta per siaj malvarmaj rigardoj kaj granda indiferenteco, kaj neniu alia fraŭlo en la vilaĝo deziris ŝin kiel sian edzinon. Ŝi mem tion sciis, tial ŝi malamis ĉiujn virojn. Oni nomis ŝin vera „bareleto da acidiĝinta biero" kaj ofte Petro malĝojis, vidante ŝian acidan mienon; ofte li pensis kun ĉagreno: Kia karaktero!... kia humoro! sed li ne kapablis ŝanĝi tiun karakteron nek tiun humoron kaj ĉiam momenton

poste lia vizaĝo jam denove sereniĝas kaj laŭte kunfrapante siajn manojn li deklamis sian poemeton.

De post la foriro de Dirk, alia servisto estis dungita; tia servisto ankoraŭ nun estis en „la Verda Ĉevalo". Li estis hipokrita, malgrasa fraŭlo kvindekjara, parolis malofte, konstante grimacridetis kaj montris ĉe tiuj okazoj du vicojn da longaj flavaj dentoj. Li estis ekstreme humila, obea, eĉ laboranta se oni lin atentis, sed li ŝteliris tra la domo kiel iu, kiu konstante havas sekretajn intencojn. Peĉjo ne amis kaj ne ŝatis lin, sed ĉar li ne postulis altan salajron, li restis en la domo, ĉar Alino konsideris lin profita; liajn grimacojn ŝi ne atentis, kvankam ŝi ne fidis la serviston; sed kian malutilon li povus kaŭzi? Ŝteli li ne povis, ĉar ŝtelindaj objektoj ne estis en „la Verda Ĉevalo" kaj la „kandelon por la nokto" ŝi gardadis tiel zorge, ke ne estis eble forpreni ĝin. Tiel staris la aferoj en „la Verda Ĉevalo".

Ankaŭ rilate al aliaj loĝantoj en la vilaĝo nur malmultaj ŝanĝoj estis okazintaj.

Alings kiel vera ido de Cereso prilaboris siajn kampojn; lin helpis kiel eble plej bone lia filo Dirk, kiu tamen estis ankoraŭ la sama stultulo. Vane oni klopodis instrui al li skribadon kaj legadon; post kelka tempo la instruisto ne plu venis por instrui lin. Sed lia amo al kunikloj estis ankoraŭ ĉiam la sama. Plezure li dediĉadis sian liberan tempon por prizorgi ilin kaj neniu kontraŭstaris lin en tio.

La muelisto Bursma havis nun dek-du filojn kaj eĉ ne unu filinon. Neniu sciis, ĉu li ankoraŭ nokte sekrete enŝteliris en la muelejon por preni iom da greno el la sakoj, konfiditaj al liaj zorgoj, sed Peĉjo estis certa, ke la muelisto tion plu ne faras post kiam la vila mano tiel maldelikate lin tuŝis.

Klaj neniam plu estis ebria, verŝajne tiu sama vila mano tiel timigis lin, ke li ne plu kuraĝas trinki sian „lastan" glaseton da branda; tial li estis fariĝinta membro de la blua butono *).

Erasmus ofte faris poemojn, sed ne povis trovi eldoniston,

*) Abstinenculo, tio estas persono pro principo ne uzanta alkoholaĵon. Abstinenculoj portis (ankoraŭ nun portas) „bluan butonon" sur la jako.—

kaj ĉar li ne havis filon aŭ filinon, kiu poste povus ilin eldoni, la poemoj de tiu vilaĝa poeto sendube neniam aperos.

Baŭman estis bankrotinta[320] antaŭ ses jaroj, kaj laboris de post tiu tempo kiel simpla dungita kamparano jen ĉe unu, jen ĉe alia farmisto aŭ terposedanto. Lia filo Johano iris post la bankroto de sia patro Amerikon kaj oni nenion plu pri li aŭdis.

Paŭl estis aĉetinta la farmon de sia estinta mastro kaj mastrumadis ĝin kiel posedanto. Nur kelke da tagoj li estis pasiginta kun Eva en Zagrab. Tiu urbo kun siaj fabrikoj ne plaĉis al li, nek al lia edzino. Tial ili reiris al sia vilaĝo, kie ili volis resti ĝis sia morto. La grafino estis mortinta antaŭ kvin jaroj, postlasinta al Paŭl siajn fabrikojn kaj aliajn riĉaĵojn, kiujn perantoj administradis por li.

La tagoj, semajnoj, monatoj kaj eĉ jaroj forflugis unu post la alia; naskiĝis novaj vilaĝanoj, kelkaj mortis, ĉiuj maljuniĝis, sed plej multe maljuniĝis Peĉjo Klakilo. Li estis nun preskaŭ centjara kaj kvankam li ne sentis sin tia maljunulo, li iom post iom konsciis ke liaj fortoj plimalgrandiĝis. Antaŭe li povis labori en sia ĝardeno, iri de farmejo al farmejo por aĉeti bovinojn aŭ ĉevalojn kaj neniam li sin sentis laca, sed en la lastaj monatoj li kelkfoje devis ripozi, — tio lin mirigis. Ĝis tiu tempo li bone povis legi la ĵurnalon surmetinte la okulvitrojn, sed ŝajnis al li ke la okulvitroj eluziĝis, li tute ne pensis, ke liaj okuloj eluziĝis. Ofte en lumaj tagoj li ne plu povis vidi la pinton de la preĝeja turo kaj li pensis de la tagoj fariĝas pli malhelaj ol en lia juneco. Tamen Peĉjo ne perdis la kuraĝon, li konstante pensis, ke post pluvo venas sunbrilo kaj post suferoj ĉiam venas prosperoj. La sunbrilo tamen ne plu aperis antaŭ liaj maljunaj okuloj, nek revenis la atendata prospero, ĉar precipe dum la lasta monato la turpinton konstante kovris densa nebulo, kaj la okulvitroj fariĝis tiel malbonaj, tiel eluzitaj, ke Peĉjo ne plu povis uzi ilin, li eĉ ne plu povis legi la ĵurnalon, li ĉagreniĝis, sed ne perdis la kuraĝon. Li pensis: la turpinto ja reaperos; post kelke da tagoj mi refoje povos uzi miajn okulvitrojn; lia vizaĝo sereniĝis kaj li bonhumore kunfrapis la manplatojn, deklamante sian poemon.

Ian fojon okazis, ke li ne povis memori kiam estas lia naskiĝtago kaj li cerbumis pri tio; li petis, ke Alino diru, en kiu tago estos la naŭdek-tria datreveno de lia naskiĝtago kaj treege ŝi mirigis lin dirante, ke li estos baldaŭ naŭdek-naŭjara. Kien do estis forflugintaj tiuj ses jaroj? Li cerbumis pri tio, refoje ĉagreniĝis, sed li estis kuraĝulo kaj viro kun bona humoro jam de sia juneco; lia vizaĝo do denove sereniĝis.

Fine alproksimiĝis tiu naŭdek-naŭa datreveno de lia naskiĝo, sed denove li devis demandi pri la „dato", ĉar denove li ĝin forgesis. Li pensis: Kiel stranga tio estas: antaŭe mi sen peno povis memori tiun daton, sed en la lastaj tagoj ĝi senrevene ĉiam denove forglitas el mia kapo. Li kelkfoje eĉ forgesis kelkajn strofojn de sia deklamaĵo kaj li ektimis, ke tio estas la komenco de la fino. Nu! li ofte diris al si: mi estas jam naŭdek... naŭdek-kvar... ne, jam naŭdek-ses? — jarulo, kaj mi devas esti danka, ke la bona Dio tiel longe indulgis min. Fine li sentis ke la morto alproksimiĝas, sed li ne timis la morton, ĉar ĉiam li estis honesta por ĉiuj, kaj la vila mano neniam bezonis surprizi lin: la vila mano tuŝas nur homojn, kiuj bezonas tiun tuŝadon, li pensis; ho, ke ĝi ankaŭ fojon tuŝu lian Alinon; sed Alinon ja ne impresos tia tuŝado; ŝia koro estis tro malmola... tiel malmola ke aliformiĝo estos neebla. Kaj Peĉjo refoje malĝojis.

Du tagojn poste li sentis ke lia kapo turniĝas; li ne povis plu pensi, ĉio nebuliĝis ĉirkaŭ li kaj li enlitiĝis.

Tiun nokton Alino ŝteliris el la ĉambreto kie li kuŝis, kaj eniris la familian ĉambron. Ŝi antaŭvidis, ke la patro estas mortonta kaj ŝi volis kalkuli kiom da mono ŝi jam metis flanken.

Estis malhela nokto, la ĉielo estis tute nigra, ĉar nek steloj nek luno estis videblaj.

Alino ŝteliris al sia vestokesto, staranta en angulo; ŝi portis lampeton kun kupra reflektoro en la mano kaj metis ĝin ĉe sia flanko sur seĝon, tiel ke la lumo falis internen de la kesto, kies kovrilo, nun apogis al la muro. Ŝi ŝovis flanken kelkajn vestojn kaj aperigis nigran ŝtrumpon. En tiu ŝtrumpo ŝi gardis jam longan tempon sian „kandelon por la nokto", [319] la ŝparitan monon, kies duono fakte nur apartenos al ŝi, post la morto

de la patro. Sed Alino estis kredigînta al si, ke tiu tuta kandelo estas ŝia, ke ŝia frato ne havas ian rajton je ĝi, ĉar li havas bonan oficon, do li povas esti kontenta. Pli ol unu fojon ŝi estis skribinta al li, ke patro ne posedas monon, ke la mastrumado kostas tiom kaj ke la patro enspezis preskaŭ nenion en la lastaj jaroj, ke li ne plu perlaboras per bovinoj kaj ĉevaloj, unuvorte ke li postlasos neniun monon kaj ke la heredaĵo konsistos nur el la domo, kiu tamen nun estas tiel malnova kaj tiel kaduka, ke ĝi ne valoras la kostojn de riparado kaj ke tial ŝi eĉ ne intencas pri tio venigi ĉarpentiston, nek kolorigisto nek iun alian por ripari la „Verdan Ĉevalon".

Niko kredis al sia fratino; li estis honesta, fidanta viro, kiu ne pensis aŭ suspektis ion malhonestan. Li eĉ estis decidinta, ke la eluzita domo post la morto de lia patro fariĝos la propraĵo de Alino.

Alino, kiu tion sciis, ridetadis. Ŝi malligis nun la rubandon, kiu ĉirkaŭis la ŝtrumpon kaj eltiris el ĝi paketon da monbiletoj. Ŝi ilin kalkulis: Kvar mil guldenoj — ŝi flustris, per avidaj okuloj rigardante la biletojn. Ŝi metis ilin sur la randon de la kesto kaj ŝovis la manon en la ŝtrumpon, ĉar en la ŝtrumpo ŝi gardis krom la biletoj, aron da arĝentaj moneroj. Ŝi palpis ilin per la fingroj dum ili glitis tien kaj reen en ŝia mano. Ŝi aŭdis la mallaŭtan tintadon de la moneroj kaj refoje eklumis siaj okuloj pro avideco. En la sama tempo la flamo de la lampeto iom flagris.[321] Alino ĝin rimarkis kaj ĵetis rapidan rigardon dekstren, ĉar tie staris la lampeto; sed ŝi vidis nenion. Nevole ŝi pensis pri sia patro kuŝanta tutsola en la ĉambreto supre kaj kiu eble mortos ĉi tiun nokton; nevole ŝi pensis pri liaj manklakadoj kaj pri lia deklamaĵo, kiu tiel ofte tedis kaj malbonhumorigis ŝin, nevole ŝi pensis pri la vila mano, kiu laŭ la certigo de ŝia patro vere ekzistas. Alino kunpremis la lipojn sed tuj poste ŝi flustris grumblante: Sensencaĵo!... babilaĵo... infanaĵo!...

Refoje la flamo de la lampeto flagris kaj refoje Alino rigardis dekstren, sed nenio estis videbla, tamen ŝajnis al ŝi ke triafoje la flamo flagras kaj kvazaŭ tiun flagradon kaŭzas io moviĝanta ĉe ŝia maldekstra flanko. Tial ŝi rigardis maldekstren, sed

ankaŭ tie ŝi vidas nenion, ĉar ĉio tie kaj post ŝi estis nigre malluma pro la reflektoro de la lampeto, kiu ĵetis la tutan lumon antaŭ ŝi en la keston kaj sur la supren starantan kovrilon.

— Sensencaĵo! — ŝi denove flustris, sed jen io kraketis malantaŭ ŝi sur la planko, sed la planko estas tiel malhela kiel la tuta ĉirkaŭajo.

— Sensencaĵo! — flustris Alino kaj denove rigardante antaŭ si, palpis la arĝentajn monerojn.

Subite trans ŝia dekstra ŝultro soviĝis io duone lumigita de la lampoflamo. Longa brako kun nigraj, vilaj, starantaj haroj ŝoviĝis antaŭen, kvin malpuraj fingroj, aspektantaj kiel ungegoj de rabobirdo rapidis malsupren, kaptis la paketon da monbiletoj de la kestorando kaj tuj poste fulmrapide la brako retiriĝis, kunportante la monon kaj malaperante en la mallumon.

Alino eligis akran ekkrion de teruro, falis brustantaŭe sur la keston kaj estis svenonta; sed ŝiaj nervoj estis fortaj, ŝi baldaŭ rekonsciigis, salte leviĝis, sin turnis kaj jen antaŭ ŝi tra la alten ŝovita fenestro glitis malsupren nigra ombro, ĝi svingis la vilan manon kun la monbiletoj. Ekstere aŭdiĝis obtuza bruo kvazaŭ iu rapide forkuris nudpiede kaj ĉio refoje senbruiĝis.

Alino denove eligis krion, rapidis al la fenestro, ŝovis la kapon eksteren kaj sur la strato ŝi vidis apenaŭ distingeblan fantomon, kiu tuj poste kuniĝis kun la nokta mallumo.

Ŝi saltis tra la fenestro kaj io malmola dolorigis ŝiajn senŝuajn piedojn. Ŝi sin klinis, pripalpis la teron kaj trovis du lignajn ŝuojn. Tuj ŝi pensis pri la lignaj ŝuoj de la servisto; ŝi reensaltis la ĉambron, kaptis la lampon kaj kuris al la bovinejo, poste al la lito, sur kiu kutimis dormi la servisto... La lito estis malplena.

— Li min priŝtelis! — kriis Alino, sed kion ŝi devos fari kontraŭ tio? Neniu kredos al ŝi, kaj al la frato ŝi estis skribinta, ke la patro kaj ŝi estas ambaŭ tute senmonaj.

— Mizerulo! — ŝi kriis, sed komprenante ke nenio estos farebla krom silentadi, ŝi eliris la bovinejon kaj rapidis supren al la ĉambreto, kie kuŝis ŝia patro... Sed ŝi venis tro malfrue! Petro kuŝis senmove, liaj okuloj estis fermitaj, liaj manoj kuŝis

unu en la alia sur la litkovrilo kvazaŭ li lastfoje estis kunfrapinta ilin. La lampeto de Alino lumigis lian noblan, palan vizaĝon, la verto de lia kapo estis blanka kiel neĝo kaj la arĝentaj harbukletoj ĉirkaŭantaj ĝin kiel brilanta aŭreolo tiel hele radiis al la okuloj de lia filino, ke ŝi ne povis ĝin elporti. Ŝi deturnis la kapon, falis surgenue kaj senespere ĝemkriis.

— Ho, kompatema Dio... helpu al mi!

FINO

ENHAVO.

Paĝo.

Ĉapitro I. „La Verda Ĉevalo" kaj kio okazis tie — Peĉjo Klakilo — Lia servisto — Aerkasteloj — La klientoj de „La Verda Ĉevalo" — Kelkaj Idoj de Cereso 5

Ĉapitro II. Daŭrigo de la unua ĉapitro — Vigla interparolado — La vila mano — Alings — Fremda Teodora 27

Ĉapitro III. Dumnokta vizito de urba profesoro — Du pacientoj — Paŭl 41

Ĉapitro IV. Refoje en „la Verda Ĉevalo" — La stultulo enkondukas neatenditan gaston — Stranga lotado. 59

Ĉapitro V. Kvar Idoj de Cereso iras hejmen meznokte — Ilia interparolado — Stranga aventuro de Klaj. 71

Ĉapitro VI. Bursma, la muelisto iras hejmen meznokte — La aventuro en la muelejo — Kial li volis pendigi Fulgon 80

Ĉapitro VII. Erasmus, la vilaĝa poeto iras hejmen meznokte kun stranga ansero — Pri du monstroj — Erasmus kaj lia edzino — Kiel ili vekiĝas, matenmanĝas kaj interparolas 88

Ĉapitro VIII. Iom pri politiko — Alino kaj Dirk iras melki — Pri kio Alino aspiras — Pri perdita kaj retrovita ansero — Peĉjo, la edzino de la muelisto kaj Fulgo — Letero, kiu kaŭzas disputon 97

Ĉapitro IX. La vila mano fariĝas ĉiekonata — Erasmus verkas poemon pri „Patrina Amo" kaj kiel li estas interrompita — Vigla interparolado inter Erasmus kaj Ksantipo — Paŭl 111

Paĝo.

ĈAPITRO X. Ĉe Blink la vilaĝa barbiro — Liaj klientoj kaj lia nova kunhejmano — Paŭl ekaŭdas ke monstroj ne ekzistas — Paŭl kaj la infanoj de Blink 123

ĈAPITRO XI. Alings la luphomo — Alings sur la digo kaj sur la kampoj — Li aŭskultas interparoladon pri si mem — Stranga plugado — Novaj intencoj de Alings 134

ĈAPITRO XII. Refoje ĉe la razisto — Neatendita regalo — Dirk kaj Alings — Peĉjo en sia elemento — Dirk ne dormas plu apud porkoj 148

ĈAPITRO XIII. La festo de la sankta Martino — Stranga kanto — Truda kaj Alings — Kial Peĉjo Klakilo staras sub flirtanta standardo — Novaj aerkasteloj de Dirk. 159

ĈAPITRO XIV. Paŭl — Lia juneco — Paŭl sur la digo — Liaj revoj kaj aspiroj — Paŭl kaj Eva — Juna amo . 169

ĈAPITRO XV. Lotado kaj kolektado de rekrutoj — Paŭl devas loti — Kion Idoj de Cereso pensas pri Marso — En la lotejo — Paŭl lotas — La katido — Ido de Cereso kontraŭ Ido de Marso — La hundo-ĉaro — Peĉjo refoje en sia elemento 181

ĈAPITRO XVI. Kion Eva pensas pri Paŭl — Kion Paŭl pensas pri Eva — Kiel knaboj de vilaĝo sin amuzas kun ranoj kaj kiel ilia amuzo subite estas interrompita — Paŭl kaj Eva 193

ĈAPITRO XVII. Paŭl en malbona reputacio sed ne ĉe ĉiuj — Paŭl, Baŭman kaj la akcioj — Paŭl iras urbon kaj pri tio, kion li spertas tie 204

ĈAPITRO XVIII. Baŭman kaj lia familio — Pri geedziĝo kaj doto 215

ĈAPITRO XIX. En „la Verda Ĉevalo" — Paŭl kaj Baŭman — La akcioj — Du strangaj bildoj — Peĉjo solvas malfacilan problemon — Alino denove en kolera humoro 220

ĈAPITRO XX. Ĉe Baŭman — Refoje pri geedziĝo kaj doto — Interparolado de Peĉjo kaj Paŭl kaj kial Paŭl iros al Haag — Lasta aminterrilato inter Johano kaj Alino. 232

Paĝo.

Ĉapitro XXI. Paŭl al Haag — Liaj aventuroj en granda urbo — Kion li pensas pri tiuj urboj — La gasflamo. 236

Ĉapitro XXII. Paŭl vekiĝas sub strangaj cirkonstancoj — Paŭl en banurbo kaj lia aventuro — Piedoj kun ses piedfingroj 253

Ĉapitro XXIII. Petro Blunt en sia ĝardeno — La reveno de Paŭl — Stranga ĵurnalanonco — Neatendita korespondado de Petro Blunt 260

Ĉapitro XXIV. Kio okazis en la dometo de fremda Dorotea — Fremdaj gastoj — La gepatroj de Paŭl — Dorotea konfesas — Paŭl sur la digo — Liaj meditatoj— Paŭl kaj Eva 266

Ĉapitro XXV. Pri fremda urbo — Ne atenditaj okazintaĵoj — Branka Ljubiĉ kaj la tertremo — Grafo Pavao Jankoviĉ 276

Ĉapitro XXVI. La maljuneco de Peĉjo Blunt — La nova servisto — Alino — La kandelo por la nokto — Prave punite laŭmerite 288

VIDU LA SAMAJN NUMEROJN * EN LA VORTARETO.

A

	No.*
Agronomio	*45
areno	61
almozulejo	79
angoro	90
akuŝistino	95
adopti	100
adjunkt-	141
aspiri	144
absurda	149
aŭreolo	150
ardi	151
aktoro	165
alproprigi	182
aluviaĵo	184
alfluo	214
akcio	218
amputi	232
arogi	236
ambicio	258
absurdaĵo	260
arĝentigi	265
arbitracianto	274
aso	283
akcidento	299

B

bufedo	7
brakoj de muelilo.	35
bastardo	58
blasfemo	116
bildo	131
barbiro	152
beto	203
banko	263
budo	306
blazono	317
bankroto	320

C

	No.
Cereso	2
cirko	60
cerbumi	159
cirkuli	252

D

digo	64
damtabulo	65
disko	67
Drento	69
diagnozi	72
diskuti	80
duonpantoflo	87
destini	101
dialogo	164
diafana	177
dorno	189
deponi	272
dekreto	301

E

ebriiĝi	33
egoisto	55
ektremo de palpebro	59
emocio	92
ekvilibro	106
enspezoj	120
eventuala	145
enkorpiganto	147
elkulturi	183
episkopo	202
enregimentigi	229
ellaciĝi	240
elmetejo	261
enmiksi sin	273
elirejo	277
emblemo	295
elakviĝi	309

F

fojnokrado	9
foiro	11
fiaĵaro	17
Fingreto	30
flegma	34
flugiloj de muelilo	35
flustri	49
fundo	51
fetoro	62
frontono	66
fremdulo	81
financa	91
flagri	124
frazo	130
fajrokesteto	175
fajrovazeto	176
flago	209
freŝa faro (ĉe la)	286
ferfadeno pikilhava	294
fazeolo	312
frapkontuzi	316

G

grunti	16
giganto	29
grumbli	53
garantii	99
galerio	121
geadoptintoj	153
gravuri	166
guteti	194
gravedeco	207
golfo	213

No.

grenadisto 233
grifelo 246
giĉeto 266
gratifikacio..... 275

H

heziti 94
hurli 123
hufnajlejo 142
hordeo 199

I

imponi 24
indiki..... 63
intuicie 115
interkonsento 168
iluzio 217
inciti 223
invento..... 227
intence 247
individuo 249
interkomunikado . 287
inaŭguri 297

Ĵ

Ĵurnalo 311
ĵaluzio 318

K

Klakilo 3
kliento 4
kalva 5
konkordo 26
klaĉfamo 27
kulturisto 28
kirli 42
konversacio..... 50
komunumo 57
kreskaĵa barilo... 73
koridoro 75
kadavro..... 76
kontakti..... 83
komplekso 84
kolono 85
konvulsie 93
konstati 96
kontrasti 118
konturo 119
kvadrato..... 122

No.

kaŭri..... 132
kukolo 133
knarbrui..... 137
konkurso 155
konsternita 162
kitelo 171
kokosnukso 173
kuratingi 206
kriple..... 210
kazerno 231
konvulsie..... 238
kontroli 254
kvitanco 255
kurso 256
kvitiĝi 257
kupeo 280
karoo 282
kontoro 288
kupolo 291
kanajlaro 293
kavaliro 296
krano 303
kajo 304
kapturniĝo 314
kandelo por la nokto 319

L

Lof der Zotheid . 22
ludkubeto 23
longfoso 44
lundisko 67
lakone 74
luprezo 77
lukso 127
luphomo 180
lolo 187
liniilo..... 193
lampiono..... 204
laŭleĝa..... 234
legomoj 242
lambastono 245
laŭtrafe 262
labirinto 289

M

mopso 18
mediti 19
matraco 32

No.

medicino 54
mardigo 64
makadama vojo .. 68
motivo..... 97
mizerulo 108
malvarmumi 112
monstro 128
militpaŭzo 143
Meduzo 163
megero 167
metamorfozo 198
mezalianco 208
maleolo 226
multaĝeco 253
mergi..... 308

N

nerva 103
nivelo 104
nesingardemo 310

O

Oleografaĵo 6
oblikve 10
okulumi 41
obtuza 109
oleoplantaĵo..... 185
orelmembrano.... 285

P

pumpilo 12
poento 21
pantalono..... 31
pilolo 39
plafono..... 47
petrolo 52
paciento 56
palpebro 59
peniko 70
prelego 71
pulso..... 78
perspektivo 82
pigmeo 88
provizore 89
pereanto 98
protesti 105
problemo 107
perfortaĵo 110
pulminflamo 113
protesti 125

	No.
pedagogia	129
premio	153
pantoflo	161
premfermi	170
pozo	188
provoki	192
premsonĝo	195
propra-impulse	196
praktiki	200
pulpo	205
polipo	216
pigmeo	220
pupilo	221
perfortulo	250
propra-iniciate	259
pupitro	264
provizore	271
piedestalo	298
ponto supermara	305

R

Refuti	37
rezignacie	38
ringo	86
religia	114
riverenci	134
retorika	154
ritmo	160
ruband-mezurilo	197
refluo	215
rento	219
respubliko	228
rezult(at)o	230
rekremento	270
rajtigito	279
radŝiri	292
reputacio	315

S

Stultulo	13
svarmi	15
sinsekve	20
superregi	36
superstiĉa	46
sofo	111
speciale	117
sapumi	169
sceno	138
senŝarĝiĝo	172
straba	174
saltbastonego	181
senloligi	187
sulko	190
subfosi	191
solvo	211
serpentumi	222
situacio	224
sonora	225
serĝento	235
salivo	239
spekuli	241
superruzi	244
sensencaĵo	251
spekulativa	267
spekuli	268
sondi	278
sereniĝi	313

Ŝ

ŝanco	102
ŝarko	307

T

traveturejo	8
trogo	14
tumulto	25
tirano	40
trafe maltrafe	43
teretaĝo	48
trodorloti	126
trilado	136
triumfo	139
titoli	157
tibikarno	178
tirputo	179
trifolio	186
terursonĝo	195
trudemulo	276
tamburado	281
tunelo	290

U

uragano	243

V

Vila	1
veŝto	135
voĉdoni	140
vekto	148
verso	156
viziero	237
viktimo	267

Z

zigzagiri	146

LA VILA MANO.

Idoj de Cereso.

Por ebligi la legadon al Esperantistoj, parolantaj la holandan, francan, anglan aŭ germanan lingvojn, sed kiuj nur dum mallonga tempo studis Esperanton, ni kompilis ĉi tiun vortareton. Ĝi enhavas nur tiujn vortojn de la romano (kun klarigoj en kvin lingvoj) kies signifo sin ne trovas en la Ŝlosiletoj de Ĉefeĉ. En la kompilado de la vortareto kunlaboris fraŭlinoj J. H. J. v. d. Plas kaj A. C. Malsch.

1. La vila mano = De ruige hand, de klauw | La griffe, La serre | The claw | Die Tatze.
2. Cereso = Ceres (godin van den akkerbouw) | Céres, déesse de l'agriculture | Ceres, goddess of village and corn | Ceres, Göttin des Ackerbaus.
3. Klakilo = Ratel, Babbelaar | Crécelle, Babillard, Jaseur | chatterbox | Plauderer, Schwätzer, Plaudermaul.
4. kliento = klant | chaland | customer | klient, Kunde.
5. kalva = kaal | chauve | bald | kahl.
6. oleografaĵo = oleographie | oléographie | olegraph | Oleographie.
7. bufedo = buffet | buffet | bar | Schänktisch.
8. traveturejo = doorrit | hangar d'attente | thoroughfare | Durchfahrt.
9. fojnokrado = ruif | râtelier | stable-rack | die Raufe.
10. oblikve = schuin | obliquement | sloping | schräg.
11. foiro = markt | marché aux chevaux | horse-fair | Markt.
12. pumpilo = pomp | pompe | pump | Pumpe, Brunnen.
13. stultulo = stompzinnige | stupide | a weakminded person | Blödsinniger.
14. trogo = trog | auge | trough | Trog.
15. svarmi = zwermen, wemelen | formiller, groviller | to swarm | wimmeln.
16. grunti = knorren | grogner | to grunt | grunzen, knurren.
17. fiaĵaro = ontuig | canaille | brood; scum | Gesindel.
18. mopso = (mops(hond) | (chien) carlin | pug-dog | Mops.
19. mediti = overpeinzen | méditer | to meditate | nachsinnen, nachdenken.
20. sinsekve = achtereenvolgens | successivement | one by one | hinter einander.

21. poento = punt, oog op een dobbelsteen | point | spot | das Auge.
22. Lof der Zotheid = een beroemd boekwerk | Eloge de la Folie | praise of foolishness | das Lob der Torheit.
23. ludkubeto = dobbelsteen | dé | die | Würfel.
24. imponi = ontzag inboezemen | en imposer | to inspire | Respekt einflöszen.
25. tumulto = rumoer, lawaai | tumulte, tapage | noise | Lärm.
26. konkordo = eendracht | concorde | concord, harmony | Eintracht, Einigkeit.
27. klaĉfamo = kletspraatjes | commérage | gossip, idle talk | Klatscherei, Geschwätz.
28. kulturisto = landbouwer | agriculteur | farmer | Landwirt, Landmann.
29. giganto = reus | géant | giant | Riese.
30. Fingreto = Klein Duimpje | Tom Pouce | Tom Thumb | Däumling.
31. pantalono = broek | pantalon | trousers | Hose, Beinkleider.
32. matraco = matras | matelas | mattress | matraze.
33. ebriiĝi = dronken worden | s'enivrer | to get drunk | sich betrinken.
34. flegma = flegmatiek | flegme | phlegma | phlegmatisch.
35. flugiloj (brakoj) de muelilo = wieken | ailes de moulin à vent | sails of a mill | die Flügel der Mühle.
36. superregi = overheerschen | dominer | to prodominate | überherrschen.
37. refuti = weerleggen | réfuter | to refute | widerlegen.
38. rezignacie = gelaten, gedwee | résigné | resignedly | gelassen.
39. pilolo = pil | pilule | pill | Pille.
40. tirano = tiran, onderdrukker | tyran | tyrant | Tyrann.
41. okulumi = knipoogen | cligner des yeux | to give a wink | zwinkern, blinzeln.
42. kirli = roeren | agiter | to stir | rühren.
43. trafe maltrafe = op goed geluk | ad hazard | at haphazard | aufs Geratewohl.
44. longfoso (= kanaleto) = sloot | fossé | ditch | der Graben.
45. agronomio = landbouwkunde | agronomie | agriculture | Landwirtschafts lehre.
46. superstiĉa = bijgeloovig | superstitieux | superstitious | abergläubisch.
47. plafono = plafond | plafond | ceiling | die Decke.
48. teretaĝo = beneden verdieping | rez-de chaussée | groundfloor | Erdgeschösz.
49. flustri = fluisteren | chuchoter | to whisper | flüstern.
50. konversacio = gesprek, conversatie | conversation | conversation | Gespräch.
51. fundo = bodem, achtergrond | fond | background | der Hintergrund, der Boden.
52. petrolo = petroleum | pétrole | paraffin-oil | Petroleum.
53. grumbli = mopperen | grommeler | to grumble | grollen, brummen.
54. medicino = medicijn | medecine | medecine | Medizin.

55. egoista = zelfzuchtig | égoïste | selfish | selbstsüchtig, selbstisch.
56. paciento = patient | patient | patient | Patient.
57. komunumo = gemeente | commune | municipality | Gemeinde.
58. bastardo = onecht kind | bâtard | natural child | Bastard.
59. ektremo de palpebro = oogwenk | clin d'oeil | twinklin; jiffy | Augenwink, Augenblick.
60. cirko = circus | cirque | circus | Zirkus.
61. areno = arène | arena | Arena.
62. fetoro = stank | puanteur | stink, stench | Geruch, Gestank.
63. indiki = aanwijzen | indiquer | indicate | zeigen.
64. mardigo = zeedijk | digue de la mer | sea-dike | Deich.
65. dama tubulo = dambord | damier | draught-board | Dambrett.
66. frontono = voorgevel | frontispice | front | Vordergiebel.
67. lundisko = maanschijf | disque de la lune | dix of the moon | Mondscheibe.
68. makadama vojo = grintweg | chemin de gravier | macadam road | Kiesweg.
69. Drento = Drenthe (provincie) | Province hollandaise (Drente) | Province of Drente (Dutch province) | Drente (Provinz).
70. peniko (aŭ kvasto) = kwast | houppe | brush | die Quaste.
71. prelego = voorlezing | lecture | lecture | Vorlesung.
72. diagnozi = diagnoseeren | diagnostiquer | to diagnose | diagnostiszieren.
73. kreskaĵa barilo = haag | haie | hedge | die Hecke, der Zaun.
74. lakone = laconiek | laconique | laconical | lakonisch.
75. koridoro = gang | corridor | passage | korridor, Hausflur.
76. kadavro = lijk | cadavre | corpse | Leichnam, Leiche.
77. luprezo = huur (prijs) | prix de location | rent | Miete.
78. pulso = pols | pouls | pulse | Puls.
79. almozulejo (aŭ malriĉulejo) = armhuis | hospice, maison de charité | workhouse | das Armenhaus, die Armenanstalt.
80. pridiskusi = bespreken | discuter | to discuss | besprechen.
81. fremdulo = vreemdeling | étranger | foreigner | Fremder.
82. perspektivo = verte | lointain | distance | Ferne.
83. kontakti = grenzen aan | être en contact | to adjoin | grenzen an.
84. komplekso = komplex | tout | block: chister | Komplex.
85. kolono = zuil | colonne | column | Säule.
86. ringo = ring | anneau | ring | Ring.
87. duonpantoflo = slof | savate | slipper | Schloppschuh.
88. pigmeo = dwerg | pygmée | dwarf | Zwerg.
89. provizore = voorloopig | provisoirement | previous | vorläufig.
90. angoro = angst | angoisse | anxiety | Angst.
91. financa = financieel | financier | financial | finanziell.
92. emocio = emotie | emotion | emotion | Emotion, Rührung.
93. konvulsie = stuiptrekkend | convulsif | convulsively | konvulsiv.
94. hezito = aarzeling | hésitation | hesitation | Zaudern.

95. akuŝistino = vroedvrouw | sagefemme | midwife | Hebamme.
96. konstati = constateeren | constater | to state | konstatieren.
97. motivo = beweegreden | motif | motive | der Beweggrund, das Motiv.
98. peranto = tusschenpersoon | intermédiaire, médiateur | mediator; go-between | Zwischenperson.
99. garantii = instaan voor | garantir | to guarantee; to warrant | haften, bürgen.
100. adopti = als kind aannemen | adopter | to adopt | adoptieren.
101. destini = bestemmen | destiner | to intend | bestimmen.
102. ŝanco = kans | chance | chance | Möglichkeit.
103. nerva = zenuwachtig | nerveux | nervous | nervös.
104. nivelo = hoogte, niveau | niveau | level | Niveau, Höhe.
105. protesti = protesteeren | protester | protest | protestieren.
106. ekvilibro = evenwicht | équilibre | balance | Gleichgewicht.
107. problemo = vraagstuk | problème | problem | Problem.
108. mizerulo = ellendeling | mizerable | wretch | Elender.
109. obtuza = dof | sourd | dull | dumpf.
110. perfortaĵo = geweldplegerij | acte de violence | violence | Gewalttätigkeit.
111. sofo = sofa | sopha | sofa | Sopha.
112. malvarmumi = verkouden worden | s'enrhumer | to catch a cold | sich erkälten.
113. pulminflamo = longontsteking | inflammation du poumon | pneumonia | Lungenentzündung.
114. religia = godsdienstig | religieuze | pious; religious | religiös.
115. intuicie = instinctmatig | intuitif | instinctively | instinktiv.
116. blasfemo = godslastering | blasphème | blasphemy | Fluch, Gotteslästerung.
117. speciala = speciaal | spécial | special | speziell.
118. kontrasti kun = afsteken, tegen | contraster | to contrast, to be ontlined | sich von einander abheben.
119. konturo = omtrek | contour | ontline | Umrisz, Kontur.
120. enspezoj = inkomsten, ontvangsten | revenues | earnings | Einkünfte.
121. galerio = galerij | galerie | gallery | Galerie.
122. kvadrato = vierkant | carré | square | viereckig.
123. hurli = huilen | hurler | to cry | schreien.
124. flagri = flakkeren | déflagrer | to flicker | flackern.
125. protesti = protesteeren | protester | to protest | protestieren.
126. trodorloti = verwennen, vertroetelen | gâter | to spoil | verwöhnen, verzärteln.
127. lukso = weelde | luxe | luxury | Luxus.
128. monstro = monster, gedrocht | monstre | monster | Ungeheuer.
129. pedagogia = opvoedkundig | pédagogique | pedagogical | pädagogisch, erzieherisch.
130. frazo = volzin | phrase | sentence | Satz.
131. bildolibro = prentenboek | livre d'images | picture-book | Bilderbuch.

132. kaŭri = hurken | s'accroupir | to cower | kauern.
133. kukolo = koekoek | coucou | cuckoo | Kuckuck.
134. riverenci = een buiging maken | faire la révérence | to curtsey | sich verbeugen, eine Verbeugung machen.
135. vesto = vest | gilet | waistcoat | Weste.
136. trilado = triller | trilo | trill | Triller.
137. knarbrui = knarsen, piepen | grincer | to grind | knarzen, knirschen.
138. sceno = tooneel | spectacle | scene | Szene.
139. triumfi = triomfeeren | triompher | to triumph | triumphieren.
140. voĉdoni = stemmen | voter | to vote | abstimmen.
141. adjunkt-urbestro = raadslid | membre du conseil municipal | member of the town council | Ratsmitglied.
142. hufnajlejo = hoefstal | travail | shoeing-forge | Hufstall.
143. militpaŭzo = wapenstilstand | trêve | armistice; truce | Waffenstillstand.
144. aspiri = hunkeren | aspirer | to long; to hanker | sich sehnen nach.
145. eventuala = eventueel | éventuel | eventual; if this be the case | eventuell.
146. zigzagiri = zigzagsgewijs loopen | décrire des zigzags | to zig-zag | im Zickzack gehen.
147. enkorpiganto = verpersoonlijking | personnification | personification | Verpersönlichung.
148. vekto = juk | fléau (de balance) | yoke | Joch.
149. absurda = ongerijmd | absurde | absurd | ungereimt.
150. aŭreolo = stralenkrans | auréole | halo | der Nimbus.
151. ardi = gloeien | être en feu | to flush | glühen.
152. barbiro = barbier | barbier | barber | der Haarschneider.
153. geadoptintoj = pleegouders | parents adoptifs | foster-parents | Pflegeeltern.
154. retorika = rederijkers | rhétorique | rhetorician | Rhetoriker.
155. konkuro = wedstrijd | concours | match | Wettkampf.
156. verso = vers | vers | verse; lines | Vers, Lied.
157. titoli = betitelen | titrer | to bear the title of | titulieren.
158. premio = prijs | prime, récompence | prize | Belohnung.
159. cerbumi = tobben | se rompre la tête | to worry | sich den Kopf zerbrechen.
160. ritmo = rhythme, maat | rythme | rythm | Metrum.
161. pantoflo = pantoffel | pantoufle | slipper | Pantoffel.
162. konsternita = beteuterd, verslagen | consterné | dumbfounded, confused; perplexed | konsterniert.
163. Meduzo = Medusa (een der Gorgonen, haar aanblik deed den beschouwer in steen veranderen | Meduse, une des trois Gorgones, ces yeux avaient la force de transformer en pierre tous ceux qu'elle regardait | Medusa | Medusa.
164. dialogo = tweespraak | dialogue | dialogue | Dialog.
165. aktoro = acteur | acteur | actor | Schauspieler.

166. gravuri = graveeren | graver | engrave | gravieren.
167. megero = helsche furie | mégère | megara | Furie, Megäre.
168. interkonsento = overeenkomst | arrangement | agreement | Übereinkunft.
169. sapumi = inzeepen | savonner | to soap | einseifen.
170. premfermi = dichtknijpen | fermer avec force | to close firmly | zukneifen.
171. kitelo = kiel | jaquette | blouse | Blouse.
172. senŝarĝiĝo = verlichting | soulagement | relief | Linderung.
173. kokosnukso = cocosnoot | noix de coco | cocoanut | Kokosnusz.
174. straba = scheel | louche | squinting | scheel.
175. fajrokesteto = stoof | chaufferette | foot-warmer | Fuszwärmer.
176. fajrovazeto = test | réhaud de chaufferette | fire-pan | der Feuertopf.
177. diafana = doorzichtig | diaphane | diaphanous | durchsichtig.
178. tibikarno = kuit | mollet | calf | Wade.
179. tirputo = rolput | puits | well | Brunnen.
180. luphomo = weerwolf | loup-garon | wer(e)wolf, manwolf | Wehrwolf.
181. saltbastonego = polsstok | perche pour sauter | fen-pole | Springstock.
182. alproprigi = toeeigenen | s'approprier | to appropriate | zueignen.
183. elkulturi = ontginnen | défricher | to reclaim (ground) | Urbar machen.
184. aluviaĵo = aangeslibd land | alluvion | alluvial soil | sngeschwemmtes Land.
185. oleoplantaĵoj = koolzaad | colza, râpe | cole-(rape-) seed | Raps, Kohlsaat.
186. trifolio = klaver | trèfle | clover | Klee.
187. senloligi = wieden (van onkruid ontdoen) | sarcler | to weed | jäten.
188. pozo = houding | port, maintien | position | Haltung.
189. korno = horen | corne | horn | Horn.
190. sulko = voor, rimpel | sillon | wrinkle | Falte.
191. subfosi = ondermijnen | miner | undermine | untergraben.
192. provoki = uitdagen | defier, provoquer | to dare | herausfordern.
193. liniilo = liniaal | règle | ruler | Lineal.
194. guteti = druppelen | dégoutter | to drip | tropfen.
195. terursonĝo } = nachtmerrie | cauchemar | nightmare | das Alpdrücken.
195. premsonĝo }
196. propraimpulse = uit eigen beweging (aandrang) | spontanément | of one's own accord | aus eigner Bewegung.
197. ruband - mezurilo = band, lint om mee te meten | tape measure | Band.
198. metamorfozo = gedaanteverwisseling | métamorphose | metamorphosis | Metamorphose.
199. hordeo = gerst | orge | barley | Gerste.
200. praktiki = beoefenen | exercer une profession | to practise | ausüben.
202. episkopo = bisschop | évèque | bishop | Bischof.

203. beto = beetwortel | betterave | beet-root | Rübe.
204. lampiono = lampion | lampion | chinese lantern | Papierlaterne.
205. pulpo = pulpe | pulpe | pulp | Pulpe.
206. kuratingi = inhalen | attraper en courant | to overtake | einholen.
207. gravedeco = zwangerschap | grossesse | pregnancy | Schwangerschaft.
208. mezalianco = huwelijk beneden z'n stand | mésalliance | mis-alliance | Mesalliance.
209. flago = vlag | drapeau | flag; colours | Fahne.
210. kriple = gebrekkig, gebroken | écorché | broken | gebrochen.
211. solvo = oplossing | solution | solution | Lösung.
212. giganto = reus | géant | grant | Riese.
213. golfo = inham | baie | cove; bay | Meerbusen, Bucht.
214. alfluo = vloed | flux | tide | Flut.
215. refluo = eb | reflux | ebb | Ebbe.
216. polipo = poliep | polipe | polype | Polyp.
217. iluzio = illusie | illusion | illusion | Illusion.
218. akcio = effect | action | stocks and shares | Effekt.
219. rento = rente | rentes | interest | Zins.
220. pigmeo = dwerg | pygmée | dwarf | Zwerg.
221. pupilo = oogappel | pupille de l'oeil, prunelle | apple of the eye | Augenstern.
222. serpentumi = kronkelen | serpenter | to wind | sich winden.
223. inciti = prikkelen | irriter | to irritate, to vex | reizen.
224. situacio = toestand | situation | situation | Zustand.
225. sonora = helder klinkend | sonore | sonorous | sonor.
226. maleolo = enkel | cheville du pied | ancle | Knöchel am Fusz.
227. invento = uitvinding | invention | invention | Erfindung.
228. respubliko = republiek | république | republic | Republik.
229. enregimentigi = inlijven | incorporer | incorporate | einverleiben.
230. rezultato = resultaat | resultat | result | Erfolg, Resultat.
231. kazerno = kazerne | caserne | barracks | Kaserne.
232. amputi = afzetten | amputer | amputate | amputieren.
233. grenadisto = grenadier | grenadier | grenadier | Grenadier.
234. laŭleĝa = wettig | légitime | lawful | gesetzlich.
235. serĝento = sergeant | sergent | sergeant | Sergeant.
236. arogi = aanmatigen | s'arroger | to be impudent | sich anmaszen.
237. viziero = klep | visière | peak | Schirm.
238. konvulsie = stuiptrekkend | convulsif | convulsively | konvulsiv.
239. salivo = speeksel | salive | saliva | Speichel.
240. ellaciĝi = uitgeput worden | épuiser | to be exhausted | sich erschöpfen.
241. spekuli = speculeeren | spéculer | to speculate | spekulieren.
242. legomoj = groente | légume | vegetables | Gemüse.
243. uragano = orkaan | ouragan | hurricane | Orkan.
244. superruzi = in slimheid overtreffen | être plus malin que | to outwit | einen an Schlauheit übertreffen.

245. lambastono = kruk | béquille | cruth | Krücke.
246. grifelo = griffel | crayon d'ardoise | slate-pencil | Griffel.
247. intence = opzettelijk | à dessein, de propos délibéré | on purpose | absichtlich.
248. malfavore konsiderata = slecht aangeschreven | étant en mauvaise réputation | of a bad reputation | schlecht angeschrieben.
249. individuo = individu | individu | individual | Individuum.
250. perfortulo = geweldenaar | despote | usurper | Tyrann, Despot.
251. sencensajo = onzin | non-sens | nonsense | Unsinn.
252. cirkuli = de ronde doen | circuler | to spread | die Runde machen.
253. multaĝeco = hooge ouderdom | vieillesse | old age | hohes Alter.
254. kontroli = nakijken | contrôler | to control | kontrolieren.
255. kvitanco = kwitantie | quittance | receipt | Quittung.
256. kurso = koers | cours | rate | Kurs.
257. kvitiĝi = schuld vereffenen | s'acquitter envers qn. | to pay one's debt | Schuld ausgleichen.
258. ambicio = eerzucht | ambition | ambition | Ehrgeiz.
259. proprainiciate = uit eigen beweging | de son propre mouvement, spontanément | of one's own accord | aus eigner Bewegung.
260. absurdajo = ongerijmdheid | absurdité | absurdity | Absurdität.
261. elmetejo = uitstalraam | étalage | show-window | Schaufenster.
262. laŭtrafe = op goed geluk af | d'aventure, par aventure | at hap hazard | aufs Geratewohl.
263. banko = handelsbank | banque | bank | Bank.
264. pupitro = lessenaar | pupitre | desk | Pult.
265. arĝentigi = verzilveren | argenter (changer en monnaie | to realize | realisieren.
266. giĉeto = loket | guichet | pay-desk | Schalter.
267. spekulativa = speculatief | speculatif | speculative | spekulativ.
268. spekuli = speculeeren | spéculer | speculate | spekulieren.
269. viktimo = dupe, slachtoffer | victime | victim | Opfer.
270. rekremento = spoeling | drèche, mares | swillings | Spülung.
271. provizore = voorloopig | provisoirement | for the time being | provisorisch.
272. deponi = deponeeren | déposer | to deposit | deponieren.
273. sin enmiksi = zich bemoeien | se mêler de | to meddle with | sich kümmern um.
274. arbitracianto = scheidsrechter, arbiter | arbitraire | arbitrator | Schiedsrichter.
275. gratifikacio = gratificatie | gratification | bonus | Gratifikation.
276. trudemulo = indringer | intrus | intruder | Eindringling.
277. elirejo = uitweg | issue | a way out | Ausweg.
278. sondi = polsen | sonder | to sound | sondieren.
279. rajtigito = gevolmachtigde | plénipotentiaire | attorney; authorized person | Bevollmächtigter.

280. kupeo = coupé | compartiment | compartment | Abteil, das Coupé.
281. tamburado = geratel | bruit de roues | noise of the wheels | Gerassel.
282. karoo = ruiten | carreau (cartes) | diamonds | Karo, Rauten.
283. aso = aas | as | ace | As.
284. svarmi = wemelen | fourmeller | to swarm | wimmeln.
285. orelmembrano = trommelvlies | membrane | drum of the ear | Trommel fell.
286. ĉe la freŝa faro = op heeterdaad | en flagrant délit | in the act | auf frischer Tat.
287. strata interkomunikado = straatverkeer | trafic de la rue | traffic | Straszenverkehr.
288. kontoro = kantoor | bureau | office | Büro.
289. labirinto = doolhof | labyrinthe | labyrinth | Labyrinth.
290. tunelo = tunnel | tunnel | tunnel | Tunnel.
291. kupolo = koepel | coupole (dôme) | dome | Kuppel.
292. radŝiri = radbraken | rouer | to break upon the wheel | radebrechen.
293. kanajlaro = gepeupel | populace (canaille) | mob | Gesindel.
294. pikilhava ferfadeno = prikkeldraad | fers barbalés | barbed wire | Stacheldraht.
295. emblemo = zinnebeeld | emblême | emblem | Sinnbild.
296. kavaliro = ridder | chevalier | knight | Ritter.
297. inaŭguri = onthullen | inaugurer | inaugurate | enthüllen.
298. piedestalo = voetstuk | piédestal | pedestal; foot | Sockel.
299. akcidento = ongeluk, ramp | accident | accident | Unglück.
300. bufedo = buffet | buffet | bar | Schanktisch.
301. dekreto = besluit, verordening | décret | decree | Entschlusz.
302. matraco = matras | matelas | mattress | Matraze.
303. krano = kraan | robinet | cock | Hahn.
304. kajo = kade | quai | quay | Kai.
305. supermara ponto = pier | jetée | pier | Hafendamm, Pier.
306. banveturileto = badkoets | voiture de bains | bathing-box | Badehaúschen.
307. ŝarko = haai | requin | shark | Hai.
308. mergi = duiken | s'immerger | to dive | tauchen.
309. elakviĝi = weer boven komen | émerger | to emerge | wieder hoch kommen.
310. nesingardemo = onvoorzichtigheid | imprudence | imprudence | Unvorsichtigkeit.
311. ĵurnalo = courant | journal | newspaper | Zeitung.
312. fazeolo = boon | haricot | bean | Bohne.
313. sereniĝi = ophelderen, opklaren | s'éclaircir | to brighten | sich aufheitern. / serena = helder | serein | bright; clear | klar, hell, heiter.
314. kapturniĝo = duizeligheid | vertige | dizziness | Schwindel.
315. reputacio = goede naam | réputation | good reputation | guter Ruf (Name).

316. frapkontuzi = stooten | heurter | to knock | toszen.
317. blazono = wapenschild | blason | coat of arms | Schild.
318. ĵaluzio = zonneblind | persienne | venetian blind | Jalousieladen.
319. kandelo por la nokto = een appeltje voor de dorst | un tirelire pour la veillesse | to lay by something for a rainy day | einen Notgroschen zurücklegen.
320. bankroti = bankroet gaan | faire faillite | to fail | Bankerott machen.

TABELO DE KOREKTAĴOJ.

Paĝo	linio		
7	19	legu:	Peĉjo transiris la teran plankon
7	34	„	senplumigotaj
60	11	„	lian ekzemplon
64	2	„	ŝajnigas kvazaŭ
67	31	„	notinta
73	29	„	iri tutsola
81	24	„	sennuba beleco
83	19	„	senmove
87	16	„	sekundojn;
91	10	„	sonorajn
91	15	„	ekklaketis,
91	17	„	sia domo
92	6	„	neniun
92	9	„	birdeto per
94	4	„	venanta de
96	13	„	triumfis
97	1	„	ŝin
97	30	„	Kaj pro tio parto
99	15	„	deklamoj
100	24	„	plugilon kaj
100	36	„	forkuregis
101	23	„	parolas
101	36	„	direktataj
106	16	„	tre
107	13	„	kurbigis
113	5	„	de kiu
119	1	legu:	bruligas
121	13	„	meze
123	22	„	gravan
123	25	„	literaturajn fruktojn
125	10	„	Ĉiuj estis
126	18	„	razataj
133	35	„	patrina
141	12	„	tiu kutimo
152	5	„	droniganta
158	12	„	muro
176	25	„	etendantaj
181	17	„	kvinjarajn
192	16	„	ĉapo
197	13	„	tie
204	35	„	io ridinda
215	3	„	li estas
217	8	„	devizon,
220	29	„	spionobservos
222	29	„	anst. dupo. trompito
224	24	„	anst. la tion: tion
243	15	„	la alian
251	9	„	anst: sian longan: longan
263	20	„	unua fojo
277	27	„	venis nur malofte
278	30	„	rifuĝejon
290	26	„	nur unu filinon

LASTA RIMARKO.

Grenkomercisto, aŭdinte pri la ŝteladoj de nia muelisto, ridetante rimarkis, ke oni falsas farunon ne per akvo, sed per muelitaj kalkaĵo kaj kretaĵo. Mi tial supozas ke la kruĉo de Bursma estis plenigita per tia miksâjo anstataŭ per akvo. La [illegible]egantoj pardonu al mi tiun eraron.

KANTO „SANKTA MARTINO" EN LA ORIGINALA DIALEKTO (p. 160).

Hailge Sunter Meerten,
Kòjen drògen steerten,
Ossen drògen horens,
Klokken drògen torens,
Torens drògen klokken,
Vrow'n drògen rokken,
Jonges drògen brouken,
Ol viev'n zitten ien houken,
Bakken dikke pannekouk
Drei vinger dik
Al zunner schik.
Hier woont 'n rieke man,
Dei ons wel wat geven kan.
Zuum nait lang, zuum nait lang
Van mien keerske is hòst verbrand!
Geef mie'n appel of 'n peer
Den koom ik haile joar nait weer!